# ESPERANTO EN AUSTRALIO
# 1905-1985
# (HISTORIO DE AEA)

Ray Ross
(Brisbane 1985)

Komisiita de Aŭstralia Esperanto Asocio kiel kontribuo al la Centjara Jubileo de Esperanto.

Dankesprimoj,

La aŭtoro sincere dankas al la sekvantaj kunlaborantoj: Carson Thomas el Toowoomba, kiu per prilaborilo kompostis la enhavon; Trevor Steele el Brisbano, kiu finkontrolis la verkadon; John Paroz el Brisbano, kiu prizorgis la kovrilon. Ankaŭ al la sekvantaj anoj de AEA kiuj volonte kontribuis necesan informadon aŭ iel respondis al help-petoj: Ralph Harry, Herbert Koppel, Bob Felby, Mac LeFevre, Chris Dean, Harry Torr, F-ino Win Addis, S-inoj Annie Spencer, Winsome Greenhalgh, Ruth McGrath, Peggy Ross, Marj Duncan, Marj Ellyard, Joan Green kaj estraroj de SES kaj E-Federacio de NSK.

La aŭtoro tributas al fontoj de informado jene: La Suda Kruco, La Rondo, The Australian Esperantist, Latrobe Valley Esperantist (Pioniroj de Esperanto en Aŭstralio, de Ivan Maddern), The British Esperantist (1911-1920), Jarlibroj de UEA kaj IEL, Nigra Cigno, Telopeo, Melbourne Esperanto News, SUKRO, Historio de la Esperanta Movado en Okcidenta Aŭstralio (1911-1945, de C. Caldera), Esperanto en Perspektivo, Enciklopedio de Esperanto, La Aŭstralia Nacia Esperanto-Biblioteko kaj Brisbana Esperanto-Muzeo.

Ray Ross,

Brisbano, 1985.

Presita de Brisbana Edukada Centro, Brisbano.

ISBN 0 9595336 6 4

## D E D I Ĉ 0

ESPERANTO EN AŬSTRALIO
estas dediĉita al ĉiuj esperantistoj kiuj strebis progresigi la Internacian Lingvon en nia lando, de la fruaj pioniraj tagoj, ĝis hodiaŭ.

Ray Ross, Brisbano, 1985

ESPERANTAJ PIONIROJ

Vin homarkonflikto
strebi al la nobla celo
insprita de l' interna
sento de la verda stelo

Inter homoj batalantaj
pro malfid' kaj bigoteco,
vi fajreron ekbruligis pri
ide' por libereco:

Nur per interkomprenado
povas ni akiri pacon,
kaj de fiaj militistoj
gajni la kapitulacon.

Vi ĉi tiun instruaĵon
disvastigis tra la tero
kaj en korojn konsternitajn
plantis semon de espero.

Kiam fine realiĝos
ĉiuj viaj pacdeziroj,
agnoskigos via rolo
Esperantaj Pioniroj.

Gaye Phillips, Brisbano, 1981.

**E N H A V T A B E L O**


| | | |
|---|---|---|
| Dediĉo. | | Paĝo |
| Enkonduko. | | 1 |
| Ĉapitro 1 | Origino de Esperanto en Aŭstralio. | 4 |
| | Origino de AEA. | |
| 2 | | |
| 3 | Asocioj, Societoj, Kluboj, Grupoj, Federacioj. | |
| 3(a) | Sud-Aŭstralio. | 8 |
| 3(b) | Okc. Aŭstralio. | 13 |
| 3(c) | Tasmanio. | 22 |
| 3(e) | Kvinslando. | 26 |
| 3(d) | Nova Sudkimrujo. | 41 |
| 3(e) | Viktorio. | 54 |
| 3(f) | Kanbero. | 68 |
| 4 | Kongresoj (AEA). | 72 |
| 5 | Oficialaj Organoj, Eldonaĵoj. | 86 |
| 6 | Bibliotekoj, muzeoj. | 90 |
| 7 | Delegita Reto, 1909-1985. | 94 |
| 8 | Esencaj kaj Asociaj Ĉeneroj de AEA. | 100 |
| 9 | Somerlernejoj de AEA. | 106 |
| 10 | Esperantaj Grupoj el Nov-Zelando kiuj aliĝis al la Aŭstralazia E-Asocio. | 110 |
| 11 | Pri la Proponita Universala Kongreso - Brisbano, 1908. | 113 |
| | Mallongigoj. | 116 |

**E N K 0 N D U KO**

(al la Historio de Esperanto en Aŭstralio)

Opinioj varias pri la valoro de historio. Henry Ford (henri fod) diris, ke historio estas pli malpli sensensaĵo. Hegel epigramis, ke "tio, kion sperto kaj historio instruas estas, ke homoj kaj registraroj neniam lernas ion el historio". Aliaj estis malpli pesimistaj. Schiller (sile) diris, ke la monda historio estas la mondjuĝejo. Schlegel (slegel) diris, ke historiisto estas renversa profeto. Mi kredas, ke la historio devas celi almenaŭ tri servojn al la komunumo kiun ĝi kronikas.

Unue, ĝi registru, kaj tiel certigu, la kontinuecon de la komunumo, ĉu nacio aŭ pli malgranda socio. Se ni scias, ke ni estas parto de daŭrema societo ni pli bone fidas al la estonto en malfacilaj periodoj, kaj komprenas pli bone niajn triumfojn.

La dua celo de la historio estas averti kontraŭ eraroj kaj danĝeroj. Nur se oni scias pri la misdecidoj kaj misagado de la pasinteco estas eble eviti freŝajn erarojn kaj rezisti la allogadon de la falsaj profetoj de la nuno.

Sed la plej grava tasko de la historio estas doni al ni heroojn kaj modelojn. Ni nepre devas honorigi tiujn, kiuj dediĉis sian laboradon, siajn financajn rimedojn, eĉ siajn vivojn por nia komunumo kaj ties aspiroj. Q. S. Tertullian diris, ke "la sango de kristanoj estas semo", kaj ĉerte la suferoj de esperantistoj sub la diktatoroj estis inspiro al sekvantaj generacioj.

Ray Ross kaj liaj kunlaborantoj, precipe S-ro E. C. Thomas, faris grandan servon al la Aŭstralia Esperanto-Asocio, verkante ĝian historion. Ni ĉiuj nun povas senti la kontinuan sinsekvon de la asocia agado, la ritmon de la kongresoj, la preskaŭ apostolan transdonon de oficoj, la konstantecon de nia organo. Ni povas studi la sukcesojn kaj malsukcesojn kaj lerni la kialojn. Kaj ni legos la nomojn de la mil kaj unu personoj, fidelaj se ne heroaj, kiuj kreis kaj konservis la Asocion kaj vere estis la Asocio.

Mi esperas, ke nia historio estos interesa kaj utila ne nur al membroj de AEA kaj al la familioj de tiuj kiuj rolas sur ĉi tiu j paĝoj, sed ankaŭ al Esperantaj organizaĵoj kaj individuaj samideanoj ĉie en la mondo. Ĉar la Esperanta Komunumo estas tutmonda, kaj la Esperanta Movado bezonas konstantan identecon, avertojn, sed super ĉio modelojn kaj heroojn.

Ralph Harry en Canberra/Kanbero
Januaro, 1986.

## Ĉapitro 1

## O R I G I N O   D E   E S P E R A N T O   E N   A Ŭ S T R A L I O

D-ro Zamenhof donis al la mondo sian Internacian Lingvon en aŭgusto 1987, kiam li publikigis, en la rusa lingvo, sian libron "La Internacia Lingvo de D-ro Esperanto": Kiam do, Esperanto alvenis en Aŭstralio? Fakte, post nur du jaroj. Jam en la jaro 1889 Zamenhof notis la ricevon de leteroj el Aŭstralio, kaj en lia Dua Adresaro aperas la nomoj de la plej fruaj adeptoj - D. G. Rienits kaj Herman Ritz.

En 1889, D. G. Rienits kaj H. Ritz varbiĝis en la Monda Esperanta Ligo, starigita de D-ro Zamenhof tiun saman jaron. D-ro Zamenhof eldonis 29 periodajn listojn da Lig-membroj inter la jaroj 1889-1909. En tiuj listoj troviĝas la nomoj de 102 Aŭstraliaj Esperantistoj, laŭ ŝtatoj jene: el Viktorio, 33; el Nova Sud-Kimrujo, 21; el Kvinslando, 16; el Sud-Aŭstralio, 15; el Okcident-Aŭstralio, 8; el Tasmanio, 9. (Vidu liston de ĉi tiuj pioniroj je la fino de la Ĉapitro). Plejparte ĉi tiuj pioniroj de Esperanto en Aŭstralio iniciatis individuajn klubojn kaj grupojn precipe en la ŝtataj ĉefurboj de la kontinento, sed pro la relativa neneceso de helplingvo en unulingva lando, progreso de la Internacia Lingvo estis relative malrapida.

LA PLEJ FRUAJ GRUPOJ: La unua klubo en Aŭstralio estis la Melburna Esperanta Klubo, fondita de S-ro John Booth la 10an de februaro 1905. Dum la unuaj du jaroj, 79 anoj aliĝis (laŭ Zamenhofa Listo), sed ne ĉiuj loĝis en la urbo mem aŭ eĉ en la antaŭurboj; kelkaj rezidis en aliaj partoj de Viktorio, naŭ en Nova Sud-Kimrujo, kaj unu en Sud-Aŭstralio. Verŝajne en 1905 la Melburna Klubo estis la Tut-Aŭstralia Klubo! Tamen en aliaj ĉefurboj, pioniroj aŭ instruis aŭ prelegis pri Esperanto. S-ro W. Schoch, Brisbano 1905, prelegis pri la Internacia Lingvo dum publika kunveno; S-ro C. Wittber kaj S-ro C. A. Uhrlaŭb, Adelaido 1906, faris prelegojn; S-ro E. Pryke, 1906, en Maitland starigis studgrupon kaj instruis la lingvon.

La 31an de januaro 1906, en Brisbano, dum ĝenerala kunveno, estis fondita la Brisbana Esperanto-Klubo; entute estis 37 anoj el kiuj 15 estis anoj de la Ligo de Zamenhof; prezidanto, P.Fewings; sekretario, H.Kay.

En 1908 S-ro Herman Ritz, unu el du pioniraj Aŭstralianoj de la Ligo de Zamenhof, kaj tiam lekciisto pri modernaj lingvoj ĉe la Universitato en Hobarto, Tasmanio, starigis Esperanto-Klubon en tiu urbo; estis 7 anoj en la frua grupo.

Ĉe Gosford, Nova Sud-Kimrujo, 1908, S-ro George Collingridge fondis la unuan klubon en tiu ŝtato; prez. G. Collingridge; sekr. P. Holdsworth. (En la nacia ĉefurbo, Kanbero, estas strato Collingridge, kiu omaĝas al la memoro de tiu pioniro.)

Benalla Esperanto-Klubo fondiĝis en 1908 kun 28 anoj; gvidanto kaj instruisto, D-ro A. E. Barrington.

Ankaŭ, 1908, en Adelaido, S-ro C. A. Uhrlaub fondis la unuan klubon en Sud-Aŭstralio; sekr. estis W. D. Smith.

Grupo en Warburton, Viktorio, en 1908 starigis Esperanto-Klubon tie; sekr. F-ino I. C. Noar; ano, F-ino L. A. Ward.

En Tumut, NSK 1908, Pastro W. Kennedy fondis la klubon, Ĉiela Lumo Gvidu; sekr.F-ino R. Beuzeville.

Ĉe Sidnejo, 1909, stariĝis la Zamenhofa Klubo, dum ĝenerala kunveno sub la gvidado de S-roj F. E. Wallace kaj H. Gadsen

En Perto, Okcident-Aŭstralio, 1911, fondiĝis la Nigra Cigno Esperanto-Klubo; aktivuloj: S-roj J. D. Davies, T. F. O'Donoghue, J. Skurrie kaj G. F. Payne. Ankaŭ ĉe Fremantle, Okcident-Aŭstralio, tiun saman jaron S-ro Colin Unwin iniciatis grupon.

Ĉe Glenelg, Sud-Aŭstralio, 1911, instruis grupon S-ino J. Lumsdon.

W. L. Edmanson en 1912 starigis la Komercan Klubon en Melburno, la duan klubon en tiu urbo.

(Legu pri aliaj postaj grupoj kaj kluboj en Ĉapitro 3 - en tiu ĉapitro estas ampleksa informado rilate al ĉiu ŝtato kaj ties historio.)

**LAŬŜTATAJ ANOJ - UNIVERSALA LIGO DE ESPERANTISTOJ - 1889 ĝis 1909.**

VIKTORIO: D-ro A. E. Barrington, D-ro S. McBurney; S-ro j G. Almgren, John Booth, J. Caldwell, F. E. Cobb, George Gordon, G. C. Hodgson, W. H. Hood, A. M. Hyde, J. Lang, R. G. Niall, Stuart Reid, A. Sheldrick, E. E. Spring, I. J. Tampion, C. W. Thonger, W. H. Vogt, H. K. Walker, G. Whiteford, E, Williams; D-rino L. Alexander; S-inoj M. Booth, M. T. Dacomb, M. D. Harrison, J. E. Newport, T. G. Noar; F-inoj F. Booth, R. Booth, A. Campbell, H. E. Cross, H. McDowell, E. A. Sinnotte.

NOVA SUD-KIMRUJO: Pastro W. D. Kennedy; S-roj J. Bailes, F. Briorly, J. F. Cobbe, G. Collingridge, L. A. Cotton, A. F. Lawlers, G. S. Lusby, R. J. Matchett, W. F. Ponder, D. G. Rienits, H. Ritz, H. B. Savage, L. Thomas, Nahum Levitin, E. A. Pryke; F-ino j A. L Benedict, R. Beuzeville, Joan Cobbe, D. Marshall, E. E. Bauer.

KVINSLANDO: D-ro Richard Rendle; Lt.Kol. C. F. Plant; S-ro j C. Brockway, J. H. Cadell, P. P. Fewings, R. Rendle, R. M. Rice, W. Schoch, R. J. Thomson, G. A. Waller, J. Woodsley; S-inoj C. Brockway, W. Fison, K. R. Nicholson, F. M. Waller; F-ino Marion Fraser.

SUD- AŬSTRALIO: D-ro W. Lamb; S-roj W.Hogg, F. H. Lewis, J. Patterson, C. Piggott, R. J. Sellars, W. D. Smith, C. A. Uhrlaub, C. Wittber; S-ino A. W. Porter; F-inoj V. E. Olivent, M. L. Robertson, J. M. Watson, J. L. Wilson, E. Williams.

OKCIDENT- AŬSTRALIO: S-roj D. Davies, P. D. Good, G. Hannah, R. T. Jackson, Cammus Longueville, D. Maclennon, J. L. Stow; F-ino K. M. Fane.

TASMANIO: S-roj T. Bennett, A. Steele, A. J. Winterton; S-inoj M. Steele, A. C. Kennedy; F-ino j R. Garrett, C. Travers, D. C. Wilson, D. E. Wilson.

-

# Ĉapitro 2

## O R I G I N O   D E   A E A

Dum la entuziasma kaj triumfa periodo de la unua Aŭstralia Esperanto-Kongreso en Adelajdo, 1911, la partoprenantoj starigis Aŭstralian Esperanto-Asocion sed, bedaŭrinde, pro diversaj kialoj, kaj malgraŭ eĉ pli sukcesa dua kongreso en Melburno, 1912, la Asocio stagnis kaj velkis. Post la tria Aŭstralia Kongreso en Sidnejo, 1920, kaj plejparte instigita de la apero de revuo, "La Suda Kruco", la nacia asocio alprenis la titolon, Aŭstralazia Esperanto-Asocio, ĉar kelkaj grupoj el Nov-Zelando kontribuis raportojn kaj monsubtenon al tiu revuo. En la jaro 1934 "La Suda Kruco", precipe pro financaj malfacilaĵoj, ne plu eldoniĝis; mortis samtempe la Aŭstralazia Esperanto-Asocio. En 1935 aperis "La Suda Kruceto", (SUKRO), Esperanto-Gazeto private eldonita de Joab Eljot. Rezulte de instigado kaj rekta agado de tiu "neordinara" esperantisto (vidu 6.3) la 11an de oktobro 1937, Aŭstralia Esperanto-Asocio denove stariĝis; Joab Eljot sin praklamis kiel prezidanton. Plue, li anoncis ke li estas preta, dume, plenumi ĉiujn neokupitajn oficojn!
Por klarigi la evoluon de AEA estas necese pritrakti la tri suprajn fazojn, pli detale.

FAZO UNUA

Dum la Unua Aŭstralia Kongreso en Adelajdo, oktobron, 1911, naskiĝis la Aŭstralia Esperanto-Asocio. Oni decidis ke la estraro estu anoj el la ŝtato kiu gastigos la venontan kongreson, kaj plue, ke nacia kongreso okazu ĉiun jaron. Do, la unua estraro estis el Sud-Aŭstralio, elektita jene: prez. Majoro Hugo Leschen; vicprez. D-ro A. E. Sheppard; sekr. S-ro J.Lyall; kas. S-ro J. Bowman; k-anoj S-ino A. Hogg, S-ino J. Lumsdon, F-ino Hillman, S-ro W. D.Smith, S-ro F. E. Place, S-ro J.Skurrie. Klarigo pri la estraro jene: "ĉar la administrada laboro rilate al AEA okazos en Sud-Aŭstralio la sekvonton jaron (1912), estas necese ke la estraro estu elektata el ŝtatmembroj; venontjare oni atendos la starigon de nacia kongreso en Melburno kaj tiam la nova estraro estu elektota el esperantistoj en Viktorio". Do tiel estis!

La estraro por la jaroj 1912-1913, el Viktorio: prez. D-ro W. J. Kendall; vicprez. S-ro G. Whiteford; sekr-oj S-ro W. J. Drummond, S-ro A. H. Johnson; kas. S-ino J. Tillotson; k-anoj: S-ro J. Booth, S-ro A. L. Sullivan, S-ro N. Mills, S-ro C. W. Ballard. Ko-operaj sekr-oj el aliaj ŝtatoj kaj el Nov-Zelando estis elektitaj jene: NSK, S-ro G. Collingridge; Kvins., S-ro J. H. Cadell; Okc.Aŭst., S-ro T. Burt; Tas., S-ro E. A. Budge; Sud-Aŭst., S-ino A. Hogg; Nov-Zelando, S-ro G. Aldridge.

Ĉar la projektita 3-a Kongreso, pro neatenditaj malfacilaĵoj, ne okazis en Sidnejo, 1913, kaj fakte, pro la interveno de la mondmilito, 1914-1918, la tria Aŭstralia kongreso finfine estiĝis en Sidnejo, 1920. Inter la jaroj 1913-1920, la Melburna Esperanto Societo efektive estis la Aŭstralia Esperanto-Asocio kaj eĉ alprenis tiun titolon anstataŭ la propran. Dum la 3-a kongreso en Sidnejo, 1920, oni decidis ke AEA, ĉar ankoraŭ la oriĝinala estraro estis el Viktorio kaj plejparte el Melburno, konsideru amendon al regularo por akordiĝi kun la sekvantaj principoj:

(a) "ke la estraranoj de AEA kiuj nun loĝas en Melburno denove aliĝu al asocio simila al Melburna Esperanto-Societo;

(b) ke la centra aŭstralia estraro estu delegitaro elektota el ĉiuj aŭstraliaj grupoj".

En Melburno, la 2-an de julio 1920, okazis ĝenerala kunveno de AEA kiam grupoj reprezentataj estis: Komerca Esperanto-Klubo, Melburna Esperanto-Klubo, Zamenhofa Klubo-Sidnejo, Hobarta Esperanto-Klubo, Mont-Albert Klubo (Melburno). Post multe da diskutado, la originala propono el la 3-a kongreso estis adoptita kaj rezulte, ĉiu filiigita grupo rajtis elekti unu "konsilanton" po dek grupanoj. Samtempe la estraro de AEA estis aparte elektita, plejparte el Melburno: prez., S-ro Maurice Hyde, vicprez-oj (2) S-ino M. Purnell, S-ro R. R. Cohen; sekr. S-ro L. E. Thomson; kas. S-ro Marshall Cohen; komitatanoj: F-ino F. A. Sinnotte, F-ino M. Helm, S-ro Clarence Kelly, S-ro G. Redfern, S-ro H. V. Tilbury.

FAZO DUA

En julio, 1920, aperis monata revuo, "La Suda Kruco" - organo de la aŭstraliaj esperantistoj. Novzelandanoj ankaŭ abonis ĉi tiun revuon kaj sekvis raportoj pri grupoj el tiu lando, el Vellingtono, Aŭklando, Greymouth, Gisborno k.a.. Do, la 15an de oktobro, 1920, la Aŭstralia Esperanto-Asocio, per ŝanĝo al regularo, estiĝis Aŭstralazia Esperanto-Asocio. Por konformi al tiu nomŝanĝo, la subtitolo de La Suda Kruco ankaŭ aliiĝis al, "organo de la aŭstralazia asocio."

Malgraŭ la fakto ke la dudekaj kaj tridekaj jaroj estis ege malfacilaj pro streĉaj ekonomiaj vivkondiĉoj, ĉiuj grupoj, kluboj kaj societoj daŭrigis apartajn laborojn por Esperanto, kiel eble plej vigle. Tamen la oficiala organo de AEA, La Suda Kruco, konstante bataladis kontraŭ financaj kaj interrilataj kondiĉoj, ĝis fine, oktobron, 1934 okazis la ĉesigo; ankaŭ AEA samtempe mortisl Oni ne rajtas kulpigi la perdon de la revuo entute pro la morto de la nacia asocio, "ĉar la estraro de AEA ankaŭ ne aktivis post 1926. La projektita kongreso en Hobarto, 1923, estis prokrastita kaj la konsilantaro decidis ke tiu (la 4a) kongreso okazu en Sidnejo; sekvis la 5a kongreso en Melburno, 1925. Bedaŭrinde la 6a Kongreso ne okazis ĝis 1929, en Perto. Sendube, ĉar ĉi tiu kongreso estis plejparte loka kongreso kaj neniu alia estis projektita en la fruaj tridekaj jaroj, manko de entuziasmo kaj monrimedoj fine kontribuis al la paralela katastrofeto, la ĉesigo de la revuo en 1934. (Estas leciono el tio, ĉu ne?)

Ŝajnas ke estis alia faktoro rilate al la eldono de La Suda Kruco kiu grande influis la sorton de tiu revuo; du kontraŭaj grupoj konstante disputis pri la valoro de nacia revuo. Unu grupo forte kontraŭis al nacia revuo, precipe pro kostoj; dume ili konstante propagandis pri solida mondasocio kaj subteno per monkontribuoj. (Fakte, la profito de la 5-a kongreso estis donacita al UEA; samtempe en la kaso de AEA estis nenio!) La dua koterio preferis subteni la revuon kaj la asocion, kaj tiel fortigi per kunagado, la movadon en Aŭstralio, ĝis eventuala, pli forta subtenado de la mondasocio. Sed la unua grupo sukcesis kaj la rezulto estis ke Esperanto en Aŭstralio funkciis sen revuo, sen nacia asocio, ĝis Joab Eljot, per SUKRO, instigis refondon de AEA kaj la eventualan aperigon de nova nacia revuo, "La Rondo". En 1938, Pastro C. C. Cowling kaj F-ino N. D. Lawson (poste S-ino Cowling), estraranoj de la Tasmania Esperanto-Societo, aperigis en Bulteno, n-ro 7, SUKRO, inviton al ĉiuj esperantistoj refondi stabilan asocion de Esperanto en Aŭstralio. S-ino R.C. Hintze, Melburno, forte subtenis la proponon, kune kun aliaj tiutempaj samideanoj. En julio, 1939, la ofictenantoj de AEA estis: prez. Pastro C. C. Cowling, sekr. kaj kas. F-ino N. Lawson; komitatanoj: S-ro J. Eljot, S-ino A. Hintze, S-ino A. Douglas, S-ro A. Turner, S-ro G. Hillerman.

FAZO TRIA

De 1935 ĝis 1956, Joab Eljot, Sidnejo, NSK eldonis sian propran revueton, La Suda Kruceto (SUKRO). ĉi tiu gazeto aperis hektografie, kaj la enhavo plejparte reflektis la ideojn kaj specialajn proponojn (eĉ pri negrandaj lingvaj ŝanĝoj) de la redaktanto mem.

Tamen, post konstantaj instigoj fare de Joab Eljot, nova Aŭstralia Esperanto-Asocio naskiĝis en 1937; Eljot sin proponis kiel prezidanton kaj kiel supre menciite, estis preta plenumi ĉiujn oficojn se necese. S-ino Anna Hintze kaj aliaj, konstante pledis por fondiĝo de vera aŭstralia asocio dum 1938. Tamen, nenio okazis ĝis 1939, kiam Pastro Cowling iĝis prezidanto kaj la nova asocio estis firme establita. En la jaro 1940, nova revuo, "La Rondo", estis fondita de Frank R. Banham kaj kunlaborantoj, F-ino W. Addis kaj F-ino L. E. Bailey. Ĉi tiu gazeto estiĝis, 1941, la oficiala organo de AEA (ĉ.5). La Rondo daŭre aperis sub tiu titolo ĝis 1958, kiam la nuntempa nomo "The Australian Esperantist", estis adoptita; la revuo, ĝis hodiaŭ, tiel nomiĝas.

Sendube naciaj kongresoj multe kontribuas al solidareco inter esperantistoj, tiel en Aŭstralio kiel en aliaj landoj. D-ro C. J. Caldera, Perto, sugestis la restarigon de aŭstraliaj kongresoj kaj rezulte, la unua postmilita kongreso okazis en Melburno, 1950. Oni decidis dum tiu kongreso ke aŭstralia kongreso estu dujara evento kaj ĉiun duan jaron post 1950 okazis nacia kongreso. Ĉi tiuj dujaraj renkontigoj, kune kun grupnovaĵo pere de "The Australian Esperantist", grandparte kontribuas al la progresigo de Esperanto en Aŭstralio.
(ĉ•4)

Iom post iom aliaj kontribuaj servoj al plensukcesa asocio evidentiĝis: Libro-Servo (ĉ.8), Korespond-Kursoj (ĉ.8), Delegita Reto (ĉ.7), Somerlernejoj (ĉ.9), Korespond-Servo (ĉ.8), Ekzameno-Komisiono (ĉ.8), Bibliotekoj kaj muzeoj(ĉ.6), Revuoj kaj Eldonaĵoj(ĉ.5).

La plej elstara kaj valorega kontribuo al la nuntempa AEA sendube estis la senpera laboro por la Internacia Lingvo fare de individuaj esperantistoj kaj lokaj grupoj, ekde la fruaj pioniraj tagoj, tra la rnalfacilaj jaroj dum kaj post la du mondmilitoj, ĝis hodiaŭ. Bedaŭrinde manko de spaco en ĉi tiu historio ne permesas mencion de ĉiuj indaj esperantistoj, kiuj iel kontribuis al la nuntempa asocio, aŭ pri multaj kiuj laboris pere de lokaj grupoj; ili restu kontentaj ke la nacia asocio ĉiujare progresas, grandparte pro la daŭriga dediĉo de fervoruloj dum pasintaj jardekoj, kaj kompreneble pro daŭra subtenado fare de nuntempaj anoj.
La Historio de Esperanto en Aŭstralio do, estas rakontita en la ĉapitroj kiuj rilatas al la senĉesa laboro de esperantistoj, pasintaj kaj nuntempaj; ne estas grave en kia kampo ili aktivis, ĉar ĉiuj fine kontribuis ion al la nacia asocio, kaj pro tio, progresigis kaj daŭre progresigas la movadon, ne sole en Aŭstralio, sed ankaŭ en aliaj mondpartoj, pere de kontaktoj, propagando, kaj interŝango de ideoj, novaĵo kaj spertoj.

Sekvas listo de prezidantoj kaj sekretarioj de AEA dum la tri fazoj supre menciitaj.

| Jaro | Prezidanto | Jaro | Sekretario |
|---|---|---|---|
| | | | |
| 1911 | H.Leschen | 1911 | J.Lyall |
| 1912 | W.J.Kendall | 1912 | W.J.Drummond |
| | | | A.H.Johnson |
| 1913-19 | NEAKTIVA | | |
| 1920-21 | A.M.Hyde | 1920-21 | L.E.Thompson |
| 1922 | T.E.O'Donoghue | 1922 | G.Redfern |
| 1923 | A.R.Cohen | 1923 | G.Redfern |
| 1924 | W.H.King (Nov-Zelando) | 1924 | P.T.B.Hudson |
| 1925 | F.U.Taylor | 1925 | R.Rawson |
| 1926 | H.Byatt | 1926 | P.T.B.Hudson |
| 1927-36 | NEAKTIVA | | |
| 1937-39 | J.Eljot | | |

| Jaro | Prezidanto | Jaro | Sekretario |
|---|---|---|---|
| 1939-41 | Pastro C.C.Cowling | 1939-41 | F-ino Lawson (S-ino Cowling) |
| 1941-42 | A.Turner | 1941-45 | G.Hillerman |
| 1942-49 | S-ino F.Rawson | 1946-47 | C.J.Caldera |
| | | 1948-49 | F-ino O.Strempel |
| 1950-51 | D-ro C.J.Caldera | 1950-67 | H.Koppel |
| 1952-55 | K.G.Linton | | |
| 1956-59 | D-ro F.Williams | | |
| 1960-61 | R.L.Harry | | |
| 1962-63 | D-ro R.Robbins | | |
| 1964-65 | M.Leereveld | | |
| 1966-67 | I.Maddern | | |
| 1968-71 | K.Linton | 1968-71 | C.C.Goldsmith |
| 1972-80 | Prof. R.Robertson | 1972-75 | R.Baxter |
| | | 1976-77 | S.Wickendon |
| | | 1977-79 | L.Scott |
| 1980-84 | R.L.Harry | 1980-81 | J.Fallu |
| | | 1982-85 | S-ino M.Ellyard |
| 1984-85 | Mac LeFevre | | |

## Ĉapitro 3(a)

## ESPERANTO EN SUD-AŬSTRALIO

En Sud-Aŭstralio estis dek kvin anoj el la adresaro de mond-Ligo de Esperanto eldonita de D-ro Zamenhof, 1889-1909; la unua nomo sur la listo de Sud-Aŭstralianoj estis C. A. Wittber, kiu gajnis, 1905, Diplomon pri Kompetenteco de iu Germana Esperanto-Asocio. S-ro Wittber sendube grande influis kaj instigis aliajn adeptojn, ne nur starigi klubon,1908, en Adelaido, sed ankaŭ estis respondeca rilate al vizito al Adelaido de S-ro John Pollen, prezidanto de la Brita Esperanto-Asocio, kiu tiam (1910) vizitis Aŭstralion. S-ro Pollen faris prelegon pri Esperanto ĉe la Universitato de Adelaido kaj tiel varbis novajn anojn por la movado en Sud-Aŭstralio. C. H Uhrlaŭb, per serio de artikoloj en la loka ĵurnalo, "Adelaide Advertiser", (Adelaida Reklamilo), sukcese helpis la varbadon. Entuziasmuloj tiam decidis starigi Tut-Aŭstralian Esperanto-Kongreson en Adelaido, 1911; Maĵoro Leschen estis la tre kapabla organizanto de tiu sukcesa kaj historia evento. (vidu Ĉ.4)

La Adelaida Esperanto-Klubo fondiĝis, 1908; prez., C. A. Uhrlaŭb; sekr., W. D. Smith. Aliaj pioniraj anoj estis: Maĵoro Leschen, D-ro W. Lamb, Ges-roj W. Hogg, F-ino J. L. Wilson, S-ino J. Lumsdon. S-ino Lumsdon fondis, 1911, alian grupon ĉe Glenelg (antaŭurbo) kie ankaŭ instruis, S-ro Uhrlaŭb, 1911-12.

Post la 1-a Aŭstralia Kongreso, fondiĝis, 1911, Sud-Aŭstralia Esperanto-Societo; prez., S-ino A. Hogg, sekr., D, Wallington. La societo tamen, baldaŭ malaperis, plejparte pro la manko de subteno post la entuziasma periodo dum la Unua Aŭstralia Kongreso. Fakte la Adelaida Klubo apenaŭ travivis ĉi tiun periodon; la sekr. W. D. Smith preskaŭ sola kuraĝigis kelkajn anojn kunlabori ĝis 1918. En 1919, W. L. Waterman transprenis la gvidadon de la grupo, denove preskaŭ sola ĝis 1931. La sekvantan jaron, 1932, Adelaida Esperanto-Klubo restariĝis; prez., W. L. Waterman, sekr, L. C. Thornton. Kun la helpo de Lt. Kol. Fulton kaj S-ro F. L. Droop la klubo daŭris ĝis 1934, kiam esperantistoj en Sud-Aŭstralio ne plu kunvenis en klubsituacio, ĝis 1949.

Tamen, dum la jaroj 1939-1946 en Adelaido okazis ege grava laboro por Esperanto en Tut-Aŭstralio. Kelkaj individuaj esperantistoj en Sud-Aŭstralio, F-inoj Win Addis, L. E. Bailey, Rose Telfer kaj aliaj, decidis eksperimenti pri la eldono de propra gazeto; la projekto estis nur inter interesataj individuoj kaj ĉiuj tradukis elektitan pecon. F-inoj Addis kaj Bailey tajpis ion kaj sendis al ĉiu partoprenanto, kiu vice sercis erarojn, ktp.

Do inter si mem ili vere provizis revuon; el ĉi tio, naskiĝis "Inter Ni (Inter Ni estis la 'glano' kiu produktis la nunan revuon de AEA, The Aŭstralian Esperantist.) Ĉiun monaton, oni sendis al S-ro F. R. Banham, redaktanto de la malaperinta "Suda Kruco", kopion de la prov-tradukado, kiu vice korektis ĝin kaj resendis al Adelaido. Tiam S-ro Banham mem gvidis traduk-kurson kun partoprenantoj en ĉiuj ŝtatoj; la du fraŭlinoj en Adelaido tajpis la foliojn. Ĉar estis manko de papero kaj aliaj esencaj eroj (dum la milit-jaroj) la tasko estis ege malfacila sed iel ili kune plenumis la necesajn taskojn. "Inter Ni naskiĝis en maĵo, 1940; S-ro Banham petis permeson redakti ĝin, F-inoj Addis kaj Bailey konsentis kaj ankaŭ ekspedis ĝin al ĉiu tradukkursanto. En oktobro estis nom-ŝanĝo al "La Rondo", kaj F-ino Win Addis estiĝis kasistino, F-ino Lydia Bailey respondecis pri la enhavo. Helpis pri preparado, tajpado, presado (per multobligilo), pinglado, ekspedo, F-ino Rose Telfer kaj en 1945, post militservo, Fred Buswell. Kiam oni memoras ke fine estis preparado de 300 kopioj (1946), oni povas taksi la valoregan taskon, farita de F-inoj Addis kaj Bailey - sendube du el la plej elstaraj tiutempaj laborantoj por la movado en Aŭstralio.

Ne estis (1939-47) vera klubo en Adelaido, F-ino Addis provis kaj iom sukcesis en 1949 sed iom post iom kunvenoj malaperis.

Dum 1954, kunvenoj denove okazis kiam F-ino Addis gvidis diskutojn kun helpo de F-ino Telfer, S-ro F. Buswell kaj S-ino F. Kempson kiu disponis al la grupo sian hejmon por la Zamenhofa Festo, 1955. Nova helpanto, S-ro H. W. Fidge aktivis principe pri propagando kaj kontribuis novaĵon al "La Rondo" pri klubaferoj. Ĉi tiu situacio daŭris ĝis 1957 kiam la klubo preskaŭ ne plu ekzistis.

Tamen, 1959, vizitantoj, Ges-roj H. Koppel, Ken Linton, M. Cohen kaj S-ino Grace Barlow vizitis al Adelaido; Ges-roj Fidge gastigis ilin. Aliaj anoj F-ino Dugdale kaj S-ino Walker aranĝis propagandan vesperon en sia propra hejmo, kiam la vizitantoj plene partoprenis per parolado kaj deklamado. Klubagado sekvis.

En junio 1959, S-ro L N. Newell alvenis en Adelaido. La eks-redaktoro de "International Language", mondfama verkisto kaj plentalenta esperantisto tuj partoprenis instruadon kaj senĉese parolis al eksteraj kluboj kaj asocioj interesataj. Li provis revigligi la movadon; en 1961, Adelaida E.Klubo estis restarigita, prez. Lt. Kol. D. Fulton; sekr. kaj kas. S-ro Rex Hannay kun helpo de S-ino Beryl Randles. S-ro Harold Fidge mortis, 1961; S-ino Newell vojaĝis al Eŭropo, 1961, kaj 30 klubanoj adiaŭis ŝin. S-ro L. N. Newell gajnis la Klerecan Diplomon de AEA kaj poste elektiĝis al la AEA Ekzamen-Komisiono. 1962, alestis la Zamenhofan Feston 16 samideanoj; alparolis la ĉeestantojn, S-ro L. Newell kaj F-ino W. Addis.

1964: pro malsano de Lt. Kol. David Fulton, S-ro L. Newell estis prezidanto; li laŭdis la tre kapablan, konsciencan eksprez-on kaj esprimis sinceran dankon pro la valora dediĉo al la Klubo. Aliaj ofic-tenantoj estis S-ino Beryl Randles kaj S-ino Thea van den Boorgard. La klubanoj kunvenis semajne,

1965: F-ino W. Addis, S-inoj W. Fulton kaj Finlayson aranĝis kunvenon por bonvenigi al S-ro W. L. Simpkins, la mond-vojaĝanto kiu kelkfoje vizitis al ĉiuj ĉefurboj en Aŭstralio: prez. L. Newell bonvenigis la gaston, en la "ĉeesto de 16 samideanoj. Estraro elektiĝis - same kiel tiu de 1964. Ĉe la 50-a Universala Kongreso en Tokio, S-ro Rex Hannay, salutis la Kongreson, nome de AEA.

Dum la Zamenhofa Festo 1966, anoj gratulis la prez-on, S-ro L. Newell pro lia 50 jara esperantisteco. S-ro Newell aliĝis al la Esperanta Movado en Anglujo, 1916, kiam li estis nur 14-jara knabo. Denove en 1967 la sama estraro elektiĝis. Aktivis dum la jaro, krom la estraro, F-ino P. Harris, S-ro Vawser.

1968. S-roL N. M. Newell mortis en Eŭropo la 7-an de novembro kaj entombiĝis en Parizo.

1969. F-ino W. Addis denove prizorgis la klubon. 10 anoj ĉeestis la hejmon de S-ino Thea v.d. Boorgard por kune festi la naskiĝtagon de D-ro Zamenhof.

1970. Grupo kunvenis semajne dank' al iniciativo de F-ino W. Addis kaj S-ro F. D. Vawser. Aktivis, S-ino Randles kaj F-ino Delaine. Mortis la 29-an de septembro, S-ro W. C. Andres, ano de Adelaido, 1954.

1971. Zamenhofa Festo en hejmo de S-ino Fulton.

1972. Denove kunvenoj okazis "ĉiusemajne. S-ino B. Randles vojaĝis eksterlanden; adiaŭa vespero en hejmo de S-ino Fulton. Aktivis, L. Bankston; F-ino W. Addis estris la grupon.

1975. S-ro F. Buswell aktivis, sed iom malsanis.

1976. Mortis L. T. Bankston, ano de la Adelaida Grupo.

Forpasis 19.10.78, F-ino Rose Telfer, fidela ano dum preskaŭ 50 jaroj. Dek kvin anoj festis la naskiĝtagon de D-ro Zamenhof; inter ili, S-ro Onn kaj S-ro Bob Felby. Negranda grupo kunvenis monate en la Universitato de Adelaido.

1979. Negranda grupo daŭre kunvenis ĉe la Universitato.

1980. Fondiĝis, la Sudaŭstralia Esperanto-Societo: prez. G. Clarke; sekr. R. Felby; anoj: Bert Onn, Thea v.d. Boorgard, Betty Syke, Audrey Felby, Beryl Randles. La 23-a Aŭstralia Kongreso okazos en Adelaido, 1982; LKK jene: prez. G. Clarke, sekr. Bob Felby; kas. Beryl Randles; k-anoj Leigh Evans, Audrey Felby. Klaso por komenculoj komenciĝis en la Universitato de Adelaido; G. Clarke instruis. La Zamenhof-festo okazis en la ĝardeno de S-ino Thea v.d. Boorgard kie 25 anoj partoprenis la okazon.

1981. Grupo daŭre kunvenis en Universitato kie instruado, parolado kaj diskutado okazis.

1982. De la 2-a ĝis la 9-a de januaro, la 23-a Kongreso de AEA stariĝis en Adelaido, plensukcesa dank' al granda laboro de la LKK (ĉ.4). La societo kunvenis semajne en la Universitato; krom la estraro, aktivis samideano, Z. Wybraniec. Oficiala organo de la societo eldoniĝis, "Tamen Plu", plejparte prizorgita de sekr. Bob Felby. La Zamenhof-festo okazis la 18-an de decembro kiam 18 anoj ĉeestis la celebradon; festparolis G. Clarke, prezentis erojn, Audrey Felby, Peter Ellyard, Beryl Randles, Rex Hannay.
1983. Kunvenejo nun estas "Uniting Church", Sefton Park. Estraro: prez. G. Clarke; sekr. R. Felby; kas. S-ino B. Randles; k-anoj Audrey Felby kaj Neill Hart. 22 anoj ĉeestis la Zamenhof-feston; kontribuis erojn: Mavis Elliott, Peter Ellyard, Audrey kaj Bob Felby, Neill Hart kaj Lloyd Noble.

1984. Estraro: prez. G. Clarke; sekr. R. Felby; kas. G. Clarke. Mortis H. G. Onn la 12-an de marto. Li esperantiĝis ĉ. 1925 kaj forte subtenis la movadon en Adelaido dum multaj jaroj. Mortis la 21-an de rnarto, S-ino Beryl Randles, granda perdo al la societo kies kasistino ŝi estis dum kelkaj jaroj kaj speciale dum la 23-a Kongreso en Adelaido. Beryl Randles esperantiĝis dum la periodo de la dua mond-milito; instruis ŝin Lt.Kol Fulton kaj poste "ŝi entreprenis korespond-kurson kun Len Newell. Ŝi ankaŭ partoprenis studrondon kun Win Addis. Krom esti kasisto de la 23-a Kongreso, ŝi kontribuis erojn al la distra programo dum la Kongreso. Mortis F-ino Win Addis, la 23-an de decembro 1984 (vidu apartan tributon).

1985. Estraro: prez./kas. S-ro G. Clarke; sekr. S-ro Z. Wybraniec. La bulteno de la societo, Tamen Plu, ne plu aperos. Uizitantoj al la societo: Ges-roj Doig, Nov-Zelando, S-ro J. Vilkki, Finnlando.

ROSE G. TELFER, (1890-1978); esperantiĝis dum la tridekaj jaroj, kunlaboris kun Win Addis, Lydia Bailey kaj Frank R. Banham, 1939-1947 pri la preparado kaj ekspedo de "Inter Ni", la postenomita, "La Rondo". Dum vizito al Anglujo, post la milito, gajnis Diplomon de BEA. Si restis fidela esperantisto ĝis la fino; ni memoru F-inon R. G. Telfer ankaŭ pro servo al AEA.

WINIFRED ELLEN ADDIS, (1910-1984), Sub la gvidado de S-ro W. L. Waterman, esperantiĝis en 1930 kaj daŭre kontribuis al la movado, ne nur en Sud-Aŭstralio, sed ankaŭ en la nacia asocio; ŝi estis kasisto (1940-1947) de AEA. Kune kun du kolegoj F-inoj L. E. Bailey kaj R. Telfer, ĉiuj kunlaboris kun redaktanto Frank R. Banham pri, unue "Inter Ni", kaj, post nomŝanĝo, "La Rondo". La rezulto estis nia tut-Aŭstralia gazeto "The Australian Esperantist". La eta grupo, F-inoj Addis, Bailey kaj Telfer faris la tutan laboron, tajpadon, multobligadon, pingladon kaj ekspedon de la revuo dum pli ol sep jaroj. Kia granda tasko! Samtempe kostis al AEA nenion rilate tiun laboron, kaj pli ol 300 abonantoj ricevis revuon, ĉiun monaton. Sed tio ne estis la finlaboro por Esperanto; de 1948 ĝis 1978 Win Addis gvidis la movadon en Sud-Aŭstralio dum mallumaj periodoj (vidu: statistikoj). Fine, post peto de la aŭtoro de "ci tiu Historio de AEA rilate al Sud-Aŭstralio, estis riĉevita paka3o de dokumentoj kaj notoj, kiujn Win Addis kontribuis al la Historio kaj al postaj generacioj, ĉar eroj sendube vivados en Esperanto-Muzeoj en Aŭstralio.

LYDIA E. BAILEY, Tiamulo de Win Addis kiu kunlaboris kun Win Addis, Rose Telfer kaj Frank R. Banham 1939-1947 prepari la revueton, "Inter Ni", poste "La Rondo" dum tiuj malfacilaj jaroj. Krom la senĉesa laboro pri la preparado kaj ekspedo, F-ino Bailey elspezis multe el sia propra mono par aĉeti taŭgan skribmaŝinon kaj aŭtomatan multobligilon. Bedaŭrinde analoj ne donas pli da detaloj pri ŝia Esperanta vivo, sed ŝi sendube meritas mencion pro la supre menciita servo al AEA.

WILLIAM L. WATERMAN, (1869--1938): Unu el la "preskaŭ pioniroj" de la movado en Sud-Aŭstralio, li estis sekretario de Adelaida Esperanto-Klubo, 1919-1931, kaj estis prezidanto, 1932-34. Forta subtenanto de la Lingvo Internacia, li instruis kaj gvidis membrojn dum multaj jaroj. Ne multe estas konata pri la vivo de S-ro Waterman, sed lia epitafo sur tombstono, en Esperanto, sendube esprimas la sentojn ne nur de la edzino sed ankaŭ de ĉiuj kiuj konis lin: "LIA B0NEC0 ESTAS LIA VERA M0NUMENTO".

Lt.Kol. DAVID FULTON: Kune kun edzino subtenis la movadon en Sud-Aŭstralio; sekretario 1933, prezidanto, 1961-1963. Vizitantoj al Adelaido, kaj partoprenantoj en festaj okazoj ŝuldis multon al la gastigemo de Ges-roj Fulton.

LEN N. M. NEWELL (1902-1968): Unu el la plej elstaraj Esperantistoj en la tuta mondo, kiam li decidis rezidi en Adelaido, 1959, estis ege bonŝanca okazo por la klubo; lerta instruisto kaj brila prelegisto li instigis multajn aliĝi al la movado. Li estis prezidanto, 1964-67. Bedaŭrinde dum vizito al. Eŭropo li subite mortis, sur trajno al Parizo. Koincide, li estis enterigita en tombejo en Parizo - jen estas la fina strofo el lia originala poemo (1934)
“Parizo”:

Da rimoj elĉerpiĝis la provizo:
Mi finu. Sed kompatu angelar':
Post morto min atendos Paradizo,
Sed iros al ciel' nur ŝelo – ĉar
Mi lasos mian koron en Parizo.

## Sud-Aŭstralia,j Ano,j de Mond-Ligo de Zamenhof 1889-1909.

S-roj W.Hogg, F.H.Lewis, J.Patterson, C.Piggott, R.J.Sellers, W,D.Smith, C.A,Uhrlaub, C.Wittber; D-ro W.Lamb; S-ino A.Porter;. F-inoj V.Olivent, M.Robertson, J.Watson, J.Wilson, E.Williams

## Sud-Aŭstralio

## Statistiko pri Jaroj, Grupoj, Estraro(nur prez. kaj sekr.) kaj Rilataj Temoj

### Adelaida Esperanto-Klubo, fondiĝis 1908

1908-1910 prez. C.A.Uhrlaub
1911-1914 prez. J.Lyall

1908-1918 sekr. W.D.Smith

### Sud-Aŭstralia Esperanto-Societo, fondiĝis 1911

1911-1912 prez. S-ino R.Hogg

1911-1912 sekr. D.Wallington

### Esperanto-Grupo, Glenelg, fondiĝis 1911

1911-1913 prez. C.A.Uhrlaub

1911-1913 sekr. S-ino J.Lumsdon

### Adelaida Esperanto-Klubo

1932-1934 prez. W.L.Waterman

1919-1931 sekr.W.L.Waterman
1932 sekr. L.C.Thornton
1933 sekr. Lt.Kol. D.Fulton
1934 sekr. F.L.Droop

### Adelaida Esperanto-Grupo, 1935-1960

1935-1938 F-inoj W.Addis, L.E.Bailey, R.Telfer activis pri kunvenoj kaj klubaferoj, kaj
1939-1946 pri "Inter Ni", kaj "La Rondo"
1948-1960 Neaktiva, sed sub gvidado de F-ino Addis, negranda grupo semajne kunvenis.

### Adelaida Esperanto-Klubo, refondiĝis 1961.

1961-1963 prez. Lt.Kol. D.Fulton
1964-1967 prez. L.Newell
1968-1971 prez. F-ino W.Addis

1961-1967 sekr. R.Hannay
1968-1969 sekr. F.D.Vawser
1970-1971 sekr. S-ino B.Randles

1972-1978 Neaktiva, sed sub gvidado de F-ino Addis, negranda grupo kunvenis.

### Sud-Aŭstralia Esperanto-Societo, fondiĝis 1979

1979-1985 prez. G.Clarke

1979-1984 sekr. R.Felby
1985sekr. Z.Wybraniec

Ĉapitro 3(b)

## E S P E R A N T O   E N   O K C I D E N T A   A U S T R A L I O

La unua E-Klubo, Nigra Cigno-Klubo, fondiĝis en Perto en la jaro 1911; pioniraj anoj estis S-roj J. Skurrie, D. Davies (ano de mond-Ligo de D-ro Zamenhof), T. E. O'Donoghue, M. A. Browne, J. Buckeridge, V. Matthews, C. Unwin, E. Goody, W. Casey; S-ino A. MacDonald; F-inoj E. Hooton, L. Wright. Ĉirkaŭ 1913, estiĝis alia E-Grupo en Perto sub la estrado de S-ro Burt ĉe Kolegio-STOTT; S-ro Burt instruis Esperanton, inter aliaj temoj, en la kolegio. Laŭ unu fonto, la grupo nomiĝis Perta Esperanto-Asocio; laŭ "Brita Esperantisto" la titolo estis Esperanto-Asocio de Okcidenta Aŭstralio. Ne estas grave, sed verŝajne la unua estis la pli taŭga nomo (STATISTIKO).

Estraro de la Nigra Cigno-Klubo en 1911, jene: prez. D. Davies; vicprez. M. A. Browne; sekr. T. E. O'Donoghue. La unua kunvenejo estis ĉe Teozofia Societo, poste ĉe kafejo "MacDonald". Meznombre, 20 anoj ĉeestis kunvenojn dum la fruaj jaroj, sed ŝajnas ke neniam estis instruado dum kunvenoj; plejparte ili estis sociaj aferoj, en kiuj oni parolis pri la Esperantoideo, muzikis, kantis kaj ankaŭ diskutis pri lingvaj detaloj, sed pli malpli oni supozis, ke la esperantistoj studis la lingvon hejme. La loka ĵurnalo, "The West Australian" (La Okcidenta Aŭstraliano) estis tute favora al la E-movado kaj volonte raportis ĉiujn detalojn pri klubagado.

Kiam en 1912 okazis la 2a Aŭstralia Kongreso de Esperanto en Melburno, partoprenis kiel delegitoj de la Klubo-Nigra Cigno, S-roj C.Unwin kaj J.Skurrie. Alia ano, M. A. Browne, partoprenis la poemkonkurson kaj gajnis la unuan premion per poemo kies titolo estis "Revengo". En 1913, S-ro T. E. O'Donoghue translokiĝis al Sidnejo kie li estiĝis prez. de SES 1918-20 kaj prezidis la 3an kongreson de AEA en 1920.

Sekvis dujara periodo, 1914-15 kiam la klubo ne aktivis, sed en 1916, S-ro Colin Caine restarigis la klubon kaj enkondukis studklasojn. Prizorgis la instruadon, S-roj H. Leighton kaj C. Unwin. Aliaj anoj kiuj aliĝis, estis tri fratoj Steitz, S-ro Bell kaj du filinoj, S-roj Alex Hewart kaj Alexander Saar. La klubo daŭre progresis sub la estrado de S-roj Skurrie, Caine kaj Casey ĝis 1922.

Ĉe la Komerca Kolegio, STOTT, S-ro Burt profesie instruis Esperanton al siaj studantoj; dume ĉe la ŝtat-lernejo en Strato-James kie la klubanoj, de 1918, kunvenis kaj studis, kelkaj el la anoj opiniis ke estus pli oportune havu profesian instruiston ol diletantojn. Inter la kritikantoj estis la fratoj Steitz. Fine la estraro cedis al la kritikoj kaj transdonis la studantojn al la zorgo de S-ro Burt DBEA, ĉe STOTT-a kolegio. Bedaŭrinde la studantoj trovis la koston pli alta ka j laŭgrade multaj forlasis la studadon. Tio okazis en 1926 kaj la progresintoj de la malnova Nigra Cigno-Klubo private kunvenis ĉe la domoj de S-roj Goody, Caine kaj Saar.

Dum la longa periodo, en kiu oficis C. Caine kiel sekr. 22 anoj riĉevis la elementan atestilon de BEA kaj S-roj Casey, Caine kaj Saar kune kun F-ino Cherrett gajnis la Diplomon de BEA. Dum 1927 la vigleco de la grupo fariĝis malforta kaj preskaŭ neniu kunveno okazis tiun jaron.

En 1928, la Westralian E-Societo - Nigra Cigno-Grupo estiĝis, per la iniciatemo de S-ro H. Byatt, kune kun helpo de la malnova grupo. Prez. estis H. Byatt, vicprez. A. Saar kaj sekr. S-ino E. Sainshury; ĉi tiu lasta forlasis la oficon en 1930, ĉar ŝi, instruistino, translokiĝis al karnpara regiono. En la nacia E-revuo, La Suda Kruco, por la unua fojo aperis avizo jene: "La Westralian Esperanto-Societo - Grupo Nigra Cigno kunvenas ĉiuvendr-ede inter la 7.30 kaj la 10 ptm.  ĉe Strato-Murray, vidalvide la magazenon Boan". En 1931 F-ino E. Griffin iĝis sekr.; en 1932 David Miller estis sekr. kaj kune kun H. Byatt (prez.) estris la societon ĝis la fino de 1935 kiam la movado malvigliĝis. Kun la helpo de fratino Betty Miller, la sekr. David Miller starigis, novan klason en alia sidejo sen ia subteno de la malnovaj anoj de la grupo. Pro financaj malfacilaĵoj la grupo forlasis la studlokon kaj dum la jaro 1936 ne plu aktivis; David Miller mem, pro universitataj studoj, portempe forlasis Esperanton. Dum la sekretaria periodo de S-ro D, Miller, multfoje okazis elementaj ekzamenoj de BEA; akiris la Diplomon, S-ro Clydesdale kaj S-ino Sorley. Dum la jaroj 1930-31 okazis piknikoj ĉe Nacia Parko kaj "Swan View" (Cigna Vidaĵo) kaj ankaŭ ĉe kampara dometo de Colin Unwin. Ofte anoj ĝuis sociajn vesperojn en diversaj lokoj.

Dum la jaroj 1936-3'7 ne estis aktiva grupo tamen la 7an de aprilo, 1938, private kunvenis S-roj Byatt, Saar, Walker. S-inoj Byatt, Saar; F-ino Gibson. Ili restarigis la societon, estraro jene: prez. H. Byatt; vicprez, S-ino A. Saar; sekr. A. Saar; k-anoj: F-ino N. Gibson, S-ino A. Barnes, E. A. Walker, A. Barnes. En 1940 fariĝis sekr. F-ino K. Crawford ĝis junio, 1941 kiam S-ro A. Chamberlain ŝin anstataŭis. Ankaŭ en 1940 S-ro H. Byatt eksiĝis el la prezidanta ofico; S-ro I.Massel anstaŭis lin. Tamen, en 1942, post interna disputo, S-ro H. Byatt iĝis prez. kaj en la sekvanta jaro, 1943 ĝis 1944 S-ro A.Saar prezidis la societon; li estis la lasta prez. de la societo.

Western Australia Esperanto League. (Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio)

S-ro Isor Masel- aliĝis al la movado en 1939; li tre rapide progresis kaj fariĝis tre flua parolanto. Li elektiĝis, en 1940, prez. de la societo (Westralian Esperanto-Societo); samtempe H. Byatt kaj A. Saar estis vicprez-oj kaj sekr. estis F-ino K. Crawford. La nova prez. tuj rimarkis ke la samtempa studado de diversaj gradoj en la kunvenejo malhelpis rapidan progreson; kelkaj grupoj studis en unu sola ĉambro, en la konstruaĵo "Overseas League" (Transmara Ligo) kies posedanto ne povis luigi la ĉambron pli ofte ol unufoje, semajne. Amiko de S-ro Masel, D-ro C. Caldera aliĝis al la movado en 1941 kaj kiam li konsciis pri la situacio malavare proponis ke li rnem estas preta pagi la luprezon de taŭga sidejo dum unu jaro “ĝis la societo stariĝos sur forta financa bazo". Sed, post diskutado inter la komitatanoj, la propono ne estis akceptita. Poste, dum ĝenerala kunueno, S-ro Klasel proponis ŝangon de sidejo; la plejmulto subtenis la ideon, sed pro severaj kritikoj fare de iuj el la influaj anoj, li. decidis ne plu klopodi pri la afero kaj eksiĝis el la prezidanta ofico.

Februare, 1943, D-ro Caldera kontaktis la prez-on, S-ro A. Saar kaj proponis al li la saman planon, jam antaŭe proponitan, "pagi la luprezon dum tuta jaro de taŭga sidejo". S-ro Saar estis tutfavora al la ideo, sed li ne povis persvadi la komitatanojn; la propono estis malakceptita. Post tin Iasta klopodo, S-ro Masel kaj D-ro Caldera decidis la fondon de nova E-organizaĵo por la disvastigo de la lingvo. Ĉeestis la unuan kunvenon en la konsultejo de D-ro Caldera, en marto, 1943, la jenaj: S-roj I. Masel, J. Jeffrey; D-ro Caldera; S-inoj I. Caldera, M, Wood; F-inoj S. Gill, L. Culligan. Post la propono de financa garantio pri la elspezoj dum unu jaro fare de S-ro Caldera, elektiĝis la estraro de la nova grupo, "Western  Australia Esperanto League" (Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio) jene: prez. S-ro I. Masel; vicprez. S-ino Wood; sekr. D-ro C. Caldera; kas. S-ro Jeffrey. Post kelkaj tagoj la Ligo estis lokita en taŭga sidejo kun meblaro por lerneja instruado.

Anoncoj aperis en ĵurnaloj, kaj en aprilo tri klasoj por novlernantoj komenciĝis, du vespere kaj alia post-tagmeze; samloke estis klaso por progresintoj. Proksimume 60 lernantaj aliĝis dum 1943. Tri diversaj gradoj de ekzamenoj stariĝis; elementa - simila al la normo de la elementa ekzameno de BEA; duagrada - laŭ la normo de la Pyke-Memoriga Ekzameno; altgrada - laŭ la Diploma Ekzemeno de BEA. La konstato estis: "ke la studantoj rapide perdas entuziasmon en la studado; sed, se ili studas por ekzameno kutime ili sukcesas konservi tiun entuziasmon ĝis la provo; se oni sukcesas konvinki ilin al plua antaŭpaŝo kaj antaŭ ili ankoraŭ sidas celo trafota, eble ili daŭrigos la studadon kun intereso". Alia regulo estis, ke studantoj devus sukcesi pri la elementa ekzameno antaŭ ol peti aliĝon al la Ligo. Pro translokiĝo al Tasmanio de S-.ino Wood, F-ino 0. Strempel elektiĝis vicprez. en 1944. S-ro Masel restis prez., D-ro Caldera sekr., F-ino Chandler kas. kaj F-ino E. Willis bibliotekisto.

Dume, malfavoraj cirkonstancoj financaj trafis la Westralian E-Societon de kiu S-ro Saar ankoraŭ estis prez.; propono de la du grupoj kunfandiĝu estis akceptita, la 25an de majo 1944, dum ĝenerala kunveno de la du anaro,j. Pro rnaljunaĝo, antaŭa fortegulo de la E-movado, S-ro H. Byatt eksiĝis en 1944. Tiun jaron 11 studantoj partoprenis la Pyke-Ekzamenon; gajnis la premion S-ro J. Cottini, dum S-ino Caldera, F-inoj Willis kaj Chandler sukcesis kun honoro. S-ro Hehir, ligano en Kalgoorlie (Kalgulio) starigis studgrupon; S-ino E. Sainsbury gvidis grupon en Hakea; D-ro T. Einihovici estris grupon en Corrigin; en Albany alia grupo kunstudis. Dum 1944: anaro de Ligo pli altiĝis ĝis 56 kaj pli ol cent studantoj partoprenis kursojn; S-ro j Masel kaj Stephens konstante propagandis per paroloj; ofte aperis en lokaj ĵurnaloj leteroj kaj artikoloj pri Esperanto. La unua oficiala klaso de Esperanto estis starigita ĉe la "Teknika Lernejo" en Perto, sub la direkto de S-ro D. Miller.

Sekvis listo de anaro dum 1944: F-ino j A. L. Bailey, E. Chandler, S. Gill, J. Johnson, E. Jones, P. Langdown, E. Lowatt, N. Moulding, S. Moore, A, Moore, D. Marshall, P. 0'Neill, M. Osborne, N. Rosser, L Rosser, R. Richardson, J. Saunders, 0. Strempel, Q. Shugg, G. Smith, P. Tate, E. Willis, E. Williams, E. Woolley, E. Watson, B, Whyte, C. Young; S-inoj D. Baesjou, I. Caldera, J. Cairns, E. Dougan, A. Ferguson, 0. Herman, A, Hanrahan, G. Lecoultre, U. Logie, H. Motteram, J. McGubbin, E. Philpot, G. Young; D-roj C. Caldera, T Einihrovici; S-roj N. Brodie, H. Byatt (Dumviva Ano), W. Casey, L. Clarke, A. Chamberlain, E. Courthope, J. Cettini, P. Hehir, G, Hannah, J. Hawks, D. Lushey, P. Leahy, I. Masel, D. Miller, T. 0'Donoghue, T. Perry, G. Partlon, R. Stephens, A. Saar, L. Samuel, 0. Thackrah, J. Wallace, C. White, P. Walter. (Noto de la aŭtoro; plejparte dank' al la "Historio pri la Disvolviĝo de Esperanto en Okcidenta Aŭstralio", verkita de D-ro C. Caldera, 1945). Por eviti tedan ripetadon de nomoj, estas necese pritrakti la sekvantan historian laŭ taŭgaj kelkjaraj periodoj.

1945-1950. Dum ĉi tiu sesjara periodo, la Ligo daŭre funkciis sub la estrado de prez-oj F-ino 0. Strempel, S-ro j N. Brodie, E. A. Walker kaj sekr-o j S-ro R. Stephens, F-ino j E. Willis, R. Goodall, S-ro J. Hawks (STATISTIKO). Aktivis ankaŭ la jenaj anoj: F-inoj A. Bailey, F. Chandler (kas. 1945-47), R. Tate; S-ino j A, Hanrahan, I. Caldera, E. Dougan (grupestrino ĉe Corrigin), I Einihovici, A. Ferguson, H. Claxton (kas. 1950), G. Pollard, E. Sainsbury (estrino de grupo-Hakea); D-ro C. Caldera, T. Einihovici; S-roj E Blaumann, W. Casey, I. Masel, W. Illingworth, H. M. Leighton, D. Miller, T. E, D'Donoghue, A. Saar, R. T. Stephens. Fondiĝis en Perto, 1947, loka sekcio de "Societo-Amikoj de Esperanto". Starigita de ELOA en 1948 estis la premio "Isor Masel" (Ĉ.8), por originala verko en Esperanto. (Isor Masel estis la fondprezidanto de ELOA kaj la premio omaĝis al la memoro de tiu forpasinto). Prez. de Societo - Amikoj de Esperanto, S-ro Strassburg respondecis pri la premio al kiu ĉiuj esperantistoj en Aŭstralio kaj Nov-Zelando povis aspiri. En 1948 F-ino Strempel vizitis al la 34a Kongreso de UEA en Malmo, F-ino L. E. Bailey translokiĝis al Perto; ŝi estis kunlaboranto kun aliaj en Adelaido 1940-46, pri `La Rondo' (Ĉ.5), Aktivis pri instruado, D-roj Caldera kaj Einihovici kaj S-ino G. Pollard.

1951-1952. F-ino O. Strempel, prez. 1951-1952 kun sekr-oj J. Hawks; 1951, D-ro T. Einihovici 1952, estris la Ligon. S-ro g. Cettini forveturis al la 25a U-Kongreso en Parizo; li ankaŭ estis oficiala deligito de AEA. Aktivis ankaŭ pri ligaferoj. F-ino E.Ball. D-ro Caldera sukcesis pri la Masel-premio, 1950. Instruis dum la periodo: S-inoj R. McGrath, G. Pollard. S-ino M. Hill. gajnis la Pyke-premion en 1951. Estraranoj jene: E. A. Walker, E. Proctor, F-ino F. Chandler. Gajnis la Masel-Premion, 1952, Brendon H. Clark, Nov-Zelando. S-ro D. Miller eksterlandis kaj revenis en 1952. Nova ano, S-ro J. Finch (Anglujo) aligis en 1952.

1953-1956. Estraro jene: prez-oj J. Hawks 1953-54, 1956: F-ino 0. Strempel 1955; sekr-oj: F-ino E. Bull kaj S -ino A. Sedgley 1953, F-ino A. Longson 1954-55, S-ino E. Pianta 1956. Aktivis en grupaferoj S-ro A, Saar: (Dumviva rnembro de ELOA), F-ino O. Strempel (kiu poste translokiĝis al Albany), S-ino: G. Pollard, S-ro G. Cettini, D-ro Caldera, D-rino V. Summers. Nova ano aliĝis, S-ro F. A. Grimminck e1 Nederlando. La 9a kongreso de AEA okazis en Perto, januare, 1954 (Ĉ.4). La Ligo riĉevis donacon de 30 libroj fare de F-ino McDonald, plejparte el la libraro de S-ro A,. McDonald (antaŭa ano). Aliaj aktivuloj jene: S-ro N. Brodie, D-ro T. Einihovici, S-ino Hitch. S-ro A. Saar antaŭa fortegulo de la E-movado en Okc.Aŭstralio mortis en 1956. Gajnis premion en la Masel-Konkurso, S-ro P. Schwerin, Sidnejo.

1957-1958. Prez. estis S-ro G. Pollard kaj sekr. 1957 T. Cameron, 1958 S-ino A. Sedgley. Aliaj estraranoj; S-ino R. McGrath; F-inoj A. Longson, 0. Strempel; S-ro N. Brodie. Jack Hawks oficiale reprezentis AEA-n Ce la 42a U-Kongreso emn Marseille; survoje al Francujo, ĉe Singapuro, S-ro R, Harry gratigis lin. S-ino R. McGrath estis la unua gajninto de la Norma Supera Diplomo de AEA. Bonvena viztanto estis S-ro King, prez. NZEA.

1959-1962. Prezidis dum 1959 S-ro E. A, Walker; dum 1960 S-ro J. Hawks; 1961-62 S-ro C. Dean. Sekr-o j 1959, 1961-62 S-ro G. Pollard; 1960 S-inoj G. Pollard kaj A. Sedgley. Estraranoj: S-inoj R. McGrath, E. Palmer; F-inoj 0. Strempel., A. Longson; aktivuloj: N. Brodie, S-ino H. Claxton, F-inoj G. McGeehan, J. Wooley, D. Leach, S-roj C. Dean, F. Lavery, H. McGrath, W. J. Illingworth, J. Finch, A. .J. Waugh, D-roj C. Caldera, T. Einihovici; S-inoj G.LeCoultre, Hutchinson, E: Palmer, E. Pianta, O Malcolm, Kruger, D. Dean, Brown; Ges-roj Fidock, Ges-ro j Strassberg. Vizitantoj: S-ino kaj F-ino Shankley (Hobarto), F-ino C. Morris (Anglujo), D-ro R. Robbins prez. AEA, S-ro M. Leerveld vicprez. AEA, S-ino Stecklenberg (Nederlando). Pastro C. Cowling rezignis la oficon de Komisiito pri Ekzarnenoj kaj D-ro C. Caldera transprenis tiun deĵoron. La Ligo estis invitita al la urba akcepto de la Reĝo kaj Reĝino de Tajlando; kvar detegitoj el ELOA ĉeestis la akcepton: S-inoj Ames, Brown, Dean kaj F-ino Longson. Pro nesufiĉa financa subteno, la projektita fondo do E-Kooperativo ne povis okazi. Sukcesis pri la Supera Diplomo, S-ino G. Pollard, S-ro C. Dean.

1963-1966. Estraro jene: prez-oj 1961-62, 1965-66 C. Dean; 1963-64 J. Hawks. Sekr-oj 1963 S-ino G. Pollard; 1964-65 F-ino A. Longson; 1966 W. H. Howard. K-anoj S-inoj G. Pollard, 0. Malcolm, N. Bowers. Aktivuloj: D-ro T. Einihovici, S-inoj R. McGrath, R. Sedgley, N. Brodie, D. D. Miller, J. Illingworth, J. Finch, A. Waugh, N. Bowers, D-ro Caldera, S-inoj W. Bowers, D. Dean; F-inoj O. Strempel, S. Ferguson, J. Veith.
Vizitantoj: F-ino Rita van Ryswijk (Sidnejo); W. L. Simpkins (Usono)
Mortis: S-ino Daniels, F-ino E. Wooley, S-ino E. Sainsbury, S-ino M.B. Jones. (Ĉiuj malnovaj anoj de la E-movado en Okc. Aŭstralio)

1967-1969. Prez. 1967, N. Brodie; 1968-69 C. Dean; Sekr. 1967-69 W.H. Howard. Estraranoj: N. Bowers, J Hawks, S-inoj E. Palmer, S. Blockley, G. Pollard, R. McGrath, F-ino V. Egan; S-ino O. Hunt; D-ro T. Einihovoci. Aliaj aktivuloj: F-inoj O. Strempel, J Gray, L. Bryant; D-ro C. Caldera; S-inoj D. Threfall, S. Blockley, A. Sedgley, G. Pollard. Vizitis al Perto: C.C.Goldsmith (sekr. AEA). TV stacio-9 intervjuis S-ron W. Howard. Mortis F-ino D. Lamprey, fervora ligano dum kelkaj jaroj.

1970-1973. Prez, 1970-71 S-ino R. McGrath, 1972-73 J. Hawks; sekr. W. Howard. Estraranoj: S-inoj E. McKay, V. Payne, E. Palmer, G. Pollard; F-ino J. Gray; S-roj J. Finch, R. Smeets, O.Loneragan, Mappin. Aktivis pri ligaferoj kaj instruado: D-roj C. Caldera, T. Einihovici; S-inoj V. Harris, D.Threfall, R.McGrath, O. Hunt; F-inoj J. Gray, O. Strempel, A. Longson; S-roj J. Hawks, W. Howard, C. Dean, M. Knight, J. Poole-Johnson. Mortis dum ĉi tiu periodo; E. A. Walker (antaŭa fortegulo de la movado). M. Strassberg (fondinto de societo"Amikoj de Esperanto" kaj inicianto de Konkurso-Masel), Jack Finch ( pro aŭto-akcidento), S-ino C. Hitch (ligano dum multaj jaroj). Vizitantoj: F-ino Spink (Anglujo), Tibor Sekelj (mondfama verkisto), S-ro A. Waugh al la U-Kongreso en Londono, 1971; Ges-roj Payne kaj D-ro T. Einihovici al U-Kongreso en Beograd, 1973. S-inoj Einihovici kaj Payne malsukcesis en provo persvadi la Federacian Ministron pri edukado enkonduki Esperanton en lernejojn – ĉefe "ŝtata" afero! Sed S-ino Payne sukcesis pri E-kurso en Centro de Teknika Instruado en Subiaco (antaŭ-urbo). Laŭ invito de la Urbestro, liganoj ĉeestis Urban Adiaŭon al eksiĝinta Guberniestro; Ges-roj Larter, S-inoj R. McGrath, A. Sedgley; kaj urban akcepton por la ambasadoro de Brazilo, ĉeestis Ges-roj C. kaj D. Dean.

1974-1978. Prezidis 1974-75 D-ro T. Einihovici, 1976 R. Smeets, 1977-78 H. Huts; sekr. ĝis junio 19777, W. Howard, poste C. Dean. Estraranoj kaj aktivuloj dum la koncernata periodo, jene; S-inoj R. McGRath, J. Wapnah, D. Threfall, V. Payne, E. Palmer, I. Einihovici, O. Larter, D.Antulov, Hancock, O. Hunt: F-inoj J. Gray, O. Straempel, Shilkin; D-roj C. Caldera, T. Einihovici; S-roj J. Poole-Johnson, J. Hawks, J. Mazza, O. Loneregan, J. Blom, C. Dean, W. Illingworth, P Thew, R. Brittain, P. Oliver, D. Miller, K. Gobba. Mortis: S-ino M. Rowe 1975; S-ino G. Pollard, 1975 ano kaj estrarano dum multaj jaroj kiu ege laboris por ELOA. Dank' al la testamento de S-ino Pollard, ELOA ricevis $6,500. Mortis en 1975, S-ro A. Waugh, multjara ligano kiu ankaŭ testamentis $500 al la ligo. En 1977 mortis W. Howard, mulktjara sekr. de ELOA. Oni decidis transdoni la E-Librojn el la "Kolekto-Caldera", al la Universitato-Murdoch (Ĉ. 6). Okazis urb-ĝemuliĝo Perto kaj Kagŝimo (Japanujo). Sukcese starigi E-klason ĉe Floreat Park, S-ino Einihovici; E-klason okazigis ĉe Scarborough S-ro Blom. Elementa E-kurso "Jen Nia Mondo", komenciĝis, 1977, ĉe Radio-Stacio 6NR kaj multaj kurs-libroj vendiĝis; estris tion S-ino V. Payne. E-seminaro okazis ĉe Universitato-Murdoch, S-ino R.McGrath estis gvidanto. S-ro O. Loneragan klopodis pri Esperanto dum konferenco pri "Multkultura Futuro kaj la Lernejoj" Li raportis "malintereson pri E-proponoj. (La sama sinteno evidentiĝis dum simila konferenco en Brisbano; noto de la aŭtoro). Vizitantoj: Ges-roj Lows, Eleanor Stein (Usono), S-ino R.Carruthers (Sidnejo), Ges-roj A. kaj E.Oliver (Anglu,jo), F-ino Taki Hamada(Japanu,jo), S-ino Elfrieda Ernst (Belgujo), S-ino M. Chaldecott (Sidnejo). Eksterlandis:D-ro kaj S -ino Einihovici al la 60a U-Kongreso en Kopenhago, 1975.

1979-85. Prezidis: 1979-80, 1983-84, S-ro R Smeets; 1981 -82, 1985, S-ro J. Hawks. Sekr. 1979-85 S-r0 C. Dean. Estraranoj kaj kontribuanoj jene: Z. Nicoletti, D. Miller, O. Loneragan, W. Illingworth, H. Huts, J. Volak, R. Alvaro, G. Gregson, H. Malcolm, J. Harvey: D-ro T. Einihovici; S-inoj R. McGrath, V. Payne, D. Dean, I. Einihovici, S. Gradussov. F-inoj A. Longson, V. Egan, J.Walker, J. Craig, V.Harris. Ges-roj C. kaj D. Dean ricevis atestilon (1983) pri Dumviva Aneco.

S-ro R..Smeets kaj O. Loneragan ricevis subvencion por partopreni E-Somerlernejon en Toowoomba (1979). Novan Radio-Klason ĉe 6NR gvidis S-ino V. Payne (1979), “Esperanto por Infanoj”. Dum kelkaj jaroj ĉe Jarfestivalo en Hyde-Parko liganoj starigis budon, por enspezi per vendado de varoj kaj samtempe propagandi pri Esperanto. Krom la normaloj klasoj en klubejpj, S-ino V. Payne instruis al E-klasoj ĉe Teknika Kolegio dum kelkaj jaroj; en februaro 1984, komenciĝis E-kurso ĉe la Okcidenta Aŭstralia Kolegio por Altgrada Eduko. La unua oficiala kurso pri la Internacia Lingvo iam starigita en aŭstralia terciara instituto; entute estis ses-semestra (tri-jara) kurso. S-ino V. Payne estis (kaj estas) la instruisto.

Dum speciala ceramonio, nova vojo en Perto, nomiĝis "Esperanto Way" (Esperanto Vojo) dum 1982. Liganoj akceptis, la inviton de AEA ke ili starigu kongreson de AEA en Perto, 1986. Anoj de LKK jene prez.J. Hawks, vicprez-o,J. Harvey, R. Alvaro; sekr. C. Dean; kas. 0. Loneragan: red. Nigra Cigno", C, Dean; PRO S-no I. Einihovici (Estraro de ELOA-1985). Dek liganoj partoprenis la E-Somerlernejon en Armidale, NSK, en 1985 (Ĉ.9).

Mortis dum la :lastaj jaroj la sekvantaj liganoj: en 1981 David Miller (sekr. WES 193235); en 1982 S-ino Edith Palmer kaj S-ino Amelia Sedgley (malnovaj fervoraj anoj); en 1983, S-ro G. Gobba (rnuzikis dum kekaj Zamenhof-festoj); en 1986 S-ino Olive Hunt (multjara ligano); S-ino Dorothy I (multe laboris kun edzo Chris pri ligaferoj); D-ro C. Caldera (Patriarko de Esperanto en Aŭstralio). Vizitantoj jene 1979 – E. W. Chandler (Sidnejo), F-ino A. Hearne (Oakleigh Grupo); 1981 F-ino Fink, S-ino Sandford, S-ino D. Tulfdord, Ges-roj Durham (Anglujo); 1982 - S-ro H. Puig (Hispanujo), S-ro R.L. Harry (prez. AEA); 1983 - F-.ino M. Issobe (Japanujo), Ges-roj K. kaj V. Stevens (Britujo),Ges-oj A. Cocking (Sidnejo), S-ro Kruiswijk, S-ino Leipoldt (Nederlando), S-ino L. Deskalova (Bulgario), S-ino R.Stepien (Pollando). Eksterlandis: Ges-roj H. kaj R. McGrath al Britujo; J. Hawks al U-kongreso en Stokholmo, 1980. S-ino S. Gradussov al konferenco de ILEI en Malto kaj poste al Gressillon (Francujo), 1980. En 1982 D-ro kaj S-ino I. Einihovici vizitis al Ĉinujo. En 1983 S-ino V. Payne partoprenis tri semajnan kurson de Esperanto ĉe la Universitato de San Francisko, Usono. En 1983, S-ino Ruth McGrath gajnis premion 'John Buchanan' kaj malavare donacis la sumon $160 por plibonigi la E-Bibliotekon en Universitato-Murdoch. D-ro Caldera sukcesis pri la sama konkurso en 1949.

Ne estas speciala mencio pri Zamenhof-festoj kiuj okazis ĉiun jaron, de la mezdudekaj jaroj ĝis 1984, kaj ne estas spaco en ĉi tiu historio rakonti pri sociaj eventoj aŭ pri aliaj sufiĉe: gravaj okazaĵoj kiuj estis integra parto de la E-movado en Okcidenta Aŭstralio, sed sekvas apartan mencion pri du elstaraj anoj:

D-ro CYRUS J.CALDERA. Li esperantiĝis en 1939, instigite de S-ro Isor Masel; en 1944 ili kunfondis la nutempan grupon, Esperanto-ligo de Okcidenta Aŭstralio, kies unua sekretario li estis de 1943 ĝis 1944. Proprakoste li provizis kunvenejon dum la unua jaro. Li estis fortegulo de la E-movado ne nur en Perto, kie li instruis kaj propagandis, sed ankaŭ kiel estrarano de AEA. Li fariĝis, en 1946, sekr, de AEA kaj de januaro 1950 ĝis deĉembro 1951 estis de AEA. Li estis la unua, kiu proponis ke la unua postmilita kongreso de AEA okazu en Melburno en 1950 kiam li elektiĝis prezidanto. Li forte strebis pri establigo de Ekzamena Komisiono de AEA en 1958; Li prezidis la Komisionon ĝis 1962. En 1976, AEA danke honoris D-ron Caldera per aljuĝo de sia Honorinsigno. Li mortis, preskaŭ 98-jara, la 9an de aŭgusto, 1984.

H. BYRTT: esperantiĝis en Melburno dum la 'mallumaj jaroj; .li estis prez. de la Persista Grupo ĉe Armadale, Viktorio, 1922-27; li estis la lasta prez.de la Aŭstralazia Esperanto-Asocio en 1926. Post translokiĝo al Perto, li elektlĝis fond-prezidanto de Westralian Esperanto-Societo kaj prezidis 1928-36, 1938-39 kaj 1942. Pro maljunaĝo li eksiĝis en 1944. Certe S-ro Byatt multe kontribuis al la E-movado, kaj en Viktorio kaj en 0kcidenta Aŭstralio.

Menciendaj estas kelkaj el la pioniroj kiuj laboris por la Nigra Cigno Klubo: S-roj T. E. 0'Donoghue, W. T, Casey, E. J. Goody, C. Caine, C. Unwin, J. Skurrie, M. Browne; F-ino E. Cherret. (STATISTIKO)

Aliaj kiuj; ege kontribuis al la Westralian Esperanto-Societo: S-roj D Miller, A. Chamberlain, A. Saar; S-ino E. Sainsbury. (STATISiIKO)

Tiuj, kiuj multe kontribuis at la nuntempa ELOA jene: F-ino j 0. Strempel, V. Egan, A. Longson; D-roj T.Einihovici, D. Broadribb; S-inoj R. McGrath, I. Caldera, I. Einihovici, A. Sedgley, V. Payne, S. Gradussov, G. Pollard, D, Threlfall, E. Palmer, E. Pianto, 0. Dean; S-roj I. Masel, J, Hawks, C. Dean, W. Howard, 0. Loneragan, N. Brodie, C. Hehir, E. Walker, R. Smeets, A. Huts, kune kun aliaj estraranoj listigitaj en STATISTIKO.

* * *

OKCIDENTA AŬSTRALIO

| | |
|---|---|
| Nigra Cigno-Klubo | 1911-1927 |
| Westralian E-Societo/Grupo-Nigra Cigno | 1928-1944 |
| Esperanto-Ligo de Okrcidenta Aŭstralio | 1943-1985 |
| Esperanto-Societo de Ocidenta Aŭstralio (Perta Esperanto-Asocio) | 1913-1926 – ĉe Kolegio -STOTT |
| Esperanto-Societo de Fremantle | 1911-1917 |

Nigra Cigno-Klubo fondiĝis 1911.

| | | |
|---|---|---|
| 1911 | prez. D. Davies | 1911-12 sekr. T.E.O'Donaghue |
| 1912 | prez. M A. Browne | |
| 1913-14 | prez. F-ino Fa Hooton | 1913-14 sekr. S-ino A.MacDonald |
| 1915 | NEAKTIVA | |
| 1915-19 | prez. J. Skurrie | 1916-22 sekr. C.Caine |
| 1920-23 | prez. W. T. Casey | 1923-27 sekr. F-ino E. Cherrett |
| 1924-27 | prez. E. J.Goody | |

-

Westralian Esperanto-Societo/Grupo-Nigra Cigno, fondiĝis 1928.

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1928-36 | prez. H. Byatt | 1928-30 | sekr. S-ino E. Sainsbury |
| | | 1931 | sekr. F-ino E.Griffin |
| | | 1932-35 | sekr. D. Miller |
| | | 1936 | sekr. P. Preston |
| | | | |

1936-37 NEAKTIVA

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1938-39 | prez. H.Byatt | 1938-39 | sekr. A. Saar |
| 1940-41 | prez I.Massel | 1940-41 | sekr. F-ino K Crawford (ĝis jun) |
| 1942 | prez. H.Byatt | 1941-44 | sekr. A. Chamberlain |
| 1943-44 | prez A. Saar | | |

Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio fondiĝis 1943 (kunfandiĝis kun WES la 25an de majo 1944)

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1943-44 | prez. I. Masel | 1943-44 | sekr. D-ro.C.Caldera |
| 1945-46 | prez. F-ino O. Strempel | 1945 | sekr. R. Stephens |
| 1947-48 | prez. N. Brodie | 1946-47 | sekr. F-ino E. Willis |
| 1949-50 | prez. E.A. Walker | 1948-49 | sekr. F-ino R.Goodall |
| | | 1950-51 | sekr. J. Hawks |
| 1951-52 | prez. F-ino O. Strempel | 1952 | sekr. D-ro T.Einihovici |
| 1953-54 | prez. J. Hawks | 1953 | sekr. F-ino Bull, S-ino A.Sedgley |
| 1955 | prez. F-ino O. Strempel | 1954-55 | sekr. F-ino A. Longson |
| 1956 | prez. J. Hawks | 1956 | sekr. S-ino E. Pianta |
| 1957-58 | prez. S-ino G. Pollard | 1957 | sekr. T. Cameron |
| | | 1958 | sekr. |
| 1959 | prez. E.A. Walker | 1959 | sekr. S-ino G. Pollard |
| 1960 | prez. J. Hawks | 1960 | sekr. S-inoj G. Pollard & A. Sedgley |
| 1961-62 | prez. C.Dean | 1961 | sekr. S-ino E. Palmer |

STATISTIKO (daŭrigo)

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1963-64 | prez. J. Hawks | 1962-63 | sekr. S-ino G. Pollard |
| 1965-66 | prez. C. Dean | 1964-65 | sekr. F-ino A. Longson |
| 1967 | prez. N. Brodie | 1966-77 | sekr. W. H. Howard |
| 1968-69 | prez. C. Dean | | |
| 1970-71 | prez. S-ino R. McGrath | | |
| 1972-'73 | prez. J. Hawks | | |
| 1974-75 | prez. D-ro T. Einihovici | | |
| 1976 | prez. R. Smeets | | |
| 1977-78 | prez. H. Huts | 1978-85 | sekr. C. Dean |
| 1979-80 | prez. R. Smeets | | |
| 1981-82 | prez. J. Hawks | | |
| 1983-84 | prez. R. Smeets | | |
| 1985 | prez. J. Hawks | | |

Anoj de la Mond-Ligo de D-ro Zamenhof, 1889-1909.

D. Davies
P. D. Good
G. Hannah
R. T. Jackson
C. Longueville
D.MacLennan
J. L. Stow
F-ino K. M. Fane

* * *

PERTA ESPERANTO-ASOCIO/ESPERANTO-SOCIETO de OKCIDENTA AŬSTRALIO
(ĉe Kolegio-STOTT)

Fondiĝis 1913. Estraro: 1913-26 prez. S-ro T. Burt; 1913-17 sekr. F-ino M. Watson, 1918-22 sekr. V. J, Matthews. En 1926, studantoj el la Nigra Cigno-Klubo aliĝis al la E-kurso de S-ro Burt, inkluzive de 3 fratoj Steitz, sed mankas aliaj detaloj. Tamen S-ro T. Burt estis prez. kaj S-ro T. Steltz estis kas. de la LKK kiu aranĝis la 6an Kongreson en Perto, en 1929 (Ĉ.4).

* * *

ESPERANTO-SOCIETO de FREMANTLE

Fondita en 1911 de S-ro C. Unwin. Estraro jene: prez. G. F. Payne; sekr. C. Unwin; kas. J. H. Foxworthy. Anoj estis J. McLaren kaj S. Fox, sed ne estas detaloj post 1917.

* * *

Ĉapitro 3(c)

**ESPERANTO EN TASMANIO**

La unua klubo, Hobarta Esperanto-Klubo fondiĝis en 1908; prez, estis Herman Ritz unu el la du plej fruaj esperantistoj en Aŭstralio - laŭ la Zamenhofa Listo de la Mond-Ligo, 1889-1909. S-ro Ritz tiam estis Iekciisto pri modernaj lingvoj en la Universitato ĉe Hobarto. Sekr. de tiu unua klubo estis S-ino Harcourt.
Tarnen estis frua grupo starigita en Hobarto, post instruado dum ŝipvojaĝo de Tasmanio al Eŭropo; Cedric White, bone konata Esperantisto kaj mondvojaĝanto, ĉiam dum tiaj vojaĝoj instruis ai interesatoj, Esperanton. En ĉi tiu surŝipa klaso estis, el Hobarto, F-ino Ross kaj S-ro Clemes kiuj starigis studgrupon post reveno; ambaŭ aliĝis al la Hobarta E-Klubo fondita de Herman Ritz, 1908. Aliaj fruaj anoj estis. Ges-roj Steele; S-roj Meggy, H. L. Nichols;F-ino C. M.Hannaford.

S-ino Steele veturis al. Melburno, 1912, por partopreni la 2-an Aŭstralian Kongreson, sed ege malsanis kaj rnortis. Pro manko de analoj kaj protokoloj pri la fruaj jaroj en Tasmanio, antaŭ naskiĝo de Suda Kruco, estas malfacila tasko elĉerpi faktojn pri la fruaj jaroj en Tasmanio, tamen aliaj fontoj estas "British Esperantist" kaj Jarlibro de UEA en kiuj troviĝas nudaj detaloj pri deligitoj de UEA kaj samideanoj en Hobarto: S-roj N. Carryer kaj D. Guilbert.

Post la morto de la dua prez. S-ino Steele en 1912, ĝis la jaro 1923 mankas nomoj de prez-oj, tamen listigitaj estas sekr-oj (vidu statistikon).

Pli vigla fazo komenciĝis en 1923 kiam F-ino C. M. Hannaford (prez,) kaj F-ino A. Beckett (sekr.) fondis grupon kiu kunvenis semajne ĉe "Eaton Bray" (Iton Brej) Lernejo. F-ino Hannaford estris la lernejon kaj dum multaj jaroj instruis Esperanton al speciala klaso tie. Ĉi tiu situacio daŭris ĝis 1929, kiam D, Guilbert (prez.) kaj F. Archer (sekr.) transprenis la gvidadon de Hobarto E-Grupo ĝis 1932.

Post 1932 sekvis vera vakuo ĝis 1938, sed sendube la influo de mond-depresio efikis; estis ankaŭ periodo piejparte sen nacia gazeto. Denove mankas historiaj detaloj.

Dum 1938-39, du fervoraj samideanoj tiutempaj, Pastro C. C. Cowling kaj S-ro G. Hillerman ege aktivis pri la starigo de Tasmania Esperanto-Societo kaj eventuala Aŭstralia Esperanto-Asocio. Ĉi tiu plenmerita kaj iom ambicia celo plenumiĝis en 1939 malgraŭ la malfacilaĵoj trafitaj pro la tiama ekonomia situacio. Pastro Cowling estis elstara ekzemplo de konscia viro; li batalis por la starigo de la nacia asocio kiun proponis Joab Eljot an 1937, kaj fine venkis pri tio en majo 1939. Pastro Cowling estis la dua prez. de AEA kaj F-ino J. Lawson (poste S-ino Cowling ) estis la unua sekretario, de majo 1939 ĝis junio 1941.

Post la fondiĝo de la Tasmania Esperanto-Asocio, 1939 ĝis 1952, estis relative stabila periodo sub la prezidanteco de S-ino A. Douglas, 1939-43 kaj tiu de S-ro J. Couche, 1944-52; sekr. 1939-40 estis F-ino N. Lawson; 1941-43 estis G. Hillerman; 1944-56 estis G Chatterton. De 1953 estis alia periodo de neaktiveco ĝis la 27a de deĉembro 1956 kiam refondiĝis la Hobarta Esperanto-Grupo, sub la gvidado de S-ro Marcel Leereveld, en Hobarto, kiu energie kaj kapable estris la grupon. S-ro Leereveld ankaŭ iniciatis Aŭstralian Kongreson en Hobarto, 1960,(ĉ.4). Aktivis dum la periodo 1957-61, S-ino A. Douglas; S-roj G. T. Lancaster, A. Nightingale, E. Bantick; S-inoj Shankley kaj A. Leereveld.

En 1960 F-ino Penny Ferguson el Sidnejo, kiu tiam laboris ĉe Bell Bay, propagandis en Laŭnĉeston-a gazeto kaj starigis klason kun 14 lernantoj. Kunlaboranto en Launceston estis S-ino Helen Cohen. Bedaŭrinde F-ino Ferguson reiris al Sidnejo, 1961, kaj la grupo ne plu daŭris.

Post la translokiĝo al Viktorio de Ges-roj Leereveld, prez-oj S-ino A. Douglas (1962-63) *G.* Lancaster (1964), kaj sekr-oj E, Bantick (1962) G, Lancaster (1963) S-ino H. Cooper (1964) prizorgis la aferojn de la Hobarta E-Grupo.

La Hobarta Esperanto-Societo fondiĝis, 1965: prez. S-ro J. Gibson; vicprez-oj S-ino M. Shankley, S-roj G. Lancaster, E, Bantick, F. Loorits; sekr. S-ino H. Cooper; kas S-ro G. Cooper; libr. S-ino E. Elias. En 1965, S-ino A. Douglas elektiĝis dumviva membro de la societo. (S-ino Douglas mortis en 1967). Ĉar S-ro J. Gibson instru-laboris en Launceston dum 1966, la estraro elektiĝis jene: prez E. Bantick; vicprez-oj S-ino M. Shankley, S-ro E. Loorits; sekr. S-ino H, Cooper; kas. S-ro G. Cooper; libr. S-ino E. Elias. La jarfinaj Zamenhof-festoj 1965-66 okazis ĉe la hejmo de Ges-roj Elias. En 1966, S-ino Hardy kaj F-ino Barclay ĉeestis la Universalan Kongreson en Tel Aviv. Bonvena vizitanto al Hobarto, 1966, estis F-ino Helen Prent el Anglujo.

La 11an de marto 1974, stariĝis la Launcestona E-Klubo, estraro jene: prez. S-ro Mac LeFevre; sekr. F-ino E. Warburton; kas. S-ro B. Carswell. 1975, estraro: prez. Mac LeFevre; sekr. S-ino L. Carswell. 1976-1980, prez. B. Squires; sekr. P. Connors.

Dum ĉi tiu periodo okazis en Launcestono 1978, Kongreso de AEA (Ĉ.4). Denove 1981-82 prez. estis Mac LeFevre dum sekr, estis S-ino Pat LeFevre, 1981-1985; S-ino K. Macfarlane, prez. 1983-1985 gvidas la klubon, dum S-ro Mac LeFevre, julio 1984 estiĝis prezidanto de la Aŭstralia Esperanto-Asocio.

Tributoj al Du Eminentaj Tasmaniaj Esperantistoj.

ĈEDRIC C COWLING, 1912-1978: esperantiĝis en la fruaj tridekaj jaroj; li varbis, tiutempe, novan membron, S-ron Ralph Harry en la movadon. Li edziĝis, 1940, kun F-ino Nancy Lawson, sekretariino de la Tasmania Esperanto-Asocio; F-ino Lawson (S-ino Cowling) estis sekr. AEA de majo 1939 ĝis junio 1941. Dum tiu periodo, Pastro Cowling estis prez.de la nove fondita AEA kaj sendube estis plejparte respondeca pri la stabila starigo de la nuntempa nacia asocio. Pastro Cowling forte subtenis S-ron Joab Eljot, kiam tiu 'paradoksulo' proponis la fondon de AEA en oktobro 1937. Ĉedric Cowling gajnis Diplomon de BEA en 1934; li estis unu el la sep originalaj komisionanoj de la Aŭstralia Ekzamena Komisiono (Ĉ.8). Li verkis libreton, "Pri la Iamaj Tasmanianoj", 1935(Ĉ.5). Li kondukis la Diservon, en Esperanto, dum tri kongreso j de AEA. Li estis fidela ano de AEA ĝis sia morto kaj ĉiam estis preta antaŭenigi la movadon; sendube li estis unu el la aŭstraliaj forteguloj de Esperanto.

ALICE DOUGLAS: ŝi esperantiĝis en 1937; ŝi prezidis la Tasmanian E-Asocion de 1940 ĝis 1943; ŝi pioniris la diskutojn, post la propono de Joab Eljot por restarigi la nacian asocion, kiuj rezultigis la nunan AEA-n; si estis vic-prez. de la nova grupo en Tasmanio, 1956-1961, kaj estis prez. 1962-63. Ŝi estis la unua ekzaministo oficiala, kiam Esperanto estis enkondukita en la programon de studoj en Tasmaniaj lernejoj. Ŝi grande kontribuis al la movado, kaj en Tasrnanio kaj en Aŭstralio.

**Eroj el historio;**

S-ino M. Steele, 1912, gajnis premion rilate al traduka konkurso, je 19 okazo de la 2-a Aŭstralia Kongreso bedaŭrinde, pro malsano ŝi ne povis ĉeesti la kongreson.

Post peto de 1a Launcestona Esperanto-Klubo, 1975, pri pruntedono de kelkaj libroj el la biblioteko de la antaŭa Grupo ĉe Hobarto, la estintaj sekretariino kaj kasisto de tiu grupo, S-ino H. C. Cooper kaj S-ro H. Cooper, decidis donaci la tutan libraron al la nova klubo en Launcestono, "por ke la laboro kaj celo de D-ro Zamenhof antaŭeniru:'

La 23-an de aprilo, 1979, S-ro R. L. Harry kune kun S-ro Mac LeFevre, membro de la Tasmania Leĝdona Konsilio, t.e. la supera ĉambro de la Parlamento, donacis al la Ŝtate Regiona Biblioteko en Launcestono, en ia norda parto de la insulo, 350 librojn por starigi Esperanto-fakon.

En 1961 , post peto de la “Friends School" (Kvakera Lernejo) en Hobarto dum 1960, la Edukado Fako de Tasmania decidis inkludi Esperanton en la lerneja Direktorio-Ekzameno. En la manlibro por 1961, troviĝas sep paĝoj pri la fako-Esperanto - la celoj de la ekzameno, la detaloj pri la kursoj de unua ĝis kvara jaro, kaj listo de E-libro j kaj gazeto j. En la Kvakera Lernejo, S-ro M. Leereveld kaj kunlaborantoj instruis Esperanton tiuĉele. S-ino Alice Douglas estis la unua oficiala ekzamenisto kiam Esperanto estis enkondukita en la lernej-programon de studoj en Tasmanio.Malgraŭ In fakto ke 8 studantoj brile sukcesis pri la ekzameno en 1964, la Edukada Fako ne plu daŭrigis la proponon ke Esperanto estu oficiala temo.

Viglaj samideanoj en Hobarto dum multaj jaroj estis Ges-roj E. Loorits. De 1963 ĝis 1985 S-ro E, Loorits estis delegito de UEA (Ĉ.7) kaj kune kun sia edzino forte propagandis por Esperanto en Hobarto.

TASMANIAJ PIONIROJ (Z-LIGO, 1989-1909)

| | |
|---|---|
| S-ro Herman Ritz | F-ino D.C.Wilson |
| S-ro J.Bennett | F-ino J.L.Wilson |
| S-ino M.Steele | S-ro J.Steele |
| S-ro A..J.Winterton | F-ino C.Travers |
| F-ino K.N.Fane | S-ino A.C.Kennedy |
| F-ino O.Harris | F-ino R.Garrett |

STATISTIKO - TASMANIO

Hobarta Esparanto-Klubo, Fondiĝis 1908

| | |
|---|---|
| 1908-1909 prez. H.Ritz | 1908-1909 sekr. S-ino Harcourt |
| 1910-1917 prez. S-ino M.Steele | 1910-1911 sekr. F-ino Ross |
| | 1912 sekr, E.A.Budge |
| 1913-1922 prez. MANKAS DETALOJ | 1913-1916 sekr. K . Simmoms |
| | 1917-1919 sekr, D.Guilbert |
| | 1920-1922 sekr. E.F.Heritage |

- 24 -

Hobarto Esperanto-Grupo, fondiĝis 1923

1923-1928 prez. F-ino C. M. Hannaford 1923-1928 sekr. F-ino A. Beckett
1929-1932 prez. D. Guilbert 1929-1932 sekr. F. Archer

1933-1936 MANKAS DETALOJ

Hobarta Esperanto-Kluho, refondiĝis 1937

1937-1938 prez. Pastro C. C. Cowling 1937-1938 sekr. S-ino A. Douglas

(1939 Pastro C. C. Cowl i.ng - prez. AEA sekr. F-ino Lawson)

Tasmania Esperanto Asocio, fondi~is 1939

1939-1943 prez. S-ino A. Douglas 1939-1940 sekr. F-ino N. Lawson
1941-1943 sekr. G. Hillerman
1944-1952 prez. .J. Couche 1944-1956 sekr. G. Chatterton
1953-1956 prez. S-ino A. Douglas

Hobarta Esperanto-Grupo, refondiĝis 1957

1957-1961 prez. M. Leereveld 1957-1958 sekr. G. T. Lancaster
1959 sekr. S-ino Shankley
1960 sekr. R.Nightingale
1961 sekr. S-ina A. Douglas
1962-1963 prez. S-ino A. Douglas 1962 sekr. F. Bantick
1963 sekr. G. Lancaster
1964 prez. G. Lancaster 1964 sekr. S-ino H. Cooper

1965 Hobarta Esperanto-Societo, fondiĝis

1965 prez. J. Gibson 1965-1966 sekr. S-ino H. Cooper
1966 prez. E. Bantick

1967-1974 N E A K T I V A

| Laŭncestona Esperanto-Klubo, fondigis 1974 | |
|---|---|
| | |
| 1974-1975 prez. Mac LeFevre | 1974 sekr. F-ino E. Warburton |
| | 1975 sekr. S-ino L. Carswell |
| 1976-1980 prez. B. Squires | 1976-1980 sekr. P. Connors |
| 1981-1982 prez. Mac LeFevre<br>1983-1985 prez. S-ino K. MacFarlane | 1981-1985 sekr. S-ino Pat LeFevre |
| Julio 1984- Mac LeFevre, prez. AEA | |
| | |
| Aliaj Grupoj. | |
| | |
| 1923 ĉe Moonah, S-ro A. Auwart gvidis grupon. | |
| 1953-54 ĉe Devonport grupa stariĝis; prez. kaj gvidanto, S-ro C. Ramsey; sekr. S-ro M. W, Ives. | |

## Ĉapitro 3(ĉ)

## ESPERANTO EN KVINSLANO

Brisbana Esperanto-Societo
La Brisbana Esperanto-Klubo fondiĝis la 31-an de januaro, 1906, dum generala kunveno tiucele; entute 44 esperantistoj kaj .samideanoj ceestis la kunvenon, inklusive de17 anoj de la Ligo de Zamenhof (1889-1909).

La plej frua instruisto de Esperanto en Kvinslando estis S-ro James Carmody, kiu en 1903 komoncis klason en Brisbano; S-ro Carmody estis profesia instruisto en lernejoj plejparte ekster la ĉefurbo kaj mortis en 1905 antaŭ ol la 1a E-klubo fondiĝis. Pro manko de protokoloj kaj analoj rilate al la fruaj jaroj estas malfacile kroniki detalojn pri unuopuloj kiuj sendube multe kontribuis al Ia tiama movado, tamen el aliaj fontoj estas haveblaj bazaj faktoj pri fruaj anoj kaj estraranoj.

1906-1924. La fondprezidanto, 1906, estis P. P. FEWINGS kiu prezidis ĝis 1912 kiam lia sanstato melebligis pluan laboron per Esperanto. S-ro Fewings kontribuis ĉiusemajne, artikolojn pri Esperanto, de 1908 ĝis 1911 al la loka ĵurnalo; ĉi tiuj artikoloj estis en Esperanto, pri diversaj temoj kaj ekzemploj restas hodiaŭ en la Kvinslanda E-Muzeo. La unuaj sekr. kaj kas. (1906-1907) estis respektive, H. Kay kaj D. Eglington. Post la du fruaj entuziasmaj jaroj, pro diversaj kialoj, negranda grupo restis en 1908. Tamen dediĉemaj anoj subtenis klubagadon an Brisbano kaj Esperanto travivis tiujn malfacilajn jarojn ĝis kaj post la 1a mondmilito. S-ro Fewings, advokato, fariĝis en 1909 vicprezidanto por Aŭstralio de la Internacia Societo de Esperantistaj Juristoj.

Krom la prez. S-ro Fewings,aktivis dum la periodo 1906 ĝis 1925, la 'Eta Patrino' de la E-movado en Brisbano, F-ino, Marion FRASER; ŝi estis kas. en 1908, sekr. 1909-1912, prez. 1913-1923 kaj 1925, vicprez, en 1924. F-ino Fraser ĉeestis la 4an Kongreson de AEA en Sidnejo, 1923, kaj la 5an en Melburno, 1925, kie bedaŭrinde ŝi forpasis dum la kongreso. (Hodiaŭ, portreto de F-ino Marion Fraser, prezentita de nevino F-ino Alison Tait al BEK dum Zamenhof-Festo en 1926, havas dignan lokon en la E-Muzeo).

Alia fortegulo, pionira ano de la originala klubo, estis S-ro T. SUESS; ano kaj estrarano de 1906 ĝis 1953. Li prezidis la klubon 1941, 1945-52; li estis vicprez. 1925-1929, 1937-1940, 1943-1945. Certe li kontribuis dum tiu kvardek-sepa jar-periodo, multon al la E-movado en Kvinslando. Alia pionira ano de BEK estis S-ro J. H. CADELL, juna viro kiu fervore parto-prenis klubaferojn; li aktivis kiel sekr. 1913-1923; li ĉeestis la 2an Kongreson de AEA en Melburno en 1912 kaj la 4an en Sidnejo 1923, kie li subite mortis. La perdo de S-ro Cadell estis granda bato al la E-movado en Brisbano.

S-ro A, MASON-BEATTY aliĝis al la klubo en 1910; li estis antaŭa ano de kaj SES kaj MES kaj prezidis la 2an Kongreson de AEA en Melburno, 1912. Li estis prez. de BEK en 1924. Ges-roj P. W. PEARS, fondintoj de BEK, translokiĝis al Warwick en 1908 sed ili restis asociaj ano j de BEK dum multaj jaroj.
S-ro A. STAINES aliĝis al la klubo en 1911 kaj restis ano ĝis 1929; li estis prez. 1926-1927.
S-ro L. W. WIRTH aliĝis al la kluho en 1909 kaj estis fortegulo de la E-rnovado ĝis 1950; li elektiĝis Dumviva Membro en 1929; li ĉeestis la 4an Kongreson de AEA en Sidnejo, 1923.
S-ro C. C. DORNBUSCH, estis asocia ano de BEK kiu loĝis en Warwick, kie li fondis grupon.
S-ro C. S. PRICE, fondinto kiu subtenis ia klubon, 1906-1910.

-26-

S-ro C. KIDD aliĝis al BEK en 1920 ka j restis ano ĝis 1953; Li estis vic-prez. 1927-28, 1930-1931, 1939-1941, 1947-1952; 1i estis prez. de BES 1929 kaj 1943. S-ro W. Kidd (frato de C. Kidd) estis aktiva membro de 1920 ĝis 1927; ambaŭ ĉeetis la 3an Kongreson de AEA en Sidnejo, 1920. Ĉeestis tiun kongreson S-ro H. R. Smith el Ipswich (asocia ano de BEK). S-ro J. Predl translokiĝis al Melburno en 1922 - ano de BEK, 1920-1921.
Anoj de la Delegita Reto de UEA en la fruaj jaroj: S-roj Wirth, Proctor, Cadel.l, Pears, kaj F-ino Fraser (Ĉ.7).

F-ino E. CARRiCK aliĝis al BEK en 1916; si fariĝs help-sekr. 1922-1923; sekr/kas. de 1924 ĝis 1954, krom en la jaro 1933 kiam .ŝi restis kas./libraristo. Ŝi elektiĝis Dumviva Membro de BES en 1957; ŝi estis fervora subtenanto de Esperanto ĝis sia morto en 1973 (ŝi jam aliĝis al la kongreso, 1974, en Brisbano). Sendube F-ino E. C. Carrick kontribuis pli daŭrigan kaj dediĉitan laboron ol iu alia membro en Brisbano por la E-movado. Memore al ŝia sindediĉemo troviĝas en la E-Muzeo de Kvinslando, sortimento de libroj, el la 'Elizabeth Carrick' libraro.
Aliaj anoj kiuj aliĝis al BEK antaŭ ol la jaro 1925 estis: S-ro A. Sycamore, sekr. 1925-1926; S-ino Sycamore; F-inoj Alphen, Cable, Stuart; S-roj S. Poon, P. Proctor (1923-1935), H. W. Holden; S-ino Hatfield.

1925-1937. Alvenis en Brisbano, en 1925, S-ro Maurice HYDE (prez. AEA en 1921) kiu tuj aktivis en klubaferoj kaj en la disvastigo de Esperanto per publikaj prelegoj kaj per radio-paroloj. Tiun jaron 1925, F-ino Carrick estiĝis sekr. kaj de tiam restas protokoloj, tre valoraj al posteuloj (analistoj) kiuj interesiĝas pri la historio de Esperanto en Brisbano. Dum 1925 kamparaj anoj aliĝis al BEK jene; F-ino M. Trundle (Eumundi) 1929-1942: F-ino A. Ryan (Redbank Plains) 1925-1935; S-ro E. P. Pryke (Mackay) 1925-1931; aliĝis ankaŭ al BEK en 1925, S-ro Oscar BEHNCKEN, kiu estis longserva membro (ĝis 1964): intertempe li estis vicprez. 1933-1934; kas. 1935 kaj kaskontrolisto dum pluraj jaroj. Alia multjara ano, S-ro H. N. LOVE aniĝis en 1925 kaj daŭre subtenis la movadon ĝis 1956: li estis prez. BES 1938-1940; li elektiĝis Dumviva Membro en 1957.

En 1925, ĉe 'Wattle Cafe' (Kafejo Akacia) okazis la unua Zamenhof-Festo en Brisbano (kiam estis ankaŭ donaco de portreto de F-ino M, Fraser al BEK, fare de F-ino Tait pro la familio Fraser).

Aliĝis al BES en 1927, F-ino Rose MACPHERSON, kiu poste oficis kiel vicprez. kaj kas. dum multaj jaroj. Tiam S-ro M. Hyde estis prez. kaj F-ino Carrick, sekretario. Vizitantoj en tiu jaro jene: D-ro Fred Williams (MES), S-ro W, J. Tubulieff (Rusujo). La jaro 1928 estis grava jaro en Brisbano; S-ro 0. Behncken proponis nomŝanĝon, ke estonte BEK estu BES kaj la propono estis unuanime akceptita. Donacoj de E-libroj al la biblioteko estis faritaj de: A. M. Hyde (inkluzive de 'Aŭstralio, Lando kaj Popolo')(Ĉ.5), L. W. Wirth, S-ino Carseldine (memore al sia filo, antaŭa E-studanto, kiu mortis en 1915 dum milit-servo), S-ino Groeneweg, Familio-Fraser (memore al F-ino Fraser). Vizitis al. BES la jenaj: Ges-roj Andrews (Nov-Zelando), Ernest Maguire (biciklisto kiu rajdis el Perto), F-ino M. Helm (MES).

Aliĝis al BES S-ro E. LITTLETON, 1929-1956; li estis vicprez. 1954-1956, sekr. 1933. Li kontribuis multon al la societo. Mortis en Sidnejo, 1929, antaŭa ano S-ino Scammel kiu estis vic-prez. de SES kaj reprezentis AEA-n ĉe U-Kongreso en Wien, 1924. S-ro Hyde propagandis pri Esperanto per cirkulero al parlamentaj kandidatoj - la temo 'Esperanto en Lernejo'; respondoj ricevitaj jene; por, 13; kontraŭ 3; necertas (pro manko de scio pri la lingvo), 5. Interesa jes-respondo estis tiu de S-ro H. Russell., antaŭa pionira ano de BEK!

En 1930 translokiĝis al Brisbano, S-ro F. T. Simon el Sidnejo,kiu fariĝis prez. De BES 1932-1933: li reiris al Sidnejo en junio 1933. Pastro A. H. Lambton (Nov-Gineo) skribis al BES dum la jaroj 1930-1934 kaj donacis E-librojn al la biblioteko. Aktivis S-roj W. Baker kaj V. Vitoshinsky pri klubaferoj dum S-ro Hyde brodkastis pri Esperanto je radio-stacio 4QG. S-ro Dobrilla (MES) vizitis al Brisbano. En 1931 S. L. PARRY, farigis ano de BES kaj restis foprta subtenanto de la societo ĝis 1962: li elektiĝis prez. 1933-936, 1953-1960; vic-prez. 1932, 1952; sekr. 1961-1962. S-ro Parry multe kontribuis al Esperanto en Brisbano dum ĉi tiu meza periodo de la movado. Dum 1931 F. T. Simon iniciatis la filion de BES al AEA; li klopodis akiri brajlan E-instrulibron por blinda ano de la societo; li (pere de BES) provizis stud-librojn por Skolt-grupo en Gympie instruate de S-ro McKie.

Ekzamena Komitato por Pyke-Memoriga Ekzameno jene: M. Hyde (FBEA), C. Kid (DBEA), N. G. Mills (DBEA); sukcesis en 1932 E. Littleton kaj S. L. Parry, pri la ekzameno. Denove en 1932, dum Zamenhof-festo S-roj Hyde kaj Simon brodkastis er radio 4QG. Vizitantoj estis: Pastro Lambton, D-ro F.Williams: S-ro A. Frederick kaj S-ro J. Lewis, F-no C. Bridge, -ro Major, S-ro T. Waverley (SES)(. En 1933 30 'kamarpaj ano' en Norda Nova Sudkimrujoj aliĝis kiel; ascoiaj membroj al BES. Multjara ano, S-ro B. CUVET aliĝis al BES; li restis ano ĝis 1973 tame estis for de Brisbano kelkfoje dum tiu periodo. F-ino Winie Reilly, el Condamine, resendis la brajlan studlibron post dujara studado, la libro estis resendita al MES. Nova estrarano estis S-ro H. Hutton ano 1925-1933. STATISTIKO ĉiam enhavas liston de prez-oj kaj sekr-oj.

En, 1934, F-ino Briggs starigis E-klason ĉe mezlernejo, Victoria Park kie ŝi estris ekster-programon grupon; denoc\ve e 1935 kaj 1936 kun helpo de S-ro W. Ross. Interesa letero estis recivita el Italujo kun peto pri informado rilate al la kurac-metodoj fare de Fratino kenny pri poliomjelito. Fratino Kenny rekte repondis kaj posta dankletero alvenis al la societo. Novaj kamparaj anoj jene: S-ino Johanson (St. George), S-ino Langtree (Eidsvold), S-ro Coats (Longreach), S-ro G. Millller (Chillagoe). Vizitis al BES: F-ino V. Andrews kaj S-ro J. Nebe (MES).

En 1936 aktivis pri instruado:s-roj Hyde, C. Kidd kaj O. Behncken; pri klubaferoj, T. Suess. F-inoj Carrick kaj McPherson. La Estro de Edukad aFako donis permeson por instruo de Esperanto çe mezlernejoj en Brisbano, du fojojn monate inter la 2a kaj ka 4a oroj ptm. En 1937 vizitis al Es, F-ino M. Ely (MES) kaj S-ro Donald Wills (salomono-Insulo).
ĝ ŝ Ĉ ĵ ŭ
1938-1944. Sub la gvidado de estraranoj (STATISTIKO) inklusive de S. WAMNER (1939-1952)a societo travivis la malfacilajn, antaŭ kaj dummilitajn jarojn. Aliĝis al BES en 1936 F-ino A. CURTIS (canungra) kiu restis ano ĝis 1969; post tiu jaro ŝi aniĝis al E-Federacio de Kvinslando ĝis hodiaŭ(1985); ŝi estis deligito de UEA , 1966- 1984. Ĉar i loĝis en la kamparo ŝi povis Ĉeesti nur Z-Festojn de BES sed multfoje partoprenis Kongresojn de AEA. F-in Curtis donacis al la e-Muzeokelkajn historiajn fotojn el pasintaj jaroj. En 1938 la biblioteko ricevis donacon de 27 librojn el la libraro de D-ro R. Rendle, pionira ano de BEK. La samon jaron S-ro Vitoshinsky, S-roj M. Hyde kaj C. Dornbusch ankaŭdonacis librojn.

En 1939 s-ro Hyde reiris al Sidnejo, post multjara kontribuado al esperanto en Brisbano. Dume S-ro Wamner daŭre propagandis per artikoloj en tagĵurnalo "Telegraph". Aktivis pri grupaferoj, s-ro james; viziti al BES, F-ino Paris (MES) kaj S-ro D. Wills (Salomono- Insuloj). En 1940 S-ro dornbusch (Warwick) verkis artikolon en 'Scienca Revuo'; red. de La Rondo (S-ro Banham) edonis artikolon pri la E-vivo de S-ro Dornbusch, kiu esperantiĝis en 1909, sub la gvidado de S-ro Pears. S-ro Dornbusch aliĝis al BEK kaj estis Deligito de UEA, 1913-1932 (Ĉ.7).

BES filiiĝis kun la novefondifita AEA; en 1941 pli ol 60 anoj aliĝis al la societo kaj dum la milit jaro j multaj vizitantaj samideanoj partonrenis klubvesperojn. Mortis en 1941, S-ro A. Staines, forta subtenanto de BES dum pli ol 30 jaroj. Daŭre subtenis la societon (krom anoj listigitaj en STATISTIKO) la jenaj: C. Kidd, J. McDonald, W. Meadley, S. Wanmer; F-ino Macpherson; D-ro F. Williams (Kiu denove donacis librojn al la biblioteko). Por sendanĝerigi la bibliotekon, oni transportis la tutan libraron (265 librojn) al banko en Sandgate, kie T. Suess estis la estro.

En 1943 sukcesis pri la Pyke-Memoriga Ekzameno, S-ino Freeman; aliĝis tiun jaron al BES, 70 anoj. S-roj S. Wanmer kaj E. Littleton estis komisiitoj de AEA, pri propagando de Esperanto en Aŭstralio. Vizitis al BES, L. Roberts, F. Buswell, L. Reith, K. Smith (soldatoj) kaj S-ino Freeman (Columboola). En 1944 S-ro C. Kidd elektiĝis komitatano de AEA. Aktivis pri klubaferoj: S-roj Wanmer, McDonald, Suess; F-inoj Carrick, Macpherson kaj S-ino A. Sycamore. Kompreneble multaj ne povis partopreni grupaferojn pro tiutempaj malfacilaĵoj, tamen 80 anoj aliĝis dum la jaro.

1945-1960. Por eviti tedan ripetadon de nomoj la lastaj kvardek ses jaroj estas traktitaj laŭ taŭgaj jarperiodoj. Krom :La prez-oj kaj sekr-oj menciitaj en STATISTIK,O, aliaj anoj kaj estraranoj kiuj kontribuis al BES dum ĉi tiu periodo jene: S-roj H. Love, R. Dunworth, J. McDonald, E. Beck, R. Brown, B. Cuvet, E. Littleton, S. Wanrner, C. Kidd, E. Kelk, N. Mills, W. Meadley, 0. Behncken, S. H. Beck, H. Pryke, A. Grant, J. Matzner, R. Ahrens, K. Gunster, N. Collier, H. Petley, J. Norman, G. Miller; S-inoj R. McGeoch, J. Langtree, J. Freeman, N. Johanson, H. Beck, J. Sandford, J. Norman; F-inoj R. Macpherson, Pat Costello, B. Richardson, R. Curtis, V. Andrews, J. 0'Shaughnessy, I Reed, B. Lewis, A. Scaroni.

Kunvenejoj dum la periodo, jene: 1945-1948, ĉe Kunvenejo de Amikoj; 1949-1953 ĉe muzik-studio de F-ino B. Richardson; 1954-1960 ĉe privataj domoj. Anoj kiuj mortis jene: 1952 - S. Wanmer; 1953 - C. Kidd; 1954 - L.W. Wirth; C. C. Dornbusch; 1959 - T. Suess. Eroj el la jaroj: Ĉiun jaron okazis Zamenhof-Festo en diversaj lokoj. En 1946, S-ro S. Wanmer provis interesigi la Instituton de Modernaj Lingvoj pri la enkonduko de Esperanto, sen sukceso. En 1947 la Biblioteko revenis el Sandgate al la klubejo en Albert House (Domo-Alberto). En 1948 anoj prezentis al F-ino Carrick broĉon, omage al ŝia longdaŭra subtenado de la E-movado en Brisbano. En 1950, S-ino J. Langtree, F-ino R. Curtis kaj S-ro E. Kelk ĉeestis la unuan postmilitan kongreson de AEA en Melburno. (S-ino Langtree ĉeestis U-Kongreson en Edinburgh, 1926). En 1951, S-ino Langtree reiris al Kimrujo; F-ino V. Andrews translokiĝis al Brisbano el Melburno; F-ino Carrick vizitis al Perto kaj partoprenis Z-Feston; S-ino McGeoch trans-lokiĝis al Tasmanio.

En 1952, partoprenis kongreson de AEA on Sidnejo, F-ino Curtis kaj S-ro Kelk; aliĝis al la societo Ges-roj A. d'Oliveyra el Nederlando. En 1954 pro nova decido de la estraro malpermesi la anglan lingvon dum klasoj/kunvenoj, membreco draste malpliiĝis dum la jaro ĝis 17, kaj la situacio ne pliboniĝis dum multaj jaroj. Vizitis la kongreson de AEA en Perto, F-ino Curtis. En 1955, prez, S. L. Parry donacis ses E-librojn al la Ŝtat-Biblioteko. En 1956, radio-stacio 4BC intervjuis, S-ron Parry pri la decido de UNESCO akcepti Esperanton 'En Konsultaj Rilatoj'. S-ro A Grant sukcesis pri la Pyke-Memoriga Ekzameno; BES malakceptis inviton starigi kongreson de AEA en Brisbano, en 1958. En 1957, pro elstara kaj longdaŭra servo al BES, elektiĝis Dumvivaj Membroj de BES, F-ino E. Carrick kaj S-ro H. G. Love. Sukcesis pri Pyke-Ekzameno, F-ino Kath Lewis. En 1960, S-ro K. Gunster kaj F-ino K. Lewis ĉeestis kongreson de AEA en Hobarto. Dum generala kunveno anoj omagis al la pasinta S-ro T. Suess, pro elstara dediĉo al Eperanto Brisbano. Brodkastis je radio-stacioj 4BK, 4QG, 4BC, 4BH kaj 4QR dum la koncerna periodo, S-ino Langtree, S-roj Parry, Littleton kaj W. Simpkins

Vizitantoj jenaj: 1945 - Pastro G. Pausback Usonu), S-ino Clayton (Perto),S-roj Gilligan, G. Pollock (Sidnejo),F-ino. V. Andrews (Melburno}, S-ro R. Morgan (Nov-Zelando), F-ino Woolnough (Sidnejo}, S-ino J, Chandler (Gladstone). 1948 - Ges-roj Hank-, (Melburno), S-ro Berg (Nederlando). 1949 - S-inoj J. Langtree, J. Chandler (Gladstone), Ge-roj Ezzy (Melburno), S-ro Hickson (Nov-Zelando), F-ino V. Andrews (Melburno), F-ino A. Watts (Tamworth). 1950 -Ges-roj R. Perry (Newcastle). 1954 - S-ro W. L. Simpkins; (Usono). 1955 - F-ino A. Longson (Perto), S-ro Guilbert (Tasmanio), S-ro Miller (Ayr) :S-ro W. L. Simpkins (Usono). 1956 - S-ro J. Yates (Melburno), S-ro Schifkorskim (maristo), S-roH. Koppel (sekr. AEA, Melburno), 1957 - F-ino de kleen (Nov-Zelando), 1959 - S-ro W. H. King, F-ino Siegel (Nov-Zelando), D-ro F, Wïlliams (Melburno), Conrad Ivefjall (Svedujo). 1960 - S-ro N. Collier (Gladstone), S-ino W. Sandford (Bundaberg), S-ino G. Kirkwood (Sidnejo).

1961-1973. Sub la gvidado de prez-oj kaj sekr-oj (ST ATISTIKO) BES progresis dum ĉi tiu koncerna periodo. Aliaj anoj kaj estraranoj kiuj kontribuis al la movado dum ĉi tiuj dek tri jaroj, jene: S-roj H. Petley, A, Grant, 0. H. Behncken, S. H. Beck, C. M. Smith, B. Cuvet, G. Tendoro, A. Deutscher, J. Allen, T. Steele, T. O'Crady; S-inoj N. Callaghan, G. Grant, V. Williams, E. Gunster, V. Fraser, V. Yowe, B. Jolly, S. Martin, G. Phillips, J. Elvidge, A. Edmeades, J, Kennedy; F-inoj B. Allatt, C. Sullivan, A. Curtis, E. Carrick, E. Lewis; Ges-roj H. Jullie, A. Sycamore, B. Hodson, J. McBride; S-inoj W. Greenhalgh, G. Bayliss, E. Gardiner, J. Peters, J. Roth, U. Talbot, B, Drabsch, P. Oxley, P. Neale, V. Robinson, P. Ross, R. Hird, M. Stephenson, I. Pomfret, E. Petley, J. Sandford; S-roj N. Collier, H. N. Love, W. J. Meadley, J, Norman, A. G. Collier, S. L. Parry, S. Bracegirdle, L. Soar, H. Brendel, R. Egset, D. Eising, F, MacDonnell, R. Pomfret, P. Nicol; F-inoj E. Cooney, J. Pomfret, D. Clarke; S-roj J. Norman, R. Ross, R. Crowe; S-inoj A. Souwer, E. Wright.

En 1981, S--ino V. Fraser ĉeestis kongreson de BEA en Oxford (Oksfordo); S. L. Parry fariĝis FBEA, F-ino A. Scaroni vizitis al Eúropo. En 1962, BES adoptis novan regularon. Prez. de BES, S-ro Karl Gunster oficiale malfermis E-klubon ĉe Redcliffe. En 1964, F-ino A. Curtis kaj S-ino V. Fraser vizitis kongreson de AEA en Melburno. En 1965, anoj surskribis peton de UEA al al Unuiĝintaj Nacioj, pri la Internacia Lingvo. En 1966, S-ino V. Fraser partoprenis kongreson de BEA. Ges-roj C. Gunster, F-ino A. Curtis, S-ïno V. Williams ĉeestis kongreson de AEA en Kanbero. Mortis la 14an de novembro, S. L. Parry, fortegulo de la movado en Brisbano dum multaj jaroj; aliĝis al BES, 1930; vicprez. 1932-1933; prez. 1934-1936, 1952-1960; delegito de UEA 1948-1966.

Okazis en Sidnejo, 1980, la 27a Kongreso de AEA (Ĉ.4). En 1973, Wre Chandler gajnis premion 'Simondetti'; ĉi tiu jarpremio estas proponita de ORE al la elstara artikolo pri iu naturtemo (S-ino G. Kirkwood antaŭe sukcesis pri la sama premio en 1971). Ges-roj J. kaj E. Matasin partoprenis U/Kongreson en Hamburg, 1974. S-ino M. Chaldecott vizitis U/Kongreson en Rekjavik, 1977. Vizitis al U/Kongreso en Vankuvero, 1984, F-ino M. Straker, S-inoj K. Gassner kaj S. Burkitt (SES), S-ino T. Metherall (Newcastle).

Ĉiun jaron, SES kaj Manlio-Klubo kune celebris la Zamenhof-Feston sub la aŭspicio de la E-Fed. de NSK en E-Domo. Vizitantoj al SES dum la koncernata periodo, 1971-1985, jene: Tibor Sekelj (Jugoslavio), Haru Myzaki (Japanujo), F-ino R. McGill (Nov-Zelando) - 1971. F-ino G. Hickenbotham (Anglujo), S-ino Tiem (Svedujo), S-ro J. T. Allen (Nov-Zelando), S-ro Verlinde (Nederlando) - 1972. S-ino M. Lightheart (Usono), S-ro B. Phillips (Anglujo), S-ro E. Veis (Jugoslavio), Ges-roj Taege (Nov-Zelando) - 1973. S-ro O. Hadjiev (Bulgario), Kamal-U-Din (Indonezio) - 1974. Ges-roj E. Loorits (Hobarto) survoje al U/Kongreso, Kopenhago - 1975. S-ino Ŝo Issobe (Japanujo), S-ro L Bernstein (Nov-Zelando), H. K. Nina (Danlando), D-ro Ivo Lapenna (multjara prez.de UEA), S-ro Probal Daŝgupto (Hinda Unio) - 1979. Ges-roj R. Bossong, Ges-roj Koorn (Nederlando), D-ro Nassif Isaac (Egiptujo) - 1980. S-ino D. Tulford, Ges-roj G. kaj N. Durham (Anglujo) - 1981. F-ino Tanaka (Japanujo), Ges-roj Lerch (Nederlando), S-ro Stan Kulski (Pollando), S-roj Ŝ. Satojossi, K. Oki (Japanujo), S-ro Alois Wenzlawski (Zairo) - 1982. Ges-roj E. Woodruffe (Kanado), D-ro Carl Stop-Bowitz (antaŭa estrarano de UEA) el Norvegujo - 1983.

Ne estas spaco en ĉi tiu verko, aparte citi to nomojn de ĉiuj kiuj multe kontribuis al la E-movado en NSK, de la pioniraj tagoj ĝis hodiaŭ sed kelkaj elstaraj subtenantoj meritas specialan mencion plejparte pro longdaŭra kaj valora kontribuado, jene:

GEORGE COLLINGRIDGE, Ano de la Mond-Ligo de Zamenhof; pionira esperantisto en NSK kiu fondis la unuan E-klubon ĉe Gosford, en 1908. Li ĉeesstis la unan Kongreson de AEA en Adelaido, 1911. Li ankaŭ estis fama artisto kaj verkisto kaj pro tio, en Kanbero estas strato nomita Collingridge, je lia memoro; anoj kiuj ĉeestis la 24an Kongreson de AEA omage vizitis la straton en 1984.

EDGAR A. PRYKE. Ano de la Ligo de Zamenhof; li aliĝis al MEK, 1906. Li poste loĝis en Barraba, NSK kie li instruis Esperanton. Estis prez. SES, 1929-30 kaj delegito de UEA dum multaj jaroj.

LESLIE E. PFAHL. Aliĝis al SES dum la 'mallumaj' jaroj, ĉirkaŭ 1916; estis sekr.de la societo, 1920-1934. Li estis delegito de UEA 1922 ĝis 1936, ĉef-del. IEL, 1937-48; cef-del. UEA 1951-55. Unu el la elstaraj anoj de la frua SES, li estis sekr. de la LKK kiu aranĝis kongresojn de AEA en 1920 kaj en 1923, vera fortegulo de la E-movado en Sidnejo.

FRED T. SIMON.   Aliĝis al SES dum la 'mallumaj' jaroj, ĉirkaŭ 1917; estis kas. de LKK dum la 3a Kongreso de AEA en Sidnejo, 1923. Li estis estrarano de SES dum kelkaj jaroj; estis prez. 1926-28. Li elektiĝis DUMVIVA membro de SES en 1928. Poste li translokiĝis al Brisbano kie li iĝis estrarano de la Brisbana Societo. (Ĉ.3(ĉ))

A. V RUTLAND. Esperantiĝis en Melburno, translokiĝis al Sidnejo ĉ. 1923 kaj aliĝis al SeS kie li vigle partoprenis en lokaj grupaferoj; li estis prez.de la societo 1933-1935. Lia E-vivo daŭris pli ol 50 jaroj; li ĉeestis kelkajn kongresojn de AEA kaj vaste kontribuis al ties aktivoj.

FRITZ MUELLER-SORAÙ. Alvenis en Sidnejo, 1955 kaj lernis Esperanton en la klaso do S-ino E. Turvey (antaŭa F-ino E. Dash). De tiu jaro, ĝis sia morto en 1975, li senlace laboris pri la antaŭenigo de Esperanto. Li estis prez. de SES 1965-1966 kaj estrarano dum multaj jaroj; li instruis la lingvon en diversaj lokoj en NSK kaj partoprenis kongresojn de AEA kaj NZEA. Je lia memor' estis starigita la 'Fritz Mueller-Soraú -Muzika Trofeo', en 1984 (Ĉ.10).

PAUL E. SCHWERIN. Esperantiĝis en Berlino, 1930, kun (posta) edzino Kathe Schwerin; ambaŭ partoprenis Cseh-Kurson en 1931; ĉeestis U/Kongresojn en Parizo, 1932 kaj en Stokholmo, 1934. Ili alvenis en Aŭstralio 1938 kaj aliĝis al SES; ambaŭ forte subtenis la societon dum la malfacilaj kvardekaj jaroj. Paul estis sekr.de SES 1942-1948; li verkis libreton, "Gaja Leganto" kaj kune Ges-roj Schwerin tradukis la novelkolekton "Brulanta Sekreto" (Ĉ.5). Per instruado kaj korespondkursoj ili grande kontribuis al Esperanto kaj en Sidnejo kaj en Aŭstralio, dum pli of tri jardekoj.

JOHN MATASIN. Li esperantiĝis en Jugoslavio; li ĉeestis U/Kongreson en Vieno, 1924. Li, kun edzino Eva, enmigris Aŭstralion en 1929 kaj ambaŭ aliĝis al SES. Ili forte subtenis la E-movadon en NSK kaj en Aŭstralio John Matasin estis prez. de SES 1953-56, 1962-64, 1968-69, 1971-72, kaj estis ano de UEA, AEA kaj SAT. Li partoprenis U/Kongresojn ĉe Mainz 1958, Tokio 1965, Budapest 1966 kaj Hamburg 1974. Kun aliaj esperantistoj John Matasin fondis E-Kooperativon de NSK por havigi E-Domon en Sidnejo.Li kaj edzino Eva estis estraranoj de E-Federacio de NSK dum multaj jaroj. Sendube ili ege kontribuis al Esperanto kaj en NSK kaj en Aŭstralio.

E. WREFORD CHANDLER. Li memlernis Esperanton je frua aĝo en Melburno kaj aliĝis al MES en 1926. Post translokiĝo al. Sidnejo li aliĝis al SES en 1932, kie li estis ano kaj estrarano ĝis sia morto en 1984. Li estis prez. de SES 1940-41, 1946-48, kaj sekr. 1949-51. Li parto-prenis multajn kongresojn de AEA. Li estis ano de NACIA FILIO DE ILEI kaj redaktis dum jaroj ties nacian revuon, 'Klerigo'. Li estis prez. de ORE 1974-81 (poste honora dumviva prezidanto) kaj dufoje gajnis la premion-Simondetti. Li prezidis dum kunveno de Klubo de E-Veteranoj ĉe U/Kongreso en Rekjavik, 1977. Li estis estrarano de E-Federacio de NSK dum kelkaj jaroj kaj redaktis ties revuon 'Telopeo' de 1970 ĝis 1975. Sendube Wre Chandler ege kontribuis al la E-movado je diversaj kampoj en Aŭstralio.

CEDRIC C. (Tajni) GOLDSMITH. Li esperantiĝis en Anglujo en 1902 Li vigle partoprenis E-aktivadon ne nur en la kadro de BEA sed ankaŭ en la mondasocio, jene: en 1920 organizis kongreson de BEA; en 1926 fariĝis administranto de la BEA; en 1927 estis fondinto, sekretario kaj direktoro de la "Esperanto Publishing Co. Ltd." (E-Eldonejo); en 1934 fariĝis sekr. de BEA; en 1936 sekr. de IEL; en 1947 post reunuiĝo de IEL kaj UEA li estis sekr. de UEA ĝis emeritigo en 1954. Li organizis 3 U/Kongresojn, 1930, 1938, 1949, kaj diversajn kongresojn de BEA. Li unue vizitis al Australio en 1965, poste en 1966 li revenis al Manlio kie li aliĝis al la Manlio-Klubo. Li kunlaboris kun LKK pri la kongreso de AEA en Manlio, 1968, kaj estis sekr. de AEA de 1968 ĝis sia morto en 1972.

En 1971 li edziĝis al Lily Jullie (posto, S-ino L. Goldsmith estis sekr. de la E-Federacio de NSK). 'Tajni' Goldsmith entuziasme subtenis la starigon de la tri ŝtat-federacioj; Nova Sudkimrujo (1966), Viktorio (1970) kaj Kvinslando (1971) per vizitoj kaj klarigparolojal la tri ŝtatgrupoj dum tiucelaj kunvenoj. Sendube Cedric C. (Tajni) Goldsmith age kontribuis al la E-movado en Aŭstralia.

TOM ELLIOTT. Aliĝis al SES en 1961; Li estis prez. de SES 1973-74, 1977, 1985 kaj sekr. De SES 1966-69; Li estis Libroperanto de AEA 1971-1985. Ano de la Federacin de NSK, Ii presis, kaj kun helpo de edzino Mavis, ekspedis la revuon 'Telopeo'. Li forte kontribuis al Esperanto ne nur dum la jaro, sed ankaŭ dum kongresoj de AEA kie li starigis ekspoziciojn de haveblaj E-libroj, diskoj, insignoj kaj E-aĵoj.

S-ino MARGARET M. CHALDECOTT. Ŝi rekte subtenis la E-movadon en Sidnejo per agado an SES kaj en la E-Federacio, kiel prez. de SES 1981-84; sekr. de SES de 1970 ĝis 1985; sekr. kaj estrarano de E-Federacio de NSK dum multaj jaroj; VD-UEA 19'79-80, D-UEA 1981-85, Sidnejo.

ALAN TOWSEY. Li memlernis Esperanton en 1930 kaj instruis la lingvon en diversaj lokoj en NSK. Li prezidis la LKK-n kiu organizis la 8an Kongreson de AEA en Sidnejo, 1952. Li estis vic-prez. de AEA 1953-54. Li redaktis la Traduk-Kurson de F. R. Banham, en 1976 (Ĉ.5), kaj estas red. de Esperanto Bulletin (Ĉ.8). Li estas (1985) komisiito de AEA por la projektata 'Aŭstralia Antologio'.

Aliaj kontribuantoj al Esperanto en Sidnejo (vidu en STATISTIKO): KEVIN SMITH, DAVID GOULD, SHIRLEY FANOS; VINCENT J. TIMMINS (kiu fondis Klubon ĉe Hornsby; gvidis anojn de Korespond-Kursoj kaj estis peranto por IKU de esperantistoj en Aŭstralio). VOLO GUELTLING (aliĝis al SES en 1955; ano de Honoriga Komitato de AEA; SAT-Peranto en Aŭstralia dum multaj jaroj. (Ĉ.8).

La Unua Esperanto-Diservo en Aŭstralio

La 6an de decembro, 1910, okazis en la Unitariana Preĝejo, Sidnejo, la unua Esperanta Diservo en Aŭstralio. Granda amasa ĉeestis kaj post la kantado de la Esperantaj Himnoj kaj parolado de S-ro G. Chapple pri "La Frateco de l'Homaro", S-ro V. Roinel faris la predikon, Esperante kaj angle, pri "Unu Safaro, Unu Paŝtisto". Tiu ĉi Diservo elvokis grandan intereson pri nia afero inter la Sidnejanoj. (Raporto en "The British Esperantist", marto 1911).

Nova Sudkimrujo - Kluboj, Grupoj, Asocioj.

GOSFORD E-KLUBO. Fondiĝis en aŭgusto, 1908; la unua E-Klubo en Nova Sudkimrujo. Entute estis 17 anoj, la fondinto kaj prez. estis G. Collingridge; sekr. P. J. Holdsworth; anoj: D-ro Fielder, S-ino Fielder kaj F-ino Fielder, F-inoj Foster, Benson, Pinnington; D-ro Paul; Pastro P. Power, A. Renwick; S-roj McGuerin, P. McPherson, R. F, Pickering; S-inoj Pickering, Holdsworth kaj Parr. Ne estas pluaj detaloj pri la klubo, sed S-ro G. Collingridge ĉeestis la unuan AEA-Kongreson en 1911.

TUMUT E-KLUB0 - Ĉiela Lumo Gvidu. Fondiĝis ankaŭ en 1908; fondinto kaj unua prez. estis Pastro W. D. Kennedy; sekr. estis S-ino Tindale; ano j: S-ro J. Donaldson kaj F-ino R. Beuzeville. F-ino Beuzeville estis ano de Fond-Ligo de Zamenhof kaj poste estis sekr. De la kluba, Pastro Kennedy aranĝis kaj estris la unuan dumkongresan E-Diservon en Aŭstralio je la okazo de la 2a Kongreso ĉe Melburno en 1912. mankas aliaj detaloj pri la klubo.

1920: WAVERLEY, Norda Sidnejo;KOGARAH (klaso par Skoltoj) gvidanto estis S-ro J. J. Joliffe.

1920: GORE HILL, apud Sidnejo; 15 lernantoj ĉe Movern Ĝarden-Lernejo, instruanto estis J. J Joliffe.

1921: BARRABA, kie S-ro E. A. Pryke starigis grupon; S-ro Pryke tiam estis Konsilantarano de AEA.

1923: NEWCASTLE, gupo sub aŭspicio de Workers Education Association (Laborista Eduka Asocio); 30 anoj aliĝis al la grupo.

1927: NEWCASTLE, S-ro F. Taylor (eksprez. SES) starigis kaj instruis grupon; en 1928 S-ro Rees Perry aktivis pri instruado.

1962: NEWCASTLE E-Klubo fondiĝis; 10, anoj kunvenis ĉe Laborista Eduka Asocio.

1980: Newcastle E-Klubo; prez. 1980-83 D. Outridge; sekr. 1980-1985 S-ino J. Green; kas. 1980-1985 S-ino T.Metherall; anoj S-ino E. Arthur, S-ino M McLeod.

1924: NELSON BAY; starigis kaj instruis grupon, S-ro S. R. Richardson.

1924: MARRICKVILLE: S-ino A. Scammel instruis grupon.

1928: NOWRA; S-ro G. D. Kvarnstrom gvidis grupon.

1954: BATHURST; ĉe Kolegio por Instruistoj, estraro jene: prez. S-ro J. Davidson; vicprez. S-ro P. Elliott; sekr./kas. S-ro W. Dawson; k-anoj F-ino C. Colless, S-ro P. Roach.

1963: HORNSBY E-Grupo; membroj kunvenis ĉe vespera liceo, Hornsby. Estraro jene: prez. K. Bowling; sekr. V. J. Timmins; vicprez-oj J. Bird, J. Wheatley; aliaj instruistoj: S-ino D. Hasluck, S-ino Olsen, S-roj F. Mueller-Soraù, I. Ross kaj V. Bourlin. Grupo daŭris ĝis 1966.

1970:MYLESTROM; S-ino G. Kirkwood instruis grupon, ĝis 1972.

Manlia Esperanto-Klubo

La Manlia Klubo fondiĝis la 19an de februaru, 1961, kiam S-ino Marjorie Duncan kunvenigis siajn gelernantojn kun la celo fondi klubon. Kvardek personoj ĉeestis la kunvenon, inkluzive de F-ino Penny Ferguson la gastparolanto, Ĉef-konsilantino May Ambrose kaj Ĉef-konsilanto de Manlio, F. S. Preacher kiu prezidis. Estraro elektiĝis jene: prez. S-ro H. V. Morgan; sekr. S-ino B. Cleminson; kas. S-ro A. Heedon. La klubo poste kunvenis ĉiun trian dimanĉon en la monato, ĉe la hejmo de Ges-roj Bedwell.

En majo 1959, F-ino Penny Ferguson aranĝis publikan kunvenon en la Manlia Vespera Kolegio, cele al E-klaso en tiu kolegio. Post sukceso, S-ino M. Duncan instruis 14 komencantojn. Tiu klaso sukcesis kaj sufiĉ j aliaj personoj interesiĝis per daŭrigi klasojn, ĝis fine la decido starigi klubon en Manlio fine fruktiĝis. Ĝis hodiaŭ (1985) instruistoj el la Manlio-Klubo daŭrigas E-Klasojn en la Manlia Vespera Kolegio. Denove, por eviti tedan ripetadon de nomoj, estas la intenco kroniki la historion de Manlio-Klubo laŭ taŭgaj kelkjaraj periodoj. STATISTIKO, je la fino de ĉi tiu sekcio, listigas prez-ojn kaj sekr-ojn de 1961 ĝis 1985; plejparte anoj kaj estraranoj kiuj kontribuis al klubaktivado dum tiu dudekkvina jarperiodo ricevas mencion en ĉi tiu verko.

1961-1970. Krom prez, kaj sekr-oj (STATISTIKO) DUM Ĉi tiu periodo,du fondintoj kiuj ege kontribuis per instruado estis Ges-roj P. kaj K. Schwerin; aliaj kontribuantoj jene S-ro Kevin Smith, S-inoj R. Carruthers, W. Begg, A. Bracken, B. Forrest, M. Bedwell, M. Parker, E. Graham, M. Robertson, F. McGillvray, M. Ambrose, G. Swan, K. Morrison, P. Ford-Lewis, J. Issobe, R. Ison, L. Cooper, M. Liston, J. Sherwood, E. Giles, T. Richmond, M, McMullen, M. Morgan; F-inoj B. Henderson, A. Dennys, D. Hasluck., D. Taylor, C. Taylor, M. Issobe, J. Issobe, L. Jullie; S-roj J. Bedwell, C. Graham, F. Preacher, C. C. Goldsmith, C. Singer, Les Scott, F. Deal, A, Cocking; D-ro A, Capell; Prof. R. Robertson,

La loka ĵurnalo 'Manly Daily' subtenis la E-movadon en Manlio per E-Angulo kaj ĉiun semajnon aperigis artikolon pri la Internacia Lingvo. S-ino E. Graham responsis pri tiu esenca publikigo rilate al aferoj kaj klasoj de la klubo. Krom la supremenciitaj anoj, instruis K. Smith, R, Robertson, A. Cocking; S-inoj B. Cleminson, M. Bedwell, B. Cooley, L. Cooper; F-ino j F. Cardale, P. Ferguson, A. Dennys, D. Hasluck, D. Taylor. Anoj de SES kiuj kontribuis diversmaniere al la progreso de Manlio-Klubo jene: S-roj J. Matasin, A. Rutland, V. Gueltling, V. Bourlin, W. Chandler; D-ro A. Capell; F-ino Rita van Ryswijk.

Vizitantoj dum la koncerna periodo jene: 1962 - S-ino Y. Canty (Nov-Zelando); 1963 - S-ro Ross Robbins (prez. AEA); 1965 - S-ro W. Simpkins (Usono), S-ro T. Archer, S-ino Y. Canty, M. Porter (Nov-Zelando); 1970 - S-ro G. La Rocca (Italujo), S-ino V. Yowe (Brisbano), S-ro E, Hansen (Kopenhago). Klub-organo, Manlio Parolas, aperis, prizorgis ĝin S-ino B. Cooley, 1962-63. S-ro C. C. Goldsmith tre aktivis per prelegoj al diversaj societoj/kluboj pri la Internacia Lingvo.

1971-1979. .Sub la gvidado de prez-oj K. Smith kaj A. Cocking, sekr-oj S-inoj 0. Russell kaj B. Cleminson,la klubo daŭre progresis dum la dua dekjara periodo. En 1971, dum ĝenerala kunveno, prez. Kevin Smith dankis al S-ino M, Duncan pro la laŭdinda dekjara laboro kiel prez. kaj prezentis al ŝi oran insignon de Dumviva Membreco de la Manlio-Klubo.

Plejparte, instruistoj dum ĉi tiu periodo restis samaj kiel en la unua, sed kelkaj novaj nomoj aperis en la listo de estraranoj kaj klubanoj. Instruis jene: S-roj P. Schwerin, K. Smith, A. Cocking, R. Robertson, R, Springer, L. Scott, G. Thatcher, M. Ross; S-inoj M. Duncan, B. Cleminson; F-ino F. Cardale. Aliaj anoj kiuj kontribuis al klub-aferoj, jene: Ges-roj R. kaj M. Baxter; S-inoj E. Giles, K. Schwerin, R. Carruthers, M. Liston, E. Brandmann, T. Richmond, S. Sobey; S-roj R. Moir, S. Wickenden, A. Curley, G. Hicks, C. Goldsmith; S-inoj A. Gash, E. Graham, P. Ford-Lewis, K. Morrison, M. Troy; F-inoj D. Hasluck, N. Witham, P. Ferguson; S-inoj M. Bedwell, B. Cooley, G. Frange, T. Thomas.

Elstara okazaĵo estis la geedziĝo de 'Tajni' Goldsmith kaj F-ino Lily Jullie, en 1971; bedaŭrinde S-ro C. Goldsmith mortis frue en 1972. En 1973, okazis ekspozicio en la urbdomo-Manlio por varbi novajn lernantojn; Prof. kaj S-ino Robertson ĉeestis la U/Kongreson en Belgrado kune kun S-inoj B. Cleminson kaj E. Graham. Dum 1974 Ges-roj Russ kaj May Baxter translokiĝis al Batemans Bay. En 1975, elektiĝis Dumviva Membro de Manlio-Klubo, S-ro Paul Schwerin; tri anoj, S-inoj M. Bedwell, B. Cooley, S-ro W. Chandler vizitis U/Kongreson en Kopenhago. En 1975 kelkaj anoj eksterlandis: S-ino M. Duncan, S-roj A. Cocking kaj M. Ross, al Anglujo dum S-inoj B. Cleminson kaj K. Morrison ĉeestis U/Kongreson en Ateno. Aliĝis al la klubo en 1977, Ges-roj G. kaj M. Myers.

En 1978 mortis Paul Schwerin, fondmenbro de la klubo kaj fortegulo de la E-movado en NSK kaj en Aŭstralio. En 1978 S-ino Goldsmith donacis E-librojn al la klubo; loka ĵurnalo intervjuis S-ron I. Lapenna dum lia vizito al la Manlio-Klubo,

Vizitantoj dum la periodo jene: 1971 – Tibor Sekelj (mondfama verkisto), Patricia De Cleene kaj Rowena MacGill (Nov-Zelando), Haru Mijzaki (Japanujo), D-rino C. Spruch (Germanujo), Ges-roj Oliver (Anglujo), 1972 - Ernest Veis (Nederlando). 1973 – Ges-roj A, kaj T. Nielsen (Norvegujo). 1976 - Prof. R. Lewin (Usono), Taki Hamada (Japanujo). 1977 - Ges-roj Hagen (Nederlando). 1973 - Ges-roj Russell, S-ino Nell Hamilton (Anglujo), Ges-roj Nath (Hindujo). 1979 - S-ro I. Lappena (antaŭa prez. UEA), S-ino S. Issobe (Japanujo), S-ro Probal Daŝgupto (Hinda Unio).

1980-1985. Okazis en Sidnejo, en januaro 1981, la 22a Kongreso de AEA; multaj anoj de la Manlio-Klubo partoprenis ĉi tiun okazaĵon (Ĉ.4). La postkongreso okazis en Manlio - aranĝita de klubanoj (Ĉ.4). Estraranoj, instruistoj kaj kontribuantoj krom la listigitaj prez. kaj sekr. (STATISTKO) dum ĉi tiu periodo estis: S-inoj M. Duncan, H. Stone, K. Morrison, E. Graham, M. Liston, R. Carruthers, J. Hanna, K. Wright, B. Scott, B. Hart, R. Dunbar, A. Gash, B. Loh, E. Giles, F. Thomas; S-roj L. Scott, A. Cocking, E. Hart, F. Preacher, K. Smith, M. Ross, J. Cooper, R. Springer, F. Mangan, K. Hanna, H. Peddie.

Kvar kursoj daŭris ĉe la Vespera Kolegio dum la sesjara periodo. Zamenhof-Festoj okazis ĉiun decembron ĉe E-Domo kie ,anoj de Manlio-Klubo kaj anoj de SES kune celebradis la naskiĝtagon de D-ro Zamenhof. En 1981: S-ino K. Morrison ricevis la oran insignon de Dumviva Membreco de Manlio-Klubo; Ges-roj Les kaj Beth Scott ĉeestis la U/Kongreson en Brazilo. En 1982: Prof. R. Robertson elektiĝis Dumviva Membro de la klubo kaj ricevis orinsignon. En 1983: mortis klubano Adelaide Ross amata edzino de Malcolm, la 14an de Julio; dum dudekkvin minuta radio-programo, Prof. R. Robertson parolis pri 'Utileco de Esperanto'. En 1984: dum la kongreso de AEA, du anoj de Manlio-Klubo iĝis ‘Fratuloj de AEA’ pro longdaŭra valora servo al Esperanto en Aŭstralio, S-ino M. Duncan kaj Prof. R. Robertson. Ĉeestis U/Kongreson en Vankuvero, Ges-roj L. kaj B. Scott, Ges-roj A. kaj P. Cocking, S-ino B. Cleminson, S-ino B. Loh. En 1985: speciala komitato stariĝis por prizorgi la elsendojn de radio-programoj en la lokaj regionoj.

Vizitantoj jene: 1980 - Ges-roj T. kaj S. Koora (Nederlando), S-ino S. van Wijngaarden (UEA-oficejo, Rotterdam), D-ro kaj S-ino Massif (Egiptujo). 1981 - Bonnie Prange (Nederlando), Ges-roj Suzuki (Japanujo), S-ino D. Tulford (Anglujo), Ges-roj J. Gibson (Tasmanio), S-ro Sakamoto (Japanujo), Ges-roj G. Durham (Anglujo), 1982 - Franĉeska Korso (Italujo), S-ino Anne Whittaker (Usono), Ges-roj R. kaj N. Hamilton (Anglujo), F-ino Majo Issobe (Japanujo), Gordon Gregson (Perto), Prof. Carl Stop-Bowitz (mondkonata esperantisto, akademiano kaj universitata prof, el Oslo). 1984 – Mac LaFevre (Tasmanio), Chris Dean (Perto). 1985 - Bob kaj Alice Colley (Anglujo), S-ino Juhani Uilkki (Finnlando), Aaron Davey kaj Gordon Gregson (Perto), S-ro E. Jablonski (Israelo).

Elstaraj kontribuantoj al Manlio-Klubo.
S-ino MARJORIE DUNCAN. Fondinto de la Manila E-Klubo kaj prez. 1962-1970, Marjorie estas dumviva membro de la klubo. Si esperantiĝis en Anglujo en 1949 kie ŝi fondis klubon ĉe Bournemouth kaj estis prez. de LKK kiu organizis kongreson tie en 1951. Ŝi ankaŭ estis ano de LKK kiu organizis la 16an Kongreson de AEA en Manlio, 1968. Kun helpantoj ŝi organizis post-kongresojn en Manlio, 1976, 1980 kaj 1984. Jaron post jaro ŝi instruadis al lernantoj en Manlio; dum la 24a Kongreso de AEA en Kanbero, 1984, Marjorie estis elektita Fratulo de AEA pro elstara servo al Esperanto en Aŭstralio. Ŝi estis D-UEA por Manlio, 1962-1985.

ROBERT G. R0BERTSON. Li komencis lerni Esperanton ĉe Manlio-Klubo en 1965. Post nelonge li estis instruisto kaj estrarano; li elektiĝis prez. de AEA 1972-1980; li estis prez. de Manlio-Klubo 1980-1985 kaj prez. de E-Federacio de NSK, 1968-1970.

Robbie Robertson multe kontribuis al la E-movado kaj en NSK kaj en Aŭstralio. Li elektiĝis Fratulo de AEA en 1984, pro elstara servo al Esperanto; li estis FD-UEA 1973-1985.

LES V. SCOTT. Esperantiĝis en 1968 kaj aliĝis al Manlio-Klubo. Li estis sekr. de AEA, 1977-1979 kaj kas. de AEA 1970-1979. Les estis prez. De E-Faderacio de NSK, 1972-1975. Li vizitis al kelkaj U/Kongresoj kie li estis anstataŭanto de Ken Linton, Ĉef-Delegito de AEA. Les multe kontribuis al la E-movado kaj en Manlio kaj en Aŭstralio. Li estis FD-UEA, Manlio, 1973-1985.

KEVIN SMITH. Aliĝis al SES en la kvardekaj jaroj kie li instruis al lernantoj; poste Ii fariĝis ano de Manlio-Klubo kaj estis prez. 1971-74. Li estis FD(IEL) en 1947 kaj poste FD(UEA). Dum pli ol kvardek jaroj Kevin aktivis pri Esperanto on Sidnejo, kaj multe kontribuis al la E-movado.

ARTHUR COCKING. Fidela ano kaj instruisto de la Manlio-Klubo kies prez. Ii estis 1975-1979. Li ankaŭ estis kontribuanto al Federacio de NSK. Li estis komisiito de AEA por Lernejoj, 1984-1985. Li estis D-UEA por Dee Why-Manlio 1979-1985. Arthur multe kontribuis al la E-movado en Sidnejo.

S-ino BETTY CLEMINSON. Ŝi daŭre subtenis la E-movadon en NSK; antaŭa ano de SES ŝi estis fondmembro de Manlio-Klubo; sekr. 1961-1963, 1966-1968, 1973-1985. Betty estis prez. de E-Federacio de NSK, 19'78-1979, 1981-1985. Ŝi ankaŭ prizorgis pri Korespondpetoj pro AEA, 1980-1985 kaj estis estrarano de AEA 1984-1985. Ŝi estis FD-UEA, Manlio 1977-1978; 1984-1985.

Esperanto-Federacio de Nova Sudkimrujo

La 25an de aprilo, 1966, sep anoj el kluboj de Manlio, Hornsby kaj Sidneja E-Societo, kunvenis por diskuti pri la fondiĝo de E-Federacio de NSK. Provizoraj prez. S-ino B. Cleminson kaj sekr. S-ino E. Graham elektiĝis. Je la 22a de oktobro, 1966, okazis en Manlio, kunveno de esperantistoj el NSK por diskuti la eblon starigi federacion en tiu Ŝtato. Prezidis S-ino B. Cleminson. S-ro C. C. Goldsmith klarigis ke federacioj laboras por plivigligi la movadon en la koncerna regiono, pere de konferencoj kaj la eldono de bultenoj kiuj donas informadon pri loka agado kaj planoj. Post vigla diskuto oni unuanime decidis favore al la starigo de E-Federacio de NSK. Elektiĝis la jena estraro: prez. V. J. Timmins; vicprez. E. W. Chandler; sekr. C. C. Goldsmith; kas, F. Preacher. Oni faris decidojn pri regularo, kotizoj, la eldono kaj distribuo de bultenoj kaj la aranĝoj pri estontaj konferencoj. Do, la federacio naskiĝis; 5 kluboj kaj 78 individuoj aliĝis al la federacio en 1967 kaj S-ino E. Graham fariĝis gazet-oficisto kaj S-ro C. Bracken inform-oficisto.

Ne estas spaco on ĉi tiu historio por listigi ĉiujn aktivulojn de la federacio, sed ĉiun jaron (ĝis 1980) tri konferencoj okazis en diversaj lokoj kune kun jarkunveno por elekti novan estraron (STATISTIKO). En 1970 okazis grava decido, ke la federacio kunfandiĝu kun la E-Asocio de NSK (la antaŭa E-Kooperativa Societo, kiu aĉetis la E-Domon en Redfern). Post la kunfandiĝo la federacio estis estrita de kvar komitatanoj jene: J. Matasin (pri financaj aferoj); A. Cocking (pri kulturaj kaj edukaj aferoj); G. Thatcher (pri distraj aferoj); C. C. Goldsmith (pri literatura kaj informaj aferoj). Samtempe elektiĝis la estraro kiu prizorgis normalajn aspektojn de la federacio mem. En marto, 1970 aperis la unua eldono de Telopeo (Ĉ.5); ĉi tiu bulteno servis kiel grava ligilo dum la sekvantaj 15 jaroj inter anoj kaj samideanoj en NSK.

La federacio subtenis, per donaco de suffiĉe grandaj monsumoj, valorajn projektojn kaj en kaj ekster la ŝtato, ekzemple: donaco en 1979 de $500 por helpi pri vojaĝkostojn de S-ino Audrey Childs-Mee kiu instruis ĉe la 2a E-Somerlernejo en Toowoomba (Ĉ.9); iniciatis la starigon de 'Tajni' Goldsmith Memoriga Fonduso, inter aliaj kontribuaĵoj.

En 1981 okazis ŝanĝo al la federacia jarprogramo; estis decidite ke anoj kunvenu monate ĉe E-Domo en Redfern ĉiun trian dimanĉon, anstataŭ ĉe la antaŭaj konferencoj kaj piknikoj en diversaj lokoj. la E-Federacio de NSK kunlaboris kun la E-Federacio de Kvinslando pri la starigo de E-Somerlernejo ĉe Armidale en 1983, 1985. (Ĉ.9)

Mortis du elstaraj anoj de la Federacio, C. C. Goldsmith 1972, kaj J. Matasin 1980. Anoj de la federacio iniciatis fonduson memore al 'Tajni' Goldsmith; post ricevo de donaco ($2000) fare de S-ino Eve Matasin memore al edzo John, estraro de AEA starigis Fonduson-Matasin, por helpi pri la eldonado de libroj kaj broŝuroj (Ĉ.10). Ĉiun jaron, post 1970, elektiĝis direktoraro kiu prizorgis la estradon da E-Domo kaj aferojn financajn rilate al la federacio;ekzemple, en 1973 la jenaj: S-ino M. Chaldecott, S-roj R. Baxter, J. Matasin, L. Scott, E.Chandler, T. Elliott kaj Prof. R. Robertson.

Dum 1983-84 okazis renovigo de E-Domo; tiucele, apuda dometo estis vendita kaj la federacio akiris sufiĉan financon por renovigo. Dum la Apudmara Renkontiĝo (Ĉ.4) post la 1984a kongreso de AEA en Kanbero, esperantistoj ĉeestis specialan okazaĵon, la 20an de januaro, ĉe E-Domo en Redfern; ĉiuj gratulis al la Sidnejanoj pro la nuntempa ege taŭga kaj belaspekta hejmo de Esperanto en NSK.

Vizitantoj, 1967-1985: F-ino Barbara Trilu (Anglujo), skulptistino kiu donacis al la Manlio-Klubo, negrandan skulptitan buston do D-ro Zamenhof; Pastro Alpino Ciccanti (Italujo); Ges-roj Issobe (Japanujo); Ges-roj K. Kaj M. Pyrzinki. (Pollando); S-ro 0. Michelsson (Norvegujo); S-ro R. L. Harry (Kanbero); S-ro Jim Dimo (Rochester); S-ino M. Rozsa (Orange).

STATISTIKO

Sidneja Esperanto-Klubo (Zamenhofa-Klubo)

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1909-17 | prez. F. E. Wallace | 1909-1910 | sekr. H. Gadsen |
| | | 1911-12 | sekr. F-ino E. Scheidel |
| | | 1913-15 | sekr. F-ino J. Orr |
| 1918-20 | prez.T. E.O'Donoghue | 1916-19 | sekr. F-ino A. Lusby |
| | | 1920-34 | sekr. L. E. Pfahl |

1920 Sidneja Esperanto-Societo

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1921-22 | prez. J. Joliffe | | |
| 1923-25 | prez. F. V. Taylor | | |
| 1926-28 | prez. F. T. Simon (ĝis junio) | | |
| 1928 | prez. D-ro F. Williams (jul-dec.) | | |
| 1929-30 | prez. E. A. Pryke | | |
| 1931 | prez. E. A, Thompson | | |
| 1932 | prez. A. W. Peacock | | |
| 1933-35 | prez. V. Rutland | 1935 | sekr. S-ino F. McCallum |
| 1936-37 | prez. E. A. Pryke | 1936-37 | sekr.F. McCallum |
| 1938-39 | prez. F. McCallum | 1938-39 | sekr. C. Lambert |
| 1940-41 | prez. F. W. Chandler | 1940 | sekr. E. Williams |
| | | 1941 | sekr. F-ino V. Dohnke |
| 1942-45 | prez. A. C. Boyle | 1942-48 | sekr.P. E. Schwerin |
| 194E-48 | prez. E. W. Chandler | | |
| 1949-52 | prez. S. Bennett | 1949-51 | sekr.E. W. Chandler |
| 1953-56 | prez. J. Matasin | 1952-58 | sekr.F-ino E. Dash |
| 1957-59 | prez. S-ino G. Barlow | 1959-60 | sekr.P. Ferguson |
| 1960 | prez. J. Matasin | | |
| 1961 | prez. S. Drake | 1961 | sekr.F-ino E. Dash |
| 1962-64 | prez. J. Matasin | 1962 | sekr. F-ino R. V.Ryswijk |
| | | 1963-65 | sekr. F. Dunn |
| 1965-66 | prez. F. Mueller-Soraù | 1966-69 | sekr. T. Elliot |
| 1967 | prez. F-ino R. v. Ryswijk | | |
| 1969-69 | prez. J. Matasin | | |
| 1970 | prez. V. Bourlin | 1970-85 | sekr. M. Chaldecott |
| 1971-72 | prez.J.Matasin | | |
| 1973-74 | Prez.T.Elliot | | |
| 1975 | prez. S-ino S. Fanos | | |
| 1976 | prez. D. Gould | | |
| 1977 | prez. T. Elliott | | |
| 1978 | prez. D. Could | | |
| 1979-80 | prez. S-ino S. Fanos | | |
| 1981-84 | prez. S-ino M. Chaldecott | | |
| 1985 | prez. T. Elliott | | |

Pioniroj de Esperanto en Nova Sudkimrujo
(Anoj de la Mond-ligo de D-ro Zamenhoff, 1889-1909)

| | | |
|---|---|---|
| D. G. Rienits | Nahun Levitkin | A. F. Lawlers |
| Hermann Ritz | F. N. Briorley | F-ino E. E. Bauer |
| D-ro J. F. Cobbe | W. F. Ponder | F-ino R. Beuzeville |
| Pastro W. D. Kennedy | F-ino A. Benedict | G. Collingridge |
| H. B. Savage | F-ino Joan Cobbe | E. A. Pryke |
| LouisThomas | F-ino D. Marshall | S G. Lusby |
| L. A. Cotton | R. J. Matchett | John Bailles |

Manlia Esperarito-Klubo, Estraro 1961-1985.

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1961 | prez. S-ro H. V. Morgan | 1961-63 | sekr. S-ino B. Cleminson |
| 1962-70 | prez. S-ino M. Duncan | 1964 | sekr. S-ino B. Cooley |
| | | 1965 | sekr. F-ino F. Cardale |
| | | 1965-68 | sekr. S-ino B. Cleminson |
| 1971-74 | prez. S-ro K. Smith | 1969-72 | sekr. S-ino 0. Russell |
| 1975-79 | prez. S-ro A. Cocking | 1973-95 | sekr. S-ino B. Cleminson |
| 1980-85 | prez. Prof. R. Robertson | | |

Esperanto Federacio de Nova Sudkimrujo

Prez-oj: 1966, S-ro V. J. Timmins; 1967-70, Prof. R. Robertson; 1971 S-ro C. C. Goldsmith; 1972-75, S-ro L. Scott; 1976-77, S-ro J. Harwood; 1978-79, S-ino B. Cleminson; 1980-81, S-ino S. Fanos; 1982-85, S-ino B. Cleminson.
Sekr-oj: 1966-67, S-ro C. C. Goldsmith; 1968-70, S-ro G. Thatcher; 1971, S-ro E. W. Chandler; 1972-73, S-ino L. Goldsmith; 1974-75, S-ro R. Baxter; 1976, S-ro J. Matasin; 1977-78, S-ino M, Chaldecott; 1979-80, S-ro J. Harwood; 1981-85, S-ino M, Chaldecott. Estraranoj kaj kontribuantoj: S-inoj E. Matasin, J. Green, E. Graham, M, Liston, T. Richmond, T. Thomas, B. Hart, E. Peddie, E.Giles, E. Curry, M. Duncan, P. Ford-Lewis, R. Carruthers, S. Burkitt, M. Elliott; F-inoj C. Taylor, D. Taylor, M. Straker; S-roj T. Elliott, F. Preacher, C. Bracken, F. Mueller-Soraú, F. Acs, A. Cocking, V. Gueltling, T. Ilow, R. Springer, W. Gassner, H. Peddie, F. Mangan.

Ĉapitro 3(e)

## E S P E R A N T O E N V I C T O R I O

La Melburna E-Societo devenis de la Esperanto-Klubo Melburna, la unua klubo en Aŭstralio fondita de John Booth, la 10an de februaro, 1905. John Booth estis klub-prezidanto kaj instruis al la aliaj dek ses anoj en sia propra hejmo, ĉe 25 Rathdown Strato, en la antaŭ-urbo, Carlton. (Antaŭ kelkaj jaroj anoj de MES alfiksis taŭgan ŝildon al la ekstera muro, memore al tiu historia okazo). John Booth, "patro de E-movado en Aŭstralio aliĝis al Monda Esperanta Ligo (Zamenhofa Klub-Listo 2-a, n-ro 9598, 1889-1909). Li ĉeestis la 7-an (Mond-Kongreson en Antverpeno, 1911, kie li renkontis D-ron Zamenhof. John Booth ofte kontribuis artikolojn al 'Tra La Mondo'; ekzemple en majo 1906 aperis 'La Melburna Pokalo' (fama ceval-konkurso).

Multaj elstaraj esperantistoj aliĝis al la klubo dum la fruaj jaroj: inter ili estis, A. M. Hyde, D-ro A. B. Barrington, C. W. Ballard, W. J. Drummond, .J. G. Pyke, G. Gordon, D-ro S. McBurney, F-ino E. R. Sinnotte. Aliaj pioniraj membroj jene: D-rino L. Alexander, S-inoj M. Dacomb, M. Harrison, M. Tillotson; D-ro Scantlebury; F-inoj T. Ashton, B. kaj C. Dacomb, J. Lamond; S-roj H. M. Lanyon, J. A. Clark, F. E. Cobb, P. Connelly, E. F.Eberbach, R. C. Mills, W. Service, T. A. Russell, C. W. Thonger, W. H. Vogt, C. F. White, G. Whiteford, A. H. Sullivan. La supremenciitaj anoj kontribuis multon per enoficiĝo kaj en MEK kaj en la Aŭstralia Asocio.

24 anoj de MEK ĉeestis la 1-an Aŭstralian Kongreson en Adelaido, la 26an ĝis 29a de oktobro, 1911. Ĉar la dua A-Kongreso estis proponita al Melburno, 1912, la kongres-komitato estis elektita el anoj de MEK, plejparte el la tiama estraro (Ĉ.4).

Post la 2-a plensukcesa Aŭstralia Kongreso en Melburno, 1912, la projektita 3-a kongreso en Sidneio, 1913, ne okazis kaj pro tio la Kongres-Komitato el Melburno vere estis la estraro de AEA (Ĉ.2) ĝis 1920, kiam okazis la 3-a kongreso en Sidnejo (Ĉ.4). Fakte la Melburnanoj alprenis tiun titolon (AEA) anstataŭ la propran; t.e. Melburna E-Societo.

Estas interese sekvi la historion de la nuntempa MES. Historiisto, Ivan Maddern (1906-1980) redaktanto de "Latrobe Valley Esperantist" profunde esploris, ne nur protokolojn rilate al la "Historio de la Melburna E-Societo", sed ankaŭ revuojn en arkivoj de ŝtat-bibliotekoj; li fine konkludis ke la nuntempa societo devenis de la unua E-Klubo (La aŭtoro tutkonsentas ; vidu en statistiko)! Ekzemple, en Enciklopedio de Esperanto (1933) L. E. Thomson skribis ke en Melburno (ĉirkaŭ 1912) estis du grupoj, Melburna E-Societo kaj Komerca Klubo (statistiko); poste (1920) W. J. Drummond restarigis MEK-n al kiu anoj de la Komerca Klubo aliĝis. Laŭ "La Suda Kruco" (1920-1934) dum kelkaj jaroj ekzistis grupo, ''Melburna Sekcio de AEA' prez. H. Byatt, sekr. P. T. Hudson, kiu kunvenis semajne - verŝajne estis la malnova MES ĉar en la 1924-a Suda Kruco, oni legas pri Melburna E-Societo, prez. C. L. Clarke, sekr. J. G. Robert. Do, vere MES kaj MEK paralele funkciis en Melburno dum tiu dekunu jarperiodo, 1924-34. Responde al demando, "kial oni bezonas du tiajn grupojn", S-ro .J. Drummond respondis, "ili kunvenas dum malsamaj vesperoj en la semajno kaj do vere estas avantaĝo ĉar esperantistoj rajtas elekti la plej taŭgan vesperon por ĉeesti kunvenon". (Vere estis diplomata respondo, ĉu ne?)

Tamen, post la 'malluma periodo' 1934-40 (sen nacia revuo), nur MEK restis. En 1963 MEK laŭ unuanima voĉdono dum ĝenerala kunveno, estiĝis MES. Proponis la nomŝanĝon S-ro W. .J. Drummond, kiu restarigis MEK-n en 1920!

Sekvas detaloj pri elstaraj esperantistoj kiuj aliĝis al la movado en Melburno dum la fruaj jaroj, 1905-1934. Jam menciita estas John Booth, fondinto de la unua E-Klubo, alia j jene:

ARTHUR M. HYDE. Li aliĝis al MEK 1907; li verkis, en 1918, la unuan aŭstralian stud-libron, "Kurso en Esperanto", kaj kunverkis en 1927 kun Laŭri Laiho (Finnlando) la libron, "Aŭstralio, Lando kaj Popolo:' Li estis prez. MES 1920-21 kaj samtempe estis prez. de AEA; li estis la unua redaktoro de "La Suda Kruco" 1920-21. Poste li farigis prez. kaj vicprez.de MES 1927-31 kaj 1934-39. Li estis flua paralanto en la angla kaj multe prelegis al aliaj grupoj pri la Internacia Lingvo.

D-ro ARTHUR E. BARRINGTON, (1862-1919). Li aliĝis al MEK 1907, sed loĝis en Benalla; li starigis klubon en Benalla, kie li aperigis la unuan E-revuon en Aŭstralio (Ĉ.5) de 1908 gis 1909. Je lia memoro en tombejo ĉe Benalla estis starigita, la 12-an de septernbro, 1976, specialan tombo-ŝtonon, plejparte dank' al iniciatemo de Ivan Maddern kaj la Historic Societo de Benalla; rezulte, la urba konsilantaro de Benalla decidis nomi du novajn stratojn, "Barrington" kaj "Esperanto".

F-ino MATILDA ASTON. Aliĝis al MEK 1907, ŝi estis mondkonata blindulo kaj esperantisto, kiu ĉiam uzis la Internacian Lingvon por antaŭenigi sian laboron por blindulo j. Ŝi aktive parto-prenis, per prelegoj kaj solkantoj, la 1-an kaj 2-an Aŭstraliajn E-Kongresojn, 1911, 1912.

S-ro GEORGE GORDON (1857-1946). Li aliĝis al MEK 1907 kaj dediĉis 40 jarojn al la E-movado, kaj en Aŭstralio kaj en Nov-Zelando. Li starigis la unuan korespondan stud-grupon, 1908. (Ĉ.8) George Gordon ĉeestis du U-Kongresojn, ĉe Helsinki, 1922, kaj ĉe Nuremburg, 1923. Li estis tre kompetenta verkisto (Ĉ.5) kaj tiel grande kontribuis al la movado en Aŭstralio.

D-ro SAMUEL McBURNEY (1847-1909). Li aliĝis al MEK 1905; li estis D-ro en fako de muziko kaj verkis (inter aliaj) la kanton, "Kie Estas Mia Lando"; vicprez. MEK 1908.

F-ino EDITH A. SINNOTTE (poste S-ino Mumford),(1870-1947); pionira ano de MEK(1905); dum multaj jaroj estis klubestrarano kaj prez. MES 1917. Ŝi ĉeestis la 2-an U-Kongreson, 1906 en Genevo, kie ŝi renkontis D-ron Zamenhof. Ŝi verkis la unuan originalan E-romanon en Aŭstralio, "Lilio" (Ĉ.5).

F-ino MAUD HELM. Aliĝis al MEK 1908. Ŝi aktivis dum multaj jaroj; sekr. de AEA 1918-19; sekr. de MES 1914-15; sekr.Komerca Klubo, 1917-18; nacia direktorino de IRK-Asocio, 1922.

W.L. EDMANSON. Aligis al MEK 1910; ĉeestis la 1-an Aŭstralian Kongreson en Adelaido. Fondis en 1912, la Komercan Klubon en Melburno. En 1913 li translokiĝis al Nov-Zelando kie li daŭrigis la E-laboron; li elektiĝis prez de NZEA en 1934.

J. SKURRIE Alvenis en Melburno de Okcidenta Aŭstralio, 1910; vizitis al la 6-a U-Kongreso en Washington (Vaŝintono), 1910; komitatano de AEA 1911; prez. MES 1928-29.

CHARLES W. BALLARD (1868-1954). Esperantiĝis, 1910; ĉeestis la 1-an A-Kongreson, 1911; komitatano de la 2-a A-Kongreso, 1912; estis la dua redaktoro 1921-27 de "La Suda Kruco"; estis prez. MES 1922-23, 1925-26, kaj fondprezidanto de la Melburna Rondevuo, 1940; ĉef-delegito, UEA 1923-27.

A. H. COHEN. Aliĝis al MEK 1916; vicprez. AEA 1920; prez. AEA 1923.

ROY R. RAWSON. Esperantiĝis 1914; vizitis U/Kongreson en Praha 1921; sekr, MES 1919; sekr MEK 1921-1935; UEA delegito,Melburno 1925-1950; li .iniciatis la Pyke-Memorigan Ekzamenon; dum tri jardekoj li daŭre propagandis per radio-programoj pri Esperanto.

S-ino FLORENCE RAWSDN. Ŝi esperantiĝis kaj aliĝis al MEK 1922; prez de MEK 1941-42; prez. de AEA 1942-49; edziniĝis al Roy Rawson 1925; ŝi forte subtenis adopton de presita forma de "La Rondo" en 1947.

ERNEST HANKS. Esperantiĝis en 1919 kaj aliĝis al MES, poste estis ano do MEK dum multaj jaroj; prez. MEK 1948-49; li ĉeestis (kun edzino PEARL HANKS, kiu ankaŭ aliĝis al MEK en 1919) U-Kongreson en Londono, 1938. Ges-roj Hanks multe kontribuis al la klubo kaj al Melburna Rendevuo.

F-ino AMY GODFREY. Ŝi (kun fratino ELSIE: GODFREY) tre aktivis en klubaferoj, F-ino A.Godfrey, estis aktiva ano de Rendevuo; ŝi ĉeestis plurajn kongresojn de AEA kaj U-Kongreson en Sofio, 1963, kie ŝi salutis, nome de AEA, la Kongreson.

Du elstaraj movadanoj kiuj frue aliĝis al MEK/MES estis F. R. Banham kaj K. G. Linton; ambaŭ laboris je la melburna sceno kaj samtempe ege kontribuis al la nacia movado en Aŭstralio.

FRANK R. BANHAM. Li esperantiĝis en 1922; li memlernis sen instruisto kaj diplomiĝis honore de BEA 1926. En 1929 fariĝis redaktoro de "La Suda Kruco"; en 1930 aliĝis al MEK. Li estis kunfondinto de "La Rondo[1°] (poste "Aŭstralian Esperantist") kaj restis redaktoro ĝis sia rnorto, la 30-an de oktobro, 1974. Li estis aktiva partoprenanto en Rendevuo. Dum multaj jaroj li estis ekzamenisto, unue por la Pyke-Memoriga Ekzameno kaj poste por la Aŭstralia Ekzamen-Komisiono; post la morto de L. N. Newell en 1968, li fariĝis la ĉef-Ekzamenisto. Per korespondo li gvidis traduk-kursojn, plejparte por progresemaj studentoj. Lia vidvino, S-ino Hilda Banham, eldonigis, 1979, libron kun titolo, "Traduka Kurso en Esperanto de Frank Banham" - la enhavo aranĝita de S-ro Alan Towsey (Ĉ.5). Frank Banham kunlaboris pri la kompilado de "Enciklopedio de Esperanto", 1933, kaj trovis lokon en "Angla Antologio" (Ĉ.5). Frank R. Banham atingis eminentecon en sia propra lando kaj li trovis rekonon eksterlande. Li elektiĝis "Fratulo de AEA” en 1974.

KENNETH G. LINTON. Li aliĝis al MEK en 1931 kaj per diligenta studo rapide progresis en la lingvo: li sukcesis pri la Pyke-Memoriga Ekzameno kun honoro en 1932, la Diplomo de BEA kun honoro 1933 kaj la Klereca Diploma de AEA kun honoro 1961. En 1976 li fariĝis komisionestro por Ekzamenoj. Li verkis sian originalan libron "Kanako el Kananam" en 1960 kaj majstre tradukis "Sur la Bordo", de Nevil Shute, eldonita de AEA 1983 (Ĉ.5). Li kompilis en 1977 du instru-librojn “Gvidlibroj por la Supera kaj Elementa Ekzamenoj de AEA". Li estis prez de AEA 1952-55; 1968-71. Li estis vicprez kaj kas de AEA .dum multaj jaroj. Li estis UEA delegito por Melburno 1952-54 kaj anstataŭis S-ron L. Pfahl kiel ĉef-delegiton 1954, ĝis sia morto en 1985. En 1976 li elektiĝis "Fratulo de AEA" tiun saman jaron li ĉeestis la U-Kongreson en Ateno. En 1960, li fariĝis la unua komitatano de UEA en Aŭstralio. Li estis Aŭstralia peranto por diversaj eksterlandaj gazetoj. Sendube, Kenneth G. Linton estis inter la plej elstaraj kontribuantoj al la E-movado en Aŭstralio.

J. G. PYKE. Aliĝis al MEK 1910; tre vigla membro, komitatano kaj prezidanto dum dudek jaroj. Li ĉeestis la 1an kongreson en 1911 kaj energie partoprenis la 2an, 3an kaj 4an. Bedaŭrinde, revenante de la Oksforda E-Kongreso 1930, li perdis la vivon de sur la ŝipo, Balranold, en la Mediteranea Maro. Li vizitis al kongresoj en Eŭropo tri fojojn - la plej bone konata esperantisto el Aŭstralio. Li starigis libro-vendejon en strato-Swanston, Melburno kaj aldonis la subtitolan, "Esperanto-Libroj Haveblaj."

Ĉe la UK en Helsinki li transprenis la respondecon, kolekti monon en Aŭstralio por starigi monumenton sur la tombo de Zamenhof. Li elstare sukcesis pri la monkolekto kaj poste, 1927, havis la honoron fari la unuan parolon ĉe la senvualiĝo de la monumento en Varsovio, Li verkis kelkajn tre sukcesajn drametojn (Ĉ.5). Li estis prez. MES/MEK 1913-16, 1918-19, 1920-29. Honore al lia granda kontribuo al Esperanto, estis starigita la "J. G. Pyke-Memoriga Fonduso", kiu kondukis al la establigo de "J. G, Pyke-Memoriga Ekzameno", kun ĉiujara monpremio.

W. J. DRUMM0ND. Li aliĝis al MEK 1907 kaj restis ano gis sin morto en 1964. Li partoprenis la 1-an Aŭstralian Kongreson en 1911 kaj kune kun A. M. Hyde kaj aliaj organizis la 2-an en 1912. Postajn kongresojn en Aŭstralio li ĉeestis, kaj, kun edzino vizitis la U-Kongreson ĉe Nuremburg en 1923. Li estis vice, prez. vicprez. sekr, de MEK de 1912 ĝis 1952, (statistiko) vera fortegulo de la E-Movado en Melburno, kie li instruis al lernantoj kaj konstante propagandis por Esperanto dum pli ol 50 jaroj. Li multe kontribuis al Rendevuo, per prelegoj kaj diskutoj. Li estis fond-membro de la Melburna E-Kooperativo kaj restis, ĝis morto, unu el la kvin Direktoroj de tiu Kooperativo.

F-ino BEATRICE K. BLYTH. Ŝi aliĝis al MEK 1908; fondis kaj gvidis E-grupon "Espero", ĉe Mont Albert 1914-21 kaj estis sekr, ĝis 1925. F-ino Blyth kunlaboris kun G. Gordon pri korespond-kursoj, 1928-31. Ŝi brajle presis la kompletan Novan Testamenton en Esperanto (Ĉ.5) krom multaj aliaj verketoj.

F-ino VIRGINIA COX, Aliĝis al MEK 1921. Estis sekr. MES 1925-32. Kune kun patro, E. J. Cox kiu estis kas. dum multaj jaroj, ŝi ekspedis la revuon, "La Suda Kruco", ĝis la fina eldonaĵo en 1934. Posts ŝi estis ekspedanto de la AEA-gazeto "The Aŭstralian Esperantist", 1956-1970. Ŝi aktive partoprenis en la M-Rendevuo. Ŝi ĉeestis la U/Kongreson en Tokio, 1965.

S-ino ANNA HINTZE. Esperantiĝis 1923; ŝi aktivis dum pli o1 30 jaroj en MEK (sekr. 1936-39) kaj estis prez. Coburg (Koburga) E-Grupo, 1929-32; ŝi forte subtenis, 1938, la proponon de Joab Eljot, refondi nacian asocion. Post ŝia morto speciala tago, la 20-an de majo, 1963, estis dediĉita al ŝia memoro kiam kondolenc-leteroj el multaj partoj de la kontinento estis ricevitaj de MES.

PERCY HUDSON. Li esperantiĝis 1916 kaj estis sekr. de MES 1918; li estis redaktoro, "La Suda Kruco" 1927-29. Li vizitis al U/Kongreso Berne, 1939; li estis prez. MES en 1930 kaj 1932-34.

H. MARSHALL COHEN. Aliĝis al MES en 1919; li estis sekr/ kas. de MEK 1940-58, prez. de Rendevuo dum multaj jaroj kaj ĉeestis plurajn kongresojn de AEA inkluzive de la lasta, 1984, en Kanbero.

Supremenciita estas negranda procento de la tuta anaro de MEK kaj MES, de la inaŭgura jaro 1905 ĝis la aperigo de "La Rondo", en 1940. Interesatoj kiuj deziras pluan informadon rilate al fruaj membroj, trovos tion en "Latrobe Valley Esperantist" (C.5); bedaŭrinde ne estas spaco en ĉi tiu historio por listigi ĉiujn nomojn.

Jen estas pluaj detaloj rilate al membroj kiuj aliĝis al MEK post la jaro 1940, kaj kiuj ege kontribuis al la progreso de Esperanto, ne nur en Melburno, sed ankaŭ en la nacia sfero, AEA.

HERBERT KOPPEL. Li naskiĝis kaj esperantiĝis en Aŭstrujo kaj alvenis en Aŭstralio en 1948 pere de Kanado. Tuj post sia alveno en Melburno, li aliĝis al MEK kaj vigle partoprenis

klubaferojn. Li kun helpantoj, organizis la unuan postmilitan kongreson se AEA en Melburno, 1950. Li senĉese aktivis ennMEK unue kiel komitatano kaj poste dum la lastaj dudek jaroj kiel sekretario. En la sfero de la nacio asocio li estis sekr. de AEA 1950-67 kaj vicsekr. de 1958 ĝis hodiaŭ (1985). Kune kun aliaj anoj li sukcese organizes naciajn kongresojn en Melburno 1958, 1964, 1972 kaj la 1an Pacifikan Kongreson kiu kunokazis kun kongreso de AEA en 1976. Pro elstara kaj valora kontribuado al AEA, li ricevis, en 1974, la Honor-Insignon, Fraluto de AEA . Post la subita morto de Frank Banham, 1974, Herbert Koppel tranprenis la respondecon de redaktado de la oficiala oragano de AEA "The Aŭstralian Esperantist" kaj ĝos hodiaŭ fidele kaj kapable plenumis tiun taskon. Li ankaŭ redaktas la organon de la E-Federacio de Viktorio "Esperanto News". Li donacis, 1971, trofeon por dramo-konkurso dum kongresoj, poste nomita "La Herbert Koppel Dramo-Trofeo de AEA”. Ne multaj, anoj pli laboris por Esperanto en Aŭstralio, ol Herbert Koppel.

S-ino FAY KOPPEL. Fay edziniĝis al Herbert Koppel on 1951 kaj forte subtenis la labornn de sia edzo. Ŝi esperantiĝis dum la mez-tridekaj jaroj en Adelaido, kie instruis ŝin Kolonel D. Fulton kaj S-ro W. Waterman; ŝi estis ano de la Adelaida Klubo dum multaj jaroj, ĝis ŝi translokiĝis al Melburno en 1950. Ŝi brile sukcesis pri ekzamenoj; Diplomo de. BEA, Supera Diplomo de AEA, en 1968 ŝi sukcesis, kun honnro, pri la Klereca Diplomo de AEA. Ŝi estis de, 1968, ano de la Ekzamena Komisiono de AEA. En 1970, ŝia verko, "De Z al A en tri Epokoj” eldoniĝis, valora libro por ĉiuj literaturo-amantoj kaj studantoj. Fay estis (kaj estas) instruistino dum la semajnaj klub-kunvenoj; ŝi antaŭe estis vigla partopreninto en Melburna Rendevuo. Precipe per prelegoj ŝi interesigis kaj instigis anojn al pligrandaj streboj, cele al perfekteco en la Internacia Lingvo. Dum pli of tridek jaroj ŝi estis komitatano kaj estrarano de MEK/MES kaj kunhelpanto pri kongresoj kaj seminarioj en Melburno.

EDWARD McKENZIE (1897-1981). Li intereŝigis pri Esperanto senpere de konatiĝo kun Roy Rawson en la Raciismo-Societo dum la mez-dudekaj jaroj, kie li ankaŭ renkontis sian edzinon. Ges-roj McKenzie forte subtenis Esperanton en Melburno kie Edward estis prez de MEK/MES de 1952 ĝis 1970. Li enoficigis kiel kasisto de AEA 1951-1956. Krom partopreni kelkajn kongresojn de AEA, Ges-roj McKenzie ĉeestis la U/Kongreson en Ateno, 1976. Li ege kontribuis al la movado ĝenerale en Aŭstralio, kaj speciale al Esperanto en Melburno.

M. LEEREVELD. Ges-roj Marcel kaj Alida Leereveld alvenis al Melburno en 1952, el Nederlando, kaj tuj aliĝis al MEK. Post translokiĝo al Tasmanio ili ambaŭ laboris cele al la refondiĝo de Hobarta E-Grupo. Marcel. estis prez. de la grupo, 1957-61 kaj iniciatis Kongreson de AEA en Hobarto, 1960. Post reveno al Viktorio on 1962 li multe kontribuis al Melburna Rendevuo, al MES kaj al la E-Federacio de Viktorio. Li estis prez. AEA, 1964-65.

MEK/MES (1940-1985)

Post la ĉesigo de “La Suda Kruco" en 1934 kaj dum la intervenaj jaroj ĝis la milit-periodo, 1939-45, restas ne multaj detaloj pri MEK. Tamen estas certe ke la paralela MES malaperis dum tiuj mallumaj jaroj. Jarlibro de AEA, 1944, listigas 92 nomojn kiel membrojn de AEA en Viiktorio, inter ĉi tiuj nomoj troviĝas: C. W. Ballard, F. R. Banham, F-ino B. Blyth, J. Butler, H. M. Cohen, F-ino V. Cox, W. J. Drummond, F-inoj A. kaj E. Godfrey, N. Grant, E. S. Hanks, S-ino P. Hanks, E. Hearne, F-ino M. Helm, S-ino F. Hill, P. Holmes, P. Hudson, H. M. Lanyon, K. G. Linton, E. McKenzie, I. T. Maddern, S-ino R. Mumford, F. A. Pitt, S-ino F. Rawson, R. Rawson, A. Turner. Plejparte, ĉi tiuj nomoj apartenas al la pli frua periodo kiam MEK kaj MES aparte funksis en Melburno. Sekvante la malfacilajn jarojn 1934-45, la supraj nomoj aperis jaron post jaro en la analoj do MEK, do, por eviti. tedan ripetadon, estas proponite pritrakti la historion do MEK/MES laŭ kelkjaraj periodoj; la celo estas inkludi ĉiujn kiuj iel kontribuis per enoficiĝo en AEA, aŭ tiujn kiuj subtenis la bazan strukturon de E-movado senpere de la poste menciitaj grupoj en Viktorio.

M E K (1940-52)

Same kiel kluboj kaj kaj grupoj en aliaj lokoj. MEK suferis pro malfacilaĵoj dum la milit-periodo kaj eĉ dum postaj jaroj.Tamen is fidelaj kaj dediĉaj esperantistoj, sub la gvidado de prez-oj S-ino F. Rawson, S-ino E. M. Hill, D-ro F. Williams, S-roj E. S. Hanks kaj W. J. Drummond kune kun la tiutempa sekr./kas. S-ro H. M. Cohen, strebis kaj sukcesis pri la stabiligo de la movado en Melburno. S-ro A. C. Hintze, estrarano 1940-49, forte subtenis per senĉesa agado, la plensukcesen re-establiĝon de MEK.Tiamuloj kaj posteuloj kiuj helpis tiurilate estis: S-inoj P. Byatt, C. Stope, O. Glenie, D-ro A. Fridenbergs; F-inoj A. Godfrey, F. Grant, F. Andres (pste S-ino Koppel); S-roj R. Rawson, R. Craigie, L. Ewan, J. Mitchell, E. McKenzie, A. Turner, K. Grant, K. Linton, J. Butler, H. Koppel, J. Rosen, J.Gottlieb, F. Halls, F. Banham, P. Dikstejn, J. McGrauer; Ges-roj E. kaj P. Hanks. Okazis en 1950, en Melburno, la unua postmilita kongreson (Ĉ.4). Ĉeestis la jarfinajn Zamenhof-festojn entuziasmaj samideanoj kaj amikoj; en 1950 ekzemple, 150 partoprenis la Z-feston; bonvena gasto, 1942, estis Pastro Pausback (Usono) kaj vizitis in 1952-an , D-ro T. Einihovici (Perto) kaj S-ro Schindler (Adelaido).S-ro J. Butler iĝis komisiito de AEA pri korespond-kursoj en 1947. En 1951 Frank Halls partoprenis la U-Kongreson en Oslo. Vizitis al MEK en 1952 S-ro Y. Waseda, sekr. de Nagoja E-Instituto, Japanio. Aliĝis al MEK 1952 Ges-roj M. kaj A. Leereveld antaŭe el Nederlando.

M E K (1953-62)

Ĉi tiu dek jara periodo, la lasta antaŭ nomŝanĝo al MES estis sub la gvidado de prez. E. McKenzie kaj sekr./kas. H. M. Cohen. Plejparte estraranoj kaj anoj restis same kiel en la antaŭa periodo (1940-52) sed novaj samideanoj aperis kaj rekte subtenis la klub-aktivadon diversmaniere. Denove, krom prez kaj sekr., inter aktivuloj estis la jenaj: S-inoj A. Hintze, E. Hill, A. Paling, L Fink, O. Glenie, M. Jackson, W. Helen, V. Baranovich; S-roj W. Drummond, J. Burnstejn, J. Oki, K. Linton, F. Latimer, I. Burnstejn, F. Banham, J Hodgkiss, E. Holmes, E. Crewe, J. Figge, R. Cecil, R. Thomson, K. Bastin, F. Taylor, N. Perkins; F-inoj L. Samblebe (kiu vizitis U/kongeson 1953, en Zagreb), S. Rosengrade, A. Godfrey, E. Godfrey, G. Colwell, V. Cox, F. van Ryswijk, A. Hearne; Ges-roj Leereveld, Schilperood, Ryding, Hanks, Milligan, Koppel.

La Melburna E-Kooperativo aĉetis E-domom ĉe 10, The Crofts, Richmond; D-ro F. Williams formale malfermis la domon, la 12an de aŭgusto, 1960; grava paŝo antaŭen por MEK! Denove, dum ĉi tu periodo, La jarfinajn Z-festojn subtenis la anoj, kai ĉiun jaron vizitantoj kaptis la okazon ĉeesti kaj partopreni la celebradon. Anoj kiuj rekte kontribuis, krom supremenciitaj estraranoj kaj membroj, jene: S-ino Ferenzi, S-ino Humphries, S-ino Cochran, G. Wilson (blindulo), F. V. Taylor, Ges-roj Laidlaw. Vizitantoj al MEK kaj al Z-festoj jene: R. L. Harry (Kanbero), Ges-roj P. Kaj K. Schwerin (Sidnejo), Manjong Kim (Koreujo), W. L. Simpkins (Usono), U. Walde (Germanio), Ge -roj B. Potts (Nov-Zelando), Ges-roj Freling (Nederlando), H. Gunkel (Germanio), S-ro D. Broadribb (Usono), S-ro A. Brooke (eks-rajao de Sarawak).

En 1954, Ges-roj Leereveld translokiĝis al Tasmania. Pro long-daŭra servado al MEK kaj al la E-movado ĝenerale, kelkaj elstaraj anoj ricevis dankesprimojn (kaj taŭgajn donacojn) jene: S-ino E. Hill, S-ino A. Hintze, S-ro F.Banham, S-ro S. Milligan, S-ro E. McKenzie, La 11 a Kongreso de AEA (Ĉ.4) okazis en Melburno, en 1958. Sekr. 1959 estis S-ino I. Fink; sekr. 1960-62, S-ro H. Koppel.

MES (1963-70)

Post nomŝanĝo al MES la 18an de marto 1963, ĝis 1970 prezidiis denove S-ro E. McKenzie, dum S-ro H.Koppel prizorgis la oficon de sekretario. Aktivis en societo-aferoj la jenaj: S-roj H.M Cohen, J. Ryding, F. Taylor, I. Heldzingen, E. Hanks, K. Linton, F. Banham, D. Kane, F. Gemeeke, J. Mitchell, K. Bastin, R. Rawson, I. Gravahoac, H. Guilbert, E. Thompson, J. Beechey, J. Rae, H. Rosengren, A. Baldwin, a. Heathfield, I. Maddern, J. Daniels,; S-inoj F. Koppel, P. Hanks, V. King,; Ges-roj F. kaj M. Fordham, G. kaj A. Brown; D. Broadribb, M. Leereveld; F-inoj A. Godfrey, R. Van Ryswijk, J. Andrews, A. Hearn, D-ro A. Fridenbergs.

La Z-festoj tiutempe okazis en E-Domo; tio estis la kutimo de la inaŭguro de E-Domo en 1961 kaj la aliaj grupoj en Melburno ankaŭ festis tie la naskiĝtagon de D-ro Zamenhof; grupoj en Boronia, Orrong, Orientaj Antaŭurboj. Kontribuis, krom la supremenciitaj anoj, Pastro C.C. Cowling, S-ino M. Sanders, S-ino A. PalingS-ino Bunning; F-inoj A. Dennis, M. Sanders, C. Cameron, O. Mitchell; S-ino D. Theyer; S-roj R. Read, C. Stevenson.

Kvar elstaraj anoj mortis dum ĉi tiu periodo: S-inn ANNA HINTZE; sekvis memorparolo de prez. kaj kondolenc-letecoj de SES (Ges-roj P. kaj K. Schwerin), de Seymour (Ges-roj Holmes), Ballarat (S-ro J. Dimo). W. J. DRUMMOND; la 1-an de januaro, 1975, estis dediĉita al la memoro de S-ro Drummond kaj omage parolis Roy Rawson, Ken Linton, Ilja Grahovac, D-ro A. Fridenbergs. F-ino E. GODFREY: la 3an de aprilo, 1969; omaĝis je .ŝia memoro anoj dum ĝeneral kunveno. D-ro A. FRIDENBERGS: la 9an de septembro, 1969, memor-vespero okazis kune kun la Baha-a Komunumo kiam 34 anoj de MES ĉeestis la ceremonion.

Vizitantoj al MES: S-ino Michaels (Japanio), D-rino R. Scolnik (Argentino), W. Simpkins (Usono), Ges-roj Oliver (Anglujo), John Moore (Rockhampton), Ges-roj Cooper (Hobarto), S-ino T. v.d. Boogaard (Adelaido) C. C. Goldsmith (Sidnejo), F-ino J. Melville (Anglujo), Ges-roj Issobe (Manlio), S-ro W. Dworczyk (Pollando), Tihor Sekelj (Jugo-Slavio). Anoj tributis al la longdaŭra kaj valorega servo al la E-movado de S-ro H. M. Cohen dum la Z-festo, 1970. Okazis en Melburno en 1964, la 14a Kongeso de AEA (Ĉ.4).

M E S (1971-85)

Sub la gvidado de prez-oj H. Rosengren (1971), H. Beechey (1972-75), S. Kanaĉki (1976-84) kaj K. Linton (1985), kaj de la sekr. H. Koppel (1971-85) MES antaŭenigis la E-movadon en Viktorio. (Estis granda ŝoko kiam Ken Linton mortis la 9an de majo,1985). Aktivuloj dum ĉi tiu dekkvinjara periodo estis; S-inoj V. King, F. Koppel, M. Fordham, A. Paling; F-inoj A. Hearn, V. Cox, H. Menzies, J. Schubert; S-roj W. Beechey, H. M. Cohen, J. Munro, E. Chick, F. R. Banham, A. Baldwin, N. Kirk, L. McLochlan, M. Leereveld, D. Pescod, J. Midgely, N. Butkumas, J. Makowski, A. Stepanov, O. Killender, S. Milligan; S-inoj K. Augunas, B. Podmore, B. Silva, I. Courtenay; D-ro J. Martin.

Aktivis pri interkluba vespero, jarmeza novaĵo enkondukita dum 1976 kie anoj de la kvar grupoj en Melburno kontribuis erojn, la jena j: S-roj D. Rockell, D. Rogers, Ges-roj C. kaj R. Tumman, Ges-roj J. and T. Fallu; S-inoj M. Frogley, M. Sanders; F-inoj E. Trainor, M. Sanders I. Gale; kune kun anoj jam supre menciitaj.

Vizitantoj dum la periodo estis: D-rino Christa Spruch (Germanio), S-ino Lee (Usono) S-ro J. T. Allan (prez. NZEA), S-ro Colhoun (Nov-Zelando), Prof. kaj S-ino R. Robertson (Sidnejo), S-ro D. Spinazze (Italujo), S-ro P. Varkaùskas (Litovujo), S-ro N. de Raaf (Nederlando), S-ro J. Lokna (Svedio), Ges-roj Durham (Britujo), S-ro J. Makawski (Pollando), S-ino J. Douma (Nederlando), S-ro C. Bertin (Francio), S-ro T. Giladi (Israelo), S-roj S. Satojosi, K. Oki (Japanujo), Prof. C. Stop-Bowitz (Oslo).

Mortis dum ĉi tiu periodo, la sekvantaj samideanoj: E. HANKS, la 12an de aprilo, 1973;
E. E. THOMPSON, la 23an de majo, 19'79; F-ino A. GODFREY, la 25an de aŭgusto, 1979; Brig. J. MUNRO, la 9an de junio, 1980; E. McKENZIE, la 30an de oktobro, 1981; I. TOTH, la 24an de aŭgusto 1983; H. M COHEN, la 15an de septembro, 1984; F. R. BANHAM, la 30an de aŭgusto, 1974: K. J. LINTON, la 9an de majo, 1985.

Okazis en Melburno en 1972, la 18a Kongreso de AEA; en 1976, la 20° Kongreso de AEA kunokazis kun la la Pacifika Kongreso (Ĉ. 4)

* * *

RESUMO

Melburna E-Klubo/Melburna E-Societo/AEA
(1905-1985)

| | |
|---|---|
| 1905 | Melburna E-Klubo fondĝis |
| 1911 | Dum la 1-a Kongreso, Aŭstralia E-Asocio fondiĝis |
| 1912 | LKK ei Melburna E-Societo (nomŝango); Komerca Klubo fondiĝis |
| 1913-1920 | Melburna E-Societo alprenis la titolon - Aŭstralia E-Asocio |
| 1920 | Aŭstralia Esperanto Asocio (poste Aŭstralazia Esperanto-Asocio) restariĝis |
| 1920-1923 | Melburna Sekcio de AEA (anoj de la antaŭa Melburna E-Societo) |
| 1920 | Melburna E-Klubo refondiĝis |
| 1920 | Komerca E-Klubo malfondiĝis - anoj aliĝis al MEK |
| 1924 | Melburna E-Societo refondiĝis; malaperis post 1934 |
| 1932 | Aŭstralazia E-Asocio ne plu funkciis |
| 1937 | Aŭstralia E-Asocio refondiĝis |
| 1963 | Melburna E-Klubo adoptis la titolon: Melburna E-Societo |

* * *

Melburna Rendevuo (1940-70)

Rendevuo estis grupo speciale kreita por progresintaj en Esperanto  kaj plenumis utilan servon tiurilate. Oficistoj antaŭaranĝis la monatan programon, ĉu parolo, deklamo, kantado au iu alia distraĵo, nacia lingvo estis tute malpemesata dum kunvenoj. La unua estraro, 1940, jene: prez. C. W. Ballard; sekr. E. Hearne;kas. H. M. Cohen. Ne estas spaco en ĉi tiu historio por detale esplori la jarlistojn de estraranoj, aŭ la individuajn temojn dum la trideka jarperiodo, sed H. M. Cohen ludis estran rolon tra la tuta ekzisto de Rendevuo.

Jen estas listo de konata,j kontribuantoj al Rendevuo: S-roj C. W. Ballard, E. Hearne, H. M. Cohen, F. R. Banham, P. Holmes, E. Hanks, H. Koppel, J. Oki, K. G. Linton, J. Podenas; S-inoj P. Hanks, F. Koppel, E. Ghinzel, H. Cooper (Hobarto), I. Fink: S-roj W. Drummond, P. Davies, J. Gottlieb, K. Hirschel, H. Hutton, S. Burnstejn, S. Ottens, S. Stepanov, A. Schilperood, R. L. Harry, S. Ling; F-inoj V. Fox, A. Godfrey, E. Godfrey, Helen Prent (Anglujo); S-roj J. Mugrauer, E. McKenzie, D. Kane, R. Rawson; D-ro T. Einihovici (Perto), D-ro F. Williams, A. Fridenbergs; Pastro C. C. Cowling; S-roj F. Taylor, Jim Dimo, D. Broadribb, J. Ryding, M. Leereveld, C. C. Goldsmith, Kim Bastin; S-inoj F. Rawson, Marie Mash (Italujo); S-roj H. Beechey, C. Stevenson, T. Pics, A. Heathfield; S-inoj M. Frogley, V. King, M. Fordham, E. Thompson; F-ino A, Hearn; Ges-roj Davidson (Usono).

STATISTIKO

| | | | |
|---|---|---|---|
| M E K (1905-1911) | | | |
| 1905-09 | prez. J.Booth | 1905 | sekr. J.GilIespie (ĝis junio) |
| | | 1905-07 | sekr. C.W.Thonger |
| | | 1908-09 | sekr. F. A. Russell |
| 1910-11 | Prez. G. Whiteford | 1910-11 | sekr. A.H.Johnson |
| | | | |
| MES (1912-20) | | | |
| 1912 | prez. W.J.Drummond | 1912 | sekr. A.L.Sullivan |
| 1913-16 | prez. J.G.Pyke | 1913 | sekr. N.Mills |
| | | 1914-15 | sekr. F-ino M.Helm |
| 1917 | prez. F-ino E.A.Sinnotte | 1916-17 | sekr. W. J. Drummond |
| 1918-19 | prez. J.G.Pyke | 1918 | sekr. P.Hudson |
| | | 1919 | sekr. R.R.Rawson |
| | | | |
| | | | |
| (MEK (1920-1962) | | | |
| 1920-29 | prez. J.G.Pyke | 1920 | sekr. L.E.Thompson |
| 1930-40 | prez. W.J.Drummond | 1921-35 | sekr. R. R.Rawson |
| | | 1936-39 | sekr. S-ino A.Hintze |
| | | 1940-58 | sekr. H.M.Cohen |
| 1941-42 | prez. S-ino F.Rawson (ĝis julio) | | |
| 1942-46 | prez. S-ino E.M.Hill | | |
| 1947 | prez. D-ro F. Williams | | |
| 1948-49 | prez. E.S.Hanks | | |
| 1950-52 | prez. W. J. Drummond | | |
| 1953-62 | prez. E.McKenzie | 1959 | ekr. S-ino I.Fink |
| | | 1960-62 | sekr. H. Koppel |
| | | | |
| | | | |
| | | | |

M E S (1920-1934)

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1920-21 | prez. A. M.Hyde | 1920-21 | Sekr. C. Kelly |
| 1922-23 | prez. C.W. Ballard | 1922 | sekr. J.C. Robert. |
| | | 1923 | sekr. G. Redfern |
| 1924 | prez. C.L.Clarke | 1924-25 | sekr. J. Robert (ĝis junio) |
| 1925- | prez. C.W. Ballard | 1925-31 | sekr. F-ino V. Cox |
| 1927 | prez. N.Grant | | |
| 1928-29 | prez. J.Scurrie | | |
| 1930 | prez. P.Hudson | | |
| 1931 | prez. P.Holmes | | |
| 1932-34 | prez. P.Hudson | 1932-34 | sekr. F-ino L. Irwin |

M E S (1963-1985)

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1963-70 | prez.E.McKenzie | 1963-85 | sekr. H. Koppel |
| 1971 | prez.H.Rosengren | | |
| 1972-75 | prez.H.Beechey | | |
| 1976-84 | prez.S.Kanaĉki | | |
| 1985 | prez. K.G. Linton (ĝis majo) | | |
| 1985 | prez. H. Beechey | | |

## Antaŭ-urbaj Grupoj - Melburno
## kaj
## Aliaj Grupoj -Viktorio

1908 Warburton-Grupo: sekr. F-.ino I.C. Noar; ano F-ino L.A. Ward.
1908-19 Benalla E-Klubo fondiĝis - 25 anoj; D-ro A.E. Barrington prezidis kaj instruis la grupon. Frua lernanto, F-ino Ruby Ledger, senvualigis tomb-ŝtonon sur la tombo de D-ro Barrington dum la memor-ceremonio, la 12an de septembro, 1976. Nuntempe en Benalla estas du stratoj nomitaj 'Barrington" kaj "Esperanto", honore al la historia evento (vidu en E-Federacio de Viktorio).

1912-20 Komerca E-Klubo, Melhurno - fondinto kaj unua prez. W.L. Edmanson. Fruaj ano j: sekr. K.C. Potts; S-inoj Davis, Warren, Johnson; F-inoj E. Larcher, M. Helm, C. Bauer, H. Wicks, C. Younger; S-roj H. Wicks, V. McDonald, L. E. Thompson, W. Smart.

Estraro:

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1912 | prez. W. Edmanson | 1912-13 | sekr. K.C. Potts |
| 1913-15 | prez. W. Smart | 1914-15 | sekr. A.L. Hutchins |
| 1916-20 | prez. L. E. Thompson | 1916 | sekr. W.H. Halliwell. |
| | | 1917-18 | sekr. F-ino M. Helm |
| | | 1919-20 | sekr. F-ino A. Godfrey |

1914-25 E-Grupo "Espero", Mont Albert: F-ino B. Blyth fondis kaj gvidis grupon 1914-17. Post nomŝango en 1918 al: Mont Albert E-Grupo, estraro jene; prez. (1918-25) F-inc E.A. Sinnotte; sekr. (1918-19) F-ino F. McLeverty, (1920-21) F-ino M. Healey, (1922-25) F-ino B. Blyth; kas. (1918-25) S-ro Roddick. Anoj: S-ino Stein, F-ino Bell.
1921-34 Coburg (Koburgo) E-Grupo. La loka grupo de la Politika Laborista Konsilantaro starigis E-kurson en 1921. Dek persona] partoprenis la klason kiun instruis S-ino P. Hanks. En 1929 fondiĝis E-Klubo; estraranoj jene: prez.: (1929-32) S-ino A. Hintze; (1933) S-ro F. Williams; (1934) S-ro E. Hearne. Sekr. (1929) S-ro G. Burns; (1930-34) S-ro R. Spencer. Instruistoj: S-inoj A. Hintze, P. Hanks; S-roj A. Spencer, C. Shanahan, N. Perkins. Grupanoj: F-inoj Trenoweth, Glaister; S-inoj Fest, S. Ling; S-roj R. Lowe, J. Belmont, C. Saaren, J. Aldreth. 33 grupanoj piknikis en l932 ĉe Ges-roj Hanks.

1922 Gooram E-Grupo: F-ino M. Wells instruis klason en loka lernejo.
1922-26 "Iru Antaŭen" Grupo, Oakleigh (antaŭe estis Oakleigh kaj East Malvern grupoj): prez. (1922-23) S-ino R. Bigelow; vicprez. (1922-26) R. Cohen; sekr. (1922-23) J. Parker; kas. (1922-26) H. Byatt. Grupo kunvenis mardvespere ĉe Oakleigh; anoj F-inoj L. kaj J. Irwin, N. Byatt, P. Abbott, M. Martin; S-roj C. Simpson, T. O'Leary. Prez, (1924-26) W. Quinlivan; sekr. (1924-26) E. Chalice.

1922 Woomelong - fondis kaj instruis grupon, F-ino Dettman.
1922-24 Carnegie E-Grupo: prez, (1922-23) .S-ro Turner, (1924) S-ro S. Blundy; vic-prez. 1922-24) S-ro J. G. Collins; sekr. (1922-24) F-ino L. Irwin.

1922 Box Hill - S-ro H.M. Lanyon instruis grupon.
1922-27 Persista grupo Armadale: prez. H. Byatt; sekr. F-ino I. Thomas; kas. F-ino N. Byatt. Grupo kunvenis merkredvespere ĉe Armadale.

1922 Ĉe Albert Park en hejmo de F-ino King, F-ino Robson instruis grupon.
1922-25 Northcote E-Grupo: fondis kaj gvidis grupon, F-ino E. Wheeler; sekr. S-ro Delaney.
1922 Koroit - F-ino Taylor instruis grupon.
1922-25 Suda Belagrave Grupo: fondis kaj gvidis grupon - F-ino Giles; sekr. S-ro Gossler.
1922-23 Sandringham E-Grupo: (Marborda Grupo): fondis kaj gvidis - F-ino Hollow.
1922 F-ino M. Helm - elektita kiel Nacia Direktorino, Internacia Romkatolika Asocio en Aŭstralio - starigita en decembro 1922.

1923-25 Orienta Berwick - Grupo: fondis kaj gvidis F-ino P. Abbott; kunvenis ĵaŭdvespere.
1923-24 Malvern - Knabinoj - Grupo: prez. F-ino N. Byatt; sekr. F-ino A. Midsley.
1923 Melburna Sekcio de AEA komencis instruadon; anoj: C.L. Clarke, G. Redfern, C.W. Ballard, P.T. Hudson; S-ino R. Bigelow, (ĉiuj elstaraj anoj de E-movado en Melburno).

1924 Grupo de Aŭstralian Natives Association (Aŭstraliaj Ennaskuloj-Asocio), Oakleigh: prez. W. Quinlivan; sekr. E. Chalice. Grupo kunvenis lundvespere.

1925 Raciista Diskutgrupo: prez. J. Skurrie; sekr. F-ino B. Adamson. Kunvenis ĵaŭdvespere.
1949-51 Ballarat E-Klubo: prez. N.G. Bevan; sekr. S-ino Weatherall, (1951) S-ino Wyres; kas. J. Allen; anoj: 0. Brkiĉ, J. Reid. Dum 1950 estis 45 membroj en la grupo.

1960 Malvern E--Klubo: kunvenis ĉe la hejmo de S-ino A. Paling.
1962-85 E-Klubo de Orientaj Antaŭ-urboj de Melburno (Oakleigh E-Grupo). Klubo fondiĝis en februaro 1962; fruaj anoj jene: S-inoj I. Fink, M. Sanders, B. Smith, B. Stafford. Estraranoj jene: prez. (1963-66) S. Milligan; (1967) S-ino M. Sanders; (1968-69) S-ino I. Fallu; (1970-71) A.Heathfield; (1972) M. Fordham; vicprez. (1963-65) S-ino B. Smith; (1966-70) F-ino A. Hearn; (1971) S-ino B. Thomas; (1972) S-ino M. Sanders; sekr. (1963-66) S-ino I. Fink; (1966-72) S-ro R. Reed; kas. (1963-65) S-ino I. Fink; (1966-67) S-ino S. Thomas; (1968-69) S-ino Herta Koppel; (19'70) S-ro J. Fallu; (1971-72) S-ro W. Brockwell; k-anoj dum diversaj jaroj: S-inoj E. Stafford, J. Phillips, M. Smith, M. Fordham, M. Casey, G, Burmeister, J. Brockwell; S-roj P. Priestley, W. Baxter, J. Brockwell; F-ino M. Widdicombe. NOM-ŜANĜO 1973. Oakleigh E-Grupo, (1973-1985) estraranoj jene: prez. (1973) S-ino M.Fordham; (1974-78) J. Fallu; (1979) N. Butkumas; (1980-85) J. Fallu; sekr. (1973-81 ) R. Reed; (1982-85) F-ino A. Hearn; kas. (1973) S-ino G. Burmeister; (1974-75) S-ino M. Gillam; (1976-85) F-ino A. Hearn; k-anoj: (1973-1985) S-inoj I. Fallu, Gillam, Silva, V. John, M. Fordham, S. Rogers, F. Reed; S-roj P. Pisz, A. Baldwin; F-ino M. Sanders. Grupo kunvenis ĉe hejmo de S-ino M. Sanders (1975-79), ĉe hejmo de Ges-roj Fallu (1980-85). Mortis 1982, S-ino M. Fordham; en 1983, S-ro N. Butkumas kaj S-ro R. Reed. Mortis en Kanbero en 1984, S-ro M. Fordham. Ĉiuj multe kontribuis al la E-movado en Viktorio.

Orrong E-Grupo: 1968-71.       Malvern E-Grupo: 1972-85.
Estraranoj jene: prez. (1968-69) S-ro C. Stevenson; (1970-71) S-ino A. Paling. sekr. (1968-71) F-ino L. Hooper. kas. (1968-71) S-ino M. Halliday. Grupo kunvenis ĉiumarde ĉe S-ino A. Paling. 1972: Nomŝanĝo - Malvern E-Grupo. Estraranoj: prez. (1972-73) S-ino A. Paling; (1974-75) S-ro. C. M. Lanyon; (1976-85) S-ro D. Pescod; sekr. (1972-73) F-ino V. Strachan; (1974-75) S-ino D. O'Brien; (1976-77) S-ino B. Podmore; (1978-79) S-ro G. Killender; (1980) S-ino E. Gazan; (1981-82) S-ino B. Podmore; (1983) F-ino L. Hooper; (1984-85) S-ino V. Fotheringham; kas. (1972-74) S-ino M. Halliday; (1975-85) S-ino B, Pescod. Instruis grupon (1972-85) S-ino A. Paling; k-anoj: S-inoj A. Paling, L. Hooper, B. Podmore, B. Pescod. Aliaj anoj: Shirley Betts, Dorothy Goodwin; F-inoj K. Walanabe, A. Hall; S-ro L. Brown. Membroj aliĝis al, kaj partoprenis en, la agado de Esperanto-Federacio de Viktorio, ankaŭ partoprenis Z-festo,jn kaj seminariojn kune kun aliaj Melburno-Grupoj.

Boronia E-Grupo: 1970-76.
S-ro I. Heldzingen, 1970, starigis la grupon kaj instruis la anojn. En 19'72 estraro jene: prez. H. Marshall; sekr. I. Heldzingen; grupo kunvenis merkrede ĉe Boronia. 1974-76 estraro: prez. G. Kohlman; sekr. I. Heldzingen; kas. S-ino B. Wustermann; libr. S-ino H. Heldzingen.

Waverley E-Grupo: fondiĝis 1978.
Estraranoj: prez. (1978-79) S-ro G. Holding; (1980) S-ro D. Rogers; (1981) F-ino I. Gale; (1982) S-ino K. Brisbane; (1983) S-ino M. Miller; (1984) S-ino M. Armour; (1985) S-ino .S. Burke; sekr. (1978) S-ino S. Parker; (1979-80) F-ino E. Trainor; (1981-82) S-ro G. Holding; (1982-85) F-ino I. Gale; kas. (1978-80) F-ino I. Gale; (1981) S-ro G. Holding; (1982-85) F-ino I. Gale. Klasoj ĉe hejmo de Brig. I. Gale; instruis: G. Holding I. Gale, E. Trainor, D. Rogers, John Coogans. Aliaj grupanoj: S-inoj El Hag, A. Eidems, S. Bengtsson, Lydon, Siu, M. Mematollaki, B. King, M. Jojkity, F. Elms; S-ro D. Adams; Ges-roj E, and M. Fisher; F-ino A. Hall. Kune kun kelkaj aliaj, Brig. I. Gale vizitis al NZEA Kongreso 1985, laŭ invito de S-ro Don Rogers, prez. NZEA kaj antaŭa prez. de Waverley E-Grupo.

Esperanto-Societo de Morwell. (1969-85)
La societo fondiĝis en aŭgusto 1969 sub la gvidado de S-ro Ivan Maddern kaj Ges-roj W. kaj M. Wybenga. Poste Ges-roj H. kaj A. Schepers kune kun aliaj anoj forte subtenis la grupon. S-ro Maddern estris la rnezlernejon ĉe Morwell kaj enkondukis Esperanton en la studprogramon; ĉi tiu situacio ĉesis post emeritiĝo de Ivan Maddern en 1971. Estraranoj 1969-85 jene: prez. (1969-74) I. Maddern; (1975) H. Schepers; (1976-85) S-ino M. Wybenga. sekr. (1969-71) W. Wybenga; sekr./kas. (1972-74) S-ino M. Wybenga; sekr. (1975) H. Schepers; (1976-78) S-ino A. Schepers; (1979-85) W. Wybenga. Aliaj komitatanoj kaj anoj jene: S-inoj L. McLaren, E. Maddern; F-inoj L. Kelly, S. Wybenga, P. Maddern; S-roj C. Laird, N. Brown.

S-ro I. Maddern kaj S-ino M, Wybenga kunredaktis la revuon "Latrobe Valley Esperantist" (1970-1980); ĉi tiu monata novaĵletero raportis ne nur pri la loka societo sed ankaŭ pri tre diversaj temoj; el tiuj la plej grava rilatas al la fruaj jaroj de E-pioniroj en Aŭstralio.

En 1974, S-ino M. Wybenga verkis "Bonan Tagon" kaj sonbendigis ĉi tiun radio-kurson kun helpantoj el Morwell-grupo. Radio-stacio 3TR brodkastis la kurson "Bonan Tagon" kaj pli of 100 lokanoj partoprenis la specialan kurson. (La sama kurso poste estis akceptita de kelkaj radio-stacioj kaj lokaj lernejoj en Kvinslando; dume "Bonan Tagon" estas la enkonduka kurso en la programo por Korespond-Kursoj de AEA). (Ĉ.8).

En 1972, S-ro I. Maddern kaj filino ĉeestis Universalan Kongreson en Portland, Usono. En 1976 Ges-roj Wybenga vizitis la U-Kongreson en Ateno. Mortis en marto 1977, Hank Schepers; en 1980 mortis Ivan T. Maddern.

IVAN THEODORE MADDERN, 1906-1980, esperantiĝis kaj aliĝis al MEK dum militservo en 1944. Poste kiel instruisto en gimnazioj de Horsham, Wangaratta, Wodonga kaj Moe, li ĉiam penis progresigi Esperanton per prelegoj kaj rekta instruado al interesataj personoj. En la jaro 1964 li, estro de mezlernejo en Morwell, enkondukis Esperanton kiel konstanton temon kaj instruado daŭris ĝis li emeritiĝis en 1971. Li fondis la E-Societon de Morwell en 1969; estis vicprez. de AEA 1963-65 kaj 1968-79; li elektiĝis prez. de AEA 1966-67. Li ege interesiĝis pri la historio de Esperanto en Aŭstralio, precipe rilate al la fruaj pioniraj jaroj kaj per "Latrobe Valley Esperantast" kaj "Klerigo" (Ĉ.5), li publikigis eltrovitajn faktojn. Dank' al Ivan Maddern kaj lia persista laboro, ĉi tiu verko, "La Historio de Esperanto en Aŭstralio", certe estas pli informriĉa rilate al tiuj fruaj jaroj. Ivan Maddern multe kontribuis al Esperanto en Aŭstralio.

Geelong E-Grupo. (1978-85): fondinto, F-ino Nan Loffel (poste S-ino Anthowisz); sep anoj kunvenis ĉe hejmo de S-ro E. C. O'Brien kiu estis prez./sekr. (1978-85) kaj gvidis la grupon. Anoj dum 1982, Ges-roj Jeans.

Mornington E-Grupo (1978): S-ro S. Newton starigis grupon.

E-Klubo de Orientaj Antaŭ-urboj de Melburno (1980): prez. S-ino L Courtenay; sekr.S-ino B.. Marshall.

## ESPERANTO-FEDERACIO DE VIKTORIO (1970-1985)

La 29an de aprilo, 1970, ĉe Oakleigh, 37 anoj el la kvar Melburnaj Grupoj kunvenis por fondi la E-Federacion de Viktorio. Prezidis, la sekr. de AEA S--ro C. C. Goldsmith kiu rakontis pri similaj federacioj kun kiuj li aktive kunlaboris. Estraro elektiĝis jene: prez. A. L. McLochlan (Boronia Grupo; sekr./kas. A. Baldwin (MES); k-anoj. Ges-roj R. Brooks (Orrong E-Grupo); S-ino M. Casey (Orientaj Antaŭ-urboj); I. Heldzingen (Boronia); S-ino V. King (MES). Dankon meritis S-ro Goldsmith kiu venis speciale el Manlio, kaj S-ro A. Heathfield (Orientaj Antaŭ-urboj) kiu multe klopodis pri la fondiĝo de la federacio.

La unua aranĝo, manĝ-danca vespero, okazis en Julio kiam 58 anoj partoprenis ĉi tiun inaŭguran eventon; prizorgis detalojn, S-ro McLochlan kaj S-ino V. King. Ĉiun jaron de 1970 ĝis 1985, depende de la decido de la estraro, okazis: ekskursoj al interesaj lokoj, vizitoj al vidindaĵoj, ĉu montaj aŭ marbordaj; piknikoj en diversaj renkontejoj, ofte en la hejmoj de anoj; tutsemajnfinaj seminarioj; jarkunvenoj. Sendube unu el la plej kontentiga estis la vizito al tombejo en Benalla la 12an de septembro, 1976. Entute 44 anoj partoprenis la starigon de tomboŝtono (kun tabuleto) je la memoro de D-ro A. E. Barrington. La iniciatemo de S-ro Ivan Maddern ebligis ĉi tiun tributon al unu el la elstaraj pioniroj de la E-movado en Aŭstralia D-ro Barrington eldonis la unuan aŭstralian E-gazeton, 1908-09 (Ĉ.5) kaj fondis E-Klubon ĉe Benalla. La urba konsilantaro, la loka historia societo kaj la E-Federacio de Viktorio, kunlaboris pri la historia evento. Poste, du novaj stratoj ricevis nomojn, Barrington Strato kaj Esperanto Strato,

Ne estas spaco en ĉi tiu historio plenraporti detalojn pri ĉiuj aktivoj dum la dekkvin-jara vivo de la federacio, sed sekvas listo de konataj kontribuantoj al tiu plensukcesa periodo. Krom la estraranoj jam listigitaj en STATIKTIK0, jen estas nomoj: F-inoj L. Hooper, V. Strachan, A. Hearn, A. Godfrey, L. Kelly, M. Malone, S-inoj I. Heldzingen, M. Wybenga, M. Halliday, Walters, F. Koppel, M, Armour, P. Francis, I. Gale. S-roj G. Kuhlman, I. Maddern, J. Dimo, C. Amat, A. Resnicek, J. Menzies, J. Makowski, W. Wybenga, J. Coogans, S. Kanaĉki, K. Linton, M. Cohen, E. Chick. Ges-roj M. and A. Leereveld, H. and A. Schepers, G. kaj R. Tumman.

Vizitantoj: S-ino T. v.d. Bongaard, G. Clarke (Sud-Aŭst.), S-ino W. Greenhalgh (Brisbane), Ges-roj Tronerud (Vik.), Ges-roj Mac LeFevre (Tas.), Ges-roj E. C. O'Brien (Vik.), Ges-roj P. Holmes (Vik.). Kontribuis al distraj vesperoj la kantgrupoj de Morwell kaj Waverley.

*  *  *

## STATISTIKO
### Esperanto-Federacio de Viktorio
### (1970-1985)

Prez.: (1970-71) A. L. Mr.Lochlan; (1972-73) S-ino A. Paling; (1974) F-ino M. Sanders; (1975-78) A. Baldwin; (1979) R. Reed; (1980) D. Pescod; (1981-84) D. Rockell; (1985) J. Fallu.

Vicprez.: (1972-73) F-ino M. Sanders; (1974-75) S-ino A. Paling; (1976-78) R. Reed; (1979) D. Pescod; (1980) D. Rockell; (1981-83) R. Reed; (1984) J. Fallu; (1985) Margaret Miller.

Sekr.: (1970-74) A. Baldwin; (1975-81) S-ino B. Podmore; (1982-83) Loretta Jackson; (1984-85) S-ino I. Fallu.

Kas.: (1970-72) A. Baldwin; (1973) M. Reader; (1974) W. Worth; (1975-79) F-ino M. Sanders; (1980-85) F-ino E. Trainor.

Bulten-Red. (1970-85) H. Koppel.

*  *  *

## Esperanto - Pioniroj, Viktorio

El la listoj de D-ro Zamenhof, 1889-1909.   Universala Ligo de Esperantistoj.

| | | |
|---|---|---|
| G. Almgren | D-ro McBurney | E. Williams |
| D-ro A. Barrington | R.G. Niall | D-rino L. Alexander |
| John Booth | Stuart Reid | F-ino F. Booth |
| J. Caldwell | A. Sheldrick | S-ino M. Booth. |
| F. E. Cobb | E. E. Spring | S-ino M. Harrison |
| George Cordon | I. J.Tampion | F-ino H. McDowell |
| G. C. Hodgson | C.W. Thonger | S-ino J. E. Newport |
| W. H. Hood | W. H.Vogt | S-ino T. G. Noar |
| A. M. Hyde | H. K. McG. Walker | F-ino E. A. Sinnotte |
| John Lang | G. Whiteford | F-ino R. Booth |
| F-ino A. Campbell | F-ino H. E. Cross | S-ino M. T. Dacomb |

ESPERANTO EN KANBERO

Kanbera Esperanto-Societo fondiĝis la 19an de novembro, 1929. Estraro elektiĝis jene: prez. Majoro C. L. Clarke; vicprez-oj S-ino Bernsten, S-ino Browinowski; sekr./kas.S-ro J. Henry; k-anoj: S-ro C. G. Garriock, S-ro G. Halle, F-ino B. Bevan. Estis decidita ke la societo kunvenu ĉiun mardon, sed bedaŭrinde ne plu estas mencio pri ĉi tiu societo post la originala anonco.

En 1952 la Kanbera E-Klubo estis fondita, la 25an de februaro; estraro elektiĝis jene: prez. R. L. Harry; vicprez. H. Torr; sekr. S-ino J. R. Maybee; kas. S-ino J. Torr; bib-l. S. Fulop. La klubo kunvenis ĉiun lundvesperon. Post reklamado, estis necese starigi du klasojn por komencantoj; instruis R. Harry kaj H. Torr. La propra E-biblioteko stariĝis kaj estis ricevitaj libroj donacitaj de SES kaj de S-ro Alan Towsey.

Por eviti tedan ripetadon de nomoj jaron post jaro dum la rakonto pri la historio de KEK estas decidite kroniki eventojn laŭ taŭgaj jarperiodoj. En STATISTIKO estas listigitaj nomoj de prez. kaj sekr. dum la koncernaj jaroj; en la sekvana teksto troviĝas nomoj de aliaj estraranoj kaj anoj kiuj kontribuis al la prosperado de la klubo de 1952 ĝis 1985. La klubo certe havas bonajn rilatojn kun registaraj instancoj kaj tio estas avantaĝo.

1952-1960. Kunvenejo estis la kunvenejo de "Konsilantaro de Bonaj Najbaroj" en Riverside (antaŭ-urbo), kie instruis: R. Harry, H. Torr, R. Robbins, S-ino Torr, S. Fulop. Estraranoj kaj kontribuantoj al klubaferoj dum la periodo krom la suprepremenciitaj: S-roj N. Gamble, C. Johns, J. Sullivan, H. Downey, J. Wallis, A. Hopkins, J. Howell, T. Cobham; D-ro K. Rutherford; S-ino Halls; F-inoj J. Channon, J. Murray, Blumer. S-ro G. Whiteford (pionira ano kaj prez. MEK, 1910-11) elektiĝis honora dumviva membro en 1958; li ankaŭ donacis al la biblioteko 30 E-librojn. Dum la periodo D-ro Robbins kaj S-ro Ralph Harry translokiĝis (kaj poste revenis al Kanbero) pro deĵor-ŝanĝoj. Vizitis al U-Kongresoj: R. L. Harry (Haarlem 1954); N. Gamble (Bologna, 1955); J. Davidson (Varsovio, (1959). En 1956 okazis plensukcesa Kongreso de AEA en Kanbero (Ĉ.4) dank' al la laboremaj anoj de KEK. Zamenhof-Festoj okazis ĉiun jaron, aŭ ĉe kunvenejo aŭ en la hejmoj de anoj.

1961-1970. Sub la gvidado de prez-oj: R. L. Harry, N. Gamble, R. Robbins, S-ino M. Zagorskis, W. Amies kaj sekr-oj R. Robbins, S-ino J. Harvey, S-ino M. Zagorskis, S-ino B. Amies la klubo daŭre progresis dum ĉi tiu periodo. Aliaj estraranoj kaj kunhelpantoj jene: S-inoj J. Torr, C. Ramage, J. Monaghan, A. Pill, J. Le Roux, G. Stevenson; S-roj W. Smith, N. Manitius, H. Torr, J. Davidson, J. Gielb, Craig Thompson, R. H. Loof; F-inoj Free, J. Grant. En 1964, pro diversaj kialoj la kunvenejo lokiĝis je la "Kunvendomo de Amikoj" en Spencer (antaŭurbo), kie ankaŭ okazis la Z-festoj dum la sekvantaj jaroj. Anoj subtenis la nacian peton de AEA per donaco al "Aŭstralia Ĉambro" en Domo de UEA en Rotterdam. La 15a kongreso de AEA okazis en Kanbero, en januaro, 1966 (Ĉ.4); estraranoj kaj klubanoj laboris pri tiu sukcesa evento. Vizitis al Kanbero 1963 dum du monatoj, Prof. Bjorn Collinder (Svedujo); li vigle partoprenis klubaferojn kaj anoj adiaŭis lin dum speciala vespero per taŭga memoraĵdonaco kaj parolo de S-ino J. Torr kaj Craig Thompson. En 1966 bonvena vizitanto estis D-ro J. Scolnik (Argentino) kiu alparolis la klubanojn pri sia mondvojaĝo. En 1968 vizitis la klubon, F-ino Herma Rinke (Germanujo). Denove, dum ĉi tiu periodo, S-ro Ralph Harry kaj D-ro Ross Robbins translokiĝis (kaj revenis) pro deĵor-necesoj. S-ro R. L. Harry ĉeestis la 52-an U/Kongreson en Roterdamo, 1967.

En 1968 oni decidis ŝangi instruadon de klasanoj al dimanĉmateno, laŭ peto de la plej multo, anstataŭ dum la kutirnaj vesperklasoj. En 1966, S-ino J. Le Roux (kas. 1955-56) reiris al Anglujo. Entute tre sukcesa dekjara periodo por KEK!

1971-1979 En 1971 anoj adiaŭis al Ralph Harry kiu foriris al Germana Federacia Respubliko, kiel Aŭstralia ambasadoro. Krom la estraranoj menciitaj en STATISTIK0, (prez-oj: N. Gamble, P. Grabham, D. Price, S-ino M. Zagorskis, W. Amies, sekr-oj S-ino J. Torr, S-ino M. Zagorskis, F-ino B. Thomas, N. Gamble, R. Hyland) aliaj anoj kiuj laboris por KEK dum ĉi tiu periodo jene: S-inoj D. Kane, K. Marshall, I. M. Summy, I. Bluhm, M. Ellyard. S-roj R. Taylor, C. Johns, H. Torr, R. Robbins, J. Harvey, D. Kane, J. Davidson, D. Daniel, G. Poole, A. Price, D. Thomas, C. James, H. Bluhm, S. Ellyard, F-inoj E. Heath (reiris al Toowoomba, 1974), M. Noonan. Mortis en oktobro 1975, S-ino Mitzi Zagorskis kaj mortis en Julio 1975, S-ro W. Amies; ambaŭ estis fervoraj anoj kaj estraranoj dum multaj jaroj.

Aktivuloj pri instruado dum la periodo, P. Grabham (kiu estris ka j gvidis grupon ĉe mezlernejo-Narrabundah), R. Robbins, S-ino M. Zagorskis, D. Price, J. Davidson, Barbara Amies, Marilyn Noonan, Marj Ellyard, R. Harry, N. Gamble, Brenda Thomas, D. Thomas, J. Harvey. En 1972 Ges-roj H. kaj J. Torr translokiĝis al la Ormarbordo, Kvinslando. Vizitis al KEK en 1972, prez. AEA D-ro Ross Robbins. Dum la Z-Festo, 1978, Ralph Harry prezentis filmon pri la U-Kongreso en Reykjavik kiun li ĉeestis tiun jaron. Entute la periodo 1971-79 estis stabila kaj kontentiga parto de la historio de KEK.

1980-1985. Sendube ĉi tiu periodo estas La ora periodo de KEK kiam la estraro de la klubo plejparte koincidis kun la estraro de AEA. De Julio 1980 ĝis Julio 1984 Ralph Harry, prez. AEA ankaŭ estis prez.de KEK; de januaro 1982 ĝis hodiaŭ (1985), S-ino M. Ellyard estis sekr.de AEA ankaŭ sekr. KEK; S-ro Sam Ellyard kas. KEK (1980-84) estis kas de AEA de januaro 1982 ĝis sia morto en januaro 1984 tuj post la 24-a Kongreso de AEA en Kanbero 1984 (Ĉ.4); anstataŭis S-ron Sam Ellyard kiel kasisto F-ino Brenda Birkett, la tiama kas. de KEK.

Aliaj anoj kaj estraranoj kiuj kontribuis al KEK dum ĉi tiu pritraktata periodo jene: F-ino Kath Lewis (kas.1984-85), S-ino Patti Anson, Ian Pollard, P. N. van Hai, F-ino M. Allnutt. KEK trovis, en 1979, kunvenejon en la Instituto de Internaciaj Aferoj. La ejo estas senkosta - kontraŭ laboro de anoj kiuj trifoje en la jaro pakas kaj ekspedas la revuon de la Instituto; en la sama loko estas starigita la Biblioteko de AEA (komisiito, F-ino Kath Lewis (Ĉ.6). En 1980 radio-stacio 2XX Kanbero, disaŭdigis iom da la kurso "Bonan Tagon". En 1981 KEK starigis budon, laŭ okazo de Pac-Pikniko, en Kanbero. Januare 1982, ses ano j partoprenis la 23-an kongreson de AEA en Adelaido, kie la dramo-grupo sukcesis pri la trofeo-Herbert Koppel. Tiun sarnan jaron vizitis al Kanbero 15 anoj de SES kaj Manlio-Klubo, dum semajnfino je 24/25 aprilo.

Ges-roj S. kaj M. Ellyard kaj S-ro R. Harry ĉeestis la U-Kongreson en Antverpeno. Bonvena vizitanto al la Zamenhof-festo estis Alan Towsey (Tahmoor), kiu festparolis. Elektiĝis Honoraj Dumvivaj Anoj de KEK la jenaj: Ges-roj H. kaj J. Torr, S-ro S. Fulop, S-ro N. Gamble – ĉiuj estis multjaraj estraranoj de la klubo - kaj S-ro C.Johns, kontrolisto. Frue en 1983 prez. R. L. Harry kaj sekr. S-ino M. Ellyard pro AEA ĉeestis kunvenon de Asocio de Instruistoj de Modernaj Lingvoj kaj prezentis proponojn de AEA al la Senata Komitato per Edukado. Gratulinda rezulto el tiuj proponoj montriĝis kiam Esperanto estis menciita en la fina raporto, inter aliaj lingvoj, kiel "taŭga lingvo elektebla dum elementa aŭ meza lernejo-nivelo". Grupo de Sidnejanoj partoprenis kun anoj de KEK, “Aŭroran Di-servon" ĉe la Aŭstralia Milit-Monumento. F-ino Brenda Birkett eksterlandis ĉe Havajo kie ŝi renkontis S-ron "Bunnie" Chambers, konatan esperantiston kaj radio-amatoron,

Aligis al la klubo, F-ino G. Tregear. En 1984 kiel supre menciite, KEK starigis ĉe Kanbero, tre sukcesan kongreson de AEA (Ĉ.4) Estis granda ŝoko al ĉiuj anoj de AEA aŭdi pri la subita morto, tuj post la kongreso de Sam Ellyard; poste je lia memor' anoj de AEA aĉetis novan libro-ŝrankon por la Nacia E-Biblioteko, kun ŝildeto surskribita "S.W.G. (Sam) Ellyard, Kasisto de AEA 1982-84". Ĉeestis la U--Kongreson en Vankuvero kaj la 3-an Pacifikan E-Kongreson en Portland, S-ro R. L. Harry kaj S-ino M. Ellyard, kie S-ro Harry elektiĝs prez. de la 3-a Pacifika Kongreso; li prelegis pri "Esperanto, Komuna Lingua por Multkultura Komunumo en la Pacifiko". En Februaro 1985, post radio-intervjuo ĉe Radio-stacio 2XX kun Ralph Harry kaj Marj Ellyard, nova klaso kun 10 komencantoj rezultiĝis; bona aŭguro por la E-jaro.

RALPH L. HARRY, AC, CBE. Varbite de Pastro C. C. Cowling, li esperantiĝis en 1937 kiam li aliĝis al la Hobarto E-Klubo. Du fojojn, 1960-61, 1980-84, li estis prez. de AEA; li estis fondprezidanto de KEK en 1952 kaj denove prezidis 1961-62 kaj 1980-85. Intertempe li ofte eksterlandis pro deĵoro en la Diplomata Servo, sed daŭrigis laboron por Esperanto en diversaj landoj. Li tradukis. "Deklaracion de Homaj Rajtoj", "La Ĉarton de UNO", "Saluton Amiko" (Ĉ.5). Li elektiĝis Dumviva Membro kaj Honora Patrono de UEA en 1967. Li komisiis "Aŭstralio, Koncizaj Faktoj" en 1974. Li ricevis la Honor-Insignon, Fratulo de AEA en 1976 pro elstara laboro por AEA kaj por Esperanto ĝenerale. Li multfoje partoprenis kongresojn de UEA kaj de AEA; li starigis, en Kanbero, Aŭstralian Nacian Bibliotekon. En 1984 li sukcesis kun honoro, ĉe la Norma Klereca Diploma kaj fariĝis ano de la Ekzameno Komisiono de AEA. Kiel prez. de AEA li iniciatis du verkojn por la aŭstralia partopreno en la E-jubilea jaro, 1987; la unua estas "Aŭstralia Antologio" kaj la dua "Historio de Esperanto en Aŭstralia". Li inaŭguris la provon starigi la unuan E-Kongreson de Esperanto en Brisbano dum 1988 kaj ege klopodis tiucele; pro cirkonstancoj ekster la direkto de la nacia asocio, tiu provo ne fruktiĝis. Sendube Ralph Harry estas unu el la elstaraj eminentuloj de la E-movado en Aŭstralio.

ROSS G. ROBBINS. Li naskiĝis en Nov-Zelando kaj lernis Esperanton ĉe lernejo en Wanganui; poste li aliĝis al la loka E-klubo. Post militservo en la mezoriento kaj en Italujo, kie li uzis Esperanton, li revenis al Nov-Zelando. En 1953 li estis vicprez. de NZEA; li translokiĝis al Kanbero kie li aliĝis al KEK kaj estis sekr. 1961-62, prez. en 1965; li ankaŭ estis prez. de AEA 1962-63. Inter deĵor-vizitoj al diversaj landoj li vigle partoprenis klubaferojn en Kanbero ĝis fine li translokiĝis al Red Cliffs en Viktorio. D-ro Ross Robbins multe kontribuis al la E-movado en Kanbero kaj en Aŭstralio.

STATISTIKO kaj la historio de KEK bildigas aliajn kiuj ege kontribuis, kaj kontribuas, al la E-movado kaj en Kanbero kaj en Aŭstralio.

KANBERO

| | | | |
|---|---|---|---|
| Kanbera Esperanto-Societo | | | |
| 1929 | prez. Majoro C.L.Clarke | 1929 | Sekr. S-ino J Henry |
| | | | |
| Kanbera Esperanto-Klubo | | | |
| 1952 | prez. R.L.Harry | 52 | sekr. J.R.Maybee |
| 1953-57 | prez. H.Torr | 53 | sekr. N.Gamble |
| 1958-60 | prez. D-ro R.Robbins | | |
| 1961-62 | prez. R.L.Harry | 1961 | sekr. S-ro R.Robbins |
| 1963-64 | prez. N.Gamble | 1963 | sekr. S-ino J.Harvey |
| | | 1964-65 | sekr. S-ino M.Zagorskis |
| 1965 | prez. D-ro R.Robbins | | |
| 1966 | prez. S-ino M.Zagorskis | 1966-70 | sekr. S-ino B.Amies |
| 1967-70 | prez. W.Amies | | |
| 1971-72 | prez. N. Gamble | 1971-72 | sekr. S-ino J.Torr |
| 1973 | prez. P.Grabham/D.Price | 19'73 | sekr. S-ino M.Zagorskis |
| 1974 | prez. S-ino M.Zagorskis | 1974 | sekr. F-ino B.Thomas |
| 1975-79 | prez. S-ino B.Amies | 1975-76 | sekr. N.Gamble |
| | | 1977 | sekr. R.Hyland |
| | | 1978-79 | sekr. N.Gamble |
| 1980-85 | prez. R.L.Harry | 1980-85 | sekr. S-ino M.Ellyard |
| | | | |
| | | | |
| | | | |

## Ĉapitro 4
## KONGRESOJ EN AŬSTRALIO

1 -an.

En la jaro 1910, eminenta membro de la Brita Esperanto-Asocio, D-ro John Pollen vizitis al Aŭstralio kaj Nov-Zelando, (D-ro Pollen poste estis prez. de BEA 1911-12). Li parolis al esperantistoj en Adelaido, Sidnejo kaj Melburno dum sia vizito. Sekvante prelegon fare de D-ro Pollen ĉe la Universitato en Adelaido sub la aŭspicio de la Adelaida E-Grupo, artikoloj en la loka ĵurnalo instigis al la E-Grupo starigi. E-kongreson en Adelaido,

Intertempe esperantistoj en Melburno ankaŭ diskutis la starigon de kongreso en tiu urbo. Esperanto en Melburno tiam estis tre firme establita sed grupoj tie decidis subteni la proponon ke la unua E-kongreso en Aŭstralio okazu en Adelaido. Certe la kongreso en Adelaido, de la 26a ĝis la 28a de oktobro, 1911, ricevis lokan subtenon; entute estis 52 vicpatronoj el diversaj branĉoj de socio.

LKK elektiĝis jene: prez. Majoro H. Leschen; sekr. :J. Lyall; kas. J. Bowman; k-anoj: D-ro E. Shepherd, Ges-roj W. Hogg, S-ino Lumsdon, F-ino Hillman, C. Uhrlaub. Salutoj alvenis de: D-ro Zamenhof, D-ro J. Pollen (BEA), S-ro Bolingbroke-Mudie (prez. UEA), kaj aliaj eksterlandanoj kune kun mesaĝoj de aliaj esperantistoj en Aŭstralio kiuj ne povis ĉeesti tiun elstaran eventon.

Entute, 53 esperantistoj partoprenis la kongreson, plejparte el Sud-Aŭstralio kaj Viktorio, tamen G. Collingridge (NSK) kaj J. Skurrie (Okc, Aŭst,) ankaŭ ĉeestis. Naskiĝis dum la kongreso, Aŭstralia E-Asocio laŭ propono de D-ro E. Shepherd, subtenata de D-ro W. Kendall kaj unuanime akceptita de la estraro. Estis diskutita ankaŭ la eblo eldoni oficialan organon de la asocio sed tiu fina decido estu farita de speciala komitato. Estis decidite starigi nacian kongreson ĉiujare kaj la kongreso en 1912 okazu ĉe Melburno. Ĉar multe da laboro rilate al nacia kongreso okazos antaŭ la evento, estis decidite ke la estraro de AEA estu nomita el la ŝtato en kiu la proponata kongreso okazos. Do, la estraro por la 2-a kongreso estis elektita entute el anoj en Viktorio.

Krom la labor-kunsidoj estis plenprogramo de distraĵoj en kiu partoprenis la jenaj: C. Uhrlaub, S-ro kaj F-ino Thrush, F-ino Tilly Aston, W. L. Edmanson, A. M. Hyde, W. J. Drummond; kontribuis al la kongreso per prelegoj, krom la supremenciitaj estraranoj kaj anoj: G. Collingridge, A. H. Johnson, J. G. Pyke, D-ro Lowe, K. C. Potts, W. D. Smith, F. E. Place, J. E. Skurrie.

Raporto pri la 1-a Kongreso estis presita (angle) kune kun aparta programo pri akcepto de la prez. la 27an de oktobro, 1911.

2-an.
La duo kongreso de AEA okazis en Melburno, la 22an ĝis la 28a de oktobro, 1912.
Estraro, el Viktorio, jene: prez. D-ro W. T. Kendall; vicprez. G. Whiteford; sekr-oj W. J. Drummond, A. M. Hyde, A. H. Johnson; kas. S-ino E. Tilletson.
Neoficiala malfermo okazis per Internacia Balo en la granda halo, 'Turn-Uerein', Orienta Melburno. La sekvantan tagon estis bonveniga akcepto fare de la Urbestro de Melburno; salutparolis: D-ro Kendall (kongres-prez.), Pastro G. Aldridge (Nov-Zelando), J. H. Cadell (Kvinslando), Pastro W. D. Kennedy (NSK), J. Steele (Tasmanio), .J. Lyall (Sud-Aŭst.), J. Skurrie (Okc. Aŭst,).

Pastro Kennedy aranĝis tut-Esperantan Diservon; la prediko, el la teksto "Amata, se Dio tiel amas vin, tiel vi devus ami unu la alian", estis konforme al la celata idealo de Esperanto. Ne estas oficiala raporto pri la kongreso, krom anonco pri la tuta programo, sed oni nomis ĝin, 'veran triumfon'! Verŝajne proksimume 75 anoj partoprenis la kongreson kaj anoj kiuj kontribuis (krom la estraro) jene: J. G. Pyke, A. L. Sullivan, G. Gordon, S-ino R. Goodyear; D-ro W. Lamb; F-inoj Tilly Aston, M. Helm, E. A. Sinnotte, H. Dinneny; S-roj N. Mills, C. W. Ballard; D-ro A. E. Barrington; F-noj R. Ledger, F. Warren, kaj la pioniro kaj fond-prezidanto de MEK, J. Booth. Gajnis premiojn pri proz-konkurso, S-ino J. Steele kaj S-ro E. A. Budge (Tasmanio); pri poem-konkurso sukcesis S-ro M. A. Browne (Okc. Aŭst.) kaj S-ino M. Seabrook (Nov-Zelando). (Bedaŭrinde S-ino Steele grave malsanis post alveno en Melburno, eniris hospitalon kie ŝi forpasis). Okazis tri labor-kunsidoj, du ekskursoj kaj piknikoj, kvar vesperprogramoj kaj ekzameno por DBEA, dum la kongresperiodo. Estis decidite ke la 3a kongreso okazu ĉe Sidnejo en 1913; oni diskutis la eblon eldoni propran Aŭstralian Revuon, sed prokrastis decidon.

3-an.

La tria kongreso okazis en Sidnejo, la 3an ĝis la 9a de aprilo, 1920; la antaŭe projektita kongreso en 1913 estis prokrastita kaj pro la interveno de la dua mond-milito ne okazis ĝis 1920. Intertempe la Melburna Sekcio de AEA daŭre funkciis kiel Aŭstralia E-Asocio jene: prez. J. G. Pyke; vicprez-oj H. Byatt, C. Ballard; sekr. P. Hudson; k-anoj F-inoj M. Helm, G. Redfern.

LKK en Sidnejo kiu aranĝis la kongreson jene: prez. T. O'Donoghue; sekr. L. E. Pfahl; kas. F. T. Simon; k-anoj G. Chapple, M. Miller, D. McLardy, J. Joliffe. S-ro J. G. Pyke oficiale malfermis la kongreson kaj invitis al S-ro T. O'Donoghue prezidi la kongreson kaj al F-ino M. Helm esti protokol-sekretario.

El la laborkunsidoj rezultis kvar- proponoj; (1) pri reorganizado de AEA, (2) ke elektita komitato eldonu nacian revuon, (3) P. Hudson estu delegito de AEA dum la 12-a U-Kongreso, (4) la venonta kongreso okazu en Hobarto, 1921. La dua propono estiĝis post tri monatoj kiam aperis 'La Suda Kruco', kiun redaktis A. M. Hyde. Diskutado pri la unua propono okazis ĉar la tiutempa estraro konsistis sole el Melburnanoj. Okazis ekskursoj dum kelkaj tagoj al vidindaĵoj, balo en la urbdomo, muzik/dramvesperoj kaj verŝajne la 3a kongreso brile sukcesis pro la altnivela programo zorge aranĝita kaj pro la harmonia sinteno de ĉiuj el la 'pli ol' 60 partoprenintoj kiuj ĉeestis. Analoj, bedaŭrinde, ne mencias kiuj rolis en la programeroj.

4-an.

La kvara kongreso ankaŭ okazis en Sidnejo; pro malfacilaĵoj en Tasmanio, la proponita kongreso en Hobarto estis prokrastita kaj la tiutempa Aŭstralazia E-Asocio decidis starigi la kvaran en Sidnejo de 30a de marto ĝis 5a de aprilo, 1923. Entute 91 anoj el ĉiuj ŝtatoj aliĝis al la kongreso aranĝita de LKK jene: prez. F. V. Taylor; sekr. L. E. Pfahl; k-anoj: J. Joliffe, P. Bennett, R. Dodd, F-inoj E. Lee, A. Hughes, M. Freely.

La kongreso estis 'notinda sukceso', ne nur pro la ekskursoj al belaj vidindaĵoj de Sidnejo, sed ankaŭ pro la viglaj diskutoj dum ĝeneralaj kunvenoj kaj pro altnivelaj distraĵoj. Malfermis la kongreson, D-ro Scott-Fletcher, estro de Kolegio-Wesley. La ĉefa diskutpunkto rilatis al la valoro de 'La Suda Kruco'; malgraŭ la fakto ke multaj kontraŭis pluan eldonon de la revuo, finfine oni decidis ke La Suda Kruco ankoraŭ estu la oficiala voĉo de Esperanto en Aŭstralio. Oni decidis ke la 5a kongreso okazu en Melburno, 1925. Dua ĉefpunkto estis publikeco, por kio la 4a kongreso strebis per la agado de komitatanoj antaŭ kaj dum la kongres-periodo.

Estraro jene. prez. C. Ballard; vicprez. G. Redfern; sekr. R. Rawon. Salutis la kongreson: F-ino M. Helm (Melburno), D-ro F. Williams (Melburno), S-ro Waterman (Sud-Aŭst..), S-ro A. Saar (Okc. Aŭst.), S-ro L. Wirth (Kvins.). Kontribuantoj al kongres-diskutoj kaj distraĵo, jene: A. Feldmyr, P. Hudson, F-ino M. Helm, C. Ballard, P. Procter., G. Redfern, R. Rawson, A. Saar, S. Kvarnstrom, H. Byatt, S-ino A, Scammell, F-ino E. Lee, F-ino E. Godfrey, J. M. Edmunds, L E Pfahl, F. Simon, S-ro F. Williams, F. Taylor. Bona organizado kondukis al plensukcesa kongreso.

5-an.

La kvina kongreso okazis en Melburno la 10an ĝis la 16a de aprilo, 1925; elektiĝis prez. de la kongreso S-ro W. H. King (Wellington, Nov-Zelando) kiu estis antaŭa prez. de la Aŭstralazia E-Asocio, S-ino Porter (Adelaido) estis vicprez. kaj A. Bowler (MEK) protokol-sekretario. Anoj de la LKK jene: sekr. R. Rawson; kas. H. Byatt; k-anoj: S-ino E. Bigelow, F-inoj N. Byatt, B. Adamson, G. Redfern.

Salutis la kongreson:C. Kidd (Brisbano), D-ro F. Williams (West City, Pekin), F-ino C. Hannaford (Hobarto) - ĉiuj per leteroj; persone salutis: A. Auwart (NSK), F-ino M. Fraser (Kvins.), W. L. Edmanson (Nov-Zelando), S-ino Porter (Sud. Aŭst.), S-ro Bonder (Okc. Aŭst.), S-ro A. Anderson (pro blinduloj).

Labor-kunsidoj okazis en Universitata Altlernejo, Strata Spring kie estis diskutado pri diversaj temoj; la plej grava ero akre diskutita estis pri la sorto de la nacia revuo, La Suda Kruco kaj fine oni sukcese proponis la ĉesigon de la revuo. (Malgraŭ tiu decido, La Suda Kruco daŭre aperis dum la postaj naŭ jaroj, subtenata de la aŭstralaziaj esperantistoj). La dua afero, profunde diskutita, temis pri pago por filiigitaj anoj al UEA (Konstanta Reprezentanto) kaj pri la profito de la kongreso. Post la kongreso, sumo de 57 pundoj ($114) - tuta profito - estis donacita al UEA; kurioza afero estis ke tiutempe la kaso de AEA estis tute malplena! Partoprenis en la labor-kunsidoj la jenaj: R. Rawson, W. Drummond, A. Anderson, H. Byatt, F. Simon, P. Hudson, L. Pfahl, J. Hepworth, F-ino Corrigan, L. Farrager, S-ino Scammell, A. Hussey, F-ino Hopton, F-ino M. Fraser, J. Davidson, A. Aurwart, J. Hindmarsh, V. Rutland, J. Pyke, E. McKenzie, F. Wallace.

Plena programo estis aranĝita de la LKK inkluzive de ekskursoj, kostum-balo, koncerto kaj muzik-vesperoj. La venonta kongreso estis proponita al Hobarto, en 1927. (Januare 1927, la Hobarta E-Grupo nuligis ĉi tiun kongreson pro samtempa vizito de anoj de la Reĝa Familio al Hobarto).

6-an.

Ĉi tiu kongreso, de la 8a ĝis la 14a de oktobro, 1929, estas priskribita kiel Okcidenta Aŭstralia E-Kongreso ĉar ĝi estis aranĝita por koincidi kun la Jarcenta Jubileo en Okc. Aŭstralio. Loka komitato, verŝajne el la E-Societo de Okc. Aŭstralio (Ĉ.3-b), prizorgis detalojn; anoj jene: prez. S-ro T. Burt; vicprez-oj S-roj C. Unwin, T. Steitz; sekr./kas. S-ro L. C. Mansfield. Partoprenis en la oficiala akcepto flanke de la urbestro de Perto, S-ro J. T. Franklin la jenaj: estraro kaj, S-ino E. Sainsbury, F-inoj M. Jeffrey, N. Gibson; S-roj C. Caine, E. Walker, H. Byatt, A. Saar, W. Casey, Cadden, Rapley, Davis, Clydesdale, Henshaw.

Kongresejo estis Halo-Rechabite (Reĥabajt) en Perto kie okazis labor-kunsidoj kaj distraĵvesperoj inkluzive de Internacia Balo. Mankas aliaj detaloj pri la kongreso, sed S-ro L. McInnes el Melburna Esperanto-Societo vizitis dum kelkaj tagoj survoje hejmen al Melburno.

7-an
Post kvarono de jarcento, en Melburno, la 3an ĝis la 7a de januaro, 1950, okazis La 7° kongreso de AEA; prezidis D-ro C. J. Caldera el Perto. Ĉeforganizantoj H. Koppel kaj J. Oki klopodis pri detaloj dum aliaj k-anoj multe helpis: S-roj F. Banham, W. Drummond, D. Brkiĉ kaj D-ro A. Fridenbergs. Pro bone organizado kaj atento al detaloj, la kongreso plensukcesis laŭ financa kaj funkcia aspektoj. Entute 115 anoj, el ĉiuj ŝtatoj, aliĝis al la kongreso; kunvenejo estis ĉe YWCA-ejo (Asocio do Kristanaj Junulinoj), kie estis ankaŭ manĝejo kaj Libro-Servo.

Estis kvar labor-kunsidoj dum la kongreso: la plej grava decido estis okazigi kongreson de AEA ĉiun duan jaron - la 8an en Sidnejo, en 1952. Estiĝis, dum la kongreso, "Aŭstralia Instruista E-Asocio[11], sub la gvidado de S-ro E. W, Chandler. Plejparte la sepa estis labor kongreso, tamen estis tempo por unu amuz-vespero kiu kontentigis ĉiujn. S-ro Brkiĉ preparis internacian E-Ekspozicion; D-ro A. Fridenbergs organizis Lingvan Seminarion al kiu kontribuis S-roj Banham kaj Gottlieb. Aliaj kontribuantoj jene: S-roj Ramsey, K. Hirschel, R. Rawson kaj S-ino Hanks. Ekskursoj al Sherbrooke kaj al la montaro apud Melburno estis aranĝitaj. Plej grava sukceso estis bone organizita propaganda agado por disvastigo de Esperanto en Aŭstralio, post la multjara silento sen nacia kongreso.

8-an.
La oka kongreso de AEA .lokiĝis en Sidnejo de la 31a de decembro 1951 ĝis la 5a de januaro 1952. El kvin ŝtatoj, 60 esperantistoj ĉeestis la okazaĵon. Bedaŭrinde la loka sekr. Wre Chandler, sur kies •ŝultroj kuŝis ĉiuj antaŭlaboroj, malsaniĝis antaŭ la kongreso kaj pro tio li ne havis la eblecon ĉion prepari tiel bone kiel oni kutime atendas. Tamen, aliaj komitatanoj, S-ino E. Klussendorf, John Matasin kaj Kevin Smith, inter aliaj, improvize faris aranĝojn kaj fine ĉio estis en ordo. La kongreso okazis en la bela halo de la Instruista Federacio, en la urbcentro, sed ne ekzistis, bedaŭrinde, eblo por vendi E-librojn. Antaŭaranĝoj por gazetara konferenco kaj radio-paroladoj certigis disvastigon de novaĵo tra la tuta kontinento.

Ĉar prez. de AEA ne povis ĉeesti la kongreson elektiĝis kongresprezidanto, Alan Towsey; vicprez. estis D-ro A. Fridenbergs kaj protokolisto S-ino F. Koppel. Dum labor-kunsidoj anoj diskutis pri diversaj aferoj rilate al: La Rondo (nacio revuo), Libro-Servo, propagando, AESI kaj la urĝa bezono por nova statuto, (ĉi lasta oni lasis en la manoj de D-ro Fridenbergs kiel komisiito). Katolika Diservo okazis en la Preĝejo, Sankta Patriko kiam Pastro Sigismundo kaj Kevin Smith kunlaboris pri aranĝoj; Pastro Sigismundo predikis Esperantlingve. Distraĵvesperoj, ekskursoj al vidindaĵoj sukcesigis la okan kongreson en Sidnejo. Kontribuis al la vesperprogramoj, S-roj K. Hunhold, P. Dikŝtejn kaj V. Koseff. Elektiĝis por la venontaj du jaroj, estraro de AEA jene: prez. K. Linton; vicprez. A. Towsey; sekr. H. Koppel; kas. E. McKenzie; k-anoj: F-ino 0. Strempel, F-ino W. Addis, A. C. Boyle (kas-k.). Oni decidis ke la 9a kongreso okazu en Perto 1954.

9-an.
Ĉi tiu kongreso okazis de la 1a ĝis la 7a de januaro 1954, en Perto. Malfermis la kongreson, S-ro J. Tonkin, Ministro por Edukado en Okc. Aŭstralio. S-ino Ruth McGrath aranĝis bonegan ekspozicion por propagandi kaj la kongreson kaj Esperanton. F-inoj E. Bull kaj 0. Strempel plensukcese prizorgis gazetaran konferenron ĉe kiu Jack Hawks, Herbert Koppel kaj D-ro Fridenbergs kunhelpis. Entute 74 anoj aliĝis al la kongreso el ses ŝtatoj (partoprenis 57). Estraro elektiĝis jene: kongresprez. F-ino 0. Strempel: vicprez-oj D-ro A. Fridenbergs, D-ro T. Einihovici; sekr. H. Koppel.

La ĉefdecido de la labor-kunsidoj estis pri propaganda en kaj ekster kluboj. D-ro Fridenbergs gvidis seminarion; D-rino V. Summers, prelegis; prelegoj de tri samideanoj estis legitaj dum la seminario, tiuj de: Pastro C. Cowling, F. R. Banham kaj S-.ino I. Hanks. Anonco pri la 'Masel-Konkurso' montris ke F. Banham sukcesis pri la 'poezio' kaj Brendan Clarke sukcesis pri la 'prozo˚. Kontribuis al aspektoj de la kongreso la jenaj: E. W. Chandler, J. Matasin, S-ino A. Hintze, S-ino G. Pollard, D. Miller, N. Brodie, J. Gottlieb, J. Hawks, F. McKenzie, D-ro T, Einihovici, F-ino E. Bull, S-ino I. Einihovici, S-ino R. McGrath. Elstara evento estis la akcepto de la urbestro de Perto, S-ro J. Murray, al. 51 kongresanoj. Nova estraro de AEA jene: prez. K. Linton; vicprez-oj A. Towsey, S. L. Parry, D-ro T. Einihovici; sekr. H. Koppel; kas. E, McKenzie; k-anoj: J. Matasin, M. Leereveld, D-ro A. Fridenbergs. E-Diservo okazis en la Anglikana Preĝejo, Sankta Bartolomew, gvidita de S-ro Edwin Moore. Anaro unuanime aprobis la novan regularon proponitan de D-ro Fridenbergs. Bonega distra kaj turisma programoj kompletigis la zorge organizitan kongreson. Estis decidite ke la 10a kongreso estu en Kanbero.

10- an.

Okazis inter la 2a kaj 7a de januaro 1956, en la federacia ĉefurbo Kanbero, la 10a kongreso de AEA. Anoj de la negranda klubo kiuj organizis ĉi tiun kongreson per senĉesa laboro, jene: Ges-roj H. kaj J. Torr, S-ro N. Gamble, S-ino E. Hall, S-ro S. Fulop. Kongresejo estis la Kultura Centro-Riverside. 101 anoj aliĝis al la kongreso kaj partoprenis 74. N. Gamble antaŭpreparis propagandon ĉe gazetaro kaj radio; S-ino G. Harlow estis intervjuita ĉe radio-stacio '2GB Sidnejo', kaj en Kanbero la loka stacio intervjuis S-ron Torr, S-ron Koppel kaj F-inon E. Bull. D-ro F. Williams aranĝis kaj estris protestantan Diservon. Malfermis la kongreson, S-ro F. D. Quinane, estro de la loka 'Konsila Komitato' en Kanbero. Elektiĝis kongres-prez. S-ro H. Torr. Dum labor-kunsidoj elektiĝis nova estraro de AEA jene: prez. D-ro F. Williams; vicprez-oj S. L. Parry, S-ino J. Torr; sekr. H. Koppel; kas. K. Linton; k-anoj R. Latimer, F-ino E. Bull.

Okazis seminario kaj prelegaro pri diversaj temoj; kontribuis la jenaj: K. Linton, Wre Chandler, F. Mueller-Soraù, S-ino G. Barlow, N. Gamble, R. Asselin, Pastro C. Cowling (legita de H. Koppel). Leter-konkurson gajnis S-ino J. Torr kaj J. Docksey (premio estis donacita de F-ino Edna Dash, Sidnejo). Aliaj kontribuantoj al la sukceso de la kongreso estis F-ino F. Styles, S-ino F. Koppel, G. Whiteford, V. Gueltling, J. Matasin, F-ino W. Addis. La 11 a kongreso okazos en Melburno, 1958.

11-an.

Okazis sukcesplena kongreso en Melburno, la 2an ĝis la 8a de januaro, 1958; aliĝis 117 el ĉiuj statoj, el kiuj 84 partoprenis. Konferencejo estis Memoriga Halo de YWCA (Junulina Kristana Asocio). LKK jene: prez. D-ro F. Williams; sekr. H. Koppel; kas. K. Linton; k-anoj: Glennys Calwell, E. McKenzie, M. Cohen. Per ABC-televido estis intervjuita D-ro F. Williams kaj S-ino Ruth McGrath aperis sur 'Virina Horo'-programo, je radio-stacio 3DB. Malfermis la kongreson S-ino Ruby Hutchinson, membro de la supera ĉambro de Okc. Aŭstralio.

Dum labor-kunsidoj anoj rnulte diskutis pri 'Aŭstralia Antologio' sen fina konkluda. Eldono de AEA Jarlibro estis akceptita kaj F-ino E. Bull respondecis pri la multobligado. Okazis la normala seminario (gvidita de Ken Linton), kaj prelegoj fare de, S-ino G. Barlow, F. Taylor, F. Banham, F. Mueller-Soraŭ, R. Robbins, D-ro F. Williams, W. Drummond, M. Leereveld, V. Gueltling, Ges-roj Hanks. D-ro F. Williams aranĝis kaj gvidis Diservon; kunhelpis F-ino W. Addis kaj S-ino R. McGrath. Post la Diservo oni kolektis monon por helpi al la Ligo Internacia de Blindaj E-istoj. Ekskurso kaj koncerto ege kontribuis al la kongres-semajno.

Estraroj por la venontaj du jaroj elektiĝis: prez. D-ro F.Williams; vizprez-oj D-ro R. Robbins, M. Leereveld; sekr. H. Koppel; kas. K. Linton; k-anoj: S--ino G. Barlow, S. L. Parry. La estraro decidis pri nomŝanĝo de la asocia organo al "The Australian Esperantist" sed reteni dum unu jaro la subtitolon "La Rondo". Estis decidite ke la venonta kongreso okazu en Hobarto, 1960.

12-an.
Ĉi tiu kongreso lokiĝis en Hobarto, la 3an ĝis la 9a de januaro, 1960; bonega organizado, variaj distraĵoj, viglaj kunsidoj, nova statuto, nova libro-peranto kaj nova prezidanto - jen elstaraĵoj de la Hobarto-kongreso. Aliĝis al la kongreso 74 anoj el kiuj 56 partoprenis. La kunvenejo estis la bela halo de Kvakera Lernejo, kie loka prez. S-ro M. Leereveld bonvenigis la vizitantojn. Antaŭaranĝoj pri gazetara kaj radio-intervjuoj rezultigis bonan propagandon, sed samtempa E-ekspozicio multe helpis, tiurilate.

Oficiale malfermis la kongreson S-ro Ralph Harry, komisiito por Zamenhof-Jaro. Sekvis akcepto ĉe la urbdomo de urbestro de Hobarto, S-ro Osbourne; elstara okazaĵo por la kongresanoj. Okazis kvin labor-kunsidoj sub la gvidado de vicprez-oj R. Robbins kaj M. Leereveld; la plej grava temo estis la nova statuto de AEA, kiu estis akceptita post longa pritraktado. La nova libroperanto estis S-ino I. Milligan kiu anstataŭigis S-ron A. Grant. Pri la Zamenhof-Fonduso, tri kuratoroj elektiĝis: R. Harry, K. Linton kaj J. Matasin. Laŭ la nova statuto, ĉiu kongresano rajtas voĉdoni por la nova estraro: prez. R. L. Harry; vic-prez-oj D-ro F. Williams, S. L. Parry; sekr, H. Koppel; kas. K. Linton.

Du ekskursoj al vidindaĵoj cirkaŭ la urbo, E-kvizo, internacia koncerto kaj adiaŭa festmanĝo distris ĉiujn. Granda laboro de S-ino Shankey (sekr.), Ges-roj Cooper, S-ino A. Douglas kaj S-ro Nightingale certigis plensukcesan kongreson. Aliaj kontribuantoj al la programo jene: F. Mueller-Soreaù, V. Gueltling, F-ino A. Godfrey. La 13a kongreso estis proponita al Sidnejo, 1962.

13-an.
La 13an kongreson, en Sidnejo la 1an ĝis is 7a de januaro 1962, ĉeestis 117 anoj el 165 kiuj aliĝis. Estis unike ke du Diservoj provizis dignan komenciĝon - unu en Anglikana Preĝejo, Sankta James sub la gvidado de Pastro Capell, kaj la dua ĉe Mona Vale, en la Baha-a Templo kiam laŭtlegis Sanktajn Skribaĵojn, S-inoj B. Jackson, J. Harvey, B. Dennett, A. Sedgley. La prez. de SES S-ro J. Matasin bonvenigis la kongresanojn kaj transdonis la prezidantecon al D-ro R. Robbins, kiu oficiale malfermis la kongreson, en granda halo ĉe Anzac-Domo. Eksterlandanoj kiuj partoprenis la kongreson estis: S-inoj R. Aagaard, Y. Canty (Nov-Zelando), Prof. Ki Yang (Koreujo).

Okazis en la urbodomo formala akcepto fare de la urbestro de Sidnejo, Skabeno H. F. Jensen. La ĉefaj diskutoj dum labor-kunsidoj rezultigis kreadon de Informa Fako, elektiĝis gvidanto S-ino Ruth McGrath kaj kunlaborantoj, R. Hannay, N. Gamble, F. Dunn, S-inoj F. Koppel, A. Douglas. Dua decido temis pri aranĝado de Korespond-Kursoj. Estraro por la venontaj du jaroj elektiĝis jene: prez. D-ro R. Robbins; vicprez-oj I. T. maddern, M. Leereveld; sekr. H. Koppel; kas. K. Linton; estrarano (Sidnejo) V. Gueltling.

Ĝuplenaj ekskursoj, per aŭtobusoj, per haven-krozo kaj invito al Manlio kie S-ino M. Duncan aranĝis tut-tagon viziton al la belega Manlio, kontentigis ĉiujn. Krom la supremenciitaj, anoj kiuj ankaŭ kontribuis al la tiel nomata "aktiva kaj la plej granda kaj plej esperiga kongreso", jene: S-inoj I. Fink, A. Sedgley, L Milligan, G. Pollard, R. Carruthers, M. Bedwell, E. Matasin, K. Morrison, M. Parker, D-ro A. Fridenbergs, (daŭrigu)

F-inoj V. Cox, R. v. Rijswi jk, Goulding, Lyall, P. Ferguson, S-roj V. Timmins, F. Banhan, K. L. Smith, G. Lancaster, J. Matasin, V. Bourlin, J.Capstick, Ges-roj L. kaj N. Willis, familio Feldmayr. Estis decidite, ĉar ne estis invito de Brisbano aŭ de Adelaido, ke la kongreso en 1964 okazu en Melburno.

14-an.

Ĉi tiu kongreso okazis en Melburno de 30a de decemhro 1963 ĝis 5a de januaro 1964. Aliĝis 143 kaj partoprenis en la kongreso 122, el ĉiuj ŝtatoj. LKK jene: prez. E. McKenzie; vicprez. M. Leereveld; sekr. H. Koppel; kas. K.Linton; k-anoj S-inoj M. Sanders, I. Fink, S. Milligan, D. Kane. kongresejo estis Eduka Centro por plenkreskuloj. Propagando per gazetoj, radio kaj televid-stacio ABV-2 okazadis dum la kongres-semajno. Malfermis la kongreson, S-ro Jim Cairns, Deputito en la Federacia Parlamento Angikana Diservo estis gvidita de Pastro C. Cowling en la preĝejo Sankta Maria.

Labor-kunsidoj pritraktis la jenajn: honorinsignon (por honori tiujn kiuj elstare kontribuis al la E-movado en Aŭstralia) - neakceptita; donaco de 625 pundoj ($1250) al UEA por nomi ĉambron "Aŭstralia Ĉambro"', en la UEA-Domo, Rotterdamo, - akceptita; kongreseto ĉiujare en ŝtatoj - akceptita kontraŭ la decido de ŝtatgrupoj. Estraro por la venontaj du jaroj elektiĝis: prez. M. Leereveld, vicprez-oj R. Robbins, F. Taylor; sekr. H. Koppel; kas. K. Linton. Kun bedaŭro la kunveno aŭdis ke D-ro C. Caldera eksiĝis kiel cef-ekzamenisto; S-ro L. N. Newell transprenis tiun postenon, laŭ propono de la kunveno.

Novaĵo estis la starigo de Junulara Asocio: prez. F-ino G. Fink; sekr./kas. D. Kane; k-anoj F-ino M. Fink, I. Heldzingen, M. Foster. AESI estraro elektiĝis: prez. S-ino G. Pollard; vicprez. M. Leereveld; sekr./kas. I. Maddern; red.- Klerigo D-ro A. Fridenbergs; k-anoj F-ino G. Fink, S-roj F. Mueller-Soraù, G, Lancaster, S. Grant, S-ino A. Sedgley. Tri aŭtobus-ekskursoj kaj du distraĵvesperoj estis plenĝuitaj de kongresanoj. Aliaj, krom la supre-menciitaj kiuj kontribuis al la kongreso, jene: Ges-roj J. Ryding, Ges-roj S. kaj I. Milligan, S-inoj V. Fraser, D. Thyer, F-inoj J. Clack, V. Fox, S-roj J. Dimo, W. Chandler, L. Newell, F. Banham, S. Hanks, V. Gueltling. Estis decidite ke la venonta kongreso, 1966, okazu en Kanbero.

15-an.

Okazis en Kanbero, la 1an ĝis la 8a de januaro, 1966, ĉe la Metodista Nacia Memoriga Centro, la 15a kongreso de AEA; aliĝis 100 kaj ĉeestis la kongreson 88 anoj. Bonvenigis la ĉeestantaron, prez de AEA S-ro M. Leereveld kaj li invitis al D-ro R. O'Keefe, de la ACT Konsilantaro, malfermi la kongreson.

Dum labor-kunsidoj anoj decidis starigi Aŭstralian E-muzeon; la originala propono estis ke tiu muzeo portu la nomon "W. J. Drummond E-Muzeo", honore al la multjara E-pioniro kiu mortis en Melburno, decembre 1964. Finfina decido pri la eldono de la Aŭstralia Antologio - pro diversaj kialoj estis decidite ke eldono ne okazu.

Elektiĝis nova estrara, jene: prez. I. Maddern; vicprez-oj R. Robbins, K. Smith; sekr. H. Koppel; kas. K. Linton; komisiitoj: UEA-aferoj T. Elliott; informado kaj gazet-servo N. Gamble; korespond-kursoj S-ino K. Schwerin. Estis ŝanĝita la nomo de ILAE al "Aŭstralia Asocio por la Instruado de Esperanto en Lernejo" (AIEA) kaj nova estraro elektiĝis: prez. S-ino G. Pollard; vicprez. M. Leereveld; sekr./kas. I. Maddern. Estraro de Junulara Asocio: prez. F-ino M. Fink; vicprez. P. Moylan; sekr. P. Moylan; kas. F-ino H. Clark; AEA reprezanto C. Stevenson.

Aŭtobus-ekskursoj (3) boat-ekskursoj kune kun E-koncerto plene distris la anojn. Pluaj kontribuantoj(krom la supremenciitaj) estis P. Schwerin, C. C. Goldsmith, D-ro A. Fridenbergs, F. Banham, F-inoj V. Cox, A. Godfrey; S-inoj J. Andrews, K. Schwerin; Wre Chandler, N. Gamble, V. Guetling, V. Bourlin, F. Mueller-Soraù, V. Timmins,; Ges-roj G. Cooper. La kongreso en 1968 estis proponita en Manlio.

16-a

La 1an ĝis la 7° de januaro 1968 anoj kongresis en Manlio. Kongresejo estis la Hotelo Manlio; aliĝis 158 kaj partoprenis 124 en la kongreso. LKK jene: C. C. Goldsmith, K. Smith, F. Preacher, V. Bourlin; S-inoj M. Duncan, B. Cleminson, E. Graham, B. Bennet: F-ino A. Dennys; Prof. R. Robinson.

Estis du Diservoj; ĉe Baha-a Templo en Ingleside kaj Biblio-Diservo en la kogresejo kie Pastro F. Turvey kaj J. Redden partoprenis kaj benis la ĉeestantojn. Ĉar la prez. Ne ĉeestis, malfermis la kongreson, la vic-prez. D-ro R. Robbins; bonvenigis ĉiujn Skabeo F. Preacher, el Manlio

Prezidis D-ro Robbins dum tri labor-kunsidoj; la ĉefa temo traktita estis “ĉu AEA intermikiĝu en la politiko?”. Incitis tion lasttempr projekto de prez. de AEA S-ro I. Maddern fondi novan partion kun la subteno de AEA kaj tiucele utiligi lokajn esperantistojn. La kunsido ne akceptis tion. Nova estraro de AEA elektiĝis: prez. K. Linton, vic-prez-oj W. Howard, I Maddern; sekr-oj C. Goldsmith, H. Koppel; kas. F-ino A. Dennys. P.O.H. Petley; kas-k. G. Thatchet; Libro-servo S-ino I. Fallu; ekzameno L. Newell; red.-AE F. Banham; korespond-kursoj S-ino K. Schwerin. Estraro de AIEA jene: S-ino G. Pollard; vic-prez. S. Blockley; sekr.?kas V. Timmins; red.-Klerigo Wre Chandler.

Anoj kiuj kontribuis aŭ al AEA au al la kongreso jene: F. Banham, N. Gamble, J. Finch, M. Forham, K. Gunster, E. Woodruff, V. Gueltling; S-inoj J. Andrews, K. Morrison, M. Parker, M. mListon,.V. Clarke, R. Carruthers; F-inoj V. Cox, O. Strempel, E. McGifford, H. Rinke, M. Lees; S-ro S. Issobe. Kvar ekskursoj kaj klasika koncerto ege kontribuis al la plezurplena kongreso. Estis decidita ke la venonta kongreso okazu en Perto, 1970.

17-an.

Inter la 4a kaj la 9a de januaro 1970, en Perto, okazis la 17° kongreso de AEA. &5 anoj aligis kaj 64 partoprenis en la kongreso. Multe da propogando per gazetaro kaj TV stacioj 9 kaj ABC (nacia) evedentiĝis dum la kongreso. Anoj de LKK jene: S-ino R. McGrath, F-ino O. Strempel, S-roj W. Howard, C. Dean, H. McGrath. Bonvenigis la ĉeestantaon prez. de la Ligo, S-ino R. McGrath kaj invitis la prez. de AEA K. Linton maalfermi la kongreson. La Vic-urbestro de Perto, S-ro Cliff Harris akceptis la kongresanojn en la bela Konsilantara Domo.

Dum labor-kunsidoj, oni akceptis rapotoj de sekr., kas., de la presoficistokaj de la libro-servo. Nova estraro de AEA elektiĝis : prez. K. Linton; vic-prez-oj W. Howard, I. Maddern; sekr-oj C. Goldsmith, H. Koppel; kas. L. Scott; P.O.H. Petley; kas-k G. Thatcher; komisiono por honordiplomo: V. Gueltling, S-inoj R. McGrath, F. Koppel. Tri ekskursoj kaj koncerto distris la kongresanojn, krom subĉiela rostfesto kaj kongresa vespermanĝo.

Aliaj kontribuantoj al la kongreso jene: D-ro C. Caldera, D-ro T. Einihovici; S-inoj F. Koppel, E. Palmer, J. Peterson, Gray, Blockley, Lindsay, I. Fallu, O. Hunt; F-inoj Grasson, Allen, W. Addis; S-roj F. Mueler Soraù, J. Finch, V. Timmins, A. Baldwin, R. Reed. La 18a kongreso estis proponita al Melburno en 1972.

19-an,

Ĉi tiu kongreso lokiĝis en Melburno de la 2a ĝis la 8a de januraro, ĉe la Kolegio Queen, en la Universitato de Melburno. S-ro R. Baldwin zorge preparis is propagandan scenon per intervjuoj kun gazetaro kaj per radio-stacio. S-roj A. Heathfield, R. Reid kaj A. McLochlan instalis bonan ekspozicion de Esperantaĵoj en la halo-Eakins. Pastro C. Cowling gvidis dignan Diservon en la Kolegia Kapelo. Ministro por turismo, S-ro Vance Dickie, oficiale malfermis la kongreson. Aliĝis al la kongreso 193 el kiuj 125 ĉeestis. Nova estraro elektiĝis: prez. S-ro R. Robertson; vicprez-oj K. Linton, I. Maddern; sekr-oj R. Baxter, H. Koppel; kas. L Scott; Korespond-Kurso j, C. Goldsmith; kas-k, G. Thatcher. Honora Diploma Komisiono- elekto jene: V. Gueltling, V. Timmins, S-ino R. McGrath. Honore al John Booth, fondinto de la unua E-Klubo en Aŭstralio, anoj ĉeestis specialan akceptor; kiam bela tabulo estis fiksita al la originala dom-muro de John Booth, ĉe 25 Rathdowne Strato, Carlton.

Anoj kiuj kontribuis al la plensukresa kongreso, krom la supremenciitaj, jene: F. Banham, F-ino V. Cox, S-ino I. Fallu, T. Elliott, S-ino M. Fordham, S-ino F. Koppel, S-ino A. Paling, F-ino V. Strachan, H. Rosengren, P. Schwerin, F., Mueller-Soraù, S-ro M. Liston, S-ino M. Sanders, S-ino M. Casey, S-ino M. Frogley, F-ino A. Hearne, D-ro T. Einihovici, V. Bourlin, J. B. Moore, F-ino B. Williams. Sekr. C. Goldsmith prezentis al S-ino D. Sinclair, diplomon - Kvinslando gajnis la premion en la inter-ŝtata konkurso pri varbada al AEA. Estraro de AIEA jene: prez. S-ino D. Sinclair; vicprez. S-ino G. Pollard; sekr./kas. V. Timmins; red.-Kerigo, I. Maddern

Manlio-Grupo sukcesis pri La Dramo-Konkurso, partoprenis ankaŭ Orientaj Antaŭ-Urboj. Ĉe la koncerto kontribuis, S-ino kaj F-ino M. Sanders, Ginny Tope, Dorothy Thyer, Jim kaj Jennifer Dimo, S-inoj M. Liston, M. Baxter, V. Payne, S-roj A. Culey, Les Scott, B. Payne, Ges-roj Goldsmith, M. Dipnell. Kvar ekskursoj kaj kongresa vespermanĝo aldonis al la sukceso de la 18a kongreso. La 19a kongreso okazu en Brisbano, en 1974, estis la decido de la kunsido.

19-an.

De la 2a ĝis la 8a de januaro 1974, en Brisbane okazis la deknaŭa kongreso; La kongresejo estis Internacia Domo, Universitato do Kvinslando. Aliĝis al la kongreso 177 anoj el kiuj 150 ĉeestis la okazaĵon, el ĉiuj ŝtatoj, inklusive de sep eksterlandanoj. La prez. de BES S-ro M. Robinson bonvenigis la kongresanaron dum la inaŭguro kaj invitis al S-ro Nigel Drury, Federacia Parlamentano, malfermi la kongreson, la unuan en Brisbano. Post E-lingva saluto, S-ro Drury oficiale (angle) malfermis la kongreson kaj adiaŭis la ĉeestantaron, esperante.

Antaŭ kaj dum la kongreso, gazetaro, radio kaj televid-stacioj, vaste raportis pri aspektoj de la lingvo kaj la kongreso. La prez. Prof. R. Robertson, prezidis dum tri ĝeneralaj kunsidoj kiam estis prezentitaj raportoj de sekr. R. Baxter; de vicsekr. H. Koppel; de kas. Les Scott; de P.O. S-ino M. Chaldecott; de libro-servo Tom Elliott. Sekvis elekto de la nova estraro: prez. Prof. R, Robertson; vicprez-oj K. Linton, I. Maddern; sekr-oj R. Baxter, H. Koppel; kas. L. Scott; libro-servo T. Elliott; P.O. S-ino M. Chaldecott; korespond-kursoj S-ino S. Fanos; kas-k. G. Thatcher.

Labor-kunsidoj decidis pri: centra reklamado; prezo de k-kursoj; loko de venonta kongreso, 1976 - en Melburno. Rilate al la lasta, estis decidite ke samtempe okazu la unua Pacifika Kongreso. Du grupoj konkursis por la Drama Ŝildo, Manlio kaj Brisbano; post balotado de la aŭdantaro, la Brisbana Societo gajnis to trofeon. Ekskursoj, internacia koncerto kaj bankedo kontentigis la anojn. S-ro A. Deutscher estris Diservon ĉe la kongresejo.

Krom la supremenciitaj anoj, aliaj anoj kiuj kontribuis al laplensukcesa kongreso jene: anoj de LKK – prrez. M. Robinson, sekr. S-ino W. Greenhalgh, kas. S-ino S. Martin, S-inoj E. Gardiner, A. Edmeades, E. Jullie, G. Bayliss, .J. Peters; F-ino T Allatt; T. O'Grady, T. Steele. Aliaj: R. L. Harry, J. Matasin, Wre Chandler, C. Lanyon, V. Guelting, V. Timmins, J. B. Moore, A. Baldwin, H. Petley, V. Bourlin, R. Ross, H. Buckler; S-inoj D. Sinclair, R. McGrath, M. Liston; F-inoj J. Turner, A. Hearn; D-ro T. Einihovici. Eksterlandaj vizitantoj: Ges-roj H. Sakaeda, S-ino S. Susumago, S—ro H. Nagai (el Japanujo), Ges-roj I. May (Nov-Zelando).

20-an.

Kunokazis ĉi tiu kongreso kun la 1a Pacifika Kongreso en Melburno, la 2an ĝis la 10a de januaro 1976. Kongresejo estas “Queens College” en la Universitato de Melburno. Intervjuoj okazis kun la gazetaro, Radio/televid-stacioj, antaŭaranĝitaj de la inform-oficisto A. Baldwin. Kunhelpantoj pri kongres-aranĝoj jene: Ges-roj J. Kaj I. Fallu; S-inoj A. Paling, F. Koppel, M. Frogley, B. Podmore, M. Elliot, R. Rathjeans, J. M. Sanders, H. McLochlan, D. O’Brian; F-inoj V. Strachan, M. Sanders; S-roj H. Koppel, T. Elliot, L. McLochlan, M. Cohen, S. Kanaĉki, k. Linton, R. Reed; F-inoj A. Hearn, L. Samblebe. Pastro C. Cowling gvidis dignan Diservon en la bela kolegio kapelo. Dum bonveniga vespero kontribuis la jenaj: P. Schwerin, Emil Vokal,(Vieno), Brisbana Kantgrupo, S-ino M. Baxter, Les Scott, S. Kaj V. McGill (Nov-Zelando), T. O’Grady, C. Strochnetter.

Malfermis la kongreson, S-ro Murray Byrne, Ministro por Turismo en Viktorio. Dum la inaŭguro, salutis la kongreson, la jenaj. J. Allen (Nov-Zelando), S-ino Y. Issobe (Japanujo), V. Gueltling (SAT), V. Timmins (K-unuiĝo), W. Chandler (ORE), S-ino E. Ernst (Belgio), F-ino A. Nilsson (Svedujo), C. Fettes (Irlando), V. McGill (Nov-Zelando), F. Wood (Aŭklando), R. Dearnley (Wellington), Dr. Balcar (San Francisko), S-ino R.McGrath (Perto), S. Kanaĉki (Melburno), S-ino M. Wybeng (Morwell), R. Reed (Oakleigh), C. Lanyon (Malvern), F-ino E. Gibson (Launceston), N. Gamble (Kanbero), .A. Cocking (Fed. de NSK), T. Elliott (SES), S-ino B. Cleminson (Manlio), S-ino J. Lehane (Toowoomba), F-ino J. Turner (Rockhamptono), S-ino J. Torr (Ormarbordo), S-ino D. Sinclair (Esp. Fed. de Kvins.), R. Ross (BES).

Aliĝis at la kongreso 242, ĉeestis 189. Statistiko jene: el Viktorio 58, el Kvinslando 33, el Nov-Zelando 29, el Nova Sudkimrujo 27, el Japanujo 9, el Tasmanio 8, el Okc. Aŭst. 7, el Usono 7, el Sud-Aŭst. 4, kaj po unu el, Aŭstrujo, Belgio, Irlando, Kanado, Svedujo, ACT kaj Norda Teritorio.

Okazis tri specialaj vesperoj , dum kiuj diversnacianoj prezentis programojn pri siaj landoj, Aŭstralia kaj Nov-Zelando, Japana, kaj Amerika vesperoj. Kontribuis la sekvantaj: Prof.R. Robertson, S-ro J. Allen, Stefano kaj Victor McGill, S-ro B. Iŝizaki, S-ino M. Takagi, S-ino Y. Issobe, S-ro E. Itoo, D-ro B. Balcar, S-ino M. Wenzel, S-ro C. Fettes. Kontribuis al la kongreso ankaŭ per prelegoj kaj per aliaj rimedoj: T. Steele, I. Maddern, D-ro T. Einihovici, S-ro Itoo, S-.ino Y. Issobe, D. McGill, C. Fettes, A. Cocking, M. Leereveld, K. Linton, R. Dearnley, W. Chandler, V. Gueltling, S-ino D. Thyer, Ges-roj Maddern, F-ino P. Maddern, Ges-roj M. Howe, F-ino J. Campbell, S-ino R. McGrath, S-ino I. Einihovici.

Tri honorsignojn S-ro Robertson transdonis al: K. Linton, D-ro C. Caldera, R. L. Harry. La Manlio-Grupo sukcesis pri la Dramo-Trofeo, Nova estraro de AEA elektiĝis: prez. R. Robertson; vicprez-oj K. Linton, I. Maddern: sekr-oj S. Wickendon, H. Koppel; kas. L. Scott; libro-servo T. Elliott; red.-AE H. Koppel; ekzamenoj K. Lintin; honoriga komisiono: V. Gueltling, V. Timmins, R. Ross; kas-k R. Baxter.

LKK esprimis dankojn al Ges-roj A. Kaj E. Oliver (Esperanto eldonejo) pro la donaco de 13 ekzempleroj de “Kanakko el Kananam,”, kiuj estis donacitaj al transmaraj kontribuantoj al la kongres-programo. Okazis post-kongreso en sidnejo kaj en Manlio, kie anoj gastigis, precipe, la eksterlandanojn, dum kelkaj tagoj. La venonta kongreso okazu en Launceston, laŭ decido dum kunsido.

21-an.

Ĉi tiu kongreso okazis en Launceston la 2an ĝis la 8° de januaro, 1978. La kongresejo estis la Tasamnia Kolegio de Altgrada Edukado. Aliĝis 92 anoj kaj partoprenis 75. Negranda LKK kiu laboris por sukcesigi la kongreson, jene: Ges-roj mac kaj Pat LeFevre, Ges-roj K. kaj E. Kerr, S-inoj K. McFarlane, L. Carswell. Dum la inaŭguro Prez. de aAEA Prof. R. Robertson bonvenigis la anojn kaj invitis al S-ro T. D. Room, vicurbestro de Launceston alparoli la kongresanojn; tion faris S-ro Room kaj invitis anojn al Urbestra Akcepto, posttagmeze.

Reprezentoj de lokaj grupoj salutis la kongreson jene: K. Linton (UEA), V. Gueltling (SAT), S-ino S. Martin (K. –Unuiĝo), W. Chandler (ORE), R. Ross (E-Fed. De Kvins.), R. Reed (E-Fed. De Vik.), S-ino E. Graham (E-Fed de NSK), S-ino E. Kerr (Launceston), C. Dean (Okc. Aŭst.), D. Pescod (Malvern), F-ino M. Sanders (Oakleigh), H. Koppel (MES), W. Wybenga (Morwell), T. Elliot (SES), A. Cocking (Manlio), S-ino M. Ross (BES), S-ino J. Lehane (Toowoomba), F-ino J. Turner, (Rockhampton), J. B. Moore (Emu Parko), E. Loorits (Hobarto).

Entute 4 labor-kunsidoj okazis kaj faris decidojn pri: Simpkins Memoriga fonduso, adresaro, Someraj Kursoj en Toowoomba. Nova estraro elektiĝis: Prez. Prof. R. Robertson; vic-prezoj. K. Linton kaj I. Maddern; 1-a Sekr. L. Scott; 2-a sekr. H. Koppel; kas. L. Scott; Libro-Servo, T. Elliot; Korespond-Kursoj, J. B. Moore; Help-Korespondanto, S-ino B. Cleminson; Ĉef-Ekzamenisto, K. Linton; Honor-Komisiono, V. Gueltling, V. Timmins, R. Ross; kas-k. A. Cocking. Kunvenis ankaŭ: anoj de UEA, SAT, kaj ORE.

Kontribuis ankaŭ al la kongreso (krom la supremenciitaj estraranoj) la jenaj: R. L. Haarry, D-ro einihovici, F-ino M. Sanders, F-ino A. Hearn, C. Strochnetter, W. Chandler, S-ino P. Guy, F-inoj I. Gale, B. Williams, Ges-roj C. kaj D. Dean, T. Eliot, A. Cocking, V. Gueltling, S-ino M. Sanders, S-ino E. loorits, S-ino E. Kerr, S-ino E. Giles, Ges-rojD. Pescod. Gajnis la Draman Trofeon rolantoj el BES S-inoj G.  Phillips, C. Sullivan, J. Peters, S. Martin, kaj Ges-roj R. kaj P. Ross. Tri ekskursoj al diversaj vidindaĵoj okazis dum la kongres-periodo; lingvaj seminarioj gvidataj de S-roj I. Maddern, J. Moore kaj K. Linton okazis dum la semajno. Prelegoj kaj distraj vesperoj aldonis multon al la kongres-programo.Plensukcesa kaj ĝuinda vizito al Tasmanio estis la fina konkludo. La venonta kongreso, 1980. okazos en Sidnejo.

22-an

La kongreso okazis en Sidnejo la 2an ĝis la 9a d janurao, ĉe la Centro Wesley. Aliĝis 120 anoj el kiuj 104 ĉeestis la kongreson. LKK konsitis al anoj de SES kaj Manlio-Klubo; prez. R. Robertson; sekr. M. Chaldecott; kas. S-ino E. Matasin; kun helpo de S-inoj B. Cleminson, S. Fanos kaj Les Scott kaj aliaj el la E-grupoj. Tom Elliot helpite de edzino S-ino M. Elliot, provizis bonaon L-Servon. Bedaŭrinde la gazetaro plejparte ignoris kaj la informilojn jam senditajn, kaj la kongreson mem. Senatano C. Mason, kiu antaŭ multaj jaroj lernis Esperanton, oficiale malfermis la kongreson. F-ino Majo Issobe (Japanujo) transdonis libro-donacon, danke al la senatano.

Salutis la kongreson la jenaj: F-ino M. Issobe (Japanujp), K. Linton (pro UEA), W. Gueltling (pro SAT), B. Silverlock (Okc. Aŭst. Ligo), R. Felby (Sud-Aŭst.), S. Kanaĉi (MES), F-ino A. Hearn (Oakleigh), D. Pescod (Esp. Fed de Vik.), D. Rogers (Waveerly), S-ino M. Ellyard (Kanbero), C. Straaochnetter (Launceston), J. Jharwood (Esp. Fed. de NSK), T. Ellio (SES), A. Cocking (Manlio), I. Maddern (Morwell), S-ino M. Rozsa (Orange), S-ino M. McLeod (Newcastle), R. Ross (Esp. Fed de Kvins.), F-ino B. Sullivan (BES), S-ino W. Greenhalg (St. Lucia), F-ino J. Turner (Rockhampton-Emu Park); salut-leteroj alvenis de Brazila E-Ligo, S-ino E. Ernst (Bruselo), Emil Vokal (Vieno), kaj W. Du Temple (Kanada E-Asocio).

Okazis 4 labor-kunsidoj: akcepto de raporto de estraro, Simpkins Heredaĵo, F. R. Banahm Fonduso, Honoriga Komisiono, elekto de nova estraro - eroj pritraktitaj. Nova estraro jene: prez. Prof. R. Robertson; vicprez-oj R. L. Harry, K. Linton; 1a sek. J. Fallu, 2a sek.H. Koppel (ankaŭ redaktoro de AE); kas. S-ino I. Fallu, Libro-servo T. Elliott; Komisiito por Eksteraj Aferoj, R.L.Harry; K-kursroj, J/ Moore; Korespondpetoj, S-ino B.Cleminson; Ĉef-Ekzamenisto, K. Linton; kas-k. K. Linton. Estis proponite ke la venonta kongreso okuzu en Adelaido. Kunvenoj de SAT, ORE, UEA kaj PAPIE okazis dum la kongreso.

Aliaj kiuj kontribuis al la kongreso jene: D-ro A. Capell, D-ro T. Einihovici, R. Harry, T. Steele, A. Cocking, J. Cooper, A. Gash, B. Silverlock, C. Strochnetter, F-ino J. Walker, G. Hicks, S-ino M. Liston, F-ino I. Gale, F-ino E. Traynor, H. Koppel, R. Robertson, T. Elliott, S-ino E. Graham, T. O'Grady, D-ro Gassner, S-ino M.Ellyard. Elstara sukceso estis traduko de “La Mikado“ de S-ino G. Phillips; anoj de Brisbano, Sidnejo kaj Melburno prezentis ĉi tiun farso-operon dum Arta Vespero; entute pli ol tridek rolistoj partoprenis Ia okazaĵon. Okazis tri ekskursoj al vidindaj lokoj en la Sidneja regiono. Denove okazis post kongreso en Manlio, sub la gvidado de S-ino M. Duncan kaj anoj do la Manlio-Klubo.

23-an.

Sepdek jarojn post la starigo de la 1-a Aŭstralia E-Kongreso, la 23-a kongreso okazis en Adelaido, la 2an ĝis la 9a de januaro, 1982. LKK jene: G. Clarke, R. Felby, S-ino A. Felby, S-ino B. Randles kaj S-ino T. v. d. Boorgaard. Kunlaboris ankaŭ R. Harry kaj Ges-ro j J. kaj I. Fallu; S-ino B. Hart kaj S-ino A. Leereveld helpis dum kafo-paŭzoj. Kongresejo estis 'Lincoln Kolegio' kie 121 anoj el ĉiuj ŝtatoj partoprenis la kongreson. Ges-roj T. kaj M. Elliott prizorgis la Libro-Servon. Gazetaro kaj televid-stacio 9 disvastigis novaĵon pri eventoj dum la kongreso.

La prez. S-ro R.L.Harry bonvenigis la kongresanojn kaj invitis al to Vic-Guberniestro malfermi la kongreson. Tion faris Kav-iro W.Crocker; li bonvenigis la anojn al Adelaido kie okazis en 1911 la unua kongreso en Aŭstralio. S-ro Harry laŭtlegis salutojn de: S-ro G. Maertens (prez. de UEA), S-ro P. Thorsen (Danlando), S-ro Mi Ji-sheng (Mongolio), Emil Vokal (Vieno), Jim kaj Jennifer Dimo (Eŭropo). Salutis la kongreson: J. Hawks (Ligo de Okc. Aust.), G. Clarke (Adelaido), M. LeFevre (Launceston), J. Fallu (Oakleigh), S. Kanaĉki (MES), F-ino I. Gale, (Waverley), T. Elliott (SES), Prof. R. Robertson (Manlio), F-ino B. Birkett (Kanbera), S-ino J. Green (Newcastle), S-ino S. Burkitt (Castle Hill), S-ino B.Cleminson (E-Fed.de NSK), R. Ross (E-Fed de Kvins.), T. Steele (BES), F-ino J. Turner (Rockhamptono/Emu Parko), S-ino M. Duncan (Plenaĝula Klubo-Sidnejo), S-ino A.Spencer (ILEI), W. Chandler (por Ges-roj Bossong ka j S-ino A. Childs-Mee).

Okazis 3 labor-kunsidoj de AEA kaj po unu de UEA, SAT, ORE, PAPIE kaj ILEI. La kunveno akceptis raportojn de estraranoj; kongresanoj akceptis la jenajn proponojn: Registrado de AEA, Jubileo de Esperanto on Aŭstralio, starigo de Universala Kongreso (principe) en Brisbano 1988, ke la 1984-a kongreso okazu en Kanbero.

Ne-akceptita estis proponon starigi kongreson de ILEI en Aŭstralio. Nova estraro elektigis: prez. R. Harry; vicprez-oj M. LeFevre, R.Ross; sekr. S-ino M. Ellyard; red.- AE, H. Koppel; Libro-servo T. Elliot; Korespon-Kursoj J. Moore;Korespondpetoj S-ino B. Cleminson;komisiitoj T. Steele (Jubilea Jaro), S. J. Campbell (Esperanto en Lernejo); Ĉef-Ekzamenisto K. Linton; kas-k K. Linton.

Estis decidite ke la Honoriga Komisiono estu el la aro de fratuloj de la Asocio. Por celebri la jubilean de Esperanto, estis proponita ke AEA eldonu la librojn: “Aŭstralia Antologio" (redaktoro, S-ro A. Towsey); "Historio de la E-movado en Aŭstralio” (Komisiito  S-ro R. Ross).

Sukcesis pri la Dramo-Konkurso, Kanbero E-Klubo; partoprenis ankaŭ grupoj el Perto, Brisbano kaj Manlio. Diservo okazis en Katedralo-Sankta Petro, kie Kanoniko W. Ray predikis esperante kaj partoprenis F-ino I. Gale, S-roj R. Harry kaj R. Robertson. Agrablajn ekskursojn la anoj partoprenis, al diversaj lokoj kaj okazis distraĵvesperoj kiam kontribuis: S-ino B. Randles, Les Scott, R. Harry, T. Steele (per kvizo), dum la sekvantaj anoj kontribuis al la sukceso de la kongreso: F-.ino J. Walker, T. Elliott, A. Cocking, R. Robbins, W. Leah, F-inoj Pam kaj Rosemary Harris, Mac LeFevre, R. Robertson, S-ino F. Koppel. Brisbana Grupo prezentis pup-teatraĵon kaj kantaron. Bankedo kaj neformala vespero konkludis ĉi tiun sukces-plenan kongreson. Tre interesa faldfolio 'Invito al Aŭstralio' kiun aperigis la Aŭstralia Turisto-Komisiono, alvenis dum la kongres-periodo.

24-an.

La 24-a Kongreso de AEA okazis la  7an ĝis la 14a de januaro en Kanbero, 1984. Bedaurinde, la 16an de januaro mortis la kasisto de ĉi tiu memorinda kongreso, Sam Ellyard. La anonco pri la morto ege ŝokis ĉiujn kiuj tre alte taksis la laboron de Sam dum la 24a kongreso kaj kiuj konis lin kiel amiko.

Du ĉefaj rezolucioj el la kongreso termis pri danko al la Australia Registaro pro la subteno de invito al UEA starigi la 73an U-Kongreson en Brishano, en 1988, kaj pri danko al Komitato de Senatanoj pro konsiderado de propono enkonduki Esperanton en la nacion agadplanon. Aliĝis al la kongreso, 127 anoj el kiuj 110 ĉeestis, inkluzive de 2 el Japanujo, po unu el Usono, Anglujo, Finnlando kaj Nov-Zelando. Malrgraŭ invito al televid/radio-stacioj kaj al gazetaro, nur la loka tag-gazeto “Canberra Times' raportis pri la kongreso. Interkonan Vesperon estris Arthur Cocking; grupoj de Manlio kaj Brisbano kantis; Jim ka j Jennifer Dimo muzikis per akordeonoj. Ekumena Diservo okazis en Katolika Kapelo, gvidita de Pastro Joseph Zerafa; F-ino I. Gale kaj Ralph Harry kunhelpis dum la servo kaj S-ino Pam Francis ludis la orgenon.

Dum la solena inaŭgro la prez, S-ro Ralph Harry, unue prezentis la eksterlandajn vizitantojn, S-inojn Y. Issobe (Japanio), V.Lidstrom (Finnlando), S-ronW. Vathis (Usono), Prof-n C. J. Adcock (Nov-Zel.ando), F-inon M. Issobe, S-inon Lyddon (Anglujo); due, li transdonis salutojn de Gregoire Maertens (prez. UEA), W. Auld (Skotlando), D-ro Salzbacher (Usono), Cathy Schulze (Usono), Ges-roj Bossong (Nederlando), D-ro Ross Robbins (Mildura), Clarrie Strochnetter (Launcestono) kaj Eino Loorits (Hobarto). Prez. Harry oficiale malfermis la 24an kongreson; li festparolis pri "Esperanto, Komuna Lingvo por Multkultura Rondo". Sekvis la lanĉado de kvar libroj presitaj en Aŭstralio de post la lasta kongreso: 'Sur la Bordo' tradukita do K. Linton; 'Aŭstralio Kantas Sian Historion', eldonita de BES; 'Ghandi', tradukita anglen de Dorothy Threlfall, kaj 'Aŭstralia E-Vortaro', redaktita de Ralph Harry. S-ro Harry dankis al S-ino Eve Matasin pro donaco de '$2000 kiu ebligis la presadon de 'Sur la Bordo'.

Okazis tri AEA-laborkunsidoj kaj po unu de PAPIE, ORE, ISAE, ILEI kaj SAT. Estis decidite ke la kongreso en 1986 okazu en Perto, Okc. Aŭstralio. Nova estraro elektiĝis: prez. R. Harry (ĝis 1an de aŭgusto, 1984 post 1an de aŭgusto, Mac LeFevre); vicprez-oj: (ĝis 1an de aŭg. 1984: Mac LeFevre post 1an de aŭg. R. Harry), R. Ross; sekr. S-ino M. Ellyard; kas. S. 9, Ellyard; redaktoro-AEA H. Koppel; komisiitoj jene: T.Steele (Jubilea Jaro); J.Moore (Korespond-kursoj); S-ino B. Cleminson (Korespondpetoj); A. Cocking (Lernejoj); T. Steel (Ĉef-Ekzamenisto); T. Elliott (Libro-Peranto kaj Eldona Servo: asistantoj S-ino M.. Elliot, S-ino J. Green); K. Linton (UEA K-ano); J.Dimo (Informado); Ges-roj J. kaj R. Tumman (Ekspozicioj); J. Fallu (Ekspedanto de revuo); S-inoj V. Payne, S. Gradussov (Konsilantoj por Klubaj Instruistoj); F-ino K. Lewis (AEA Biblioteko); R. Ross (Historio de AEA, Somerlernejo); A. Towsey (Aŭstralia Antologio).

Dramo-konkurso: kvar grupoj partoprenis en la konkurso, 'kaj gajnis la trofeon la grupo el Okc. Aŭstralia. Ĥor-konkurso: ŝildo donacita memore al Fritz Mueller-Soraú, de fratino Herta Mueller kaj anoj de grupoj en NSK; sukcesis, la Brisbana kant-grupo. Seminarioj: S-ino V. Payne, A. Towsey kaj R. Ross gvidis diversajn grupojn dum tri instru-periodoj. Ekskursoj: kvar ekskursoj al specialaj vidindaĵoj okazis dum la kongresperiodo. Muzik-vespero: vera altnivela spektaklo - Jennifer Dimo per akordeono, kantoj de la Brishana Grupo. S. Pretty per hobojo, K. Radford per piano, Kam Lee per gitaro, Hispana Danc-trupo; estrita de Jim Dimn.

Dum oficiala bankedo, S-ino M.Duncan kaj Prof. R. Robertson fariĝis ‘Fratuloj de AEA'; D-ro kaj S-ino Einihovici donacis erojn por la aŭkcio gvidita de A. Towsey. (Bonvena profito rezultiĝis). Distra vespero: Mar LeEevre gvidis la programon, kontribuis: Jim kaj Jennifer Dimo, Vera Payne, Brisbana Kant-grupo. Neformala vespero: kontribuis, R. Harry, Vera Payne, Mac kaj Pat LeFevre, Kam Lee, Roger Sprirnger ka j Marj Ellyard.

Aliaj kontribuantoj dum la kongres-periodo ,jene: K. Linton, H. Koppel, S.Ellyard, Jack Hawks, Betty Hart, Brenda Birkett, Kath Lewis, Richard Harris, Isabel Gale, Mary Armour, Kit Brisbane, Val Fotheringharn, Nellie Lyddon, Margaret Miller, Sybil Martin, Peggy Ross, Gaye Phillips, Kay Andersen, Decie Shonhan, Gilbert Shonhan, Arthur Cocking, Marjorie Duncan, Eunice Graham, Judith Hanna, Beryl Loh, Eva Matasin, Margaret Robertson, Bess Scott, Ivy Fallu, Don Pescod, P.Hall, Terry Metherall, Blair Silverlock, Shirley Gradussov, D-ro T. Einihovici, Margaret Listen, Sylvia Burkitt, Joan Green, Gail Tregear, Joyce Turner, Annie Spencer, Wre Chandler, V. Gueltling, Les Scott, Jack Fallu, Gerald kal Ruth Tumman, Winsome Greenhalgh, Tom Elliott. Oficiale fermis ĉi tiun plensukcesan kongreson, la prez. R.L.Harry.

Apudmara Renkontiĝo en Manlio: Manlianoj organiszis Post-kongreson en Manlio la 15an ĝis 20a de januaro, 1984. Krom la estrino , Marjorie Duncan, multe kontribuis Ges-roj Keith kaj Judith Harris, Malcolm Ross, Aurthur Cocking, Les kaj Beth Scott kaj aliaj anoj de la Manlia Klubo. 60 samideanoj ĉeestis la finfinan distraĵ-vesperon.

*   *   *

Ĉapitro 5

## O F I C I A L A J    O R G A N O J,    E L D O N A Ĵ O J

The Australian Esperantist estis la unua revuo en Aŭstralio, eldonita de D-ro A.E. Barrington, fondinto de la Benalla E-Klubo; de majo 1908 ĝis aprilo 1909 estis nur 12 ekzempleroj. Pro manko de monsubtenado, D-ro Barrington decidis, post unu jaro, ne eldoni ĉi tiun tre popularan, unikan revuon.

La Suda Kruco, 'Organo de la Aŭstraliaj Esperantistoj', aperis en julio, 1920. Ĝi naskiĝis post la plensukcesa 3-a Aŭstralia Kongreso en Sidnejo, dum aprilo tiun saman jaron. La unua redaktoro estis S-ro A. M. Hyde ĝis junio 1921, kiam li translokiĝis al Rabaul (Nov-Gineo). En januaro 1921, la subtitolo sanĝiĝis al 'Organo de la Aŭstralaziaj Esperantistoj' pro forta subteno de Suda Kruco fare de grupoj el Nor-Zelando; poste, en junio 1921, la revuo estiĝis 'Oficiala Organo de la Aŭstralazia Esperanto-Asocio'. De julio 1921 ĝis aprilo 1927, Suda Kruco estis redaktita de S-ro C. W. Ballard ĝis kiam li eksterlandis; tiam S-ro P. Hudson, de majo 1927 ĝis marto 1929, prizorgis la eldonon de la revuo. S-ro F. R. Banham transprenis la oficon de redaktoro en aprilo 1929; ĉi tiu situacio daŭris ĝis la eldonĉesigo en oktobro, 1934.

En aŭgusto 1935, aperis 'La Suda Kruceto' (SUKRO), private eldoniti de Josh Eljot; ĉi tiu monata revuo iom plenigis la vakuon kaŭzitan de la malapero de la antaŭa nacia gazeto, La Suda Kruco, sed neniam estiĝis oficiala revuo. Joah Eljot [vidu Ĉ.3(d)] ne aspiris al tiu celo kaj fakte fieris pri sia tutsendependa propra bulteno; tamen li kontribuis multon al Esperanto en Aŭstralio kiam li sukcese instigis aliajn refondi la nacian asocion. La Suda Kruceto daŭre eldoniĝis ĝis 1956 kaj oni konkludas ke Joab Eljot, senpere de SUKRO, gajnis rekonon inter esperantistoj en Aŭstralio (kaj eĉ eksterlande) malgraŭ la fakto ke la plej multaj forte kontraŭis aspektojn de gramatikaj ŝangoj kaj iom radikalaj vidpunktoj ofte esprimitaj.

'La Rondo'. En Adelaido, 1939, grupo de esperantistoj sub la gvidado de F-inoj Win Addis kaj Lydia Bailey starigis traduk-rondon kaj por progresigi ĉi tiun rondon, iniciatis revuon 'Inter Ni', en kiu estis la traduk-provoj fare de la studrondanoj. Samtempe en Melhurno, S-ro F. R. Banham gvidis traduk-kurson inter membroj el ĉiuj ŝtatoj; ĉi tiu kurso estis limigita de temporaba tajpado de individuaj lecionoj. Post kiam F-inoj Addis kaj Bailey sendis al S-ro Banham la unuan eldonaĵon de 'Inter Ni' en 1940, li sugestis ke li redaktu la revuon kaj vice Fino Bailey proponis ke ŝi tajpu kaj multobligu la foliojn rilate al la traduk-kurso de S-ro Banham. El ĉi tiu kunarango naskiĝis en novembro 1940, La Rondo. Unue la revuo estis presita per kromografilo, sed poste F-ino Bailey, proprakoste aĉetis maŝinon por hektografie presi la foliojn. En 1941 estis decidite starigi la revuon kiel oficialan organon de AEA. S-ro Banham restis redaktoro, F-ino Addis iĝis kasistino de AEA kaj F-ino Bailey respondecis pri la enhavo de la bulteno. Do, en Adelaido, ĝis la fino de 1946, F-inoj Addis, Bailey kaj Telfer tajpis, multobligis, pingladis kaj ekspedis la revuon, kiun S-ro Banham redaktis; entute 300 ekzempleroj ĉiun monaton alvenis al disaj abonantaj en la lando. En januaro 1947, la revuo estis profesie presita dum S-ro Banham daŭrigis la redaktadon. En januaro 1958 okazis nomŝanĝo kaj 'The Australian Esperantist' estiĝis anstataŭ 'La Rondo'. Frank R. Banham redaktis la revuon ĝis sia subita morto, la 30an de oktobro, 1974; li sendube grave rolis inter la plej elstaraj kontribuantoj al la E-movado en Aŭstralio [vidu Ĉ.3(e)]. S-ro Herbert Koppel tuj akceptis respondecon pri redaktodo de 'The Australian Esperantist' kaj prizorgis ĉi tiun taskon ĝis hodiaŭ (1985).

ŜTAT-ORGANOJ

Revuoj en Okcidenta Aŭstralio.

REVUO de Okcidenta Aŭstralia Esperanto-Ligo. La unua REVUO aperis en 1945 kaj la enhavo inkludis verketojn de D-ro C. Caldera, N.Brodie, A. Saar, I. Massel, T. O'Donohue, M. Casey, kaj F-ino 0. Strempel. Ankaŭ estis raporto pri la jarkunveno, 1945. REVUO aperis unu fojon jare ĝis 1959 – entute cirkaŭ 20 paĝoj ĉiujare raportis ligiaferojn kaj santempe estis Iigilo inter la memboj. Due 1960, manskribitaj leteroj pri ligaferaj aperis - S-ino G.Pollard, M. Sedgley kaj E. Palmer multe laboris pri tio. En marto, 1961, aperis la unua eldonn de NIGFA CIGNO, negranda (8 paĝa) novaĵletero;ĉi tiu monata revuo plejparte raportis pri aferoj en Okc. Aŭstralio, sed ofte pri gravaj E-evento j en aliaj partoj de Aŭstralio, kaj pri E-mondaferoj. Redaktis la revuon, jene: 1961-1965, S-ino E. G. Palmer; 1966-1969, J. Hawks; 1969-1979, S-ino E. C. Palmer; de oktobro 1979-1980, S-ino P. McGrath, kun heipantoj: S-ino D. Threlfall, A. Huts, A. Belmont. En 1961 NIGRA CIGNO aperis kun tutnova aspekto, pligranda kun ŝango de prezentado; redaktis ĝin, S-ino V. Payne, S-ro Janek Voluk ka j S-roA.Huts: poste aliaj anoj kunhelpis pri redaktado: S-ino ,R.McGrath, I. Einihovici; S-roj R. Smeets, P.Triziski. Tamen, en januaro 1982, NIGRA CIGNO reaperis sub la originala formato, redaktoro 1982-1985, S-ro C. Dean. En junio 1985, la revuo aperis novstile presite, redaktoro, S-ro Donald Broadribb.

TELOPEO - NSK.

La titolo Telopeo devenas de la botanika nomo de la ŝtata floremblerno de NSK. Post la fordiĝo de la E-Federacio de NSK, 1969, eldoniĝis tri bultenoj en kiuj troviĝis raportoj pri kunveroj ktp. Tamen fervoruloj opiniis ke monata revuo estas necesa ligilo inter la ano j de la federacio kiuj loĝas en diversaj regionoj ĉar tiel ili sentos sin veraj partoprenantoj en la federacio.Kontribuaĵoj al la bulteno de ĉiuj membroj estis bonvenaj kaj ĉiun monaton anoj ricevis propran revuon, gravan ligilon kian proponis la antaŭaj fervoruloj.

La unua redaktoro estis Wre Chandler, de marto 1970 ĝis aprilo 1975; aliaj sekvis jene: de majo 1975 ĝis novembro 1976, Thelma Smith; de decembro 1976 ĝis aŭgusto 1980, Elsie Curry; de septembro 1980 ĝis marto 1981, Tom Elliott kaj kunhelpantoj, Wre Chandler, Margaret Chaldecott, Joan Green; de aprilo 1981 ĝis aŭgusto 1981, Colin Pollard; de septembro 1981 ĝis novembro 1981, Tom Elliott, Wre Chandler, Margaret Chaldecott, Joan Green; de decembro 1981 ĝis nun (1985), Joan Green.

LA VOĈO - KVINSLANDO

Oficiala organo de la fedaracio de Kvinslando; la titolo estis elektita dum la Ia unua konferenco de la novefondita asocio ĉe Caloundra, en februaro 1972. La okpaĝa bulteno eldoniĝas kvar fojojn jare kaj la enhavo rilatas al aferoj de la federacio kaj de filiigitaj grupoj; samtempe ĝi estas ligilo inter disvastigitaj anoj en la ŝtato. La redaktoro de la inaŭguro de la bulteno en 1972 ĝis hodiaŭ (1985) estas Ray Ross, el la Brisbana Societo.

MELBOURNE ESPERANTO NEWS - VIKTORIO

'Melburna Esperanto-Novaĵo'. Ĉi tiu anglepresite revuo aperis ĉiun duan monaton kaj estas tute dediĉita al disvastigo de novaĵo pri venontaj okazaĵoj en kaj apud Melburno, kune kun raportoj pri ĵuspasintaj eventoj - pri ,jarkunvenoj kaj similaj aferoj rilate al E-Federacio de Viktorio, Melburna E-Societo, kaj E-Grupoj de Oakleigh, Malvern kaj Waverley. Redaktoro, de 1970 ĝis hodiaŭ (1985) estas Herbert Koppel, el MES.

TAMEN PLU - SUD-AŬSTRALIO

Oficiala organo de la Sud-Aŭstralia E-Societo, naskiĝis la 11an de majo 1982; redaktoro estis Bob Felby, la tiama sekr.de la societo. La eldono daŭris ĝis decembro 1984, kiam estis decidite ne plu eldoni la revuon.

## ASOCIAJ KAJ KLUBAJ BULTENOJ
(Nuntempaj kaj Pasintaj)

Manlio Parolas: organo do Manlia E-Klubo

Rockhamptona Rondo: organo de Rockhamptona E-Societo

Klerigo: organo de Asocio por la Instruado de Esperanto on Aŭstralio

Latrobe Valley Esperantist: organo de Morwell E-Klubo

Transoceana: organo de Pacifika Asocio por Instruado de Esperanto

(La supra] revuoj ne plu estas eldonataj)

Revuoj - ankoraŭ eldonataj, jene:

KEK Kuriero: organo de Kanbera E-Klubo

Brisbana Babilado: organo de Brisbana E-Societo

Tereno: organo de Toowoomba E-Societo

Esperanto Bulteno organo dre Korespond-Kursoj de AEA

## ELDONAĴOJ

1911 'Kara Panjo' elangligita de G. Gordon
1911 'Raporto pri la 1-a Aŭstralia Kongreso' (angle)
kompilita de Loka Kongres-Komitato, Adelaido.
1912-1914 Dramoj verkitaj de J. G. Pyke
'Amigilo', 'La Akvo de l'Forgeso', 'Dum Ŝi Vivas', 'La Koro de Maria',
'Iun Belan Tagan', 'Pri Balboni, Mansfield kaj Vojeĉek, Bankieroj'.
'Amigilo' estis presita en La Revuo, (red. D-ro Zamenhof) kaj poste prezentiĝis en Kopenhago kaj Parizo. Kunlaboris, A. L. Sullivan pri 'Dum Ŝi Vivas'.
1913 ''La Kamena Angulo' elangligita de G. Gordon
1913 Alegorioj de la Naturo' elangligita de G. Gordon
1922 (2-a eldono)
1914 'Nova Testamento' brajle presita en Esperanto de F-ino B. K. Blyth
1915 'Lia Lasta Ŝanco' tradukita de G. Gordon
1918 'The Esperanto Guide' verkita de A. M. Hyde
(La Unua Australia E-Lernolibro)

1918 'Esperanto Lando' originala kanto de D-ro S. McBurney
1918 'Lilio' verkita de F-ino E. A. Sinnotte
(la unua originala romano en Aŭstralio)
1924 'Indekso al Anglaj Vortoj' kompilita de G. Gordon
(vortaro de (Millidge)
1925 'Historietoj de Aŭstralia Esplorado' kompilita kaj tradukita de S-ino R. B. Bigelow
1927 'Australia, Lando kaj Popolo' kunverkita de A. M. Hyde kaj Lauri Laiho
1931 'Anstataŭa Edzino' angle verkita de S-ino L.M. Pyke elangligita de S-ro Sampson
1934 'Pri la Iamaj Tasmanianoj' verkita de Pastro C. C. Cowling
1938 'Perturboj Bontonaj en Kakofonujo' verkita de Joab Eljot
1945 'Gaja Leganto per Esperanto' kompilita de P. E. Schwerin
1948 'Versaĵoj de JoE' verkita de Joab Eljot
1951 (dua eldono)
1948 'Deklaracio Pri Homaj Rajtoj' tradukita de R. L. Harry
1949 'Brulanta Sekreto˚ (de Stefan Zweig) tradukita de Ges-roj P. kaj K. Schwerin
1953 'Kanako el Kananam' originala verko de K. G. Linton
1957 'Eroj, por Angla Antologio' tradukitaj de F. R. Banham
1970 'Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj' tradukita de R. L. Harry
1970 'De Z al A' kompilita de S-ino Fay Koppel
1970 'Konvencio Pri Diplomatiaj Rilatoj' tradukita de R. L. Harry
'Konvencio Pri La Juro de Traktatoj' " de R. L. Harry
(kune eldonitaj, majon 1980, de Unuiĝintaj Nacioj)
1970 'Statuto de la Internacia Kortumo' kunlaboris pri la traduko,
R. L. Harry, I. Lapenna kaj E. Svane.
1972 'Esperanto: Lingvo de la Sporto' kompilita de R. L. Harry
1974 'Bonan Tagon' Instru-folio] kun kasedo: preparita por Radio-kurso, de S-ino
M.W.'ybenga. Poste libroforme presita/adaptita por Korespond-Kursoj de AEA de
J.B. Moore kaj A. Towsey
1977 'Studlibro por la Aŭstralia Norma Supera Diploma' de K. G. Linton
1977 'Studlibro par la Aŭstralia Norma Elementa Diploma' de K. G. Linton
1979 'Tradukaĵoj de Frank Banham' kompilita de A. Towsey
1980 ‘el Telopeo', elektitaj verkoj el la oficiala organo de Esperanto Fed. de NSK
1981 'Invito el Aŭstralio' (turista broŝuro) eld. Aŭstralia Turista Komisiono
1981 'Queensland Esperanto Museum' angle presita de BES
(Kvinslanda Esperanto-Muzeo)
1981 'The Life of Ghandi' angle tradukita de S-ino D. Threlfall de la originala verko de
Edmond Privat 'Vivo de Gandhi'
1982 'Aŭstralio Kantas Sian Historian' kunverkita de S-inoj Gaye Phillips, Kay Andersen
(kant-libro) eld. BES
1983 'Sur la Bordo', de Nevil Shute elangligita de K. G. Linton
1983 'Mia Bildlibro de Esperanto' kompilita de J.Moore, bildoj de S-ino A. Spencer
1984 'Vortoj Kun Flugiloj’ kompilita de R. L. Harry
(citaĵoj el la tuta mondo)
1984 'Aŭstralia Esperanto-Vortaro' kompilita de anoj ĉe E-Somerlernejo,
Armidale 1982-1984. eld. AEA
1985 'Australia Esperanto-Vortaro
(dua eldono)

## Ĉapitro 6
## BIBLIOTEKOJ – MUZEOJ EN AŬSTRALIO

Multaj E-asocioj kaj individuaj libroamantoj formis tre frue bibliotekojn, en kiuj estis kaj estas konstante kolektataj, libroj, gazetoj, broŝuroj kaj aliaj esperantaĵoj. Tiel estis en ĉiuj diversaj grupoj en Aŭstralio, de la plej fruaj jaroj ĝis hodiaŭ; kelkaj estas sufiĉe ampleksaj dum aliaj, kompreneble, estas modestaj. Gravan signifon, el kultura vidpunkto, havas la bibliotekoj kun esperantlingva materialo. Internacilingva interesulo, ankaŭ neesperantisto, perceptas propraokule, multe pli bone of per mil teoriaj argumentoj, la signifon de la lingvo.

En ĉiuj ŝtatoj, kie estas establitaj asocioj, societoj aŭ kluboj troviĝas bibliotekoj. Laŭ sia Statuto, akceptita en 1960, AEA organizas bibliotekon de libroj, gazetoj, filmoj, sonbendoj kaj eldonaĵoj. Ĝi servas al ĉiu membro de la asocio. La estraro decidas pri la bibliotekisto kaj pri kondiĉo j de uzo (Artikolo 27). En marto, 1981 , la estraro, je la sugesto de Herbert Koppel, komisiis la tiaman prezidanton, S-ron Ralph Harry, starigi kun la helpo de KEK, Nacian Esperanto-Bibliotekon en Kanbero, la nacia cefurbo.

### La Aŭstralia Nacia Esperanto-Biblioteko

Laŭ la Statuto la celo estis kolekti kaj prizorgi:
(a) kompleton de la libroj, gazetoj, filmoj, diskoj kaj sonbendoj eldonitaj en Aŭstralio
(b) la ĉefajn tiajn eldonaĵojn el aliaj landoj
(c) la "neaktivan" arkivon de AEA.

La biblioteko interpretis sian komision flekseble, kaj akceptis donacojn ankaŭ de afiŝoj, poŝtkartoj, bildoj kaj aliaj esperantaĵoj. Ĝi ankaŭ plenumis rolon kiel ekspozicio konstanta kaj centro por la eldono de dokumentoj rilatantaj al la biblioteko mem; ekzemple, la indekso de Australian Esperantist, la Aŭstralia Esperanta Vortaro kaj internacia citaĵaro por kiu la biblioteko provizis materialon.

Fruaj klopodoj fare de prez. de AEA kaj anoj de KEK ne sukcesis rilate al la provizo de taŭga ĉambro je malalta pago en la mezo de Kanbero, sed la Instituto de Internaciaj Aferoj, de kiu prez. de AEA, S-ro R. L. Harry estis Direktoro, permesis la uzon de parto de sia Biblioteko-Casey en la Centro-Jamison. AEA pagas nenion, sed KEK fariĝis korporacia membro de la Instituto kaj la membroj tri fojojn jare ekspedas la revuon de la Instituto; ĉiujare anoj de KEK kontribuas ĉirkau 200 laborhorojn por la Nacia Biblioteko! Por malpliigi la laboron de la anoj de KEK, la estraro de AEA rajtigis S-ron Harry intertrakti kun la bibliotekisto de la Nacia Universitato pri kontrakto, laŭ kiu la Universitato akceptus la bibliotekon 'prunte', provizus ĉambron kaj helpus pri la organizado kaj katalogado. AEA siaparte provizus subvencion por acetado de libroj, abonoj al periodaĵoj, dum anoj de KEK daŭrigus helpon rilate al E-aspektoj de la biblioteko. (Lastmomenta informo estas ke la Nacia Universitato ne akceptis la proponon, do oni devas trovi alian solvon al la problemo).

La unua kerno de la biblioteko estis la malgranda sed valora 'muzeo' kolektita de Ivan Maddern kaj la esperantistoj de Morwell en Viktorio. Tio inkludis librojn kaj gazetojn de W. J. Drummond, F. R. Banham, C. C. Cowling kaj aliaj pioniroj. Kelkaj estis donacoj de esperantistoj el Melburno kaj Monto Waverley, inkluzive de klasikaj libroj kaj gazetoj, i.a. kompleto de Nica Literatura Revuo, kelkaj volumoj de Esperanto eldonitaj tuj post la Unua Mondmilito, Suda Kruco, Oomoto kaj British Esperantist.

Aldoniĝis al la viktoria kerno la biblioteko de KEK kaj ties membroj, (inter ili Noel Gamble, Harry kaj Joyce Torr kaj Barbara Amies). Dua aldono estis la persona biblioteko de la prez. Ralph Harry; ĝi inkludis ĉirkau 100 librojn kaj binditajn kolektojn de gazetoj (Literatura mondo, Heroldo, La Rondo, Australian Esperantist, La monda Lingvo-Problemo/ nun Lingvaj Problemoj kaj Lingvo-Planado, kaj Internacia Revuo).

Dum la sekvintaj kvar jaroj la biblioteko ricevis tre malavarajn donacojn - iom da mono sed ĉefe librojn. La plej granda donaco estis la kompleta libraro de Fritz Mueller-Soraù (libroj, gazetoj, sonbendoj kaj ŝtalaj bretaroj). Aliajn tre utilajn donacojn faris la familio de George Collingridge, la familio de Jock Campbell, William Auld, Eileen Oliver, Alan Towsey, Ken Linton, Bobbie Robertson, Volo Gueltling kaj la familio Wybenga.

Por kunordigi la bibliotekojn en Aŭstralia, la biblioteko sin turnis al la jam farita katalogo de la Universitato-Murdoch, Okc. Aŭstralia; la katalogadon faris anoj de KEK kun la helpo de F-ino Katherine Lewis, kiu fariĝis bibliotekisto en 1984. En 1985, pro la granda nombro da duoblaĵoj post la enkorpigo de la libraro de Fritz Mueller-Soraù, la estraro de AEA rajtigis KEK-n uzi tiujn librojn kaj gazetojn por restarigi la kluban bibliotekon, en aparta loko. Kompletoj de eksterlandaj gazetoj estis bindigitaj, la nekompletaj kolektoj metitaj en skatolojn. Periodaĵojn eldonitajn en Aŭstralia oni retenis en skatoloj por faciligi kopiadon se iu organizaĵo aŭ persono bezonas. Jam bindigitaj estas kolektoj de Suda Kruco, La Rondo kaj Australian Esperantist.

Je la fino de 1985 la biblioteko entenis ĉirkau 800 librojn inkluzive de verkoj pri la lingvo kaj ties historio, tradukoj el naciaj literaturoj, originalaj verkoj de E-literaturo. mankis libroj eldonitaj en la pasintaj dek jaroj, sed la estraro de AEA elspezis $200-n por aĉeti novajn librojn dum aliajn librojn donacis KEK kaj individuoj. Por esti taŭga nacia biblioteko ĝi nepre devas resti moderna. Estas en la biblioteko, krom la libroj, ĉirkau 100 binditaj volumoj kaj 50 skatoloj da periodaĵoj. La biblioteko kolektis kelkajn diskojn de kantado kaj deklamado, el kiuj, kelkaj estas el la fruaj tagoj; inter ili estas la vocoj de D-ro Zamenhof, Edmond Privat kaj Julio Baghy. Unu celo de la biblioteko estas produkti unuigitan katalogon, en kiu aperu ĉiuj libroj en ĉiuj bibliotekoj en Aŭstralia.

Jam menciita estas la valoro de la biblioteko kiel konstanta ekspozicio; ĝi estas ankaŭ la bazo por specialaj ekspozicioj, ekzemple por Neregistaraj Organizaĵoj kaj Etnaj Organizaĵoj dum ties konferencoj. Sed la plej valora servo estas al la esperantistaro mem kiu rajtas ĝin uzi kaj peti informadon rilate al ĉiuj aspektoj de la Internacia Lingvo.

Biblioteko de Melburna Esperanto-Societo.

Kredeble, la plej granda biblioteko trovigas en Melburno, la originala hejmurbo de Esperanto en Aŭstralia, kie pli of 1100 volumoj estas haveblaj al membroj. Krom konstantaj donacoj fare de antaŭaj pioniroj kaj postaj anoj de la societo dum preskaŭ okdek jaroj, la biblioteko ankaŭ ricevis librojn por recenzo en Australian Esperantist. Samtempe, dum la jaroj, MES aĉetis novajn librojn por certigi ampleksan stokon de studlibroj kaj konsultlibroj verkitaj de eminentaj aŭtoroj el multaj landoj. La fina rezulto estas sufice ampleksa biblioteko kiu spegulas la agadon dum pasintaj jardekoj kaj samtempe provizas por estontaj studantoj kaj anoj ekzemplerojn de ĉiuj lingvaj aspektoj de la Internacia Lingvo. La Biblioteko de MES troviĝas en Esperanto-Domo, Melburno. Kompreneble, estas haveblaj al anoj, eksterlandaj gazetoj kaj naciaj revuoj el Aŭstralia.

## Biblioteko/Muzeo de Nova Sudkimrujo

La biblioteko de SES troviĝas en Esperanto-Domo, Sidnejo, kun enhavo de kelkcent libroj plejparte donacitaj de pasintaj anoj de la societo dum la periodo 1909-1985. Ĉi tiu biblioteko provizas la saman servon kiel ĉiuj aliaj al ties anoj, per haveblo de konsultmaterialo por ĉiuj aspektoj de la Internacia Lingvo, ĉu por studantoj, ĉu por instruistoj. Konstanta aldono de novaj libroj certigas ke ĉiam anoj povas prunti de la libraro ĝisdatajn ekzemplerojn.

## Federacia Muzeo de Nova Sudkimrujo

Ĉi tiu muzeo estas starigita en E-Domo, ĉe 143 Lawson Strato, Redfern. La ĉefcelo estas montri la historion de la E-movado en NSK per fruaj libroj, periodaĵoj kaj fotografaĵoj, inkluzive de tiuj, kiuj ankaŭ speciale rilatas al la E-movado en Aŭstralio. Estonte, estas la intenco aĉeti taŭgan vitrinon por la muzeo-enhavo. Dua kaj grava celo por starigo de la muzeo estas sciigi al tiuj kiuj sekvos, kion jam faris pioniraj, pasintaj kaj nuntempaj anoj, tiele konservi por la estonteco la atingojn de la estinteco.

## Brisbana Esperanto-Biblioteko

La biblioteko enhavas pli of naŭcent volumojn, la plej multaj el kiuj estis donacoj fare de pioniraj, pasintaj kaj nuntempaj anoj de la societo. Samtempe estas la kutimo aldoni al la stoko, ĉiun jaron, kelkajn ekzemplerojn el la plej elstaraj E-eldonaĵoj tiutempe haveblaj. En 1976, la biblioteko ricevis librojn-donacon de Elizabeth Carrick/Winsome Greenhalgh kolekto, entute pli of 150 volumoj, inkluzive de sep bele binditaj 'Literatura mondo'. En 1977, memore al sia edzino, Kav-iro Douglas Fraser el Redcliffe, donacis al la biblioteko 150 E-librojn (libraron de Kav-irino Violet Fraser). Aliaj anoj, notinda estas Norman Collier, donacis revuojn el diversaj aliaj landoj dum multaj jaroj.

## Kvinslanda Esperanto-muzeo

Malfermita la 10an de oktobro, 1981, la muzeo akiris memoraĵojn (plejparte librojn, revuojn, fotojn) kiuj ĉefe rilatis al pioniroj, tamen paralele kun tiuj kolektaĵoj estas historio de BES (1906-1985) kaj plenlistoj de anoj jaron post faro; historioj de ĉiuj kluboj/ grupoj en Kvinslando troviĝas ankaŭ en la muzeo. La nuntempa hejmo de la muzeo estas ĉe la kunvenejo de BES, tamen la fina loko estos en la celota Kvinslanda E-Domo. La muzeo konservas tutan serion de la revuo de EFK (La Voĉo) kaj, kiel eble plej multe, serion de aliaj aŭstraliaj revuoj. Oni neniam celas bibliotekon kaj ĉiu ero en la muzeo-ŝranko meritas lokon tie pro antaŭa ligo kun Esperanto aŭ en Kvinslando aŭ en Aŭstralio. La Kvinslanda muzeo multe profitis pro la helpemajs muzeo de NSK, Aŭstralia Nacia E -Biblioteko kaj Biblioteko de MES.

## Biblioteko de Sud-Aŭstralia Esperanto-Societo

Ne estas detaloj pri la biblioteko, sed dum pasintaj jaroj, F-ino Win Addis kaj aliaj anoj prizorgis la libraron kiu plejparte devenis de donacoj fare de pioniraj, pasintaj kaj nuntempaj membroj. Sed aldone al tio, aĉetado de ĝisdataj libroj provizas sufice ampleksan bibliotekon kiu servas al anoj, ĉu lernantoj, ĉu instruistoj, kiel fonto de havebla informado.

## Biblioteko de la Ligo de Okcidenta Aŭstralio

Libraro de ELOA troviĝas en la biblioteko de Universitato-murdoch en Perto. Dank' al la persistaj klopodoj de S-ino Ruth McGrath, la Ŝtat-Bibliotekisto fine konsentis transdoni al la Biblioteko de la Universitato la E-librojn el 'Kolekto-Caldera'. Ĉi tiu kolekto, antaŭ multaj jaroj estis metita en la Ŝtatan Bibliotekon kie anoj trovis ĝin nefacilan por konsulti aŭ ekzameni. Ĉi tiu tuta libraro nun estas multe pli facile havebla al ĉiuj anoj. En la biblioteko estas ĉirkaŭ 750 katalogitaj titoloj kun pli of 1000 libroj entute. Rnkau trovi"gas gazetoj kaj revuoj, inkluzive de Esperanto, Australian Esperantist, Brita Esperantisto, Nigra Cigno, Homo kaj Kosmo, El Popola Cinio, kaj aliaj aĵoj - broŝuroj, tezoj kaj fotoj. La libraro estas profesie katalogita.

## Biblioteko de Launcestona Esperanto-Klubo.

La Launcestona Klubo fondiĝis en 1974 kaj en 1975 la estraro petis de la antaŭa grupo ĉe Hobarto, pruntedonon de kelkaj libroj el ties biblioteko. La estintaj sekr. S-ino H. Cooper kaj kas. S-ro H. Cooper decidis donaci la tutan libraron al la novefondita klubo en Launcestono, "por ke la laboro kaj celo de D-ro Zamenhof antaŭeniru". Ĉi tiu libraro kiu plejparte konsistas el donacoj fare de pasintaj anoj de grupoj en Hobarto nuntempe estas la kerno de sufice ampleksa biblioteko en Launcestono. En 1979 estis donacitaj al la Ŝtata Regiona Biblioteko en Launcestono, 350 libroj, por starigi E-Fakon en tiu biblioteko; faris la donacon S-roj Mac LeFevre kaj Ralph Harry.

## Biblioteko de Manlia Esperanto-Klubo

La biblioteko lokiĝas en granda ŝranko, ĉe Vespera Kolegio, Manlio laŭ malavara permeso de S-ro Wilkinson, estro de la kolegio, kie ekde 1961 kunvenis la klubo. La biblioteko enhavas romanojn (proks. 100) kiujn anoj povas pruntepreni, senpage; aron de lernolibroj (Jen Nia Mondo, Step by Step, ktp. proks. 30) kune kun proks. 100 diversaj romanoj por klaslegado kaj studado. Aldone estas konsultlibroj, Plena Ilustrita Vortaro kaj Plena Analiza Gramatiko. Ĉiujare, laŭ monrimedoj, la klubo aĉetas novajn librojn por ĝisdatigi la bibliotekon. Granda stoko de magazinoj kaj ĵurnaloj troviĝas en la ŝranko, plejparte ĉi tiuj estas donacitaj de klubanoj; ekstraj ekzempleroj estas senditaj eksterlanden, laŭ petoj.

## Aliaj libraroj.

Kiel menciitaj en la unua alineo, ĉiuj grupoj, kluboj, asocioj kaj societoj provizas libraron, ĉu grandan, ĉu negrandan, sole por la uzo de anoj; plejparte ĉi tiuj estas studlibroj kaj vortaroj, sed multaj enhavas romanojn, konsultlibrojn, antologiojn, laŭ la bezono kaj monrimedoj de la koncernata grupo.

*          *          *

## Ĉapitro 7

### LA DELEGITA RETO 1 9 0 9 - 1 9 8 5

Kiam UEA fondiĝis en 1908, estis decidite starigi 'Delegitan Reton', en urboj kie estis anoj de UEA. Dum multaj jaroj esperantistoj akceptis la respondecon, per aliĝo al la Reto, transpreni taskojn rilate al diversaj aferoj; respondi demandojn pri turismo, komerco, instruado k.s., laŭ la principoj entenataj en la Ĝenerala Regularo de UEA, kaj en la Regularo pri la Servo de Informpetoj al UEA - delegitoj. En 1909 la unuaj delegitoj en Aŭstralio akceptis tiun respondecon kaj plejparte, krom la malfacilaj jaroj dum la du mondmilitoj, subtenis daŭran reton; hodiaŭ (1985) estas 44 Delegitoj en Aŭstralio, kiuj estas pretaj respondi al diversaj petoj.

Sekvas listo, laŭ alfabeta ordo de urboj, pri Aŭstralia] Delegitoj, kaj de UEA kaj de IEL (Internacia Esperanto Ligo 1938 - 1947).

Mallongigoj: UEA (CD = Cef Delegito: D = Delegito: VD = Uic-Delegito:)
UEA (SD = Sub-Delegito: FD = Fak-Delegito: JD = Junul-Delegito:)
IEL (D-IEL: VD-IEL: FD-IEL:)

*　　*　　*

ĈEF-DELEGITOJ:
S-ro C.W. Ballard (UEA) 1923-1927
S-ro L.E. Pfahl (IEL) 1939-1947; (UEA) 1951-1955
S-ro K.G. Lipton (UEA) 1956-85
S-ino S.M. Burkitt (UEA) 1985

ADELAIDE (S.Aŭst.)

S-ro W.D.Smith (D)1911
S-ro F.G.Hooper (D) 1912
S-ro D.I.Lyall (D)1913-16
S-ro W.L.Waterman (D)1925-35
S-ro J.Couche (D-IEL)1938-39
S-ro R.N.Brown (VD-IEL)1944-47
F-ino W.Addis (D-IEL )1940-47;(D)1948-78
S-ro E.L.Shelton (FD-IEL )1944-47
S-ro H.W.Buswell (FD-IEL)1945-47;(VD)1948-55
S-ino T.v.d.Boorgaard (D)1979-81
S-ro R.Felby (VD)1979-81;(D)1982-85

BACCHUS MARSH (Vik.)

S-ro D.P.Halls (D)1956-57

BANKSTOWN (NSK)

S-ro E.A.Pryke (D)1925-33

BARRABA (NSK)

S-ro E.A.Pryke (D)1922-23

BEALBA (Vik.)

S-ro C.Jenkin (D)1910-11

ALBANY (Okc.Aŭst.)

S-ino E.Dougan (D)1951-52;1965-66

ALBURY (NSK)

S-ro F.V.Taylor (D-IEL)1945-47;(D)1948-61

ALECTOWN (NSK)

S-ro E.Unger (D)1936

ARMIDALE (NSK)

S-ro P.A.Robertson (D)1981-83

AVOCA BEACH (NSK)

S-ro F.R.W.Thomas (D-IEL)1945-46

BALLARAT (VIK.)

S-ro K.Podenas D)1951-BO
F-ino J.Clack (FD)1967

BATHURST (NSK)

S-ro J.Davidson (D)1955-56
S-ro A.Towsey (D)1961-63

BENALLA (Vik.)
D-ro A.E.Barrington (D)1911-16
S-ro J.H.Jones (VD)1911-16

BOWEN (Kvins.)
S-ro G.(n.Shardlow (D-IEL)1940-45
S-ro M.McKay (D-IEL)1946
S-ro N.A.Collier (0)1969-75

BRISBANE (Kvins.)
S-ro L.W.K.Wirth (D)1910
S-ro P.Proctor (0)1911-15
S-ro J.H.Cadell (VD)1911-15
S-ro P.W.Pears (0)1916
F-ino M.Fraser (D)1922-25
S-ro L.W.K.Wirth (UD)1924-27
S-ro O.H.Behncken (0)1928-36;(0-IEL)1937-38
S-ro C.Kidd (VD)1928-35
S-ro S.L.Parry (D-IEL)1945-47;(D)1948-66
S-ino U.Fraser (UD)1956-58
S-ro S.Beck (VD)1959-71
S-ro H.V.Petley (FD)1967-69
S-ino W.Greenhalgh (0)1974-80;(FD)1981-84
S-ro R.Ross (FD)1977-80;(D)1981-85
S-ro T.Steele (VD)1979-85
S-ino A.Spencer (FD)1982-85

CLAREMONT (Okc.Aust.)
S-ino H.E.Mottrarn (D-IEL)1945-47

COFFS HARBOUR (NSK)
S-ino G.Kirkwood (FD)1964-85

CURLEWIS (Vik.)
F-ino M.M.Bennett (0)1911-15

DEE WHY-MANLY (NSK)
S-ro A.Cocking (0)1979-BS

DROUIN (Vik.)
S-ro D.Pescod (0)1982-85

EAST MAITLAND (NSK)
S-ro E.A.Pryke (0)1910-16

EMU PARK (Kvins.)
S-ro J.B.Moore (0)1975-85

FREEMANTLE (Okc.Aŭst.)
F-ino K.R.Litten (0)1911

BLACKHEATH (NSK)
S-ro F.A.W.Thomas (0)1932-33;1936;(0-IEL)1938

BOGANGATE (NSK)
S-ro W.A.Marshall (0)1924-25

BOX HILL (Vik.)
S-ro A.H.Serpell (0)1925-30
S-ro A.Heathfield (0)1973-74

BRUCE ROCK (Okc.Aŭst.)
S-ro W.L.Illingworth (D)1951-57

BUDERIM (Kvins.)
S-ro N.A.Collier (0)1979-83

BUNDABERG (Kvins.)
S-ro C.N.Lovejoy (0)1910-11
S-ino E.Haigh (VD)1911
S-ino J.Langtree (D-IEL)1945-47

CAMDEN (NSK)
S-ino E.Turnbull (0)1951-55

CANBERRA (AFT)
S-ro S.Fulop (0)1953-59
S-ro R.L.Harry (VD)1953
D-ro R.Robbins (0)1960-67
S-ro N.Gamble (FD)1968;(D)1969-78
S-ro W.Amies (FD)1969-72
S-ino M.Ellyard (0)1979-85

COLUMBOOLA (Kvins.)
S-ino J.Freeman (D-IEL)1946-47

DEEPDENE (Uik.)
S-ro W.A.Kaye (D)1982-84

DEVONPORT (Tas.)
S-ro G.Hillerman (D-IEL)1940-44
S-ro C.Ramsay (D)1951-60

ELIZABETH (S.Aust.)
S-ro G.Clarke (D)1977-85

FITZROY (Vik.)
S-ro I.Grahovac (FD)1966-70

GERALDTON (Okc.Aŭst.)
S-ro A.Saar (D)1929-34

GISBORNE (Vik.)
S-ro R.M.Lanyon (D)1916-21
S-ro W.MacPherson (D)1922-24

GOONDIWINDI (Kvins.)
S-ino H.Johansen (D-IEL)1940-47;(D)1948-50

HAKEA (Okc.Aŭst.)
S-ino E.E.Sainsbury (D-IEL)1945-47

HAZELBROOK (NSK)
D-ro S.J.Woolnough (D-IEL)1947

HOBART (Tas.)
S-ro N.Carryer (D)1914-16
S-ro D.Guilbert (D)1920-38
S-ro F.Archer (D-IEL)1938-39
S-ro J.Couche (D-IEL)1944-47;(D)1948-57
S-ino A.Douglas (D)1960-65
S-ro E.Loorits (FD)1963-77;(D)1978-85
S-ino H.Cooper (UD)1965;(D)1966-77
D-ro A.Capell (FD)1960-65;1974-75

KALAmUNDA (Okc.Aŭst.)
S-ro D.R.Thompson (D)1953-64

KALGOORLIE (Okc.Aŭst.)
S-ro C.P.Hehir (D-IEL)1947;(D)1948-62

LEONGATHA (NSK)
S-ro W.Gray (D)1932-36;(D-IEL)1937-38

LORD HOWE ISLAND (NSK)
S-ino E.Foreshaw (D)1924
S-ro M.Nicholls (D)1925-26

MANLY (NSK)
S-ino M.Duncan (D)1962-85
S-ro L.V.Scott (FD)1973-85
S-ino B.Cleminson (FD)1977-78;1984-85

M0E (Vik. )
S-ro I.T.Maddern (D)1958-61

MOREE (NSK)
S-ro E.M.Woodruff (D)1965-79

MORNINGTON (Vik.)
F-ino J.Dixon (D)1911-12

G00MERI (Kvins. )
S-ro E.Kelk (D)1951-52

GUYRA (NSK)
S-ro F.J.Mann (D)1924-28

HAMILTON (Vik.)
S-ro F.S.Chamberlain (D-IEL)1938
S-ro J.Ilic (D)1981-82

HEALESVILLE (Vik.)
S-ro J.Tumman (D)1981-85

INGHAM (Kvins.)
S-ro E.Hanhiniemi (FD) 1968-70

IPSWICH (Kvins.)
S-ro P.W.Pears (D)1913-15

JUNEE (NSK)
S-ro D.Frederiksen (D)1910

KALBAR (Kvins.)
S-ro E.Peck (D-IEL)1945-46

LAUNCESTON (Tas.)
S-ro J.Gibson (D)1965-72
S-ro Mac LeFevre (D)1977-85
S-ro C.Strochnetter (VD)1981-85

LITHGOW (NSK)
S-ro J.H.King (D-IEL)1940-47

MACKAY (Kvins.)
S-ro B.Kostinek (D)1954

MELBOURNE (Vik.)
D-ro S.MacBurney (UD)1909;(D)1910
S-ino M.Harrison (VD)1910-13
S-ro G.Whiteford (D) 1912-18
S-ro C.W.Ballard (VD)1915-18;(D)1919-27
S-ro M.J.Hyde (VD)1919-21
S-ro R.R.Rawson (UD)1923-27;(D)1928-36; (D-IEL)1937-47;(UD)1948-50
F-ino V.Cox (VD)1929-36 (UD-IEL)1937-47;(UD)1948-57
D-ro F.Williams (FD-IEL)1947;(FD)1948-61
S-ro F.R.Banham (FD-IEL)1942-47; (FD)1948-55
S-ro F.Halls (FD-IEL)1947;(UD)1948-54

MELBOURNE (Vik.)
S-ro K.Linton (D)1952-62;(CD)1955-85
S-ro F.V.Taylor (D)1963-65
S-ino I.Fink (FD)1965-67
S-ro J.Ryding (FD)1965-80
S-ro S.Milligan (D)1967-72
S-ro H.M.Cohen (FD)1967
S-ro A.J.Baldwin (FD)1970-72;(D)1973
S-ro S.Kanacki (FD)1977-80;(D)1981-85
S-ro F.H.Thorpe (FD)1975-76
S-ro E.Chick (VD)1981-85
S-ro A.E.Shaw (FD)1982-85
S-ro L.Cresswell (FD)1982-85
S-ino A.Paling (FD)1982-85
S-ino J.Courtenay (D)1978-80
S-ro W.A.Kaye (FD)1985

NELSON BAY (NSK)
S-ro S.R.Richardson (D)1924-26

NORTH CURL CURL (NSK)
S-ro F.A.W.Thomas (D-IEL)1947

NORMANTON (Kvins. )
D-ro A.R.MacLurkin (D-IEL )1945-46

NOWRA (NSK)
S-ro G.D.Kvarnstrom (D)1924-31
S-ro R.F.Latimer (D)1954-58

PARKES (NSK)
S-ro A.Towsey (D-IEL)1947;(D)1948-60

PERTH (Okc.Aŭst.)
S-ro H.M.Leighton (SD)1909-10
S-ro J.G.Baker (D)1916
S-ro C.Caine (D)1921-31;1934-35
S-ro A.Saar (D)1938
S-ro E.R.Walker (D-IEL)1937-47;(D)1948-56
S-ro N.V.D.Brodie (VD-IEL)1945-47;
(VD)1948-55
S-ro H.Byatt (FD-IEL)1945-46
D-ro C.J.Caldera (FD-IEL)1945-47;
(FD)1948-51
F-ino O.Strempel (FD-IEL)1946-47;
(FD)1948-50
S-ro J.Finch (D)1958
S-ino R.McGrath (D)1959-85
S-ino A.Sedgley (VD)1962-69
S-ro J.R.Richardson (FD)1967-69
S-ro D.Thorp (FD)1969-74;1976-82
D-ro T.Einihovici (FD)1973-85

M0RWELL (Vik.)
S-ro I.T.Maddern (D)1965-80
S-ino M.Wybenga (VD)1979-80;(D)1981-85

MT. VICTORIA (NSK)
S-ro H.R.Rienits (D)1924-26

MT. WAVERLEY (Vik.)
S-ino I.Fink (D)1955-61

MULLEWA (Okc.Aŭst.)
S-ro J.Finch (D)1951-52

NAMBOUR (Kvins.)
S-ro N.A.Collier (D)1966-68

NARROGIN (Okc.Aŭst.)
S-ro W.L.Illingworth (D-IEL)1945-46

NEDLANDS (Okc.Aŭst.)
D-ro C.J.Caldera (D)1963-66

NEWCASTLE (NSK)
S-ino E.Foreshaw (D)1925-31;(VD)1932-35
S-ro F.V.Taylor (D)1932-36;(D-IEL)1937-38
F-ino C.Logan (D-IEL)1939-40
S-ro R.Perry (D)1953-54

ORANGE (NSK)
S-ro F.Acs (D)1970-75

ORROROO (S.Aŭst.)
S-ro G.Clarke (D)1974-77

PARRAMATTA (NSK)
D-ro S.J.Woolnough (D)1934-36;(D-
IEL)1945-46

PICTON (NSK)
S-ro A.Towsey (D)1967-68

PLUMPTON (NSK )
Pastro Sigismondo (D)1954-57

PORT LINCOLN (S.Aŭst.)
S-ro S.H.Grant (D)1965-80

PORT PIRIE (S.Aŭst.)
S-ro H.G.Onn (D-IEL)1946-47

PRESTON (Vik.)
S-ro H.M.Cohen (D)1964-65

PERTH (Okc.Aŭst.)
S-ino V.Payne (VD)1979-85
F-ino J.Walker (JD)1983-85

RABAUL (NG)
S-ro m.Hyde (D)1922
S-ro F.Simon (VD)1922

RED CLIFFS (Vik.)
D-ro R.Robbins (FD)1982-85

ROCHESTER (Vik.)
S-ro J.Dimo (D)1964-71;(VD)1972-78;(D)1979-83
F-ino J.Clack (FD)1967-71;(D)1972-78

ROSEDALE (NSK)
S-ro R.Baxter (D)1978-85
S-ino M.Baxter (FD)1979-80

SALE (Vik.)
S-ro F.S.Chamberlain (D-IEL)1939

SEYM0UR (Vik.)
S-ro A.Bassett (D)1925-29
S-ro P.Holmes (D)1953-72

ST. MARYS (Tas.)
Pastro C.Cowling (D-IEL)1944-46

SUNSHINE COAST (Kvins.)
S-ino D.Sinclair (D)1970-85

TAHM00R (NSK)
S-ro A.Towsey (D)1972-85

TAMBORINE (Kvins.)
F-ino A.Curtis (D)1966-85

TAMWORTH (NSK)
S-ro B.F.Fryer (D)1911-15
S-ro R.Cleary (D)1936;(D-IEL)1937-39

TOOWOOMBA (Kvins.)
S-ro$_f$ H.V.Petley (D)1970-79
S-ino J.Lehane (VD)1979;(D)1980-85

TORRENSVILLE (S.Aŭst.)
S-ro W.L.Waterman (D)1922-24

PENSHURST (Vik.)
S-ro Juraj Iliĉ (D)1984-85

PROSERPINE (Kvins.)
S-ro B.Kostinek (D)1955-61

QUEENSTOWN (Tas.)
Pastro C.Cowling (D-IEL)1946

REDCLIFFE (Kvins.)
S-ino V.Fraser (D)1959-68
S-ino A.Pritchard (D)1972-76

RICHMOND (NSK)
S-ro G.DiRago (D)1932-35

ROCKHAMPTON (Kvins.)
S-ro C.S.Price (D)1911-13
Pastro H.V.Rymer (D-IEL)1943-46
S-ro N.Russell (D)1958-61
S-ro H.V.Petley (FD)1964-65
S-ro J.B.Moore (D)1964-74
F-ino J.Turner (VD)1974;(D)1975-85
S-ino Y.Rayner (FD)1975-85
F-ino D.Davies (VD)1975

SHEPPARTON (Vik.)
S-ro E.A.Turner (D-IEL)1939-47;(D)1962-73

ST. HELENS (Tas.)
S-ro C.Strochnetter (D)1980

SYDNEY (NSK)
S-ro B.G.Watson (SD)1909;(D)1910-11
S-ro W.Weston (SD)1911
F-ino E.M.Andrews (SD)1911;(VD)1912-15
F-ino M.E.Andrew (SD)1911-15
F-ino E.Scheidel (SD)1911-15
S-ro W.F.Beattie (SD)1911
S-ro A.Schneider (SD)1911
S-ro W.Fairless (VD)1911-15
F-ino M. Adamson (D)1912-15
S-ro J.Chedgey (SD)1912-15
F-ino J.G.Orr (SD)1912-15;(VD)1932-33
S-ro A.A.Laird (D)1922
S-ro L.E.Pfahl (VD)1922-23;(D)1924-36;
(D-IEL)1937-38;(CD-IEL)1939-47;
(CD)1951-55
S-ro F.R.McCallum (D)1938
F-ino A.Shirvington (D-IEL)1939-47;(FD)1948-51
S-ro A..C.Boyle (D-IEL)1944-47
S-ro W.R.Lamb (VD-IEL)1944-47;(VD)1948-59

SYDNEY (NSK)
S-ro P.Schwerin (FD-IEL)1944-47;(FD)1948-78
S-ro F.V.Taylor (FD-IEL)1944
S-ro E.W.Chandler (FD-IEL)1947;(FD)1948-66;
(FD)1976-84
D-ro K.L.G.Smith (FD-IEL)1947;(FD)1948-50;
(D)1951-53;(FD)1964-83
Pastro I.Serisev (FD)1950-61
S-ro C.Hickey (FD)1952-68
S-ro J.Klatasin (D)1954-80
F-ino E.Dash (VD)1955-65
D-ro A.Capell (FD)1964-74;(FD)1976-79
S-ro F.M.Dunn (FD)1966-85
F-ino A.Dennys (FD)1969-83
Prof. R.L.Robertson (FD)1973-85
S-ino M.Liston (FD)1972-74
S-ino M.Chaldecott (VD)1979-80;(D)1981-85
S-ino B.Hart (VD)1981-85
S-ro D.Gould (FD)1983-85
S-ino S.M.Burkitt (FD)1985
S-ro A.Hall (FD)1985

YETHOLME (NSK)
S-ro T.Porter (D-IEL)1939-47;(D)1948-55

TOWNSVILLE (Kvins.)
S-ro C.S.Price (D)1910
S-ro G.Laylor (D)1911-12
S-ro L.m.Glynn (D)1925-30;(D-IEL)1943-47

WARWICK (Kvins.)
S-ro P.W.Pears (D)1910-12
S-ro C.C.Dornbusch (D)1913-32

WELLINGTON (NSK)
S-ro L.Enderby (D)1932-36;(D-IEL)1937-45

WODONGA (Uik.)
S-ro I.T.Maddern (D)1955-57

WYALKATCHEm (Okc.Aŭst.) S-ro J.S.Finch (D)1959-61

WYNNUM (Kvins.)
S-ino H.Johansen (D)1951

YINNAR (Uik.)
S-ro M.F.Walker (D)1925-28

## Ĉapitro 8

## ESENCAJ KAJ ASOCIAJ ĈENER0J DE AEA

PREMIO "Isor Masel".

La premio estis starigita ĉe la Okcidenta Esperanto-Ligo en 1948 pro la oficiala iniciato de la prezidanto de la Societo de Amikoj de Esperanto, S-ro M. Strassburg, kiu prenis sur la Societon kaj eventuale sur sin mem la respondecon provizi la sumon de kvin pundoj ($10) ĉiujare, kiel premion por la plej bona literatura verko originale skribita en Esperanto.

Al la premio povis aspiri ĉiuj esperantistoj el la Pacifica regiono, t.e. Aŭstralio kaj Nov-Zelando. La konkurso fermiĝis la 30an de junio en ĉiu jaro, kaj la juĝo, sen rajto apelacia, estis en la manoj de juĝanto elektita de la komitato de la Ligo.

La verkoj devis esti inter 1000 kaj 1500 vortoj; la temoj estis tute liberaj laŭ plaĉo de la verkantoj, sed ili devis esti proze ellaboritaj, tamen la komitato rezervis al si la rajton ĉiun kvinan jaron doni premion por poezia verkado. Se iu esperantisto dufoje gajnis la premion, tiu ne plu povis partopreni en la konkurso. (Isor Masel aliĝis al la E-movado en 1938; li estis ano kaj poste prez. de la Westralian E-Societo. Li estis fond-prezidanto de E-Ligo de Okc. Aŭstralio en 1943. Diplomito de BEA, li starigis kursojn kaj ekzamenojn pri Esperanto ĉe la Ligo. Li elektiĝis Dumviva Membro de la Ligo kaj memore al Isor Masel estis starigita la supremenciita premio).

AUSTRALIA INSTRUISTA ESPERANTO-SOCIETO (AIES).

Fondiite en 1950, dum la sepa kongreso de AEA, AIES celis al disvastigo de Esperanto en lernejoj; oficiala novaĵletero estis 'La Klerigo' kaj red. estis S-ro Wre Chandler. La unua estraro jene: prez. W. Chandler; vicprez-oj F-ino 0. Strempel, D-ro A. Friedenbergs; sekr./kas. E. C. Kelk. Aliaj estraranoj ĝis 1966 jene: D-rino V. Summers, S-inoj G. Pollard, A. Sedgley; S-roj M. Leereveld, I. Maddern, S. Grant, G. Lancaster, K. Smith; F-ino G. Fink. La societo kunvenis dum ĉiu kongreso de AEA; inter kongresoj anoj korespondis kiam necese.

En 1966, okazis nomŝanĝo al Asocio por la Instruado de Esperanto en Aŭstralio (AIEA) kaj ne plu estis devige ke anoj estu profesiaj instruistoj. Pluaj estraranoj jene: S-inoj D. Sinclair, M. Duncan, R. McGrath, W. Wybenga; F-ino W. Addis; S-roj S. Blockley, F. Mueller-Soraù, J. Moore.

En 1978 okazis alia nomŝanĝo al Pacifika Asocio por Instruado de Esperanto (PAPIE), revuo-Transoceana (red. T. Steele). Estraranoj jene: T. Steele, S. McGill (Nov-Zelando), T. O'Grady, R. Ross, A. Towsey, T. Elliott; S-ino J. Lehane. En 1984, PAPIE malfondiĝis ka j anstataŭis ĝin filio de ILEI; novaj anoj, S-inoj A. Spencer, V. Payne, M. Ellyard, S. Gradussov.

Ekzamenoj

En 1961 AEA, kun la aprobo de la Akademio de Esperanto, starigis ekzamenojn laŭ tri kategorioj: norma elementa provo; norma supera provo; norma klereca provo. Ĉiuj esperantistoj en Aŭstralio kiuj posedis Kapableco-Diplomon de la Brita Esperantista Asocio, estis invititaj de la Akademiestro de Esperanto, S-ro Isbruker, sin submeti al speciala provo por ke li elektu aron da ekzamenistoj.

En tiu Provo sep el la kandidatoj sukcesis, nome: Pastro C. C. Cowling, S-ro K. G. Linton, S-ino P. Hanks, S-ro F. R. Banham, D-ro A. Friedenbergs, S-ro P. Schwerin kaj D-ro C. J. Caldera. Ili fariĝis dumvivaj specialaj ekzamenistoj de AEA. En la estonteco ĉiuj gajnintoj de la Klereca Diplomo de la Asocio fariĝos siavice dumvivaj ekzamenistoj de la Asocio; la posedantoj de la Supera Diplomo povas esti aligitaj al juĝanta komisiono por la Elementa Provo, se necese. (Poste estis ŝango: nur anoj kiuj gajnis la Superan Diplomon 'kun honoro' rajtas ekzameni).

Antaŭ ol tiu decido en 1961, multaj esperantistoj sukcesis pri la Diploma de BEA; aliaj pri Atesto pri Kompetenteco de Pyke-Memoriga Ekzameno. Ekzamenistoj 1943-1960, Diplomitoj de BEA jene: Ĉef-Ekzamenisto (Komisiito de AEA), Pastro C. C. Cowling; Specialaj Ekzamenistoj: S-ino A. Douglas, S-roj F.Pitt, G. Hillerman, H. Byatt, R. Rawson; D-ro C. J. Caldera.

Pastro C. C. Cowling eksiĝis kiel komisiito en 1960 kaj estris la komisionon 1961-1963 D-ro C. J. Caldera; 1964-1968 S-ro L. N. Newell; 1968-1974 S-ro F. R. Banham; 1974-1984 S-ro K. G. Linton; 1984-1985 S-ro T. Steele. Gajnintoj de la Klereco Diploma jene: 1958 D-ro C. J. Caldera; 1961 S-ro K. G. Linton; 1968 S-ino F. Koppel; 1982 S-ro T. Steele; 1984 S-ro R. L. Harry. (mortis en 1984 D-ro Caldera, en 1985 S-ro Linton).

Traduk-kursoj; Korespond-Kursoj.

Dum la jaroj inter 1914 kaj 1924 S-ro G. Gordon estris studgrupon kiu sinekzercis pri tradukado. S-ro Gordon proponis proz-pecon (500-700 vortojn) ĉiun monaton al la grupanoj kiuj resendis la provojn, kaj li vice, en la Suda Kruco (post 1921) modele tradukis la skrib-pecon kaj sumis la malfortaĵojn trovitajn dum la provoj. La kosto estis minimuma, nur sufica por poŝtkosto. De 1924 ĝis 1934, kunhelpanto F-ino B. Blyth sekretariis pri la kurso kiu daŭris ĝis la malapero de Suda Kruco en 1934. S-ro Gordon translokiĝis al Nov-Zelando en 1924, sed daŭrigis la kursojn. En 1940, S-ro F. Banham estris specialan kurson por progresintoj; ĉi tiu kurso ankaŭ estis provizita, je minimuma kosto, de Frank Banham ĝis lia morto en 1974. Pere de La Rondo (poste  Australian Esperantist) li kuraĝigis samideanojn el ĉiuj ŝtatoj plibonigi la propran stilon per tradukado kaj tiel antaŭenigi la lingvon en Aŭstralio.

En 1940, la nacia asocio inaŭguris korespond-kurson, precipe por postkomencantoj; gvidantoj estis: S-roj F.Pitt, R. Glenie, J. Butler kaj F. Culell. S-ro Pitt, en 1944 starigis kurson por studantoj kiuj ne povis ĉeesti klubojn - lernolibro estis Praktika Kurso en Esperanto, de Szilagyi. S-ro P. Schwerin enkondukis interklubajn traduk-konkursojn - kiuj kontribuis multon al la traduk-sperto inter la koncernataj kluboj kaj societoj.

Dum la 15a Kongreso de AEA, 1966, estis decidite, ke S-ino K. Schwerin estu komisiito de AEA rilate al Korespond-Kursoj. S-ino Schwerin estris la kursojn ĝis 1972; S-ro H. Koppel daŭrigis la estradon 1973-1975 kiam S-ino S. Fanos elektiĝis al la ofico - Kunordiganto por Korespond-Kursoj kaj Reklamado, 1976-77. En 1978, S-ro J. B. Moore estis elektita komisiito por Korespond-Kursoj kaj plensukcese organizis kursojn je kvin niveloj, laŭ la studkapabloj de kursanoj. Helpgvidantoj en ĉiuj ŝtatoj ege kontribuas al la nuntempa (1985) bonstato de la kursprogramo. En 1982 propra bulteno (Ĉ.5) de la korespondkursoj estiĝis, 'Esperanto Bulletin', red. S-ro A. Towsey. Antaŭaj kursgvidantoj estis: S-roj V. J. Timmins, Wre Chandler, W. Wybenga, J. Campbell, R. Smeets, H. Petley; S-ino E. Strawbridge.
Nunaj kurgvidantoj jene: S-ino A. Bruton (Castlemaine, Vik.), S-ino Straker (Sidnejo), S-ro A. Towsey (Tahmoor, NSK), S-ro Payne (Perto), S-ino K. Andersen (Brisbano), F-ino J. Moore (Emu Parko).

Ornitologia Rondo Esperantlingva (ORE)

Dum la Unua Pacifika Kongreso en Melburno, 1976, estis decidite starigi Aŭstralazian Sekcion de ORE. S-ro E. W. Chandler, la provizora prez. klarigis la celon de ORE kaj ties 'Studgrupo pri Natur-protektado'. Sekr./kas, elektiĝis S-ino Betty Cleminson; aliĝis entute 38 anoj al la sekcio, inkluzive de unu el Nov-Zelando. Red. de 'La Suda Mevido' ankaŭ estis S-ro Chandler. De 1974 ĝis 1981 S-ro Chandler estis mond-prez. de ORE; Aŭstralia peranto de ORE estis S-ino G. Kirkwood.

Gajnis la premion 'Simondetti' de ORE, S-ino G. Kirkwood kaj dufoje S-ro Chandler. (Premio-Simondetti; ORE starigis premion por honori ĉiujare la plej bonan tekston verkitan en Esperanto pri Naturscienca Temo). En 1982 estis decidite dum kunsido ĉe la 23a kongreso ke la Aŭstralia Sekcio de ORE estu filio de ORE. Vizitis al Aŭstralio, anoj de ORE el Nederlando, Ges-roj Bossong, kiuj vizitis, kun Wre Chandler, al la orientaj ŝtatoj en Aŭstralio.

Junulara Asocioj en Aŭstralio.

En 1964, ĉe la 14a kongreso de AEA, fondiĝis Aŭstralia E-Junulara Asocio, kiu aliĝis al TEJO, estraro jene: prez. F-ino G. Fink; sekr./kas. D. Kane, k-anoj: F-ino M. Fink, I. Heldzingen, M. Forster. En 1978, S-ino E. Kerr sukcese proponis, dum kongreso en Launcestono, ke "si havu la subtenon de AEA por reprezenti TEJO-n en Aŭstralio kaj organizi Asocion. Aliaj anoj kiuj aliĝis jene: Ges-roj D. kaj P. Guy, Kam Lee. En 1984 ĉe Kanbero okazis Junulara Kunveno kaj estraro elektiĝis: prez. F-ino B. Birkett; anoj: F-ino K. Lewis, Kam Lee, R. Harris, B. Silverlock. Denove sub la kadro de AEA starigas Junulara Organizado de Aŭstralio. Kontaktadreso (1985) Adrian Hall, 217 Commonwealth St., Surrey Hills, NSW, 2010.

Korespondpetoj.

De 1978 ĝis hodiaŭ (1985) prizorgis korespondpetojn en Aŭstralio, S-ino Betty Cleminson.

Skoltoj kaj Esperanto en Aŭstralio

En 1934, ano de MEK, S-ro W. Brentwood instruis al skoltoj en Viktorio kiuj partoprenis en Skolta Ĵamboreo starigita kiel parto de la Ŝtat-jarĉenta celebrado. En 1948, S-ro S. Ling, el Noble Park (Viktorio), instruis Esperanton al kvin pliaĝaj skoltoj por ke ili povu kunparoli kun eksterlandaj skoltoj dum mond-ĵamboreo, tiun jaron. La unua oficiala AEA reprezento de SEL estis S-ro S. Milligan kiu, de la fruaj sesdekaj jaroj ĝis 1973 aktive laboris pri la instruado de Esperanto al skoltoj kaj en Melburno kaj en aliaj lokoj en Viktorio; li estis SEL-peranto en Aŭstralio ĝis 1973. En 1974, SEL-peranto estis John Moore; en 1975 S-ro Hans Brendel (Brisbano); poste Hans Brendel eksterlandis kaj denove, 1976 ĝis 1984 John Moore estis SEL-peranto.

Je la fino de 1983, S-ro H. C. Bailey (BES) starigis E-budon ĉe Skolta Ĵamboreo apud Ipswich (provinca urbo en Kvinslando) kaj kun helpo de anoj de BES disdonis propagandfoliojn kaj samtempe proponis senpagan deklecionan kurson al interesataj skoltoj. Ĉi tiu kurso riĉevis monsubtenon fare de AEA, EFK, Fed. de NSK kaj individuaj esperantistoj; bedaŭrinde la Skolta Movado ne rekte subtenis la provon kaj pro tio, la decido estis lasita al la skoltoj mem, ĉu partopreni la kurson aŭ ne. Tamen la lecion-propono modere sukcesis kaj propagando pri Esperanto certe rezultiĝis. En 1984 transprenis respondecon kiel peranto de SEL, S-ino Jennifer Dimo, kiu ankaŭ estras aron de junskoltoj en la urbo, Gatton (Kvins.).

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista

En 1922, F-ino M. Helm elektiĝis Nacia Direktorino, Internacia Romkatolika Asocio en Aŭstralio. En 1923, filio de IKA estis fondita en Sidnejo - estraro S-roj A. Feldmajr kaj J. N. Edmonds. Perantoj de IKUE en Aŭstralio jene: 1953-1954 S-ro K. L. Smith; 1955-1979 S-ro V. J. Timmins; 1980-1985 F-ino C. Sullivan.

Publicista Servo/Informado.

Oficis, 1966-1969 S-ro N. Gamble; 1970-1971 S-ro H. V. Petley; 1974-1975 S-ino M. Chaldecott; 1984-1985 S-ro J. Dimo.

Internacia Biblia Misio.

Peranto, 1978-1985 S-ro L. Creswell.

Internacia Scienca Asocio.

Peranto, 1974-1985 D-ro K. Bowling.

Internacia Societo de Esperanto-Juristoj.

1909-1912 S-ro P. P. Fewings, vicprez, por Aŭstralia.

Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj.

Peranto, 1984-1985 S-ro R. L. Harry.

La Herbert Koppel Dramo-Trofeo de AEA.

En 1971 S-ro Herbert Koppel donacis belan ."ŝildon por kiu rajtas konkursi ĉiu E-Grupo dum kongreso de AEA. Gajnis la trofeon la sekvantaj grupoj; 1972 Manlio; 1974 Brisbano; 1976 Manlio; 1978 Brisbano; 1980 Manlio; 1982 Kanbero; 1984 Perto.

La Fritz Mueller-Soraù Muzika Trofeo por Kant-Grupoj.

Memore al Fritz Mueller-Soraù, fratino Herta Mueller kaj anoj el Manlio/Sidnejo donacis ĉi tiun belan ŝildon por ĥor-konkurso dum kongresoj de AEA. Unuafoje en 1984, ĉe la 24a Kongreso en Kanbero, kantgrupoj konkursis pri la Ĥor-Trofeo; sukcesis la kantgrupo de Brisbano.

Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT).

De 1952, SAT-anoj kunvenis dum ĉiu kongreso de AEA. Anoj de SAT tiun jaron aranĝis en la kadro de la kongreso la unuan fakkunsidon en Aŭstralio; elektiĝis SAT-Peranto en Aŭstralio, S-ino G. Barlow. Oni decidis propagandi Esperanton speciale inter la diversaj sindikatoj kaj laboristaj vesperlernejoj. La unua peranto de la SAT-Revuo, ᵗSennaĉiuloᵗ estis S-ro F. Buswell, 1948-1951; peranto 1952-1959 S-ino G. Barlow; 1960-1985 S-ro V. Gueltling. Tre aktivis pri SAT aferoj, S-ro M. Leereveld; aliaj fruaj anoj estis S-roj J. Matasin kaj Henk Schepers.

AEA Libroperantoj.

Dum multaj jaroj komisiitoj por Libro-Servo de AEA ege kontribuis al la movado; aldone al la ĉefperantoj de AEA, grup-perantoj rekte daŭrigis la servon al individuaj anoj. Jen estas listo de ĉefperantoj: 1942-1949 G. Hillerman; 1950-1953 F-ino W. Addis; 1954-1956 E. Hearne; 1956-1958 N. G, Mills; 1958-1959 R. Grant; 1960-1963 S-ino I. Milligan; 1964-1967 S-ino J. Andrews; 1967-1970 S-ino I. Fallu; 1971-1985 T. Elliott.

Honorinsigno - Fratuloj de AEA.

Dum la 17a Kongreso de AEA en 1970, estis akceptite ke AEA havu Honoran Diplomon por esperantistoj kiuj elstare laboris por AEA kaj por Esperanto ĝenerale. Estis starigita tripersona komisiono kiu rekomendos al la estraro, indajn personojn. Anoj de la komisionon de 1970 ĝis 1980 jene: S-inoj F.Koppel, R. McGrath; S-ro j V. Gueltling, V. Timmins, R. Ross. Dum la kongreso en 1980 estis decidite ke la aro de Fratuloj de AEA transprenu tiun rekomendon al la estraro. Ne pli ol du personoj estas honorigataj en unu dujara periodo. La Fratuloj estas: 1974 F. R. Banham, H. Koppel; 1976 C.J.Caldera, R.L.Harry, K.G.Linton; 1982 E.W.Chandler; 1984 R.G. Robertson, S-ino T.Duncan.

J.G.Pyke-Memoriga Ekzameno.
Omaĝe al la memoro de J. G. Pyke, anoj de MEL starigis fonduson por ebligi jaran ekzamenon (unue en Melburno, sed poste en ĉefurboj de ĉiuj Ŝtatoj) jene:
a). ĉiuj kandidatoj kiuj gajnis pli ol 66 procentojn de eblaj poentoj ricevu ateston pri kompetenteco;
b). speciala monpremio (kvin gineoj) al la plej kapabla kandidato kiu komencis studon tiun saman jaron (poste tiu kondiĉo iomete ŝanĝis, al kandidato kiu komencis studon post la 1-a de novembro en la antaŭa jaro - t.e. tutjara studado). La ekzameno estis kaj skriba kaj parola kaj, de 1931 ĝis 1962, kandidatoj sin prezentis en diversaj urboj al ekzamen-komitatoj tiucele starigitaj. Kuratoroj de la J. G. Pyke memoriga Fonduso estis: W. J. Drummond, E. McKenzie kaj R. R. Rawson.

Post la starigo de ekzamenoj de AEA en 1961, ne plu estis entuziasmo por la ekzameno-Pyke kaj en 1962 nur eseo-konkurso estis proponita. Dum la pli ol tridekjara periodo kiam la ekzameno-Pyke ekzistis, multaj esperantistoj kaptis la okazon fari la unuan paŝon laŭ la vojo al fina kompetenteco per la Pyke-Memoriga Ekzameno.

Ekspedantoj de la Nacia Revuo.
Estas grave ke revuoj, post eldonado, atingu la abonantojn kiel eble plej rapide, kaj multaj dedicaj komisiitoj ja faris tiun neĉesan taskon. Analoj diras ke ekspedantoj de la Suda Kruco, 1921-1934 estis S-ro E. J. Cox kaj F-ino V. Cox - Melburno. Pri La Rondo kaj The Australian Esperantist jen estas la ekspedantoj:

| | |
|---|---|
| 1940-1946 | F-inoj W. Addis, L. Bailey, R. Telfer |
| 1947-1955 | S-ino A. G Hintze - Melburno. |
| 1956-1970 | F-ino V. Cox - Melburno. |
| 1971-1972 | S-ino M. Fordham - Melburno. |
| 1972-1985 | Ges-ro j J. kaj I. Fallu - Oakleigh. |

## LA FONDUSOJ DE AEA

La Asocio ricevis de tempo al tempo heredaĵojn aŭ donacojn por specialaj celoj kaj starigis fondusojn, honore al donacinto aŭ alia meritinto. Tiuj fondusoj jam ludis gravan rolon rilate al la koncernata celo kaj anoj de AEA malavare subtenis per mondonacoj ĉiujn fondusojn. La ĉefaj fondusoj starigitaj estas:

J. G. Pyke-Memoriga Fonduso
Omaĝe al la memoro de J. G. Pyke, anoj de MEK en 1931 starigis fonduson por ebligi jaran ekzamenon(Ĉ.8.), J. G. Pyke-Memoriga Ekzameno. En 1977 la Pyke-Memoriga Fonduso proponis Eseo-Konkurson; la temo estis, 'Kiel Aktivigi Ne Plu Aktivajn Esperantistojn'. La premio estis senkosta flugo de Melburno al Launcestono, je la okazo de la 21-an Kongreso de AEA. Sukcesis pri la konkurso S-ino Dorothy Threlfall, el Perto, Okc. Aŭstralio.

Fonduso Por Nomi Ĉambron en UEA-Domo en Rotterdamo
Dum la 14-a kongreso do AEA en Melburno, 1964, estis decidite starigi fonduson por kolekti sumon de 625 pundoj ($1250) tiucele. La fonduso, post tri jaroj, sukcese atingis la celatan sumon kaj Ĉambro-Aŭstralio (konferenca ĉambro kaj arfiivejo de CED) estiĝis.

La 'Tajni" Goldsmith memoriga Fonduso
Ĉi tiu fonduso estis iniciatita de Esperanto-Federacio de NSK, memore al 'Tajni' Goldsmith, antaŭa estrarano de la Fed. kaj sekr. de AEA de januaro 1968 ĝis deĉembro 1971. La celo de la fonduso estis helpi, per informado kaj anoncoj, varbadon de novaj membroj.

La Fonduso-Simpkins

La fonduso honorigas S-ron Simpkins, kiuj kelkfoje vojaĝis al Aŭstralio inter 1954 kaj 1970 kaj kiu fine testamentis al AEA pli ol $2000. La celo de la fonduso estas helpi E-organizaĵojn en ilia agado, per egalaj distribuoj al ĉiuj ŝtataj organizaĵoj, el la interezo de la heredaĵo.

La ' Australian Esperantist' - Subten-Fonduso

La redakcio de AE lanĉis, en 1980, kun aprobo de la estraro de AEA, specialan Subten-Fonduson por la nacia gazeto. La celo estis kolekti sufiĉan monon por pli ofta eldonado de la gazeto kaj samtempe daŭrigi la altan nivelon. Anoj de AEA ĉiujare, malavare subtenas la fonduson.

La Fonduso, Matasin-Banham

F. R. Banham-Memoriga Fonduso estis starigita post la morto de F. R. Banham (Ĉ.3) en 1974, memore al lia elstara kontribuo al la E-movado en Aŭstralio; la celo estis helpi pri la eldono de libroj verkitaj aŭ tradukitaj de aŭstralianoj. Fonduso-Matasin estis starigita de AEA, post kiam la nacia asocio ricevis, en marto 1982, malavaran donacon ($2000), fare de S-ino Eve Matasin, memore al la mortinta edzo, John (Ĉ.3). La estraro de AEA decidis starigi fonduson por helpi pri eldonado de libroj aŭ' broŝuroj, aŭ por la aĉeto de eldonitaj libroj. Poste, ĉar la du fondusoj Matasin kaj Banham samcelis, estis decidite kombini la du kaj la Fonduso, Matasin-Banham estiĝis.

Fonduso Por Esperanto-Stipendio

Ĉi tiu fonduso estis starigita laŭ propono de Launcestono E-Klubo ke anoj de AEA donacu $3000 al proponita donaco de $1500 fare de la Launcestono Klubo, por estigi la fonduson. Post starigo de la fonduso, estis decidite ke nur la interezo estu uzata por ebligi al aŭstraliaj esperantistoj studviziti eksterlande, aŭ por vizitoj de eksterlandaj esperantistoj al Aŭstralio cele al la antaŭenigo de la E-movado en  ĉi tiu lando. En maĵo, 1983, Tasmania junulino, Shaunnagh (Ŝone) Dorsett ricevis stipendion por helpi ŝin viziti E-klubojn en Japanujo kaj partopreni la 31an Regionan Kongreson en Ikeda, fratin-urbo de Launcestono. malavaran donacon ($1000) faris Ges-roj Gerald kaj Ruth Tumman en 1985, al ĉi tiu fonduso.

# Ĉapitro 9

## SOMERLERNOJ DE AEA

Unua.

En januaro, 1977, S-ino Jean Lehane, prez. Toowoomba Esperanto-Societo, iniciatis E-kursojn en la kadro de "Darling Downs Institute of Advanced Education" (Instituto de Altgrada Edukado en Toowoornba). Alia j(ĉirkaŭ 30) kursoj samtempe okazis ce DDIAE sed la E-kursanoj loĝis kaj studis ĉe Kolegio-Fairholme (kolegio por knabinoj) kie ĉiam regLs bona amikema kaj samideana etoso dum la dektaga kursperiodo.

Instruis la klason por komencantoj, S-ro Wre Chandler (Sidnejo) per 'Privilegia Vojo al Lingvoscio'; la klason por mezgraduloj instruis S-ro Ray Ross (Brisbano) per 'Pasoj al Plena Posedo'; gvidis la altgradulojn, S-ro Trevor Steele (Brisbano) per 'Kiel Akvo de l' Rivero' kaj 'Humoroj'.

Krom studoj, ankaŭ okazis: tuttaga ekskurso per aŭtoj, al rezervejo por indiĝenaj flaŭro kaj faŭno; rostfesto ĉe hejmo de S-ro Bob Weis, kiu tie gastigis la kursanojn; oficiala bankedo ĉe DDIAE; vizito al metio-elmontraĵoj ĉe DDIAE; ĉiun vesperon, distraĵoj diversspecaj.

Sendube la unua somerlernejo plensukcesis; la venonta, en 1979 (post du jaroj pro la intervena kongreso de AEA) denove okazos en Toowoomba.

Klasanoj kiuj partoprenis jene: S-inoj P. Guy, J. Hock, F-ino J. Turner, S-ro R. McNeill (Rockhamptono). S-inoj E. Steele, W. Greenhalgh, S. Martin, S-ro E. Whiston (Brisbano). S-inoj J. Lehane, R. Maltman, F-ino G. Morgan, S-ro R. Weis (Toowoomba). S-ino H. Nickels (Melburno). S-ino E. Taylor (Ormarbordo). S-ino D. Sinclair (Sunbrila Marbordo). Prof. R. Robertson (Manlio).

Dua.

En januaro, 1979, denove aranĝita de S-ino Jean Lehane en la kadro de DDIAE ĉe Kolegio-Fairholme, Toowoomba, okazis la dua somerlernejo. Partoprenis la kursojn 42 studantoj kaj instruis dum la dektaga periodo, la jenaj: S-ino Audrey Childs-Mee (klason por komencantoj /observantoj); Prof. R. Robertson (klason por post -kornencantoj); S-ro R. Ross (klason por mezgraduloj); S-ro T. Steele (klason por altgraduloj).

Dank' al la klopodoj de S-ro Wre Chandler kaj malavara donaco fare de la Federacio de NSK, kune kun donacoj de aliaj asocioj por helpi pri vojaĝkostoj de S-ino Childs-Mee, la ege valora kontribuo al la E-movado evidentiĝis, ne nur pro la demonstrado de la instrumetodo, sed ankaŭ pro la propaganda kontribuo per televid/radio-stacioj kaj en Toowoomba kaj en Brisbano. Ĉiuj, kaj instruistoj kaj studantoj, kaptis la okazon observi la metodon de S-ino Childs-Mee, kiu permesis, dum lecionoj, la uzon de unu sola libro, 'Oportuna Vortaro de 0rdinara Esperanto' de V. Setala. S-ro R. Robertson instruis per 'Privilegia Vojo' de V. Setala; S-ro R. Ross per 'Paŝoj al Plena Posedo' de W.Auld kaj legolibro 'Abismoj' de Jean Forge; S-ro T. Steele gvidis sian klason per studo de poezio - de Zamenhof, ĝis De Kook kaj Ragnarsson - kaj per legolibro ' La Senlingvulo˚ de V. Korolenko.

Distraĵo: kelkfoje la kursanoj el ĉiuj grupoj veturis al Kolegio-McGregor (ejo de DDIAE) por viziti artekspoziciojn aŭ por aŭskulti koncertojn prezentitajn de studantoj/instruistoj el muzikaj kursoj; okazis ekskursoj al vidindaĵoj ĉirkaŭ Toowoomba; Ges-roj Bob kaj Jean Weis ankoraŭfoje gastigis kursanojn per subĉiela rostfesto ĉe sia proksima bieneto;

bankedo kaj danco distris anojn dum la lasta vespero de la kurso; ĉiun vesperon, krom la supremenciitaj, okazis E-distraĵo aranĝita de S-inoj M. Ellyard, S. Fanos, D. Sinclair, B. Hart kaj S-ro John Moore. Nova sperto por multaj anoj estis la provo 'muziki per diĝeriduo˚ (indiĝena muzikilo) post kapabla demonstracio fare de S-ro S. Weis.

Kursanoj jene: S-inoj W. Greenhalgh, I. Griffiths, B. Hart, J. Lehane, S. Fanos, M. Ellyard, R. Maltman, M. McLeod, J. Green, R. Morrison, M. Neilson, R. Philp, M. Rozsa, D. Shonhan, D. Sinclair, A. Spencer, W. Stadhams, G. Stower, E. Taylor, J. Weis, H. Dark; F-inoj J. Turner, C. Sullivan, M. Weis, H. Mueller, D. Farrier, G. Morgan; S-roj S. Ellyard, W. Leah, 0. Loneragan, R. Smeets, J. Moore, A. Morrison, T. O'Grady, G. Shonhan, T. Wardman, C. Thomas, R. Weis, W. Chandler.

Tria.

La ĉiudujara somerlernejo okazis la 3an fojon en la kadro de DDIAE en Toowoomba en januaro, 1981. La loĝejo estis en Kolegio-Downlands (porknaboj-mezlernejo) - ne tre taŭga dormejo speciale por virinoj - tamen aliaj aspektoj estis unuaklasaj, klasĉambroj, manĝejo, naĝejo kaj teatro. Post iom da diskutoj inter la Federacioj de NSK kaj Kvinslando estis decidite ke pli centra loko, eble en Armidale  aŭ en Orange (urboj en NSK) estus pli konvena loko por estontaj somerlernejoj.

El Kvinslando 17, el NSK 14, el Viktorio 1, el Okc. Aŭst. 2, el Kanbero 3, entute 37 anoj partoprenis la trian lernejon de Esperanto. Bazan kurson por E-komencantoj gvidis S-ino A. Spencer, laŭ la rekta metodo ellaborita de S-ino Audrey Childs-Mee, kun lernolibro de Szilagyi, 'Practika Kurso en Esperanto'. Du knabinoj, Melissa Dawe kaj Michelle van Brunschot, el elementa lernejo 'Holy Name' (Sankta Nomo), kiuj gajnis stipendiojn de la E-Federacio de Kvins., estis la solaj studantoj.

Kurson por postkomencantoj (12 studantoj) instruis S-ino Jean Lehane, per 'Step by Step' de M. Butler.

Klason por progresintoj (9 studantoj) gvidis S-ro Ray Ross per ˚Pasoj al Plena Posedo' de W.Auld.

La kvaran grupon (10 studantoj) gvidis S-ro Trevor Steele per ˚Baza Literatura Krestomatio˚ de Benczik kaj per ˚Fianĉo de l'Sorto˚ de Rosbach.

Krom partopreni en distraj vesperoj en la kolegio, multaj anoj vizitis al la centra kolegio de DDIAE por ĉeesti koncertojn kaj aliajn prezentaĵojn kaj por partopreni en komuna rostfesto. Tuttaga pikniko en loka parko, kune kun vizitantoj el Brisbano kaj Toowoomba E-kluboj okazis dimanĉe; estis plezuro renkonti antaŭe nekonatajn samideanojn, sed bedaŭrinde loka veterano, S-ro Heber Petley, pro malsano, ne povis ĉeesti. Speciala vespera prezentalo de ˚Cindrulino˚ okazis kun ĉefrolantoj, Joan Green, Katie Wright kaj Robby Robertson, kompreneble kun aliaj helpantoj. Aliaj kontribuantoj al distraj horoj estis S-ino Marj Ellyard kaj S-ro Sam Ellyard; la du junaj knabinoj el la klaso de Annie Spencer prezentis lertmaniere, ege amuzan skeĉon (spektantoj varme aplaŭdis la prezentaĵon).

Je la okazo de la 74a naskiĝtaga datreveno de Wre Chandler, juna studanto, 14 jaraĝa Tero Lahteenmaki ceremonie prezentis specialan kukon al la veterano.  Ĉi tiu okazis dum la kursfina festo ĉe la lernejo.

Anoj kiuj partoprenis en la tria somerlernejo jene: F-inoj J. Turner, M. Straker, G. Morgan, J. Boyce, M. v. Brunschot, M. Dawe, J. Walker, S. Connors; S-inoj T. Metherall, P. Anson, M. Ellyard, J. Green, S. Leah, K. Wright, S. Burkitt, D. Morrison, N.McGuckin, R. Morrison, T. Anderson, I. Einihovici, M. Jefferis, S. Fanos, E. Giles; S-roj C. Pollard, S. Ellyard, W. Leah, C. Thomas, J. Couch, R. Robertson, W. Chandler, C. Bailey, T. Lahteenmaki, N. McCurran.

Kvara.

La federacioj de NSK kaj Kvins. kune decidis ke la kvara somerlernejo okazu ĉe Kolegio-Duval, Universitato de Nov-Anglio, en Armidale, NSK, dum januaro 1983. Speciala komitato prizorgis detalojn, anoj jene: S-inoj J. Green, S. Fanos; S-roj C. Thomas, R. Ross.

Denove estis kvar studgrupoj; kurson por post-komencantoj gvidis S-ro Alan Towsey, per 'Studlibro por la Aŭstralia Norma Elementa Diplomo' de Ken Linton, per 'Praktika Bildvortaro de Esperanto' kaj per tri lecionoj el `Paŝsoj al Plena Posedo' de W.Auld. Sep anoj partoprenis la kurson.

S-ino Annie Spencer kaj S-ro W. Chandler kunlaboris kiel belarta grupo; bedaŭrinde aliaj interesuloj ne povis ĉeesti, pro diversaj kialoj.

S-ro R. Ross gvidis dek progresanto jn laŭ 'Paŝoj al Plena Posedo' kaj 'Plena Gramatiko'. Plejparte ili priatentis gramatikajn punktojn, frazkonstruadon, elizion kaj ĝemelajn vortojn. Intertempe studantoj tradukis kaj diskutis aborigenajn legendojn; diskutis kaj analizis vortfigurojn el 'Abismoj' de Jean Forge.

En la literatura kurso, gvidata de S-ro T. Steele, naŭ partoprenantoj tralegis la libron 'Abismoj˚, studis la antologion 'Baza Literatura Krestomatio' de Denczik, pridiskutis elektajn erojn el 'Literatura mondo', 'Fonto' kaj 'Monato'.  ĉi tiu grupo ankaŭ kunlaboris kun S-ro R. Harry pri, ˚Aŭstraliaj Terminoj kaj Esprimoj', nemalhavebla ilo por tradukantoj de verkoj eldonotaj en la projektita Aŭstralia Antologio. (Aŭstralia E-Vortaro eldoniĝis en 1983).

Okazis dum la lerneja periado, distraĵvesperoj en kiuj partoprenis preskaŭ ĉiuj anoj; nĉefe responsis pri la programoj S-inoj Annie Spencer, Joan Green kaj Marj Ellyard. Tuttaga ekskurso kaj pikniko okazis dimanĉe al vidindaĵoj en la pitoreskaj kamparaj regionoj.

Estis plezuro bonvenigi studantojn el la foraj Okc. Aŭst., Norda Teritorio kaj Tasmanio al ĉi tiu nova studloko; jen estas listo de partoprenantoj: S-inoj J. Lehane, T. Metherall, A. Spencer, S. Burkitt, S. Fanos, J. Green, J. Nelson, K. Gassner, M. McLeod, P. Anson, S. Gradussov; F-inoj S. Connors, J. Turner, M. Straker, P. Harris, R. Harris; S-roj W. Chandler, Mac LeFevre, C.Thomas, R. Robertson, A. Towsey, R. Ross, T. Steele, R. Harry, I. Grahovic;
Ges-roj M. kaj A. Ross, W. kaj S. Leah, S. kaj M. Ellyard.

La komitato unuanime decidis starigi la Somerlernejon, 1985, ankaŭ ĉe Kolegio-Duval, en Armidale.

Kvina.

Januaron, 1985, okazis la kvina Somerlernejo de AEA ĉe Kolegio-Duval, en Armidale. Denove estis kvar studgrupoj: gvidis la kurson por postkomencantoj, S-ino M. Duncan per 'Virineto en Bluo' de Mason Stuttard, per 'Amuza j Dialogoj' de A. Lienhart kaj per rekta partopreno en skeĉoj kaj dialogo.

Instruis klason por progresintoj, S-ro R. Ross per 'Studlibro por la Supera' de Ken Linton, per 'Apokrifoj' de K. Ĉapek kaj per 'Paŝoj al Plena Posedo' de W.Auld.

S-ro R. Harry gvidis grupon por studi la aplikadon de la lingvo, per diskutado kaj praktikaj ekzercoj rilate al propaganda, ĵurnalismo, turismo kaj funkciado de la delegita reto.

La literatura stud-grupo de S-ro T. Steele tralegis la epopeon 'La Infana Raso' de W.Auld, la romanojn 'Kiu Semas Plorante' de E. Tofalvi kaj 0. Knichal kaj 'Kinkas Akvobleko' de J. Amado. Intertempe ili tradukis erojn por la 'Aŭstralia Antologio'.

Entute 46 anoj inkluzive de 10 el la fora Okc. Aŭstralio, ĉeestis la Somerlernejon. Komisiito de AEA por somerlernejo estis R. Ross kaj kunlaboris pri la starigo de la kursoj, S-ino Joan Green kaj S-ro Carson Thomas.

Unu ĉefcelo de la lernejo fruktiĝis kiam 11 studantoj sukcesis pri la parola parto de 'Elementa Ekzameno de AEA' kaj 3 kandidatoj sukcesis pri la parola parto de la 'Supera Ekzameno de AEA', je la fino de la kursoj; cent procento de la kandidatoj!

Distraj vesperoj kaj ekskursoj ebliĝis al la kursanoj malstreĉiĝi; S-ino M. Ellyard kaj S-ro A. Cocking respondecis pri la vesperaj eroj en kiuj ĉiuj anoj partoprenis de tempo al tempo.

Okazis ankaŭ kunvenoj (2) de AEA; la ebla starigo de festo en la kadro de la somerlernejo en 1987 estis sugestita; dum ĉi tiu festo okazos la lanĉo de la aŭstralia soleno rilate al la centjara jubileo de Esperanto. Speciala komitato prizorgos detalojn pri la solenaĵo.

Anoj (46) kiuj partoprenis la kvinan somerlernejon jene: S-inoj M. Duncan, D. Russell, M. Chandler, K. McCashney, U. Casey, E. Arthur, K. Gassner, M. Packham, K. Montefiore, J. Green, T. Metherall, A. Gash, V. Payne, S. Burkitt, M. Ellyard, W. Greenhalgh, R. Philp, I. Timonin, B. Cleminson, I. Einihovici, E. Graham; F-ino j J. Turner, L. Casey, J. Boyce; S-ro j R. Robertson, W. Clarke, A. Cocking, L. Eddington, P. Ellyard, G. Gregson, R. Harry, E. Hart, E. Hewitt, N. McCurran, J. Mills, H. Peddie, M. Ross, R. Ross, T. Steele, C. Thomas, P. Fife, A. Davey; Ges-roj W. kaj S. Leah. (Du japanaj gejunuloj, Joŝiko Unno kaj Cutomu Suganami vizitis la somerlernejon dum kelkaj tagoj).

Ĉapiro 10

## ESPERANTAJ GRUP0J EL N0V-ZELAND0 KIUJ ALIĜIS AL LA AŬSTRALAZIA ESPERANT0-AS0CI0

Esperantistoj el Nov-Zelando aliĝis al la Aŭstralazia Esperanto-Asocio grupe kaj individue post la fondiĝo de tiu asocio, la 15an de oktobro 1920. Dum la eldon-periodo (1920-1934) de La Suda Kruco, oficiala organo de la nacia asocio, kluboj kaj societoj en Nov-Zelando konstante raportis pri agado kaj personoj kiuj estris kaj gvidis tiujn grupojn. Ec post la refondiĝo la 26an de januaro 1929, de la Nov-Zelanda E-Asocio (NZEA), raportoj aperis monaton post monato en Suda Kruco ĝis la fina eldono en 1934. Sekvas mallongaj elĉerpaĵoj el Suda Kruco rilate al E-grupoj dum la supremenciitaj jaroj, 1920-1934.

S-ro W. H. King elektiĝis prez.de AEA (A-ziaEA) en 1924 kaj prezidis la 5an Kongreson de AEA en 1925. (Denove la aŭtoro ripetas ke ĉi tiu sekcio rilatas sole al tiuj grupoj el NovZelando, pri kiuj troviĝas novaĵo en Suda Kruco (1920-1934) kaj neniel pretendas prezenti integran parton de la historio de Esperanto en tiu lando).

Whangarie-Grupo Esperanta: fondiĝis 1920; prez. S-ro D.Tilley; sekr. S-ro W. H. King; instruis 1921-1927 S-ro F. E. Moreton, 1928 S-ro W. H. Chetham. Pionira fondinto, Pastro J. H. Hawkes mortis la 13an de junio 1932, ĉe Remuera. Estraro, 1925: prez. S-ro D.Tilley; sekr. S-ro C. Weymouth. S-ro Tilley tre aktivis pri E-radio-brodkastoj en Whangerie kaj S-ro W. Chetham (politikisto) ankaŭ tre aktivis pri Esperanto dum 1928.

Christchurch: en 1921, S-ro N. M. Bell estis instruisto; li ankaŭ aktivis pri E-brodkastoj per radio 3YK ĝis 1927. S-ino Page ankaŭ propagandis pri Esperanto, 1927-1928, je la sama radio-stacio. En majo 1928, Christchurch E-Societo fondiĝis, sekr. S-ro N. M. Bell. Aliaj aktivuloj: S-roj L. Efford kaj A. W. Page. Poste S-ro N. Bell estis vicprez. de NZEA.

Gisborne: en 1921, klasoj okazis ĉe la hejmo de S-ro Crawford; S-ro J. L. King ankaŭ starigis kurson en Gisborne. S-ro King multe propagandis per radio kaj per artikoloj en gazetaro; li mortis la 25an de septembro, 1927.

Auckland: en 1921, F-ino M. McCarthy instruis grupon; la socialista grupo rekomencis kunvenojn ĉe 175 Strato-Symonds, sekr. estis S-ino H. E. Dewing. En 1926, fondiĝis Aŭklanda E-Societo, estraro jene: prez. J. S. Russell; vicprez. S-ino A. Dewing; sekr./kas. R. J. Crago; k-ano j: E. Dewing, C. H. Parker, S-ino Watkins, F-ino James. En 1927, malnova ano, S-ro J. S. Russell starigis klason ĉe Remeura. Aktivulo, S-ro Crago propagandis per radiostacio 1 YA. S-ro W.H. King, Aŭklando, proponis la restarigon de NZEA (legu poste). Mortis la 17an de aprilo, 1927, E-pioniro el Nov-Zelando, S-ro C. H. Parker. En 1928, S-ino Watkin estris klubon ĉe St. Helens. S-ro C.A.Adcock, per artikoloj en ĵurnaloj, forte subtenis la temon, 'Esperanto en la Lernejoj'; kunlaboris tiuĉele, S-ro E. A. Watkin kaj S-ino J. L. King. Ĉiuj tri faris brodkastojn per radio-stacio, 1YA. Aŭklanda E-Asocio 1929, estraro jene: prez. J. Russell; vicprez. E. Clark; sekr./kas. E. Watkin; k-anoj: S-roj Woodward, Woolaxall kaj Druery.

Palmerston North: en 1921, starigis kaj instruis grupon, S-ro Rod Ross, kiu aktivis pri instruado ĝis 1931. Li ankaŭ instruis grupon ĉe Feilding, 1925-1931; li mortis en 1934. S-ro Ross estis UEA-Delegito; vic-del. estis S-ro A. Williamson.

Wellington: en 1921 fondiĝis nova grupo 'The Wellington Esperanto Magazine Club' (La Velingtona Magazin-Klubo); gvidanto estis S-ro V. L. Daniel. En 1925 okazis sugesto de S-ro W. H. King pri nacia kongreso en Nov-Zelando kaj pri restarigo de NZEA (legu poste). En 1926, tre aktivis en E-aferoj, S-ro W. L. Edmanson (antaŭa prez.de Komerca Klubo en Melburno, 1912), S-ro W. H, King kaj S-ro L. E. Dust, per radio-stacio 2YK. La 31 an de aŭgusto, 1927, fondiĝis la E-Klubo de Velingtono, estraro jene: prez. W. L. Edmansan; vicprez. L. E. Dust; sekr. Bertram Potts; kas. U. L. Daniel. Dum Zamenhofa Festo, 1927, plena programo prezentiĝis, al kiu kontribuis: F-ino McQuarrie, S-roj Ballantyne-Russell, Daniel, McGuigan, B. Potts, W. Edmanson kaj W. H. King. En 1928, S-roj Edmanson, King kaj Jack, tre aktivis en klub-aferoj; S-ro G. Gordon (Ĉ.5),(Ĉ.8) donacis al la klubo 30 E-librojn. Estraro en 1928 jene: prez. E. C. Jack; vicprez. V. L. Daniel, sekr. B. Potts, kas. L. E. Dust; libr. F-ino W. Tricker.

En 1929, nova klubo ĉe YMCA (Junula Kristana Asocio) stariĝis; F-ino C. Smythson instruis la grupon. Estraro, 1929: prez. E. Jack; vicprez. F-ino C. Smythson; sekr. B. Potts; kas. L. Dust. La klubo daŭriĝis agadon dum 1930-1931; estraro kiel en 1929. En 1932 nova estraro: prez. B. Potts; vicprez. E. Jack, sekr. F-ino G. Canty; kas. L. Dust. En 1933 sola ŝanĝo estis je vicprez. kie V. Leck anstataŭis S-ron Jack. En 1934 estraro estis: prez. V. Lock; vicprez. F-ino C. Smythson; sekr. C. T. Cooch; kas. L. Dust.

Greymouth: grupo kunstudis en 1921.
Nelson: grupo kunstudis en 1924.

Dunedin: 1924 F-ino M. McCarthy gvidis grupon; 1926 F-ino McCarthy estis sekr.de grupo; en 1929, post vizito de S-ro C. Adcock, nova klaso komenciĝis. F-ino McCarthy daŭre laboris por Esperanto ĝis sia morto, la 13an de oktobro 1934.

Dargaville: 1924-1926: grupon instruis Alfred Gregory kiu ankaŭ estis prez.de la grupo; sekr. estis R. Pope.

Masterton: en 1925 grupo stariĝis, estraro jene: prez. kaj instruisto, S-ro A. Dewar, sekr. S-ino L. Payne de 1926 ĝis 1928, instruado daŭris kaj raporto de plensukcesa Zamenhof-Festo en 1929, estraro jene: prez. A. Dewar; vicprez. J. McNab; sekr. S-ino L. Payne; k-ano j: E. Coleman, H. Franks, H. Arthur; aliaj aktivuloj: F-ino Jamieson; S-roj Garvich, Bullock, Green; S-inoj Spiers, Rosewarne. Ŝanĝo al estraro en 1930: prez. S-ro Jotus; sekr. S-ino H. Franks. Mortis la 23an de januaro 1931, S-ino L. Payne, kunfondinto de la grupo. Dum 1931, ankoraŭ instruis al klubanoj, S-ro A. Dewar; aktivis S-ino McNab kaj S-ro Shepherd. En 1932 prez. estis A. Dewar; vicprez. J. McNab; sekr./kas. H. Franks; instruis F-ino Ibbetson kaj B. Johns. Okazis en Masterton, 1932, la 4a Nov-Zelanda Kongreso. En 1933-1934 S-ro A. Dewar prezidis, S-ino McNab kaj B. Johns estis vicprez-oj, sekr./kas. estis H. Franks; la Hon. Patrono estis G. R. Sykes.

Wanganui: 1927, S-ro F. E. Moreton instruis grupon; 1928, aktivis S-ro W. H. Chetham; en 1932 S-ro S. J. Nolan gvidis la grupon.

Hamilton: 1927, S-ro Brailsford estris grupon; 1929, S-ro C. Adcock gvidis klason; 1930, S-ro Adcock vizitis al Hamilton kie li prelegis al anoj de Rotary (Rotario) kaj al antaŭaj anoj de la E-Klubo; li instigis al antaŭaj anoj restarigi la E-Klubon en Hamilton.

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio

En januaro, 1929 restariĝis NZEA dum konferenco en Wellington. Iniciantoj estis S-roj C. J. Adcock, W. L. Edmanson kaj W. H. King. Je la fino de 1929 pli ol ducent anoj aliĝis al la asocio. Estraro elektiĝis jene: prez. C. J. Adcock; vicprez-oj S-ino E. M. Watkin, S-ro L. Dust, S-ro J. S. Russell, S-ro N. M. Bell; sekr. S-ro W. M. King; kas. S-ro E. Jack.

En 1932 okazis ŝanĝo al estraro: prez. L. E. Dust; vicprez-oj S-ino J. Allan, S-roj J. A. Hodges, N. M. Bell, C. J. Adcock; sekr. W. H. King; kas. E. C. Jack. En 1934 la jena estraro elektiĝis: prez. W. L. Edmanson; vicprez-oj C. Brandon, H. E. Facer, A. Dewar, L. A. Efford; sekr. W. H. King; kas. E. C. Jack.

## Ĉapitro 11

## PRI LA PROPONITA UNIVERSALA KONGRESO - BRISBANO, 1988.

Dum la 23a Kongreso de AEA ĉe Adelaido en januaro, 1982, kongresanoj akceptis proponon de S-ro R. L. Harry, ke la estraro de AEA invitu la 1988-an Universalan Kongreson, en la Jubilea Jaro de Aŭstralio. S-ro Harry ankaŭ proponis ke Brisbane estu la loko de tiu U/Kongresa

La estraro de BES, kune kun aliaj volontuloj, akceptis la rolon de provizora LKK, jene: prez. T. Steele; sekr. R. Ross; kas. S-ino S. Martin; k-ano j: S-inoj P. Ross, M. Spork, G. Phillips, K. Andersen, L. Newman, R. Morrison, A. Spencer; F-ino L. Farr; Ges-roj J. kaj J. Dimo, G. kaj D. Shonhan, C. kaj m. Bailey; S-roj J. Paroz, T. 0'Grady, M. Schramm. Anoj de Toowoomba kaj St. Lucia grupoj proponis pluan helpon pri specialaj taskoj. Ĉar la E-Federacio de Kvinslando estas korporacie registrita ĝi poste anstataŭis la Brisbanan E-Societon kaj responsis pri organizado de la proponita kongreso.

Intertempe la LKK aktivis pri lokaj instancoj kaj ricevis kuraĝigan subtenon fare de la ministro por Turismo, Turista Korporacio de Kvinslando kaj Turista Buroo; Brisbana Magistrato, inkluzive de Invito de la Urbestro; Brisbana Konvencio-Buroo; Nacia Instanco pri Dujarcenta Jubileo; Aŭstralia Nacia Flugkompanio QANTAS. Dume, en Kanbero, prez. de AEA, S-ro Harry sukcesis pri senpera subteno fare de la Ĉef-Ministro, S-ro R. J. Hawke, kiu, en Julio 1983 sendis mesaĝon al la U/Kongreso en Budapesto jene: "mi salutas la 68an Kongreson de Esperanto kaj deziras por ĝi plenan sukceson; mi esperas ke la 73a Kongreso estos en Brisbano, Aŭstralio, en la jaro de nia Ducentjara Jubileo, 1988". Post la kongreso en Budapesto, la estraro de UEA decidis PRINCIPE akcepti la inviton de AEA por okazigi la U/Kongreson, 1988, en Brisbano.

LKK aranĝis loĝejon ĉe la Universitato de Kvinslando dum la periodo de la projektota kongreso kaj provizore esploris detalojn pri ekskursoj, programeroj, enlanda veturado kaj diversaj aferoj rilate al tia kongreso. La flugkompanio QANTAS ege kontribuis al kongrespreparado per donaco de senpagaj flugbiletoj por ebligi du anojn de LKK veturi al U/Kongresoj en Vankuvero 1984, Augsburg 1985, Pekino 1986 kaj Uarsovio 1987. Aldone al tio QANTAS promesis broŝurojn, senpagan portadon de dokumentoj al eksterlandaj flughavenoj kaj monkontribuon por presado de propagand-broŝuroj.

Du anoj de LKK, Jim Dimo kaj Ray Ross, veturis al Vankuvero du semajnojn antaŭ la kongreso por labori kun la tiea LKK, antaŭ kaj dum la U/Kongreso. Ili gajnis multe da sperto kaj samtempe povis disvastigi informadon pri la projektota U/K en Aŭstralio, en 1988. Ĉiuj faktoj pri la LKK-agado en Brisbano estis prezentitaj al la estraro de UEA. Je la fino de la kongreso en Vankuvero, prez, de AEA, Ralph Harry, Jim Dimo kaj Ray Ross kunvenis kun la estraro de UEA; prez, de UEA, S-ro G. Maertens, elparolis jene: "sekve de la diskuto j en Vankuvero pri vianoma invito de AEA, ke UEA organizu la 73an Universalan Kongreson en Brisbano, la estraro de UEA esprimis sin tre favora al la invito el movado vidpunkto, sed havas gravajn zorgojn pri la financa sekvo. Por garantii la financan bazon de la aranĝo por UEA, la estraro proponas starigi la sekvantajn kondiĉojn antaŭ ol definitive akcepti la inviton; ni petas, ke tiuj kondiĉoj estu plenumitaj aŭ, ke oni proponu similefikajn solvojn. La kondiĉoj estas:

1. Se la gajno de la kongreso ne sufiĉas por ĉertigi, ke la sumo pagenda al UEA laŭ paragrafo 31 de la Kongresa Regularo atingas kvin mil aŭstraliajn dolarojn ($A5000), AEA garantias aldoni la diferencon.

2. 18 senpagaj flugbiletoj estu havigitaj por flugo al la U/K de 9 estraranoj, 4 oficistoj de UEA kaj 5 ceteraj gravaj kontribuantoj al la kongresa programo ankoraŭ nomotaj.
3. 6 senpagaj biletoj estu havigitaj al oficistoj aŭ estraraj komisiitoj dum la jaroj 1984-1988 por kongresorganizaj vizitoj.
4. Estu adekvata garantiita aranĝo kun flugkompanio pri rabatoj de flugprezoj por kongresanoj, pri kiu ni aparte interkonsentu post ricevo de viaj proponoj".

La unua kunveno de LKK en Brisbano diskutis la postulatajn kondiĉojn kaj EFK malakceptis responson pri la garantio de $A5000; poste, estraro de AEA akceptis tiun responson. Rilate al la aliaj tri kondiĉoj, estis decidite informi la flugkompanion, QANTAS; kompreneble estus nura komerca decido flanke de QANTAS, "ĉu ili sufiĉe gajnus per donaco de plua 24 flugbiletoj por certigi ke la U/K okazu en Brisbano. La 31an de oktobro QANTAS respondis jene:" pri kondiĉoj 2 kaj 3 (pri senpagaj flugbiletoj) ili ne subtenas la kondiĉojn; pri la 4a kondiĉo ili ne garantias specialan rabaton por kongresanoj, tamen negocoj pri la plej avantaĝaj vetur-aranĝoj laŭ la tiutempa komerca 'klimato' estos haveblaj". LKK informis la prez-n, S-ro Mac LeFevre, pri la decido de QANTAS kaj kunveno de AEA-estraranoj estis aranĝita dum la E-Somerlernejo en Armidale, la 10an de januaro 1985. Samtempe LKK sciigis al S-ro R. Lindblom, UEA-estrarano pri kongresoj, pri la tiutempa situacio rilate al kondicoj 2, 3, 4.

Dum la estraro de AEA en Armidale diskutis la kongres-aferon, alvenis letero de prez. de UEA kiu tekstis jene: "ĉar AEA ne povas plenumi la kondiĉojn postulatajn en la letero de S-ro Lindblom al la E-Federacio de Kvinslando, UEA decidis ke la 73a U/Kongreso ne okazu en Aŭstralio".

La 17an de marto, 1985, prez, de AEA, S-ro Mac LeFevre respondis: "Bedaŭre mi ne povis ĉeesti la aranĝitan kunsidon de AEA-estraro ĉe Armidale frue en januaro ĉar mi estis en hospitalo, do mi petas pardonon pro mia prokrastita respondo al via letero de la 1a de januaro. La estraro kunsidis sub la gvidado de vicprez. S-ro Ralph Harry, kaj plenkonsideris la proponitan 1988-an kongreson en Brisbano. La aktualinformo de via letero alvenis je la ĝusta momento. Nia estraro bone komprenas la koncernon de UEA pri la neceso por gardi, kaj eĉ refortigi siajn financajn aferojn, post la elspezoj de la Jubileo, sed ni ne povas kompreni, aŭ akcepti, ke la proponita kongreso en Aŭstralia devus esti elektita por ŝultri tiun ŝarĝon por plenumi la kason de UEA.

Ni iomete miris, ke post nia invito UEA ŝanĝis la regularon, kaj tiel postulis:
a) ke AEA garantiu profiton por UEA de $A5000
b) ke AEA aranĝu 24 senpagajn flugbiletojn por personoj nomitaj de UEA
c) ke estu adekvata garantiita aranĝo kun flugkompanio pri rabatoj de flugprezoj por kongresanoj.

Atendante, ke UEA akceptus nian 1983-an inviton (ni ne atendis novajn pli malfacilajn financajn kondiĉojn), ni tuj kaj entuziasme:
a) establis viglan organizan komitaton en Brisbano
b) aranĝis komencan fonduson por tiu komitato, kiu vice aranĝis:
(1) 8 senpagajn biletojn por helpi pri la preparo de la kongreso
(2) por la flugkompanio QANTAS, doni specialajn malmultajn prezojn por ara vojaĝado al la proponita kongreso.
(3) bonan kongres-lokon en Brisbano
c) proponis, ke UEA ricevu la jam garantiitan profiton ĝis $A5000
c) garantiis al UEA kontraŭ perdo.

Evidente ĉi tiuj aranĝoj, kiujn ni faris en la komenco, ne sufiĉis, ĉar en via letero vi invitis nin gastigi Universalan Kongreson, ne en 1988, sed je iu tempo post 1990. Ne eblas por ni bedaŭre, akcepti tiun inviton dum tiuj novaj kondiĉoj aplikas al nia popolo, kiu estas relative malgranda, kaj unu el la plej disvastigita en la tuta mondo.

Estimata Prezidanto, ĉar amikoj en multaj landoj planis veni al Brishano kaj petadas informon pri la situacio, mi petas, ke vi publikigu ĉi tiun leteron en 'Esperanto', por ke ĉiuj bone sCiu pri la afero kaj pri la faktoj.

Malgraŭ nia ne sukcesa invito por Mond-kongreso, ni ĉiam ĝoje entreprenos en aferoj, kie eblas por ni helpi al UEA en la kreskigo de la universala lingvo, Esperanto".

(Elĉerpaĵo el letero de S-ro Humphrey Tonkin, Vic-Prezidanto de UEA, al S-ro Ralph Harry, Vic-Prezidanto de AEA, 14an de januaro 1985). "La kondiĉoj, kiujn Estraro prezentis al la organizantoj de la kongreso, fontis el la objektiva konstato, ke en 1988, tuj post la grandaj streboj kunlige kun la Jubileo, la financa stato de UEA estos verŝajne iom malforta. Se oni aldonas al tio, ke multaj unuopaj esperantistoj elspezos sian monon vojaĝante aŭ al Pekino en 1986, aŭ al Varsovio en 1987, oni povas antaŭvidi iom malgrandan kongreson en Aŭstralia - ĝuste tiam kiam UEA bezonas enspezojn por daŭrigi sian laboron".

Ĝisdate (la fino de 1985) AEA ne ricevis de UEA, pluan informon aŭ komenton rilate al la letero de S-ro Mac LeFevre, prez. de AEA, kaj verŝajne ne estas ia inklino flanke de UEA publikigi la faktojn koncerne al la supremenciitaj "kondiĉoj".

▌▌▌▌▌

MALLONGIGOJ

| | |
|---|---|
| AE | Aŭstralian Esperantist |
| AEA | Aŭstralia Esperanto-Asocio |
| AEK | Adelaida E-Klubo |
| AES | Adelaida E-Societo |
| AFT | Aŭstralia Federala Teritorio |
| AIEA | Aŭstralia Instruista E-Asocio |
| AIES | Aŭstralia Instruista E-Societo |
| ANA | Aŭstraliaj Ennaskuloj-Asocio (Australian Natives Association) |
| A-ziaEA | Aŭstralazia E-Asocio |
| BEA | Brita E-Asocio |
| BEK | Brisbana E-Klubo |
| BES | Brisbana E-Societo |
| bibl. | bibliotekisto |
| (ĉ.) | Ĉapitro |
| ĈD | Ĉef-delegito |
| D | delegito |
| DBEA | Diplomito de BEA |
| DDIAE | Instituto de Supera Edukado en Toowoomba |
| E | Esperanto |
| EF de NSK | Esperanto-Federacio de Nova Sudkimrujo |
| EF de Vik. | Esperanto-Federacio de Viktoria |
| EFK | Esperanto-Federacio de Kvinslando |
| ELOA | Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio |
| FBEA | Fratulo de BEA |
| FD | fak-delegito |
| Fed. | Federacio |
| HEG | Hobarta E-Grupo |
| HEK | Hobarta E-Klubo |
| HES | Hobarta E-Societo |
| help-sekr. | help-sekretario |
| Hon. | Honora |
| IEL | Internacia E-Ligo |
| ILEI | Internacia Ligo de E-Instruistoj |
| JD | junul-delegito |
| k-anoj | komitatanoj |
| kas. | kasisto |
| kas-k. | kas-kontrolisto |
| Kav-iro | Kavaliro |
| KEK | Kanbera E-Klubo |
| Kvins. | Kvinslando |

| | |
|---|---|
| LEK | Launcestona E-Klubo |
| libr, | libristo |
| LKK | Loka Kongresa Komitato |
| LP | libro-peranto |
| MEK | Melburna E-Klubo |
| MES | Melburna E-Societo |
| NSK | Nova Sudkimrujo |
| NZEA | Nov-Zelanda E-Asocio |
| Okc. Aŭst. | Okcidenta Aŭstralio |
| PAPIE | Pacifika Asocio Por Instruado de Esperanto |
| P.O. | Publikiga Oficisto |
| PRO | Publik-Rilatoj-Oficisto |
| prez. | prezidanto |
| proks. | proksimume |
| QANTAS | Aŭstralia Nacia Flug-Linio |
| Red. | redaktoro |
| SAT | Sennacia Asocio Tutmonda |
| sekr. | sekretario |
| SEL | Skolta E-Ligo |
| SES | Sidneja E-Societo |
| Sud-Aŭst. | Sud-Aŭstralio |
| SUKRO | La Suda Kruceto |
| Tas. | Tasmanio |
| TEA | Tasmania E-Asocio |
| TEJO | Tutmonda Esperantista Junulara Organizo |
| TES | Tasmania E-Societo |
| UEA | Universala E-Asocio |
| U/K | Universala Kongreso |
| U/Kongreso | Universala Kongreso |
| UNO | Unuiĝintaj Nacioj-Organizo |
| VD | Vic-delegito |
| Vicprez. | Vicprezidanto |
| Vik. | Viktorio |
| WEA | Laborista Eduka Asocio |

* * * * *